

HELECO



Pres-organo de:
Astura Esperanta-Asocio



Numero 84

Augusto 2009

Astura Esperanta-Asocio

Sidejo: strato Tomás y Valiente, 1 -2ª etaĝo
33201-GIJÓN (ASTURIO-HISPANIO)

Interret-paĝo: <http://uica.info/esperanto>

Retadreso: asturias@telecable.es
<mailto:esperanto@uica.info>

Astura Esperanto-Asocio estas esperantista rondo kiu plenumas sian rolon favore al la disvastigado de la **Internacia Lingvo** unualoke en nia urbo, Gijón, kaj ankaŭ, leŭeble, en tiuj partoj de la Asturia regiono, kie ne ekzistas lokaj grupoj de **Esperanto**.

Nia agado disvolviĝas kadre de: **Cátedra JOVELLANOS de Extensión Universitaria**

<u>Enhavo</u>	<u>Paĝo</u>
ASTURA ESPERANTA ASOCIO.- Nia dumjara laborado	3-5
Naturo de la nuna ekonomia krizo	6-7
Informoj pri UEA	8-9
Kuirante kun Pilar	10
Astura Esperanta Asocio Centjara	11
Antaŭaĵoj de la afero	12-13
Apoteozo en Barcelono	14-15
Per flugiloj de facila vento	16-17
Popolo popolon atakas kruele...	18-19
Renaskiĝo	20-25
Hispanio kontraŭ Hispanio	26-27
Frat' fraton atakas ŝakale	28-29
La silenta jardeko	30-31
16a Hispana Kongreso de Esperanto	32-33
Grupo Esperantista Jovellanos	34-41
Hispana Kongreso de Esperanto en Mieres	42-43
La kursoj de Santiago Mulas	44-45
Transira epoko	46-51
39a Hispana Kongreso de Esperanto	52-57
Astura Esperanta Asocio reakiras sian nomon	58-61
Nia diligenta kolegaro...	62-67
Centjara Jubileo de Esperanto	68-69
Asturaj Kongresoj de Esperanto	70-75
Evoluo de HELECO	76-79
La Festoj de la Lingvoj	80-85
En Interreto	86-91
68a Hispana Esperanto-Kongreso	92-93
SOLIDARECO. Prelego de Luis Serrano	93-96
Universala Kongreso en Bjalistoko	97-99
Ni ridu iomete	100

La enhavo de la tekstoj de ĉi-tiu revuo ne esprimas oficialan opinion de **Astura Esperanto-Asocio**: pri ili respondecas la verkintoj mem.

Leĝa Registro 0/319/85



Astura Esperanta Asocio

NIA DUMJARA LABORADO



Jen la 84a numero de nia revuo. Ĉi foje ni atingis rekordon en kio rilatas al la nombro da paĝoj. 100 paĝojn! Ja, tio estas ia maniero festi kaj reliefigi tion ke nia **Astura Esperanta Asocio** ĵus fariĝis Centjara.

Tion ni devas soleni iamaniere. Do, ĉi tiu numero de **HELECO** estas speciale dediĉita al la jarcenta historio de la Esperanta movado en nia urbo, kaj tio, ja, ne povas esti farita en la kutima nombro da paĝoj de la revuo.

Por la kompilado de tiu historio estis necese movi grandan amason da paperaĵoj, traserĉi dokumentaron, kolekti fotografiaĵojn, tralegi artikolojn kaj dosierojn... Ĉio-ĉi, ja, devas esti enkalkulata en la dumjara laborado pri kiu raportas ĉi artikolo.

Oni devis prepari ankaŭ dokumentaron por provizi ĝin al la informmedioj kiuj konsentus publikigi ion pri Esperanto, nia E-asocio kaj ties Centjaro. Tiurilate oni atingis ion: La Princlanda

Radio-stacio elsendis, en monato julio, intervjuon faritan al la Prezidanto kaj la Sekretario de **Astura Esperanta Asocio**. Kaj la tagĵurnalo **La Nueva España** de Gijón publikigis, en monato aŭgusto, raporton pri nia Esperanta asocio kaj ties historio. Ni esperu ke tiu publika apero de esperantista asocio utilu por la altiro de gelernantoj por la venonjaraj kursoj.

La ellaborado de la revuo ne apartigis nin de la plenumo de la informado specife adresita al la membraro de la E-grupo, t.e. **AEA-Infomilo**. La 5a numero de tiu informilo estis eldonita en aprilo de la nuna jaro. Per ĝi, krom alia informo kiu jam estis prira-

portita en la antaŭa numero de **HELECO**, oni informis ankaŭ pri aliaj aferoj okazintaj post la eldono de la 83a numero de la revuo. Tia estis la kazo de la esperantista festo aŭ Zamenhofa Tago de la jaro 2008, okazinta la 14an de decembro, en tre malfavoraj veteraj kondiĉoj. La partoprenantoj ne estis mult-

taj kompare al antaŭaj jaroj pro tio ke la vetero estis tre akra. Ne eblis stari ekstere en la strato Esperanto. La ĉeestantaro devis atendi en kafodrinkejo la horon por la bankedo. La bankedo okazis en Restoracio **Parrilla Muñó**. En ĝi regis, la kutime bona kaj afabla etoso de tiutipaj renkontiĝoj.

Alia afero pri kiu raportis la **AEA-Infomilo** estis la forpaso de samideano Juan Manzano Bartolomé, kiu estis okazinta la 10an de novembro de 2008. Kun li malaperis la lasta el la iamaj membroj de **La Verda Kolombejo** kiuj translokiĝis al nia urbo kaj al nia E-grupo antaŭ proksimume 30 jarojn.

Se la ellaborado de ĉi revuo ne malebligis la publikigon de la informilo, ne okazis same en kio rilatas al la Interreta paĝo de la Asocio. Dum la lasta jaro nur tre malmulte da materialo estis enkondukita en la mondan reton. Kaj tio estas sufiĉe malbona afero ĉar la ret-paĝo estas nia plej potenca ilo de sureksteraj projekciado. Pli grava ol la internaj informiloj kaj la raportoj pri la esperantistaj festoj de la E-grupoj estas la E-kursoj kaj Esperantaj materialoj destinataj al la ĝenerala publiko, ĉar ĉiu esperantista rondo ne ekzistas por si mem, sed por propagandi favore al la internacia lingvo kaj diskonigi ĝin.

Rilate al la interreta paĝo oni devas reliefigi ke la farena laboro estas enorma. La efiko de la per-

A.E.A.-informilo

Numero 5 Aprilo 2009

Por Esperanta propagando

La 5an de januaro de la pasinta jaro kelkaj membroj el la estraro de Astura Esperanta Asocio renkontiĝis kun kelkaj elstarantaj geesperantistoj en Prunjo, ĉe la binao de la kanacio Valeriu Pérez. Ĉi tiu estas esperantisto alĝita al la ĉ. Paŭlino Serejs, la ĝistaga servo por la Esperanto. Paŭlino Serejs estas aĉasanto de tonoj el la tuta mondo, kaj serpege akceptas gastejn en siaj hejmoj. La ĝistagatoj indikas la sencindon, ekcepte pli rufinadon, al la nombro da gastej kiuj venas, kaj postas menciitaj diversaj komentojn pri siaj intertoj, deerto, interpubliko kaj simila. Ĝistagatoj ĝust akcepti homojn de diversaj landoj, gastej juos serpagas ardator, kaj li facile akomodindas per Paŭlino Serejs. Ofte, ĝistagatoj hebras al gastej pri transportado, kio estas la loko kaj.

Ĉi tiu, la gastej de nia samideano Valeriu estas ano da geesperantistoj el diversaj landoj de la Eŭropa Unio: Germanio, Italio, Polujo kaj preske Francio. Ĝi okazas ĉi tiu per aldono de la laperis ĝuste pri nia vojaĝo. Post tiam kelkaj landoj de Okcidenta Eŭropo kiuj estas ankoraŭ ĝistagato. Ĝi estas estis Kompostelo, sed ĝi kiuj estis al la organizinto kaj ĝistagato de nia asocio, profesoro Miehle Abada-Simon, ĝi vojaĝi estas nek pligrandeco nek taranto sed propaganda manifestacio favore al Esperanto. La tago antaŭ ĝi aldono al Astura ĝi estis en Ĥilano samideano didonate propagandon pri la Interreta Paĝo. Tio ĝi fatis en ĝi loko kien ĝi aldono: tiam ĝi estis plenumite tian aldono al Ĥilano. Ĝi plenumo ĝistagato vojaĝi per venontaj ĝistagato kaj ĝistagato la tago ĝistagato geesperantistoj informo en ĝi. La ĝistagato kaj ĝistagato membroj de ĝi aldono ĝistagato pri ĝi aldono kien ĝi procejo por propagandon ĝistagato Esperanto en ĝi landoj. Ĝistagato de ĝi aldono por ĝi ĝistagato de Eŭropa Unio ĝi procejo esperantistoj: landidato, kiuj rigejas ĝist agadoj un aldono ĝistagato. Pri ĝi tiam vado ĝi aldono informo en la numero 5 da la revuo HELECO.



FOTO-RAPORTO DE LA RENKONTIĜO



reta propagando pri Esperanto estas en rekta proporcio al la kvanto da materialo enretigita. Ju pli da pri- kaj perEsperanta materialo en la reto, kaj ju pli da temoj estas pritraktaj per ĝi, des pli da

personoj povas trovi ion el ĝi kiam ili serĉos ion en Interreto, kaj ekscii pri la internacia lingvo dank' al la eventuale trovita Esperanta materialo.

Sed estas tre malgranda la kapablo de nia E-grupo por enretigi tekstojn, informojn, eseojn, artikolojn... Por tiu tasko, nia E-asocio bezonus sufiĉe ampleksan teamon da spertaj informadik-fakuloj kapablaj ellabori ttt-paĝojn, aŭ almenaŭ, sendantojn de

esperantigitaj tekstoj jam surbendigitaj, ekzemple sendataj al ni per retroŝto, tiel ke oni ne devu tajp-skribi ilin. Pri kiuj temoj? Pri ĉiuj ajn temoj ĉar interesas ke en la reto ekzistu ĉiutipa Esperanta materialo. Sed, se konkretigi, taŭgas recenzoj de filmoj kaj libroj, artikoloj pri aktualaj temoj, prihistoriaj raportoj... Oni sin detenu pri materialoj kiuj jam ekzistas esperantlingve en la reto; estus sensencaĵo ripeti alies laboron.

Foje nia E-grupo ricevas viziton de foraj samideanoj. En la jarcenta historio de nia E-rondo, kiun ni prezentas en ĉi tiu numero de la revuo, oni mencias multajn el tiuj vizitoj. Ĉi jare, Komence de la somero vizitis nin iu germana esperantisto, Rudolf Fischer. Li jam estis farinta similan viziton pasintjare. Li estis survoje al Kompostelo kune kun neesperantista samlandano. En Oviedo renkontiĝis kun li du membroj de **Astura Esperanta Asocio**: Carlos E. Carleos kaj Faustino Castaño. Kiel kutime okazas en la renkontiĝoj de esperantistoj el malsamaj landoj, lingvoj kaj kulturoj, tuj okazas en la kunvenanta grupo la miraklo de la interkomunikado. Interkomunikado kiu ne eblas,

aŭ tre ege malfacilas, inter neesperantistoj kun malsama gepatra lingvo. Ni interparolis, sen la lingva baro, pri diversaj aferoj, la celo de lia vojaĝo, lia sperto de antaŭaj similaj vojaĝoj en nia lando kaj en aliaj lokoj... Kun ĝojo, kaj envio, ni aŭdis lian informon pri la bonstato de la esperantista movado en lia urbo. Ne tiel bona estas la stato de la esperantista afero ĉe ni, sed ni devas klopodi venki ĉiujn malfacilaĵojn en la disvastigado de Esperanto. Kaj tiu disvastigado efektiviĝas per lerno-kursoj. Tial, estas interese por ni anonci nun la organizon de novaj Universitataj kursoj de Esperanto en nia regiono. Antaŭ pluraj jaroj estis en la Universitato de Oviedo Esperanto-kurso organizita kaj gvidita de Doktorino María José Álvarez Faedo kaj Profesoro Carlos Enrique Carleos Artime. Nun, tiuj samaj gesamideanoj planas okazigi, ne unu, sed du novajn Universitatajn E-kursojn, unu en Oviedo kaj alia en Gijón por la lerno-jaro 2009-2010. En la sekva paĝo ni prezentas la oficialan anoncon de la Universitato pri la kurso planita por Gijón, kiun gvidus Carlos E. Carleos. Tiu de Oviedo, kiun gvidus María José Á. Faedo, estus laŭ samaj kondiĉoj. Ni esperu ke multaj gestudentoj interesiĝos pri la afero. Kiel dirite, tiuj kursoj havas Universitatan rangon; tio signifas ke, se ili okazos, tio estos sendepende de la kursoj kiujn ni povos organizi, kiel kutime, en la ejo de

nia E-grupo por ĉiutipa gelernantaro. Kiam komenciĝas la dua jarcento de la esperantismo en Gijón, ni devas esti pretaj fari ĉion eblan por ke en la estonteco la internacia lingvo prosperu, ene kaj for de nia urbo, ĝis sukcesi ludi la rolon de universala interkomunikado por kiu ĝi estis kreita.

nia E-grupo por ĉiutipa gelernantaro. Kiam komenciĝas la dua jarcento de la esperantismo en Gijón, ni devas esti pretaj fari ĉion eblan por ke en la estonteco la internacia lingvo prosperu, ene kaj for de nia urbo, ĝis sukcesi ludi la rolon de universala interkomunikado por kiu ĝi estis kreita.

nia E-grupo por ĉiutipa gelernantaro. Kiam komenciĝas la dua jarcento de la esperantismo en Gijón, ni devas esti pretaj fari ĉion eblan por ke en la estonteco la internacia lingvo prosperu, ene kaj for de nia urbo, ĝis sukcesi ludi la rolon de universala interkomunikado por kiu ĝi estis kreita.



Zamenhofa Tago de la jaro 2008

nia E-grupo por ĉiutipa gelernantaro. Kiam komenciĝas la dua jarcento de la esperantismo en Gijón, ni devas esti pretaj fari ĉion eblan por ke en la estonteco la internacia lingvo prosperu, ene kaj for de nia urbo, ĝis sukcesi ludi la rolon de universala interkomunikado por kiu ĝi estis kreita.



Germana E-isto kun asturaj samideanoj

nia E-grupo por ĉiutipa gelernantaro. Kiam komenciĝas la dua jarcento de la esperantismo en Gijón, ni devas esti pretaj fari ĉion eblan por ke en la estonteco la internacia lingvo prosperu, ene kaj for de nia urbo, ĝis sukcesi ludi la rolon de universala interkomunikado por kiu ĝi estis kreita.

nia E-grupo por ĉiutipa gelernantaro. Kiam komenciĝas la dua jarcento de la esperantismo en Gijón, ni devas esti pretaj fari ĉion eblan por ke en la estonteco la internacia lingvo prosperu, ene kaj for de nia urbo, ĝis sukcesi ludi la rolon de universala interkomunikado por kiu ĝi estis kreita.



Uniovi Directo

Alumnos

Profesores, PDI

P.A.S.

Oferta Formativa

❖ **Información del programa**

Curso académico: 2009/2010

CURSO:	ESPERANTO 1. GRUPO A. GIJÓN
EDICIÓN:	1
PLAZAS DISPONIBLES:	25
DESTINATARIOS:	Acceso libre teniendo cumplidos 18 años (o cumplirlos a lo largo del curso académico).
IMPORTE DE LA MATRÍCULA:	279,33 €
FECHAS DE REALIZACIÓN:	Del 1 de octubre de 2009 al 27 de mayo de 2010
PERÍODO DE MATRÍCULA HORAS:	Del 1 de julio al 24 de septiembre de 2009 90 horas (9 Cr.: 9 Cr. Teóricos y 0 Cr. Prácticos)
TIPO CURSO:	Homologable por 5 créditos de formación permanente al profesorado no universitario del Principado de Asturias en activo.
LUGAR DE IMPARTICIÓN:	CAMPUS GIJON CENTRO. CÁTEDRA JOVELLANOS. AULA 03
OBJETIVOS:	Leer textos relacionados con presentaciones, tareas cotidianas, las horas, medios de transporte, viajes, aficiones, entretenimientos, la familia, la escuela, estados de ánimo, el tiempo atmosférico, entre otros. Traducir textos de dificultad baja (al principio del curso) y media (según va avanzando el año académico) sobre temas relacionados con los de los textos de lectura. Pronunciar todos los sonidos del idioma esperanto. Comunicarse en situaciones reales en las que haya que presentarse, explicar la procedencia y la dirección, pedir la hora, pedir y ofrecer comida y bebida, comprar diferentes artículos, viajar, expresar gustos y estados de ánimo, y pedir y ofrecer información, etc. Comprender textos orales relacionados con los temas antes mencionados, emitidos bien por el profesorado de la asignatura o por otros medios audiovisuales. Intervenir en conversaciones sobre aspectos vistos en el curso. Realizar una exposición oral utilizando el vocabulario aprendido en el curso. Participar en diálogos sobre los distintos aspectos tratados en el curso.
CONTENIDO:	CONTENIDOS LÉXICO-SEMÁNTICOS: La familia y las relaciones sociales; las tareas cotidianas; las horas, los días de la semana, los meses del año; viajes y medios de transporte; aficiones y entretenimientos; la escuela y el aprendizaje; estados de ánimo y sentimientos; el tiempo atmosférico. CONTENIDOS SINTÁCTICOS: Usos del artículo; el presente de indicativo; formación del plural; las preposiciones; pronombres personales; adjetivos y pronombres posesivos; pronombres relativos e interrogativos; el pasado simple; algunos sufijos; comparativos de superioridad; conjunciones; el imperativo; diminutivos y aumentativos; el condicional; pronombres reflexivos; adverbios; numerales ordinales; el pronombre indefinido; el comparativo de igualdad y el superlativo; el uso del participio presente y del gerundio; el participio pasivo. CONTENIDOS PRAGMÁTICOS: Elaboración de narraciones, descripciones y redacciones. Preparación de exposiciones verbales y argumentaciones orales (a favor y en contra). CONTENIDOS FONOLÓGICOS: La pronunciación del esperanto.
HORARIO:	Martes y Jueves de 19.30 a 21.00 h.
BIBLIOGRAFIA:	GUTIÉRREZ ADÚRIZ, M (1995). Esperanto, curso del idioma internacional. Santander: PAS. GUTIÉRREZ ADÚRIZ, M (2002). Diccionario Español-Esperanto/Esperanto-Hispana. Santander: MGA. JANTON, P (1976). El Esperanto. Barcelona: Oikos-Tau.
METODOLOGIA:	La docencia será en español y esperanto, mediante clases prácticas en las que el profesorado utilizará un libro de texto como apoyo para sus enseñanzas, metodología audiovisual, además de las nuevas tecnologías de la información y la comunicación, a fin de fomentar la interacción del alumnado, para que así aprenda a desarrollar sus capacidades de aprendizaje.
CRITERIOS EVALUACIÓN:	Se seguirá un sistema de evaluación continua y se expedirá un Certificado de Asistencia a los alumnos que superen el 85% de presencia en clase, y de Asistencia y Aprovechamiento a aquellos que, además, superen las pruebas del nivel correspondiente.
MAS INFORMACIÓN: TRABAJOS PARA COMPLETAR CRÉDITOS:	Nivel A 1 - A 2 El alumno realizará una serie de tareas que deberá entregar al profesor al final del curso.

Naturo de la nuna ekonomia krizo

Estas inter la ekonomikaj fakuloj debato pri la naturo de la krizo kiu nuntempe frapas nian ekonomian sistemon. Ĉu temas pri simpla cikla krizo, kiel iuj asertas?, aŭ, ĉu ni troviĝas antaŭ iu krizo je civilizacio, laŭ alies opinio? Gravas la distingo, ĉar la danĝero kaj la solvo de la problemo estas malsama ĉu temas pri iu aŭ alia krizo-tipo.

La ciklaj krizoj estas nepra komponaĵo de ĉi tiu kapitalisma sistemo kaj ties funkciad-maniero. Tiaj krizoj regule akompanas ĉi tiun socion ekde antaŭ pli ol du jarcentoj. La ekonomikistoj kaj la regantoj bone scias apliki rimedojn al la problemaro de tiutipaj krizoj. La reguligoj nun postulataj kaj aplikataj de la Uson-Prezidento Obama, Eŭropuniaj regantoj k.a. estas efikaj iloj por alfronti la ciklajn krizojn.

Sed ĉi-foje temas pri alia afero. Aŭ pli ĝuste, preter kaj krom la kriza fazo de cikla ripetiĝo, kiu sendube ni travivas hodiaŭ, estas ankaŭ la fakto ke la produktadmaniero de nia industria kaj postindustria tekniko troviĝas antaŭ ia ŝajne senelira vojo. Kaj en tiu situacio nia civilizacio, la mondo, postulas solvojn kaj alternativojn, ne reguligojn.

La superregantoj de la tutmonda ekonomia sistemo celas ke oni eliru el la krizo laŭ la tradicia maniero de la cikla kriz-skemo, t. e. laŭ maniero favora al siaj intereso, ne al la ĝeneralaj intereso de la homaro. Sed ni vidos ke la situacio estas tia,

ke ĝi ne solveblas per flikaĵoj. Unue ni devas kompreni ke la krizo estas ne nur ekonomia, sed multflanka: financa, pri nutrado, pri energio, pri akvo-manko, pri klimato, socia... Sed oni devas kompreni ankaŭ ke la kaŭzo aŭ fonto de ĉiuj-ĉi problemoj estas la sama: la kapitalista sistemo. Kaj tiu problemaro ne solviĝos dum ne malaperos la kaŭzo kiu generis ilin.


Kiam preskaŭ miliardo da homaj estaĵoj vivadas sub la lim-linio de ega malriĉeco, kiam ĉiutage pereas dekmiloj da personoj pro malsato, kiam

senĉese malaperas etnioj, kulturoj kaj vivmanieroj endanĝerante la kulturan heredaĵon de la homaro, kiam la klimato percepteble degrad-iĝas... oni ne povas temi nur pri financa krizo. La ekonomio-potenculoj zorgas nur pri la financa flanko de la krizo kaj postulas priekonomikajn solvojn, kiuj savos iliajn financojn kaj la sistemon en kiu ili prosperis ĝis nun. Sed la sociaj sekvoj de la krizo kiun ilia monavido provokis tre perceptiĝas ankaŭ malproksime el tie, kie ĝi originiĝis: senlaboreco, altekostaj vivrimedoj, margen-igo de la plej malriĉuloj...

Kiel dirite, ĉi tiu krizo ne estas la unua de la sistemo, sed ĝi havas karakteraĵojn aperantaj nun unuafoje en la historio de la ekonomiko. La disvolviĝo de novaj teknologioj pri informado kaj interkomunikado kreis la kondiĉojn por la efektivigado de ekonomiaj operacioj kiuj metis la kapitalon kaj ties fluon for de la kontrolo de la ŝtatoj kaj ĉi ties aŭtoritatoj. La ekonomio fariĝis pli virtuala kaj tro grandiĝis la diferenco inter la enspezoj de iuj kaj aliaj personoj. La spekulado fariĝis normala operacio de la ekonomia sistemo kaj kontribuis generi grandajn malekvilibrojn. Ni vidu, ekzemple, la krizon pri nutrado: La plialtiĝo de la prezoj de la nutraĵoj ne estas rezulto de malpliigo de produktado sed de spekuladmanovroj kaj de la pliigo de la produktado de agrokomburaĵoj. La vivo de milionoj

da homoj estas submetita al la atingado de profito por la kontrolantoj de la ekonomia fluado.

Aliflanke, la krizo pri energio preterpasas la influon de la prezo de la nafto. Okazas ke la mondo troviĝas antaŭ la fino de periodo de malmultekosta energio fosili-devena (nafto, gaso, karbo) kiu karakterigis nian ĝisnunan produktadmanieron. La super-ekspluatado de la naturaj rimedoj, krom pliakceli ties elĉerpiĝadon ankaŭ okazigis konsiderindajn damaĝojn al la ekologio kaj la klimato. La vivmaniero de la superaj kaj mezaj



klastavoloj baziĝis sur disipado kaj malŝparado de la naturaj energi-fontoj.

Ne estas malpli grava la socia flanko de la krizo. La subtenado de la ĝisnuna formo de eltirado de ekonomia profito efikis tre damaĝe kontraŭ individuoj kaj homaj kolektivoj. Ni atentu denove pri la kazo de la agrokulturaĵoj: La grandamasa kultivado de plantoj destinitaj al la produktado de naturaj karburaĵoj, krom kontribui al la kreskiĝo de la malsato pro la malpliigo de la tereno destinita al la produktado de nutraĵoj, ankaŭ efikas malbone kontraŭ la ekologio pro la detruado de la biologia diverseco fare de la mono-kultivoj, detruado de la terenoj kaj la subteraj akvoj. Sekve de tio, kaj aldone al tio, estas la sociaj sekvoj de forigo de milionoj da kamparanoj el ilia tradiciaj loĝlokoj, kio devigas ilin iri loĝi en la mizeraj ĉirkaŭaĵoj de la urboj kaj/aŭ plintensigi la premon de la elmigrad-fluo. La socia krizo montras tiun akran realaĵon: por la privata kapitalprofito pli konvenas la ekonomia disvolvigo de tiu 20 procento el la monda loĝantaro kiu estas konsum-kapabla ol atenti pri la plej bazaj bezonoj de la cetero el la homaro sen aĉetkapablo. Pluafoje la logiko de la kapitalakumulado sin metis super la bezonoj de la filoj de la homaro.

Malpli granda konscio ekzistas pri alia flanko de la krizo: la priklimata problemo. Sed nuntempe estas jam neniu dubo pri tio ke la ŝanĝoj, kiujn la klimato suferas, estas sekvo de la homa agado, de la maniero je produktado kaj konsumado de nia postindustria civilizacio. Kaj ankaŭ tiu produktad-kaj konsumad-maniero respondas al la intereso de la profitantoj de la sistemo. Agadas kontraŭ la klimata ekvilibro la diseligado de gasoj kun forcejefiko kaj varmiga rezulto. La pliigo je uzado de krudmaterialoj kaj la trouzado de transportiloj ne atentante pri la protektado de la naturmedio, pliigis kaj akcelis la detruadon de la kli-

mato kaj malpliigis la kapablon je regeneriĝo de la naturo. Opinions iuj sciencistoj ke jam oni alvenis al iu punkto el kiu ne eblas retroiri; eble tiuj fakuloj estas tro pesimismaj, sed ĉiukaze la mondo troviĝas jam tre proksima al ekologia kaj klimata katastrofo kiu povos signifi la finon de la homa vivo sur la tero. Ĉiuj problemoj kaj ĉiuj elementoj de la krizo havas saman fonton kaj devenon. Ĉio estas aranĝita cele de la atingo de la plej alta profit-takso por la beneficuloj de la kapitalisma sistemo. La tuta ensemblo de la menciitaj problemoj konstituas veran krizon je civilizacio. Kaj la afero povus esti pli grava se kiel elirmaniero de la krizo oni elektos la vojon de la milito, kiel okazis en antaŭaj similaj situacioj. Do, kion fari? Se la homaro insistas agadi senracie kaj senetike, ĝi ne meritos plu vivi. Nun estas evidente ke ne povas, ne scias kaj ne volas gvidi la necesan procezon por la eliro de la krizo la sociaj klasoj kiuj dronigis nin en tiun krizon. Kiu socia(j) klaso(j) aŭ homa(j) kolektivo(j) kapablos alpreni savan projekton? La socia aganto kiu entreprenus la taskon liberi la mondon de la katastrofo kiu minacas ĝin devas esti kapabla koncepti kaj realigi longatempajn planojn surbaze de tute aliaj valoroj ol tiuj kiuj inspiris la ĝisnunan agadon. **Oni devas** celi kaj efektiviĝi alitipan rilaton kun la naturo, respektante ĝiajn limojn, uzante renovigeblajn (ne elĉerpeblajn) natur-rimedojn. **Oni devas** pretigi alian formon je ekonomio, celante la ĝeneralan utilon kaj ne la privatan profiton. **Oni devas** pliampleksigi la sferon de aplikado de la demokratio, ne limigante ĝin al la tereno de la politiko, sed respektante la homajn rajtojn ankaŭ en la ekonomio, en la rilatoj inter viroj kaj virinoj... La defio estas klara. La mondo ne plu povas persisti kiel ĝis nun, kaj la solvoj urĝas.

celi kaj efektiviĝi alitipan rilaton kun la naturo, respektante ĝiajn limojn, uzante renovigeblajn (ne elĉerpeblajn) natur-rimedojn. **Oni devas** pretigi alian formon je ekonomio, celante la ĝeneralan utilon kaj ne la privatan profiton. **Oni devas** pliampleksigi la sferon de aplikado de la demokratio, ne limigante ĝin al la tereno de la politiko, sed respektante la homajn rajtojn ankaŭ en la ekonomio, en la rilatoj inter viroj kaj virinoj... La defio estas klara. La mondo ne plu povas persisti kiel ĝis nun, kaj la solvoj urĝas.

celi kaj efektiviĝi alitipan rilaton kun la naturo, respektante ĝiajn limojn, uzante renovigeblajn (ne elĉerpeblajn) natur-rimedojn. **Oni devas** pretigi alian formon je ekonomio, celante la ĝeneralan utilon kaj ne la privatan profiton. **Oni devas** pliampleksigi la sferon de aplikado de la demokratio, ne limigante ĝin al la tereno de la politiko, sed respektante la homajn rajtojn ankaŭ en la ekonomio, en la rilatoj inter viroj kaj virinoj... La defio estas klara. La mondo ne plu povas persisti kiel ĝis nun, kaj la solvoj urĝas.

celi kaj efektiviĝi alitipan rilaton kun la naturo, respektante ĝiajn limojn, uzante renovigeblajn (ne elĉerpeblajn) natur-rimedojn. **Oni devas** pretigi alian formon je ekonomio, celante la ĝeneralan utilon kaj ne la privatan profiton. **Oni devas** pliampleksigi la sferon de aplikado de la demokratio, ne limigante ĝin al la tereno de la politiko, sed respektante la homajn rajtojn ankaŭ en la ekonomio, en la rilatoj inter viroj kaj virinoj... La defio estas klara. La mondo ne plu povas persisti kiel ĝis nun, kaj la solvoj urĝas.

celi kaj efektiviĝi alitipan rilaton kun la naturo, respektante ĝiajn limojn, uzante renovigeblajn (ne elĉerpeblajn) natur-rimedojn. **Oni devas** pretigi alian formon je ekonomio, celante la ĝeneralan utilon kaj ne la privatan profiton. **Oni devas** pliampleksigi la sferon de aplikado de la demokratio, ne limigante ĝin al la tereno de la politiko, sed respektante la homajn rajtojn ankaŭ en la ekonomio, en la rilatoj inter viroj kaj virinoj... La defio estas klara. La mondo ne plu povas persisti kiel ĝis nun, kaj la solvoj urĝas.

Faustino Castaño



NI DIRIS TION ĈIAM TRE KLARE:

"NI ELIROS EL LA EKONOMIA KRIZO"

KAJ JEN TIO OKAZIS:

NI ELIRIS EL LA EKONOMIA KRIZO!

TAMEN ONI AKUZAS NIN PRI TROMPO.

TROMPO AL KIUJ?...

ĈU IAM NI PROMESIS AL VI: "NI ELTIROS VIN EL LA EKONOMIA KRIZO"?

Informoj pri UEA

Nova internacia Esperanto-ekzameno ĉe UEA

Por pli bone kompreni la evoluon de la nova ekzamena sistemo en Esperanto, oni devas reiri kelkajn jarojn en la historio kaj provi pensi per ekstermovadaj pensmanieroj.

La priskriboj por la lingvo-ekzamenoj de la niveloj de A1 ĝis C2 de la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) estis fiksitaj de la Konsilio de Eŭropo.

La baza libro en la angla '*Common European Framework of Reference for Languages: Learning, Teaching, Assessment*' aperis en 2001. La internacia Esperanto-movado ne reagis.

Intertempe en Hungario Esperanto-instruado kaj ekzamenado furoris en la lastaj jaroj kaj Esperanto - post la angla kaj germana - daŭre estas en la tria loko rilate al la nombro de ekzamenitoj. Dekmiloj!!!! da ekzamenitoj akiris la novan lingvo-atestilon por profesiaj celoj (laborejaj postuloj, kreditpoentoj por universitataj studoj, liberiĝo de abiturienta lingva ekzameno ktp.) ITK (ŝata ekzamencentro en Hungario) jam de jardekoj estas ofertanta Esperanto-ekzamenojn en baza, meza kaj supera niveloj (mi mem estis kaj daŭre estas kvalifikita ekzamenanto de ITK por Esperanto). Ekde septembro 2006 ili adaptis sian 3-gradan Esperanto-ekzamensistemon al la novaj normoj de KER, akiris akreditigon por ĝi de la hungara ŝtato kaj ankaŭ submetis ĝin al kvalita kontrolo (2008) far Asocio de Lingvotestistoj en Eŭropo (ALTE), la internacia organizaĵo kompetenta pri pritaksado de ekzamensistemoj laŭ KER.

Tio estas en tiu kadro la maksimumo, kion oni povas atingi por la agnosko kaj prestiĝo por nia internacia lingvo. La ekzamensistemo de ITK (Origio-ekzameno) - laŭ tradicio ankaŭ el aliaj fremdaj lingvoj – estas t.n. du-lingva versio. Tio signifas, ke enhavas kelkajn taskojn, ekz. tradukadon inter la cellingvo kaj la nacia lingvo. Pro tio ĝi ne taŭgas por internacia uzo. La celo kaj plej facile irebla vojo, la plej racia kaj ŝparema solvo por iu internacia ekzamensistemo laŭ KER estis la adaptado de tiu jam longe funkcia dulingva sistemo al unulingva versio.

Kelkaj gravaj paŝoj

- aperigo de la unua E-lingva broŝuro pri KER (prizorgis ĝin Katalin Kováts kaj UEA), januaro 2007;
- traduko de la tuta Framework-libro al Esperanto: Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj: lernado, instruado, pritaksado (kun permeso de la Konsilio de Eŭropo, Dialang kaj ALTE. La laboron organizis Katalin Kovats/edukado.net, finance subtenis *Esperantic Studies Foundation (ESF)*, tradukis Roel Haveman, eldonis ĝin UEA, decembro 2007);
- ITK komencas trejni, kvalifiki siajn 2-lingvajn ekzamenantojn al la unulingva sistemo;
- pretigo de novtipaj testoj, provtesado, analizoj (centoj!!!! Da provtestantoj estis bezonataj). Spertaj kaj kvalifikitaj ekzamenantoj, testverkistoj de ITK, ekz. Márta Kovács. Salomonné Pálma Csiszár kaj Zsófia

Kórody kun faka gvido de ITK-respondeculo dr. László Szabó kaj granda movada helpo de Katalin Kováts/edukado.net finpretigis la akreditigendan materialon en 3 niveloj: dum 2008;

- UEA subskribis la kunlabor-kontrakton kun ITK anstataŭ ILEI, kiu rifuzis doni komision al Zsófia Kórody, tiama vicprezidanto kaj respondeculo por ekzamen-aferoj, junio 2008;
- trejnado de internacia ekzamenantaro laŭ la akreditig-postuloj de ITK kaj ALTE: atestilo pri altnivelaj E-lingvaj kapabloj, universitata diplomo pri Esperanto-studoj resp. instruado de fremdaj lingvoj, plurjara lingvoinstruista kaj ekzamenada sperto, onta jara pluklerigado, julio kaj decembro 2008;
- apero de la libro: 'Esperanto de nivelo al nivelo' (ITK, 2008), fakte jarkomence 2009 kun priskribo de la taskoj kaj modeltestoj en B1, B2 kaj C1 niveloj. Aŭtoroj: Zsófia Kórody,

- Márta Kovács, Salamonné Pálma Csiszár, dr. László Szabó.
- internacia lanĉo de la novaj KER-ekzamenoj, akiro de ŝtata agnosko ankaŭ por la unulingva versio en Hungario, ekde 2009.

Kotizoj: la samaj, kiuj por la du-lingva versio en Hungario (pageblaj, pagitaj jam de dekmiloj da hungaroj), similaj, eĉ iom malpli kostaj ol aliaj prestiĝaj internaciaj ekzamenoj en aliaj fremdaj lingvoj, internacie subvenciataj laŭ la MA kotizoj de UEA (por ioma komparo: Cambridge First Certificate /B2 nivelo/ kostas 150 eŭrojn).

IEK: nek elektas siajn ekzamenantojn (IRE) laŭ la akreditigaj postuloj, nek havas trejn sistemon, pluklerigadon por ili.

Rekompencoj: nek la ellaborintoj de la tute novaj KER-ekzamenoj, nek la fakaj gvidantoj, nek la organizantoj de testsesioj, provtestistoj, korektantoj de centoj de provtestoj, administradon, statistikojn, korektadon farintaj, farantaj gekolegoj, plibonigantoj de la sisemo, ktp, ktp, ĝis nun ricevis iun ajn finanĉan rekompencan por la pli ol dujara laboro, do ĈIO LAŬ VOLONTULA BAZO, DONACO POR LA ESPERANTO-MOVADO!!!!

Malgranda teamo investis sian tempon, energion kaj centojn da laborhoroj....

La nova KER-ekzamensistemo estas je dispono por ĉiuj. Sur la hejmpaĝo de ITK (<http://itk.hu>) aperis elekta verda steleto, kiu gvidas al la internaj paĝoj, kie eblas legi la postularon, detalojn pri ĉiuj tri niveloj: <http://itk.hu/index.php?id=322&fomenu=322&lang=ept>

Ekzamendatoj, informoj pri kotizoj, aliĝilo al la novaj UEA-ekzamenoj:

<http://edukado.net/pagina/NOVAJ+UEA-EKZAMENOJ/22422//>

Ni esperas, ke multaj eluzas la bonan ŝancon jam ĉi-jare akiri atestilon en la niveloj B1, B2 aŭ C1.

Sukcesojn

!

Kun multaj salutoj, Zsófia Kóródy

Interkultura Centro Herzberg <http://esperanto-urbo.de>

fonto: Ret-Info <http://www.eventoj.hu>

Propono de UEA pri Esperanto al kvar mondaj gvidantoj

La 16an de junio okazis en la rusa urbo Jekaterinburgo la unua pintkunveno de Brazilo, Rusio, Hinda Unio kaj Ĉinio. Tiuj kvar landoj intencas kunlabori pli intense kaj elpaŝi kune en la monda politiko. En Jekaterinburgo, kie la ĉefa temo estis la nuna ekonomia krizo de la mondo, renkontiĝis la ŝtatestroj Dmitrij Medvedev el Rusio, Luiz Inacio Lula da Silva el Brazilo kaj Hu Jintao el Ĉinio, kaj la barata ĉefministro Manmohan Singh.

Post la kunveno la prezidanto de UEA, prof. Probal Dasgupta, skribis al la kvar gvidantoj, karakterizante la eventon kiel historian. "Ekonomia krizo okazigita alilande trafas viajn landojn grave, ne nur pro la nekredablaj riskoj kaj ŝuldoj alprenitaj en Usono, sed ankaŭ pro la fakto, ke la valuto de nur unu lando rolas kiel internacia valuto", li komentis la temon de la kunveno. Per tio li samtempe enkondukis proponon:

"Universala Esperanto-Asocio proponas al vi la ideon, ke valutoj kaj lingvoj funkcias sammaniere. La internacia uzo de la angla plifortigas nur kelkajn privilegiitajn landojn kaj samtempe starigas riskojn kaj kostojn por ĉiuj aliaj. Ĉu tiaj privilegioj, valutaj kaj lingvaj, kondukis nin al pli bona mondo? Ĉu la kostoj estis efikaj? Certe ne."

"Viaj kvar landoj estas promesaj landoj por la estonteco. Sed vi, kiel ni tra la tuta mondo, devas ĉesigi la valutajn kaj lingvajn privilegiojn, se ni volas progresi rapide, malpli koste kaj harmonie. Pri nova valuta sistemo, vi jam havas ideojn kaj proponojn. Por nova lingva sistemo, ni proponas Esperanton kiel efikan, pragmatan kaj malpli koston solvon."

La letero de prof. Dasgupta estis sendita al ĉiu ricevanto en ties propra lingvo.

laŭ Gazetaraj Komunikoj de UEA, n-ro 332, 2009-06-26



Kuirante kun Pilar

Buletoj el densigita lakto

Ingrediencoj: Ladskatolo da densigita lakto (400 gramoj prosimume), 200 gramoj da rostitaj biskvitoj, 100 gramoj da rostitaj migdaloj, 5 gramoj da sukero por pulvora disŝutado, paperaj kapsuletoj.

Ellaborado: Oni devas mueli la rostitajn migdalojn kaj pere de rulpremilo oni devas pulvorigi la biskvitojn. Sekve oni miksu ĉion kun la densigita lakto. El la maso oni faru buletojn kaj oni lasu ilin seki ĝis la sekva tago. Tiam oni disŝutu sur ili la pulvorigitan sukeron kaj oni metu ilin en la paperaj kapsuletoj.

Flandra ovaĵo

Ingrediencoj: 6 ovoj, 6 tranĉaĵoj da kolbaso, ladskatolo da pizo, 200 gr. da kapsikoj, petroselo, 200 gr. da tomatoj, du ajl-pecetoj, 50 gr. da ŝinko, 200 gr. da asparagoj.

Ellaborado: Unue oni fritu la ajletojn, dispecigitajn, en pato kun iomete da oleo. Kiam ĝi flaviĝos oni aldonu al ili la ŝinkon, la kolbas-tranĉetojn kaj iomete da pipro. Sur la miksaĵo oni aldonu la tomatojn, salon kaj iomete da sukero. Fine ankaŭ la kapsikojn kaj oni fritu ĝis kiam ĉio fariĝu malmola. Tiam oni demetu la kolbaspecojn. Oni verŝu la saŭcon en fajr-rezistajn kaserolojn (6 entute), oni surmetu sur la saŭcon la ovon, la kolbason kaj la asparagon. Sekve oni metu en fornon la kaserolojn kie ili devas resti ĝis kiam la ovo-blanko estu koagulita, la ovo-flavo devas resti malmola. Fine, por la manĝado, la rezultanta ovaĵo devas esti prezentata en la sama kaserolo.



Kutime, nia revuo pritemas ĉefe ĝeneralajn temojn prefere al tiuj aferoj rilate al la Esperantista Movado. Tiurilate, oni povas diri ke HELECO pli estas PER-Esperanta ol PRI-Esperanta revuo. Konkrete, ĝiaj lastaj numeroj havis iun ĉefan temon pri la historio de iu grava evento kies centjaro aŭ kelkdeka dat-reveno oni festas en la jaro de la publikigo de la revuo.

Sed ĉi-numere oni permesu al ni fari escepton kaj ĉeftemi pri ni mem, pri **Astura Esperanta Asocio**. Okazas ke ĉi-jare estas la Centjaro de la fondiĝo de tiu esperantista organizaĵo, aŭ pli ĝuste, de la komenciĝo de la esperantismo en Gijón kaj en Asturio. Tiaj eventoj okazas nur unufoje en ĉiu jarcento; al ni okazas nun unufoje kaj verŝajne ne estos dua centjaro por nia esperantista Asocio. Do, la ĉefa temo de ĉi tiu 84a numero de **HELECO** estas dediĉata al la pritemado de la esperantista historio de nia urbo kaj nia regiono.


La situacio de nia astura esperantista asocio tra ties 100-jara ekzistado estis nestabila, nefirma... Sed, ĉu ne estis tia la situacio de la esperantista movado ĝenerale, je landa kaj tutmonda skalo? Tial eble multaj E-grupoj sin vidos respigitaj en la historio kiun ni rakontas tra la sekvaj paĝoj.

La ellaborado de tiu historio ne estis facila pro la problemoj kompili materialojn de tiom longa periodo kaj el tre diversaj fontoj. Pri iuj periodoj estas sufiĉe da kono sed pri aliaj tre malabundas la informoj. Tre utila estis por nia laboro la verko de Antonio Marco Botella **Analoj de la esperanta movado en Hispanujo**. Ĝi provizas multe da informo pri la esperantista vivo de la tuta lando, kaj el inter tiu materialo ni povis eltiri sciigojn pri **AEA** nun ne troveblaj en aliaj fontoj. Grava alportaĵo estis ankaŭ la memoraĵoj de samideanoj de nia E-grupo kiuj travivis diversajn epokojn de la centjara ekzistado de la astura esperantismo. Tiurilate estas menciinde ke vivas ankoraŭ samideano, membro de **AEA**, kiu konis la unuan etapon de la Asocio. Li naskiĝis la saman jaron kiel la Asocio (1909) kaj membras ĉe ĝi ekde sia junaĝo. Ni disponas ankaŭ je konsiderinda foto-kolekto de la E-grupo kaj iuj el ties membroj; per tiuj bildoj ni ilustras la raportadon de la diversaj epokoj de la **AEA**-historio. Fine, la neanstataŭigebla interreto provizis al ni materialon kiu, eĉ se ne rekte koncernas al nia E-rondo, tamen pritemas aferojn de la E-movado, je landa kaj monda nivelo, kiuj enkadrigas la esperantismon de Asturio kaj donas sencon al tio, okazanta ĉi tie.

La historio de la nacioj prirakontas grandajn eventojn, batalojn, venkojn, invadojn, konkerojn... Kompare al tio, la historio de la E-movado kaj ties organizaĵoj povas rezulti teda, enuiga... ĝi estas konstituita el kursoj, kongresoj, prelegoj, kunsidoj, intervjuoj, publikigaĵoj... neniu heroaĵo, laŭŝajne. Sed malantaŭ aŭ sub tiu ekstera aspekto de la afero estas vera heroismo de sindonemaj personoj kiuj sin dediĉas volonte al ideo kiun ili, ni, konsideras sanktan aferon konekse kun la grandaj interesoj de la homaro. En la sekvaj paĝoj ni volas prezenti, krom la eksteran aspekton, ankaŭ tiun animon aŭ internan ideon de nia celo.



Antaŭaĵoj de la afero



Kiam, somere de la jaro 1905, Lazaro Ludoviko Zamenhof prezidis, en la franca urbo Bulonjo-sur-Marco, la unuan universalan kongreson de Esperanto, li estis travivinta grandan penadon kaj malfacilaĵojn por efektiviĝi tiun realaĵon: ke la lingvo – tiam jam nomata Esperanto – fariĝu parola lingvo de movado sin dediĉanta al ties disvastigado. Ekde la jaro 1887, kiam estis eldonita la unua lernolibro pri tiu universala lingvo, Esperanto, fakte, estis nur skriba, sed ne parola lingvo. Tre intensa korespondado inter Zamenhof kaj unuaj simpatiantoj de la afero kaj unuaj E-kluboj montris la taŭgecon de Esperanto por la interkomunikado inter malsamlingvanoj kaj kuraĝigis entrepreni la fazon de starigo de Esperanto-movado konstituita de homoj el la tuta planedo.

Kiel dirite, Zamenhof devis supervenki multajn malfacilaĵojn. La eldonado de la unua libro pri la lingvo internacia en la jaro 1887 eblis nur dank' al la financa apogo de la bopatro de la iniciatinto de Esperanto. Kaj antaŭ tiu jaro Zamenhof tre devis penadi por antaŭenpuŝi sian projekton. Ne decas ripeti ĉi tie la historion de la komencaj jardekoj

de la esperantista afero. La esperantistoj sufiĉe konas tiun periodon kaj krome ekzistas bonaj verkoj kiuj pritemas tiun aferon. Ni reliefigos nur tiujn okazintaĵojn, kiuj iamaniere influis en – aŭ rilatas al – la ekestiĝo de la esperantismo en Hispanio kaj en nia Asturia regiono.

La universalaj kongresoj de Esperanto, tiu menciita de Bulonjo-sur-Marco kaj tiuj sekvintaj en Genève, Svislando (1906), Cambridge, Britio (1907), Dresdeno, Germanio (1908)... utilis por ke la granda publiko eksciis pri la ekzistado de tiu lingvo-projekto. Sed jam antaŭ la jaro 1905 kelkaj fakuloj kaj interesitoj pri la lingva problemo konis la ekzistadon de la kreaĵo de Zamenhof kaj kontaktis kun li pri tiu temo. En Hispanio, konkrete, jam en la jaro 1890 estis eldonita lernolibro de Esperanto, iniciate de José Rodríguez Huertas el Malago, kaj en la sekvinta jaro, ankaŭ en la urbo Malago, estis

kreita, la unua esperantista grupo de Hispanio fare de la sama Rodríguez Huertas, kiu gvidis tie lernokursojn. Menciinde estas ke en tiu epoko, krom tiu de Malago ekzistis esperantistaj kluboj nur en Nurembergo, Munkeno, Friburgo kaj Upsala.

En la jaro 1897 estis kelkaj hispanaj aliĝintoj en la Internacia Esperanta Movado gvidata de L.L. Zamenhof, kaj en la sekva jaro, Francisco Pi-i-Margall, eksprezidento de la unua hispana Respubliko propagandis pri Esperanto per artikolo en iu madrida ĵurnalo, kaj pliaj du gazetaj artikoloj en la jaro 1900. En Madrido gvidis la unuan kurson de

Esperanto, en la jaro 1899, Ramón Andreu, kiu ankaŭ publikigis en iu revuo resumon de la Esperanta gramatiko. Inter la lernantoj de tiu kurso estis iu arma oficiro, Vicente Inglada Ors, kiu poste gvidis E-kursojn en Barcelono.

En la jaro 1901 oni publikigis artikolojn pri Esperanto en Olot kaj Santander, kaj evidentiĝis Esperant-favora aktivado en Barcelono kaj Coruña fare de simpatiantoj de la afero kiuj, tamen, tiam ankoraŭ ne konstituis organizitajn grupojn. La unua Esperanta gazeto en Hispanio aperis

en Santander en la jaro 1902, ĝi titoliĝis **Esperanto** kaj ties kreinto kaj ĉef-redaktoro estis Andrés Bravo del Barrio. En la sama jaro fondiĝis en Murcio Esperanto-Societo. Daŭre estis kursoj kaj artikoloj pri Esperanto en diversaj lokoj en la lando, kaj en la jaro 1903 la disvastiĝo de la movado estis speciale rimarkinda en Katalunio, Murcio kaj la Valencio regiono. Tiam aperis ankaŭ la unuaj esperantistoj en Eŭskio, Valladolido kaj la Aragona regiono. Sed la plej grava esperantista evento de tiu jaro estis la fondiĝo de tutlanda esperantista organizaĵo nomata **Hispana Societo por propagando de Esperanto (H.S.p.p.E.)**. Ĝi daŭris, kun tiu nomo dum kelkaj jaroj; oni povas diri ke, iamaniere, ĝi estis antaŭaĵo de la nuntempa tutlanda organizo **Hispana Esperanto-Federacio**, fondita en la jaro 1947. En la jaro 1904 la eldonejo **ESPASA** de Barcelono publikigis Esperantan Ko-



Vicente Inglada Ors

lekton aprobitan de Zamenhof kaj gramatikon kaj E-vortaron verkitajn de Vicente Inglada. En la sama jaro oni publikigis en Hispanio pliajn aliajn esperantaĵojn: vortaroj, gramatikoj, lernolibroj...

Oni devas rimarkigi ke la fontoj kiuj provizas al ni informon pri la agado de la pioniroj de Esperanto en Hispanio tute ne mencias, eĉ ne unufoje, Asturion. El la dokumentaro je kiu ni disponas ne eblas determini ĉu la scio pri la ekzistado de la Internacia Lingvo estis tiam jam alveninta al nia urbo kaj nia regiono. Verŝajne la diskoniĝo pri la esperantista afero en Asturio estis rezulto de la propaganda efiko de la universalaj kongresoj. Dum tiuj jaroj la iniciatinto de Esperanto, entuziasme helpita de liaj unuaj disĉiploj, plenumis gravan kaj intensan laboron de propagando kaj publika interrilatado celante diskonigi la ekzistadon kaj utilecon de la internacia lingvo Esperanto. Kiel supre menciite, en la jaro 1905 okazis

en Bulonjo-sur-Mar (Francio) la unua el la universalaj kongresoj de Esperanto. Unufoje, homoj el pluraj landoj –inter ili kelkaj hispanoj– kaj diversaj lingvoj publike interparolis kaj debatis per komuna kaj neŭtrala lingvo. En la solena Malfermo de la kongreso la majstro diris: *post multaj miljaroj de reciproka surdamuteco kaj batalado, nun en Bulonjo fakte komenciĝas en pli granda mezuro, la reciproka kompreniĝado de la diverspopolaj membroj de la homaro, kaj unu fojon komenciĝinte, ĝi jam ne haltos, sed irados antaŭen ĉiam pli kaj pli potence ĝis la lastaj ombroj de la eterna mallumo malaperos por ĉiam. Gravegaj estas la nunaj tagoj en Bulonjo-sur-Mar kaj ili estu benataj.*

La hispanoj partoprenintaj la kongreson profitis post ĝi ĉiun okazon por publikigi la novaĵon per la ĵurnaloj de iliaj loĝlokoj kaj prelegi pri la afero. Tiujare fondiĝis en Hispanujo pliaj Esperanto-grupoj: La Coruña, Solsona, El Royo (Soria), Enguera (Valencio), Barco de Valdeorras (Orense), Barcelono (pluraj grupoj)... La sekvan jaron, en Bilbao oni akceptis Esperanton post tio ke la sciencisto Torres Quevedo faris fervoran deklaron favore al tiu internacia lingvo. Tiam fondiĝis Esperanto-grupoj ankaŭ en Burgos, Kartañeno, Castellón, La Guardia (Jaén), Portugaleta, Benicarló, Sabadell, Donostio, Kompostelo, Sestao, Simat de Valldigna, Tarancón, Tortosa...

Tiujare la dua universala E-kongreso okazis en Ĝenevo (Svisio), ankaŭ kun la ĉeesto de Zamenhof kaj ankaŭ kun la ĉeesto de grupo da entuziasmaj hispanaj geesperantistoj. Iu el ĉi lastaj raportis pri la vojaĝo dirante ke en la stacidomo de Avinjono, hispanoj, angloj, francoj... plenigis jam plurajn vagonojn, tra kies fenestroj vidiĝis multenombraj verdaj flagoj, kaj eliris torento da gajaj kantoj. En sia kongresa parolado, Zamenhof akcentis la ligan de la lingvo Esperanto kun la interna ideo de batalado por libereco, por la homaj rajtoj, por la paco, interkompreno kaj amo inter la homoj, inter la popoloj, inter la diversaj etnoj kaj religioj...

Ĉi tiu kongreso, same kiel tiu de la antaŭa jaro, estis potenca reklamo por interesi la hispanan publikon pri la praktika utileco de Esperanto. Oni publikigis multajn ĵurnalajn artikolojn pri la temo.

Pliaj E-grupoj kaj societoj estis fonditaj en la lando: Alikanto, Albaceto, Tortoso, Medina-del-Campo, Carcagente (Valencio), San-Fernando (Cadiz), Santurce, Palma, Lleida, Salamanko, Bermeo, Eibar, Ĝibraltaro...

La tria universala kongreso okazis en la jaro 1907 en Cambridge (Britio) kun simila sukcesa rezulto en kio rilatas al la propagando antaŭ la publiko. Zamenhof estis akceptita en la urbon kun grandaj honoroj fare de la aŭtoritatoj. Tio fariĝis ĝenerala komponaĵo de ĉiu universala kongreso en kiu li partoprenis. La entuziasmo kaj la optimismo regis tiam en la esperantistaj vicoj ĉar ŝajnis ke la publiko bone akceptadis la esperantismon, tiel la lingvon mem kiel la

ideon kiu animis ĝin.

En la lando plu daŭris la fondiĝo de esperantistaj grupoj kaj asocioj kaj ankaŭ oni publikigis kelkajn librojn kaj revuojn en Esperanto. En la jaro 1908 la universala kongreso estis en Dresden (Germanio). Ĉeestis la solenan Malfermon du mil personoj, kaj la forumo disvolviĝis kun simila pompo kaj socia resonado kiel la antaŭaj. Oni prenis tie gravan decidon por la hispana esperantistaro: oni aprobis ke la kongreso de la sekva jaro okazu en Barcelono.

Estis en tiu etoso de optimismo kaj entuziasmo kiam estis fondita la unua esperantista rondo en Asturio, la E-grupo de nia urbo: **Astura Esperanta Asocio.**



Zamenhof kaj lia edzino en la universala kongreso de 1905

APOTEOZO EN BARCELONO



La dispo de la Dresdena U.E. Kongreso organizi por la jaro 1909 universalan kongreson de Esperanto en Barcelono mobilizis la geesperantistojn de nia lando por la organizado de la evento kun la celo ke ĝi estu kiel eble plej brila. Ankaŭ la aŭtoritatoj de la urbo alprenis la respondecon dece gasti la esperantistajn gekongresanojn el la tuta mondo. La urbestro de Barcelono disponis ke la Urba gvardio lernu Esperanton. La firmo Hispano Films promesis filmi la Barcelonan kongreson, kio estus bonega ŝanco por la postkongresa propagando pri Esperanto.

Dume plu estis en la lando kursoj pri la internacia lingvo organizitaj de la jam ekzistantaj E-grupoj kaj estis kreitaj, antaŭ kaj post la kongreso, pliaj E-grupoj kaj societoj, inter ili iu Virina Esperanta Grupo. Sed pli grave por nia historio estas tio ke la 4an de junio de tiu jaro oficiale naskiĝis **Astura Esperanta Asocio**.

La longa tempo pasinta de tiam kaj la agitata vivo de tiu organizaĵo igis ke ne eblis konservi en nia arkivo dokumentaron de la komenca etapo de la grupo kaj akton de ties fondiĝo. Pri tiu grava okazintaĵo nun ni disponas nur je la informo provizita de la verko **Analoj de la esperanta movado en Hispanujo**. En ĉi tiu paĝo ni prezentas bildon de eltranĉaĵo de la 43a paĝo de tiu libro, en kiu oni raportas pri la fondiĝo de la ĥihona E-grupo. Ĝi informas nin ke tiu esperantista rondo funkciis en

la ejo kaj kiel sekcio de alia organizaĵo, konkrete la Katolika Centro. La unua prezidanto de Astura Esperanta Asocio estis Francisco Menéndez Rúa. Ni ne scias kiam, kie kaj kiel esperantiĝis la unuaj membroj de tiu unua E-grupo de Asturio. Dubindas ke iu(j) el ili partoprenus en iu(j) el la kvar ĝistiamaj universalaj kongresoj de Esperanto, sed ŝajnas ke en tiu jaro 1909 almenaŭ du membroj de **AEA** partoprenis en la Kongreso de Barcelono okazinta malmultajn monatojn post la fondiĝo de la grupo. La numero 70a de la gazeto **LA SUNO HISPANA**, kiu raportis pri la 5a Kongreso uni-

versala, prezentas liston de la delegitoj kiuj salutis la kongresanaron kaj inter ili aperas la nomo (Sro Fraga) de iu asturiano, sed li ne aperas kiel membro aŭ delegito de **AEA** sed de la astura lingvo.

Temante pri la kongreso en Barcelono indas diri ke ĝi estis eĉ pli brila ol la kvar antaŭaj universalaj kongresoj. Tralegante la priskribon de la kongresaj sesioj kaj de la intervenoj de Zamenhof, kiujn detale transskribas la menciita verko **Analoj de la esperanta movado en Hispanujo** kaj de la numeroj de **LA SUNO HISPANA** de la lastaj monatoj de 1909, oni povas percepti ke la Majstro kaj ĝenerale la tuta ĉeestantaro troviĝis en stato de granda eŭforio, kvazaŭ ekstazo. Ĉio ŝajnis indiki ke la popolo kaj ties aŭtoritatoj bone akceptadis Esperanton kaj ke la afero antaŭeniradis “per flugiloj de facila vento”. Fakte, tiu facila vento kaj bona

lo de Cartagena; kaj en Kordovo kies unua Prezidanto estis Luciano Gisbert kaj Sekretario Cristeto Rodriguez. Specialan mencion ni devas fari pri la fondiĝo de rondo en la Astura Regiono, sub la nomo "Astura Esperanta Asocio", en strato Los Morales de Gijón, numero 99. Tiu Esperanta Rondo estis fondita de membroj de Katolika Centro de la dirita urbo (veterana societo fondita en 1882), kaj disvolvis ilian aktivadon komune, fakte la Esperanta rondo funkciis kiel Sekcio de la Katolika Centro. La organo de ambaŭ societoj estis "El Principado", redaktita en hispana lingvo, kaj la esperantistoj normale plenigis du paĝojn de tiu bulteno, de tempo al tempo parte en Esperanto. La unua Prezidanto de Astura Esperanta Asocio estis S-ro Francisco Menéndez Rúa, postenon kiun li okupis dum multaj jaroj. Tiun Esperantan Rondon oni fondis, ĝuste, la 4an de Junio.

Eltranĉaĵo de Analoj de la esperanta movado en Hispanujo

etoso estis preskaŭ konstanta elemento de la unua etapo de la Esperanta movado, t.e. ĝis la jaro 1914, kiam komenciĝis la Unua Mondmilito.

La tiama reĝo de Hispanio, Alfonso la 13a, avo de la nuna monarĥo de nia lando, akceptis prezidi la patronecon de la kongreso. La registaroj de Belgio, Meksikio, Norvegujo kaj Usono sendis reprezentantojn al tiu esperantista evento de Barcelono. La urbestro de tiu urbo donacis gravan monsumon, kaj la Rektoro de la Universitato permesis uzi la palacojn de tiu institucio por la kongresaj sesioj. Post la alveno de Zamenhof al Barcelono, la 4an de septembro, li vizitis la aŭtoritatulojn de la urbo akompanata de la Loka Kongresa Komitato kaj iuj akademianoj. La sekvantaro okupis kvar veturilojn kiujn gvidis rajdantaj urbogardistoj, kaj dum la irado tra la stratoj ili estis simpatie salutataj de multenombraj gecivitanoj. La gekongresanoj, kaj landaj kaj eksterlandaj, spertis grandan ĝojon kaj iluzion.

La kongreso daŭris dum la tagoj 5a al 11a de septembro en festa etoso. Esperantaj flagoj ornamis multajn balkonojn en la urbo. En la esperantista meso de la dimanĉon, 5an de septembro, la predikanta pastro Richardson benis la esperantistaron nome de la Papo. Dum la kongresaj tagoj abundis la signoj de socia akcepto de la esperantismo. Ni citas jenan paragrafon de la **Analoj**:

Se dimanĉo aperis multaj balkonoj ornamitaj de tapetoj kaj Esperantaj flagoj, lundo, la tuta Barcelono estis plene esperantigita. Tia estis la impresio de partopreninto en tiu kongreso, kaj iu aldonis: kafejoj, tramveturiloj, balkonoj, vendejoj, ĉie oni vidis Esperantaĵojn, ĉie oni kantetis nian himnon, la utopio pri Esperantujo fariĝis realo en tiuj kongresotagoj, ĉar Esperanto vere sinjoris la urbon, malofte oni povis konstati tiom da fervoro kaj entuziasmo surstrate...

Zamenhof prezidis la kongresajn sesiojn kaj siaj tiamaj diskursoj esprimis optimismon kaj fidon pri la estonteco. Fine de la kongreso, Ricardo Codor-

niu, la patro de la hispana esperantismo, komunikis ke la Reĝo de Hispanio nomis Doktoron Zamenhof Komandoro de la ordeno de Izabela la Katolika. Eble la Majstro Zamenhof travivis tiam la plej feliĉajn tagojn de sia vivo. Li povis pensi ke alvenis la tago de lia triumfo, la venko de la utopio. Tiu protokola ordeno, kiun li ricevis, povis ŝajni signo de historia revanĉo aŭ kompenso: Izabela la Katolika estis reĝino kiu, antaŭ kelkaj jarcentoj, elpelis la judojn el Hispanio, kaj jen tiam, judo triumfe akceptata en la lando ricevas la honoron de Komandoro de ŝia ordeno.

Post la barcelonaj kongrestagoj estis kelktaga postkongresa ekskurso al Valencio. Tie la popola simpatio al Esperanto kaj ties kreinto estis eĉ pli varma ol en Barcelono. Recitante la **Analoj**-n:

Je la emocia momento de la eniro de la trajno en la stacidomon tondra entuziasma aplaŭdado sonis, dum la urba muzikbando ludis "la Espero"-n kiun ĥore kantis la alvenintoj kun la atendintoj... Dum la marŝado de la veturiloj tra la Valenciaj stratoj, la publiko varme aplaŭdadis, multaj personoj sin elŝovis el la balkonoj por vidi la eminentan invititon, kaj, kiam la veturilo de Zamenhof trafis la hotelon Palace kie devis loĝi la aspekto de strato Paz kaj la publikaklamoj estis vere imponaj. Nia Majstro eniris en la hotelon sed la aplaŭdoj tute ne ĉesis, kio devigis lin sin montri al la publiko en la balkono por danki tiel grandajn pruvojn de simpatio kaj akcepti ankoraŭ novajn aklamojn.

Vere, Zamenhof povis pensi ke alvenis la Tempo de la Mesio, kiam malaperos ĉiu homa kontraŭdiro kaj regos feliĉo. Sed konvenas klarigi ke en tiu esperantista optimismo estis multe da subjektivismo. La realo estis multe pli akra ol montris tiuj brilaj tagoj. Hispanio estis tre malriĉa, preskaŭ duonfeŭda lando kiu, krome, tiam havis koloniisman militon en Maroko. Ĝuste du monatojn antaŭ la kongreso en Barcelono, en tiu sama urbo estis perforta revolucio kontraŭ la milito, la Reĝo kaj la burĝaro, la t.n. "Tragika Semajno", kiu endanĝerigis la okazadon de la kongreso.



Fotoj de la universala kongreso de Esperanto en Barcelono, en 1909, kun la ĉesto de Zamenhof.



per flugiloj de facila vento



La 5a U.E. Kongreso de Esperanto, okazinta en Barcelono, en kiuj partoprenis la iniciatinto de Esperanto L.L. Zamenhof, troviĝis ĝuste meze de la favora tajdo por nia movado. Post ĝi okazis pluaj 4 universalaj kongresoj. Dum la 5 jaroj ekde la 5a U.E. Kongreso ĝis la jaro 1914 la esperantista afero plu antaŭenmarŝis de loko al loko *per flugiloj de facila vento*, laŭ la optimisma esprimo de Zamenhof en la himno “**La Espero**”, kiun li mem komponis.

Tiuj kvin jaroj estis la unuaj de la vivo de **Astura Esperanta Asocio**. Ĝia tiama membraro estis, proksimume, trideko da samideanoj, sed neniuj samideanino laŭ nia scio. En tiu epoko, ĉefe en nia lando, la virinoj intervenis tre malmulte aŭ preskaŭ neniom en publikaj, sociaj, asociaj... aferoj. Plejparto el la inoj kiuj aperas en la E-kongresaj fotoj, tiam (kaj ankaŭ en la nuntempo), estas edzinoj de esperantistoj, ne esperantistinoj ili mem. Tiurilate estas speciale menciinda tio ke en la jaro

1911 estis fondita en Hispanio **Virina Esperantista Asocio**. Fakte, la interveno de inoj en politiko kaj ceteraj publikaj aferoj, ankaŭ Esperanto, komencis tiam kaj pliiĝis laŭlonge de la sekvaj jardekoj. La agado de la Esperanta asocio de nia urbo estis organizi kursojn de Esperanto kaj uzadi la presorganon de la **Katolika Centro**, en kiu la E-grupo estis enkadrigita. Tiu presorgano nomiĝis **El Principado** (La Princlando) kaj **AEA**. kutime plenigis du paĝojn de ĉiu numero de la bulteno, parte en Esperanto.

En Hispanio, pro la ega sukceso de la kongreso en Barcelono, plu progresis la esperantista movado. En la jaro 1910 fondiĝis **Kataluna Esperanto-Federacio**, kiu organizis sian unuan kongreson tiujare, kaj en Kadizo estis fondita la bulteno “Gazeto Andaluzia”: estis E-kursoj en kelkaj provincaj ĉefurboj de la Andaluzia regiono, same kiel en multaj aliaj lokoj de la hispana geografio.

La universala kongreso de la jaro 1910 okazis en Vaŝingtono. Samkiel en la antaŭaj U.E.-kongresoj, ankaŭ ĉi-foje Zamenhof estis bone akceptita de la gastiga lando. La usonanoj ricevis la E-Majstron kun simpatio kaj intereso. Sendis al ĉi tiu kongreso oficialajn reprezentatojn ne malpli ol 22 landoj.

Tiujare oni publikigis en Hispanio ses esperantlingvaj revuojn (pli ol nuntempe), sed la bulteno **LA SUNO HISPANA**, kiun oni publikigis ekde la jaro 1904, ĉesis publikiĝi en 1910 por reaperi komence de 1913. Ankaŭ estis eldonitaj kelkaj E-libroj, kiuj, se iuj el ili temis pri Esperanto mem (vortaroj, gramatikoj...) tamen estis ankaŭ aliaj kiuj uzis Esperanton por pritemi aliajn aferojn.

Alia hispana novaĵo de nia E-movado tiujare estis la fondiĝo de **Esperantista Militista Asocio** kies honoran prezidantecon akceptis la Reĝo Alfonso la 13a. Li deklaris ke li iome lernis la internacian lingvon kaj kapablis legi kaj traduki el ĝi. En la jaro 1911 estis en nia lando oficiala permeso por instrui Esperanton en la lernejoj. Ankaŭ tiurilate la E-afero estis tiam pli favora ol nuntempe; evidentas ke ĉiuj informoj pri la situacio de Esperanto en tiu periodo temis pri kreskado kaj progresado de la movado kaj ties influo sur la socio. Kiel ni vidos laŭlonge de ĉi tiu historio, post la jaro 1914 ne-

niam plu estis tiel favoraj kondiĉoj por la disvastiĝo de la internacia lingvo.

En 1911 la universala kongreso estis en Antverpeno (Belgujo) kun simila sukceso kaj socia resonado kiel la antaŭaj.



Kongresanaro en Vaŝingtono (1910)

En nia lando plu progresadis la E-movado, kreskis la nombro da esperantistoj. La Zaragoza E-asocio “**Frateco**”, kiu estis fondita antaŭ kelkaj jaroj, nombris tiam 136 membrojn. En la urbo Taragono okazis la **Dua Kataluna Kongreso de Esperanto**. Kadre de la katalunaj E-kongresoj okazadis la t.n. “Floraj Ludoj”, t.e. konkursoj pri poezia verkado, kompreneble en Esperanto.

Alia signo de la vigleco de la esperantista movado en Hispanio estis la fondiĝo de pliaj E-grupoj: estas scio pri almenaŭ 12 novaj esperantistaj rondoj en diversaj lokoj en la lando en tiu ĵaro 1911, sed ĉefe interesas al ni tio ke unu el tiuj grupoj estis kreita en nia propra urbo, Híĥono (Gijón). En la **Laborista Ateneo** de tiu ĉi urbo oni fondis esperantistan grupon, impulsata de entuziasmaj kaj tre kapablaj samideanoj: Alfredo Villa, Juan Fernández, Francisco Fraga kaj Eduardo de Castro. Tiu grupo rapide akiris singularan gravecon en la urbo. Do, de tiam ekzistis du esperantistaj rondoj en Asturio kaj ambaŭ havis sian sidejon en nia urbo.

Tiu F.Fraga estis ĉeestinta la E-kongreson en Barcelono; ni menciis tion ke li salutis la kongresaron kiel reprezentanto de la astura lingvo. Pri Alfredo Villa menciindas ke li estas la aŭtoro de unu el la kvar esperantlingvaj versioj de la himno de Asturio. Ĉiujn kvar versiojn oni povas vidi en la interreta paĝo de nia Asocio, konkrete en la subpaĝo kies adreso de aliro estas:

<http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/asturias/asturland.html>

La fakto ke tiam ekzistis du E-grupoj en urbo kiel Ĥiĥono, kiu ne estis granda (hodiaŭ estas multe pli granda kaj havas nur unu grupon, cetere sufiĉe malforta) estis signo de la vigleco kiun havis en tiu epoko la esperantista movado, sed estis signo ankaŭ de priideologiaj diferencoj, kiuj tiam gravis pli ol nuntempe. Ja, la anoj de **Astura Esperanta**

Asocio, kreita du jarojn antaŭe, apartenis al la **Katolika Centro**, kies ideologio estis religie-ma, burĝklasa, politike dekstra aŭ centr-dekstra, dum la nova grupo, enkadrigita en la **Laborista Ateneo**, sin tenis laike, laboristklase kaj politike maldekstre. Sed spite al tiuj diferencoj, oni povas diri ke la membroj de ambaŭ grupoj estis progresema kaj tre fervoraj aktivuloj de la esperantismo kaj ties interna ideo.

En la jaro 1912 senhalte progresadis la hispana esperanta movado. Inter la hispanaj E-grupoj elstaris "**Fratego**" de Zaragozo, subgvide de la prestiĝa advokato Emilio Gastón. En Sabadell oni festis la 25-jaran jubileon de la naskiĝo de Esperanto per la inaŭguro de strato dediĉita al D-ro Zamenhof. Hodiaŭ ekzistas en la mondo multaj stratoj kiuj portas la nomon de la fondinto de Esperanto, sed tiu de Sabadell eble estis la unua el ĉiuj ili. La 8a universala E-kongreso estis en Krakovo (Polujo). La tiama parolado de Zamenhof finis per jenaj vortoj: *kio estas la esenco de la esperantista ideo kaj al kia estonteco alkondukos iam la homaron al interkompreniĝado sur neŭtrale-homa, sengenta lingva fundamento, tion ni ĉiuj sentas tre bone, kvankam ne ĉiuj en tute guala formo kaj grado. Ni donu do hodiaŭ plen-*

an regadon al tiu silenta sed solena kaj profunda sento kaj ne profanu ĝin per teoriaj klarigoj.

La tria kataluna esperanta kongreso de tiu jaro okazis en Tarrasa; organizis ĝin la grupo "**Lumon**" de tiu urbo. Kiel kutime, kadre de tiu kongreso estis la beletra konkurso "Floraj Ludoj".

La **Analoj** registras por tiu jaro 1912 la kreadon de nur unu nova esperantista grupo en nia lando, Ĝi nomiĝis **Blindula Esperanta Grupo**, kaj, jen surprizo: tiu grupo estis en nia urbo. Jen la teksto de la informo pri ĝi en la **Analoj**:

Ĉe Laborista Ateneo de Gijón, oni fondis ĉi-jare Blindulan Esperantistan Grupon, probable la unua aŭ unu el la unuaj en la mondo kun tiu specifa karaktero. Ĝia Prezidanto estis S-ro Manuel Blanco Chico, kiu baldaŭ akiris grandan prestiĝon ĉar ĝi

multe aktivis.

Ankaŭ la jaro 1913 estis profitdona por la esperanta movado je ĉiu nivelo, kaj enlanda kaj internacia. Reaperis la revuo **LA SUNO HISPANA** post plurjara ĉeso kaj okazis en Ĝirona la 4a kongreso de **Kataluna Esperanto-Federacio**.

La Universala Kongreso de Esperanto de tiu jaro okazis en Berno de la 24a al la 31a de aŭgusto. Ĉeestis ĝin hispana delegacio gvidita de kapitano Perogordo kiel reprezentanto de la Reĝo. Tie oni prenis la decidon ke la kongreso de la sekva jaro okazu en Parizo.

Inter la novaj E-grupoj

de nia lando indas menciiti tiun fonditan en Melilla jam en la monato januaro.

La jaro 1914 komencis sub tiel bonaj aŭspicioj por Esperanto kiel la antaŭaj. La 28-29an de junio okazis en Sant Feliu de Guixols la kvina kongreso de **Kataluna Esperanta Federacio** kun siaj kutimaj "Floraj Ludoj".

Komence de la monato aŭgusto la stratoj de Parizo varmis je esperantistoj venintaj tien por ĉeesti la dekan universalan kongreson de Esperanto. La 2an de aŭgusto en la kongresejo oni metis afiŝon komunikante al la miloj da kongresantoj la neokazigon de la kongreso: okazis katastrofo: estis komenciĝinta la UNUA MONDMILITO.



Zamenhof kaj edzino kun esp-istoj en Bad-Kissingen



Kongresanaro en Antverpeno (1911)



Popolo popolon atakas kruele...

**Homaron Vi kreis perfekte kaj bele
Sed ĝi sin dividis batale;
Popolo popolon atakas kruele,
Frat' fraton atakas ŝakale.**

Kiam L.L. Zamenhof, akompanita de lia edzino, estis survoje al Parizo por ĉeesti la 10an Universalan Kongreson de Esperanto, ĉar lia loĝlando, Polujo, apartenis tiam al la imperio de la rusa Caro,

kiu ekestis milite kontraŭ Germanio, li ne povis trairi ĉi tiun landon destine al Francio, kiu, ankaŭ ĝi staris en milito kontraŭ Germanio. Cetere, la kongreso mem estis suspendita. Al ĝi estis aliĝintaj 3739 personoj, pli ol en ĉiuj antaŭaj U.E. kongresoj.

Reveninte al Varsovio, li okupiĝis precipe pri tradukado, de Andersen-fabeloj kaj partoj de la Biblio. Pro malsano li devis ĉesi sian profesion kuracadon kiel okulisto. De tiam kaj ĝis la tago de lia morto, kiu okazis la 14an de aprilo de 1917, li tre suferis, korpe, pro malforteco de la koro, manko de pulso kaj malfacilaĵoj por enspiri, kaj anime pro la granda tragedio kaj la hororoj de la milito kiu dum tiuj jaroj dronigis Eŭropon per sango.

Tiu milito reprezentis la fiaskon de la strebado de lia tuta vivo, de lia revo kaj lia plano. La Granda Milito okazis pro tio ke venkis la naciismoj, la ŝovinismo, la imperiismoj, la malamo inter la homoj. Kontraŭ ĉio ĉi li estis batalinta senĉese. La strofo de "La Preĝo" de Zamenhof, kiun ni metis komence de ĉi tiu ĉapitro, montras la manieron kiel li vi-

dis la antaŭan historion de la homaro. Ĝuste al tiu historio li volis meti finon per sia lingva projekto, aŭ pli ĝuste, per sia projekto, ne nur lingva sed ankaŭ homarana laŭ lia esprimo.

Por li la "homaranismo", ja, estis la kerna aŭ interna ideo de la internacia lingvo. Lia ideo estis ke la nacioj malaperu kaj ke ĉiuj homoj havu unu komunan lingvon kaj komunan bazan kredon pri

"plej alta estaĵo". Tio signifus nek la malapero de aliaj lingvoj nek de aliaj religioj. Laŭ la postuloj de homaranismo, ĉiu lando havu neŭtralan geografian (ne gentan) nomon, kaj apartenu al ĉiuj enloĝantoj samrajte. Ĉiu havu la rajton uzi private iun lingvon preferatan, sed kun aliaj homoj kaj kun institucioj oni parolu home-neŭtralan lingvon. Religie, homoj restu ĉe sia religio laŭdezire, sed tiuj apartaj religiaj dogmoj ne rajtas kontraŭdiri al scienco. Eĉ inter esperantistoj homaranismo restis nesukcesa, kaj nuntempe nur tre malmultaj nomas sin homaranismanoj.

Li faris alvokon al diplomatoj enhavante tiun homaranisman programon, kiun oni devus pridiskuti en internacia kongreso, sed ĝi havis neniun sukceson kaj tia kongreso neniam okazis.

Sed dum la milito, konkrete en la jaro 1915 okazis iu 11a U.K. de Esperanto en San Francisco, Usono, sed nek Zamenhof nek multaj aliaj geesperantistoj el diversaj landoj povis partopreni. Fakte, estis nur 163 ĉeestantoj.



Ejo de la 10a Universala Kongreso de Esperanto, kiu ne okazis.

Notindas ke multaj iamaj esperantistoj falis sub la influo de la freza ondo je ŝovinismo kiu tiam superregis la mondon. Multaj aliaj mortis viktimoj de la milito. Zamenhof mem rekte suferis sekvojn de la milito. Lia loĝurbo estis unue okupita de la rusaj trupoj kaj poste de la germanaj, kaj la judoj estis mistraktitaj de ambaŭ armeoj.

La milito tre malhelpis la funkciadon de la esperantista movado; ne okazis pluaj universalaj kongresoj ĝis post la fino de la konflikto. Tamen nia lando estis neŭtrala en tiu milito, do ĉi tie ĉiuj aferoj normale disvolviĝis, male ol en preskaŭ ĉiuj ceteraj eŭropaj landoj. Ankaŭ la esperantista afero ĝuis en nia lando je tiu situacio de ne-militado. Dum la militaj jaroj plu okazis la kongresoj de **Kataluna Esperanto Federacio** kun ties “Floraj Ludoj”. En la jaro 1916 malaperis la tutlanda E-organizaĵo **H.S.p.p.E.** sed tio signifis neniun perdon por la hispana esperantismo ĉar dume estis fondita iu **Hispana Esperantista Konfederacio** kiu de tiam organizis tutlandajn kongresojn de Esperanto.

Kaj dum tiuj jaroj aperis ankaŭ regionaj federacioj de esperantistoj en kelkaj lokoj en la lando: la **Aragona Esperanta Federacio** estis fondita en Zaragozo en 1916, kaj tuj aliĝis al la menciita **Hispana Esperantista Konfederacio**, kiu okazigis sian unuan kongreson koincide kun la sepa de la kataluna federacio, en Reus. En la sama jaro estis fondita ankaŭ la **Baska Esperanta Federacio**.

En la jaro 1917 fondiĝis ankaŭ Esperanta Federacio en Madrido, kun la nomo **Zamenhofa Federacio**, kiu eldonis revuon titolita **Hispana Esperantisto**, sed ĉi tiu ne aliĝis al la tutlanda konfederacio kaj krome havis tute malsamajn celojn. En la sama jaro estis fondita Andaluzia Esperantista Federacio, kiu, laŭ decido de ĝia estraro

havis kiel presorgano la saman revuon ol la madrida federacio, t.e. **Hispana Esperantisto**. Ne estas malfacile konjekti ke la diferencoj inter ambaŭ grupoj de federacioj estis similaj al tiuj ekzistantaj inter la esperantistaj grupoj de nia urbo.

Kiam okazis la morto de Doktoro Zamenhof la hispana esperantistaro dolore reagis antaŭ tiu grava perdo, kaj en ĉiuj esperantistaj societoj, inter ili tiuj de Asturio, oni omaĝis la Majstron, kaj rememorigis lian eksterordinaran figuron per diversaj elmontroj de amo kaj plej alta konsidero al lia filozofia penso kaj homa agado.



Zamenhof en 1916



Lasta foto de Zamenhof

Kvankam en Hispanio la domaĝa influo de la mondmilito ne tiel estis grava kiel an aliaj lokoj, tamen oni devas konstati ke malaperis multaj hispanaj esperantistaj grupoj, ĉefe en la du unuaj jaroj de la milito. La reago kontraŭ tiu malfavora situacio konstatigis meze la jaro 1916, kiam okazis en

Reus la menciitaj samtempaj kongresoj de **K.A.E.** kaj **H.E.K.**

Laŭlonge de la jaro 1918 oni perceptis esperon pri finiĝo de la milito kaj la renaskiĝo de la spirito kiu estis forte domaĝita de la malamo komence de la konflikto. Tiu reago kontraŭ la valoroj de la interbatalintaj fortoj, tiel perceptebla en la batalantaj landoj kiel en la neŭtralaj kiaj Hispanio, estis vera krizo de konfido en la ĝistiamaj regintaj klasoj. La rusa revolucio eble estas la plej klara ekzemplo de tiu krizo, sed estis ankaŭ la kazo de la ruiniĝo de la imperiestra reĝimo en Aŭstrio kaj de la

Kajsero en Germanio. Kaj ne nur en la venkitaj landoj, ankaŭ en Francio, Anglio kaj aliaj lokoj estis popolamasaj plendoj kontraŭ la milito kaj la aŭtoritatoj kiuj alkondukis la popolojn al tiom ega katastrofo, la plej mortiga milito inter ĉiuj okazintaj ĝis tiam.

En Hispanio estis fonditaj novaj Esperanto-grupoj, kiel tiu nomata “**Juneco**” en Santander. Estis nova E-grupoj ankaŭ en Logroño, Burgos, Orense,

Baltanes (Palencio)... Okazis ankaŭ tio ke multaj aliaj grupoj kiuj ne estis mortintaj sed vegetis dum la antaŭaj jaroj, revigliĝis kaj organizis novajn kursojn de Esperanto. **Andaluzia Esperantista Federacio** okazigis tiujare sian duan kongreson.

Alia aspekto de la renaskiĝo de la esperantista aktivado estas tio rilate al la festoj kaj similaj aktoj, kiuj preskaŭ tute estis ĉesintaj ekde la komenciĝo de la milito.

Sed eble inter tiuj signoj de espero pri revigliĝo de la movado ne estis facile konscii pri tio ke la milito detruis la sociajn kondiĉojn, ekzistantaj ĝis la jaro 1914, por la ĝenerala akcepto de la Internacia lingvo Esperanto fare de la popoloj kaj ties gvidantaj klasoj. Ja, la ĝistiamaj ekvilibro, en Eŭropo, inter la ĉefaj lingvoj: angla, franca kaj germana, rompiĝis favore al la angla. Verdire, ruiniĝis ankaŭ la ĝistiamaj supereco de Eŭropo en la mondo. Aperis nova superpotenco, la angloparolanta Usono, kaj tio komencis ekestigi malfavorajn kondiĉojn por la disvastiĝo kaj monda akcepto de Esperanto.



RENASKIĜO



Finiĝinte la Granda Milito kaj forpasinte la Majstro Zamenhof, komenciĝis por la esperantista movado nova epoko tute malsama ol la antaŭa. Kadre de la ĝenerala normaligo de la mondaj aferoj normaligiĝis ankaŭ ĉio koncerne al la esperantista movado. Reiĝis la ĉiujara okazado de universalaj kongresoj de Esperanto samkiel de landaj E-kongresoj kaj renkontiĝoj en diversaj lokoj en la mondo, kaj la (re)fondiĝo de grupoj kaj kluboj de Esperanto. En ĉi tiu punkto decas iome atenti pri la ideologia ŝanĝo aŭ evoluo de la epoko. Tiel grava konflikto kia estis la MondMilito ne povis pasi ne lasante post si grandan efikon, aŭ pli ĝuste dirite, ĝi ne estus povinta okazi sen la antaŭekzisto de grava krizo ene de socisistemo. Ĉu kaŭzo aŭ rezulto de la Granda Milito, la krizo de la sistemo konsistis en tio ke la superreganta klaso, t.e. la burĝaro, ĉesis esti revolucia klaso kaj fariĝis konservema. Al tiu klaso apartenis revoluciaj kaj progresemaj homoj kiaj George Washington, Karl Marx, F. Engels, Lenin kaj multaj aliaj, inter ili Zamenhof mem. Tiu klaso batalis kontraŭ la antaŭaj superregantoj de la socio: la aristokrataro, la feŭdsistemo... Sed

de tiam ĝi ne plu sin tenis favore al la socia progreso sed al la kapitalisma ekspluatado. Dume, aperis kaj prenis la torĉon de la progreso nova revolucia klaso kiu ĝis tiam ĝi neniam estis protagonisto de la historio: la proletaro. Ĝia debuto en la historio estis la Rusa Revolucio de 1917 kaj ĝia protagonismo estis granda laŭlonge la 20a jarcento. Tio perceptiĝis ankaŭ en la esperantista movado. Tiurilate menciindas ke en decembro de la jaro 1919 okazis en Madrido kongreso de la hispanaj Sindikatoj, kiu decidis disvastigi Esperanton kiel eble plej, kio signifis ke la lernejoj dependantaj de la Sindikatoj organizis kursojn de Esperanto en ĉiu hispana urbo kie ekzistis tiuj laboristaj centroj. Rilate al nia urbo, ni jam vidis ke la E-grupoj enkadrigitaj en la Laborista Ateneo konsistis el aktivuloj kiuj ligis sian laboron por Esperanto kaj ties interna ideo kun sian dediĉon al la batalado por socia justeco. En tiu periodo, kiun ni pritemas, la E-grupo gvidata de Alfredo Villa eldonadis bultenon, nomatan "Diagonalo", en kiu estis, en ĉiuj numeroj, krom artikoloj en Esperanto, ankaŭ gramatika suplemento de tiu Internacia Lingvo.



Sed aktivadis por Esperanto ankaŭ la alitipa E-grupo, unua fondita en nia urbo: **Astura Esperanta Asocio**, kaj ĝi daŭre estis estrita de ĝia fondinto kaj unua prezidanto, Francisco Menéndez Rúa. Pri ĉi tiu periodo, kiun ni priskribas, de la jaro 1919 al 1936, ni, bedaŭrinde, ne disponas je skribita dokumentaro pri tiu E-Asocio. Sed ni havas ion, konkrete, tri fotografiaĵojn, kiujn ni prezentas en ĉi tiu ĉapitro de nia historio, kaj la personan informon de iu survivanto de tiu epoko kaj ankoraŭ nuntempe membro de nia E-Asocio, José Palacio Tuero, kiu naskiĝis en la jaro 1909, same kiel la E-Asocio mem.

La unua el tiuj fotoj, kiu aperas en la antaŭa paĝo, estis farita en monato majo de la jaro 1929, laŭ informas al ni nia centjara samideano Palacio, kiu aperas en ĝi, en la dua vico, triaŭloke dedekstre en la foto. La prezidanto, Francisco M. Rúa, aperas en la centro de la unua vico, kaj deskre de li estas

Tomás Guisasola, prezidanto de la **Katolika Centro**, en kiu estis enkadrigita la Esperanta Asocio. Eble tiu sinjoro sin sentis sufiĉe ligita al la esperantismo aŭ estis esperantisto li mem ĉar li aperas ankaŭ en la du ceteraj fotografiaĵoj de la E-grupo, kiujn ni



prikomentos poste. Nu, ĉar ni konas, dank' al samideano Palacio, la nomojn de ĉiuj samideanoj, kiuj aperas sur la foto, jen ni transskribas tiujn nomojn: *De maldekstre al dekstre: en la unua vico:* Juan Martínez, Julio Menéndez, Rufino Menéndez, Tomás Guisasola (Prezidanto de la **Katolika Centro**), Francisco Menéndez Rúa (Prezidanto de **Astura Esperanta Asocio**), Emilio López Castro, Alfredo A. Cañada, Manuel Rodríguez, Alberto Menéndez. *En la dua vico:* Alfredo Martínez, José Junquera, Luciano Sánchez, Ángel Álvarez, Aurelio Rodríguez, Leonardo Villabona, Constantino S. Montoto, Ignacio Valdés, José Maroto, Vicente S. Montoto, Severino D. Bernedo, José Palacio Tuero (la sola ankoraŭ vivanta nuntempe), Benigno Ibáñez, Ramiro Fernández. *En la tria vico:* José María Mori, José Blanco Raspal, Horacio Solar, Adolfo Amigo, Tomás Palacio Tuero, Luis Muñiz, José Mendíbil.

Malantaŭ la grupo, iomete maldekstre en la foto, oni povas vidi la esperantan flagon de la Asocio. Notindas ke sur la kvinpinta verda stelo estas blanka (aŭ ĉu eble flava) kruco. La kruco en tiu flago havas duoblan signifon. Unue, ĝi estis simbolo de la **Katolika Centro** en kiu estis enkadrigita la esperantista grupo, kaj due, flavkolora kruco kun tiu sama formo aperas sur la tradicia flago de la Astura regiono, kaj la E-Asocio enhavas en sian nomon ankaŭ la titolon de "Astura".

La dua fotografiaĵo, kiu aperas en ĉi tiu sama paĝo, estas eltranĉaĵo de ĵurnalo **MADRID** de la 12a de Junio de la jaro 1931, kun jena teksto (kompreneble, en la hispana lingvo): **GIJON.-** Reprezentantoj de la tri unuaj generacioj kiuj lernis Esperanton en la noktaj klasoj de Astura Esperanta Asocio, institucio kiu ĵus festis sian 23an jariĝon.

En tiu teksto estis iu preseraro: tiam ne estis la 23a sed la 22jara datreveno de la fondiĝo de la Asocio.

En la foto estas klare videbla la flago de la grupo kun indiko de la jaro de ties komenciĝo: 1909.

Do, inter la antaŭa foto kaj ĉi tiu estis pasintaj ĝuste du jaroj. Sed dum tiu mallonga periodo estis okazintaj en nia lando gravaj ŝanĝoj en la politika te-

reno. Kiam oni faris la E-grupan foton de la jaro 1929 Hispanio estis ankoraŭ reĝ-monarkio kaj krome la lando estis, de antaŭ kelkaj jaroj, sub la militista diktaturo de la Generalo Primo-de-Rivera. Tamen, kiam oni faris la duan foton estis jam falinta la diktatoro kaj krome falis poste ankaŭ la Reĝo; Hispanio estis tiam respubliko de antaŭ preskaŭ unu monato.

La lasta el la tri fotografiaĵoj de tiu epoko, je kiuj ni disponas, estas iome strangeta. Ni prezentas tiun bildon en la sekva paĝo. Unue, ni ne sukcesas datigi tiun fotan dokumenton; ni ne scias ĉu ĝi estis farita antaŭ la du antaŭe menciitaj, aŭ post ili, aŭ inter ambaŭ.

Sed pli malfacile estas konjekti la naturon kaj la cirkonstancoj de la grupo aperanta en tiu bildo. Ĝi povas esti aŭ Esperanta lernokurso aŭ kunsido de la estraro de la **Katolika Centro**. En la foto aperas, krom la du prezidantoj, Tomás Guisasola kaj



Francisco Menéndez Rúa, facile rekoneblaj, ankaŭ aliaj kiuj, ŝajne, aperas sur la unua foto kiun ni komentis. Sed estas ankaŭ aliaj tute ne konataj kaj inter ili ne malpli ol kvar katolikaj pastroj. Krome du el tiuj pastroj ŝajnas esti iome altrangaj; iliaj vestaĵoj ŝajnas indiki ke ili estis kanonikoj aŭ io simila. Tio igas nin pensi ke temas pri kunsido de la estraro de la **Katolika Centro**, sed tiukaze ne kongruas la ĉeesto de tri infanoj en la grupo, nek la flago de **Astura Esperanta Asocio**, bone videbla malantaŭ la grupo. Alie, la grupo estas tre multnombra por temi pri estraro de iu Asocio. Ĉiuj tri cirkonstancoj apogas la tezon ke temas pri lernokurso de Esperanto, sed tiukaze estas ne verŝajna tiom granda partopreno de pastroj en la sama kurso. Antaŭ la manko de preciza informo ni povas fari supozon, kaj nia opinio estas ke temas pri la partoprenantoj en Esperanta lernokurso sed konsentis pozi por la foto ankaŭ kelkaj altranguloj de la **Katolika Centro** por esprimi sian simpatian apogon al Esperanto. En tiu periodo, kiun ni difinas kiel de renaskiĝo de la esperantista afero, oni povas konstati apogon al Esperanto en ĉiuj sociaj sektoroj, tiel en la burĝa, konservema klaso, el kiu nestis ideologia referaĵo tiu religia centro, kiel en la laboristaj kaj maldekstraj soci-tavoloj kies ideologioj estis la anarkiismo, la socialismo kaj la tiam naskiĝanta komunismo.

Interesa novaĵo de la periodo kiun ni priraportas estis la komenciĝo de la okazado de la Hispanaj Kongresoj de Esperanto. La unua okazis la jaron 1920 en Barcelono. Ĝi, pli ol “Hispana” povus esti nomata “Ibera”, ĉar la partoprenantoj estis hispanaj kaj portugalaj, same kiel la pritrakitaj temoj de la kongreso. La dua okazis la jaron 1921 en Zaragozo, kaj havis, ankaŭ ĝi, Iberian rangon kaj karakteron. La Loka Kongresa Komitato estis, kompreneble, la E-asocio “Fraterco” de Zaragozo. Notindas ke nur unu monaton antaŭ la okazigo de la kongreso, tiu E-grupo ricevis 326 aŭstrajn ĝinfanojn, orfojn de la Granda Milito, kiuj estis poste distribuitaj inter kelkaj hispanaj lokoj, inter ili kelkaj asturiaj urboj kaj vilaĝoj. En la jaro 1922 ne povis okazi la planita, por Madrido, Iberia E-kongreso, kaj ankaŭ ne okazis la kutima Kataluna E-Kongreso kaj aliaj, planitaj, de kelkaj hispanaj regionoj. La kaŭzo de tiu ŝajna bremsado de la hispana esperantismo estis la morto, tiujare, de kelkaj gravaj esperantistaj aktivuloj, kaj aliaj cirkonstancaj malfacilaĵoj. Sed en la sekva jaro, 1923, normaligiĝis la situacio de la hispana esperantismo kaj reigiĝis la okazado de la E-kongresoj en nia lando. La Tria Hispana Kongreso de Esperanto okazis tiujare en Valencio, kaj ties Honora Prezidanto estis la Reĝo Alfonso la 13a. Pli ol la du antaŭaj, tiu kongreso havis

iberan karakteron, fakte, ĝia oficiala titolo estis, krom “Tria Hispana Kongreso de Esperanto”, ankaŭ “Unua Kongreso de Iberiaj Esperantistoj”. En septembro de ĉi tiu jaro forpasis Ricardo Codorniu, la plej elstara figuro de la hispana esperantismo. Estis en tiu sama jaro, 1923, kiam la Generalo Miguel Primo-de-Rivera faris sian militistan puĉon kontraŭ la konstitucia ordo de la lando. Lia diktaturo daŭris sep jarojn, ĝis 1930, sed la granda eraro de la Reĝo, permesi tiun situacion, estis fatala por la monarkio mem, kiu estis anstataŭita de la 2a Respubliko unu jaron poste (1931).

En la jaro 1924 komenciĝis en la hispana esperantista movado grava konflikto inter katalunismo kaj oficialismaj tendencoj. Tiu kverelo, kiu tre damaĝis la funkciadon de la Hispana Esperanta Movado, daŭris kelkajn jarojn... fakte, ĝis la hispana CivilMilito (1936). Verdire, la

konflikto ne estis problemo de la esperantista movado sed de la hispana socio ĝenerale. La malakordo interne de la E-movado de nia lando estis reflektado aŭ respiegulo de la problemo de la regionaj naciismoj naskiĝantaj tiam en la hispana socio. Post la 4a Hispana Kongreso (2a de la Iberiaj esperantistoj), okazinta tiujare en Bilbao, la Kataluna Esperanta Federacio ne plu partoprenis en tiuj tutlandaj E-kongresoj. Paradokse, en la 5a Hispana Kongreso de Esperanto (3a Kongreso de la Iberiaj Esperantistoj), okazinta en Kordovo en la jaro 1925, partoprenis la Federacio de Portugalio, kiu estas sendependa lando de antaŭ kelkaj jarcentoj, kaj tamen ne partoprenis tiu Kataluna Federacio. En ĉi tiu kongreso oficiale naskiĝis **Hispana Esperanto Federacio**, nomo kiun portas ankoraŭ la land-skala organizo de la geesperantistoj de tiu-ĉi lando. La 6a Hispana Kongreso de Esperanto okazis en Madrido en la sekva jaro, 1926, sed ĝi jam ne havis iberan karakteron sed nur hispanan.

En la jaro 1927 ne okazis Hispana E-Kongreso, kaj en 1928 estis la 7a, en Seviljo. Tiam jam oni sciis ke la sekva E-Kongreso, tiu de la jaro 1929, estos en la Asturia ĉefurbo: Oviedo.

Tio devigas nin atenti pri la tiama situacio de la esperantismo en nia regiono. Ni jam vidis tiun foton de la membraro de **Astura Esperanta Asocio** en majo de 1929, kaj ni sciis ke tiam ekzistis aliaj

du E-grupoj en nia urbo, dependantaj de la Laborista Ateneo. Sed la situacio de Esperanto tiumomente, en Ĥiĥono konkrete kaj en Asturio ĝenerale, estis pli forta. Ni konstato tion tra legante jenan transskribon el la **Analoj** de Marco Botella:

La hispana Esperanta Movado solidiĝis tiun jaron kiam la Esperantaj Grupoj de Oviedo kaj Gijón, ĵus refonditaj, kompletigis la mapon de tiu ĉeno de la nordaj Esperantaj Grupoj kiuj etendiĝis de post niaj veteranaj esperantistaj rondoj de Bilbao-Barakaldo tra Santander ĝis Asturio. La asturaj Grupoj ebligis la kontakton de tiu norda akso kun la entuziasmaj iam fervoraj galegaj esperantistoj de Lugo-Orense-Coruña-Santiago-Vigo... Niaj asturaj samideanoj strebis por nia afero tre efike dum la tuta jaro. Ili publikigis ofte artikolojn favore al Esperanto en la ĵurnaloj “El Comercio” kaj “El Noroeste” de Gijón, kaj ankaŭ en “El Carbayón”, “La Región”, “La Prensa” kaj “La Voz de Asturias” de Oviedo. Elstara inter ĉiuj la tieaj esperantistoj estis Antonio Jiménez Mora, kiu en tute senlaca strebado faris el Oviedo unu el la fokuso



Ricardo Codorniu

plej gravaj de Esperanto en Hispanujo. Jam en monato Januaro, li prelegis ĉe la Ateneo de Oviedo, kie li jam gvidis kurson de Esperanto speciale por virinoj; li ankaŭ organizis kaj gvidis alian por la georfoj de Centro de la Astura Deputitejo, kaj danke al sia persona influo, li atingis ke la Provinca Depititara de Oviedo tiel multe interesiĝis pri Esperanto, ke tiu institucio invitis la hispanajn esperantistojn kongresi venontjare en Oviedo.

Tio, kion diras tiu teksto pri refondiĝo de la E-grupoj de Oviedo kaj Gijón ŝajnas ne esti tre ĝusta. Estas neniu indico pri neaktiveco de la grupoj de Ĥiĥono dum tiuj jaroj, kaj la E-grupo de Oviedo estis fondita de tiu Antonio Jiménez Mora

en la jaro 1927, do ne havas sencon paroli pri refondiĝo en 1928. Tiurilate la propraj **Analoj** kontraŭdiras sin mem ĉar en alia loko diras ke en tiu jaro 1927 la grupoj de Gijón kaj Oviedo fondis la **Asturan Esperantistan Federacion**, subgvide de Antonio Jiménez Mora mem. Do, ne sencas paroli pri refondiĝo de tiuj grupoj en 1928.

Tiu A. Jiménez Mora ne estis nov-alveninto en la Esperantista Movado. Oni scias ke li partoprenis en la Universalaj Kongresoj de Esperanto ekde la jaro 1907 al 1914 kaj eble ankaŭ en tiu de la jaro 1920 en Nederlando. Li gvidis kursojn de Esperanto en kelkaj lokoj kie li rolis kiel armea oficiro. Dum tiuj jaroj, 1926 al 1930 li estis en la garnizono de Oviedo kiel infanteria kolonelo kaj tie li fondis **Esperantan Grupon de Oviedo** kaj la **Asturan Esperantistan Federacion**, kies Prezidanto

li mem estis. Dum li dediĉiĝis al la organizado de la **8a Hispana Kongreso de Esperanto** la astura esperantismo plivigliĝis kaj estis pruvoj de tio ankaŭ en nia urbo Gijón. Denove ni cedas la parolon al la **Analoj**:

Alia areo en kresĉendo estis Asturio, kio estis facile komprenebla ĉar en Oviedo oni preparis la 8an Hispanan Kongreson de Esperanto. Gijón, la alia granda astura urbo ankaŭ vivis intense tiajn preparojn, kaj projektis omaĝi la kongresanojn en la propra Gijón per festeno okazonta en la lasta kongrestago. Lernantoj de la Komerca Lernejo "Jovellanos", sub la fervora kaj lerta gvidado de Cristóbal Fournier, fondis Esperantistan Grupon registritan sub la nomo "Ĥiĥona Espero", kies unua estraro konsistis el jenaj gesamideanoj: Prezidanto S-ro Francisco Fernández; Vicprezidanto S-ro Alfonso S. Marguenda; Sekretario Pedro Sierra Muñiz; kaj aliaj estraranoj estis S-ro José Menéndez, F-inoj Encarnación Junquera, Elisa Fernández, kaj Luz Piñera...

Kvaran E-grupon en nia urbo, kaj krome kun estraraninoj! Verdire La Ĥiĥona esperantismo estis travivante tiam sian oran epokon.

Alia grava evento okazinta tiun jaron en Gijón estis la starigo en la Foiro de tiu urbo de speciala stando por propagandi Esperanton. Ĝin oni uzis kiel konstantan Ekspoziciejon de Esperantaĵoj. Preskaŭ ĉiuj Ministroj, same kiel multenombraj vizitantoj, admiris la originalecon de niaj propagandaĵoj, kaj speciale tiujn el ekzotaj landoj... Kiam la vizitanto estis la Ĉefministro, akceptis lin la Prezidanto de la Astura Esperanto Federacio, S-ro Antonio Jiménez Mora, kiu donacis al S-ro Primo de Rivera belan insignon de la venonta kongreso okazonta en Oviedo tre baldaŭ. La Ĉefministro komentariis al S-ro Jiménez "ke li ofte ricevas Esperantajn presaĵojn, ke li bone komprenas la lingvon", kaj li tuj interesiĝis pri la disvolvo de Esperanto en la mondo. En tiu momento, la Ministro pri Publika Instruado intervenis en la konversacio por indiki al S-ro Primo de Rivera "ke li jam subvenciis la Hispanan Esperanto-Asocion sed konstatante la gravecon de la Movado lia ministerio certe pligrandigos la oficialan helpon al la esperantistoj". Jiménez Mora, profitis la okazon por inviti la Ministraron partopreni en la proksima kongreso, kion li akceptis "se aliaj pli urĝaj devoj permesos tion al li". Je la adiaŭo, generalo Primo de Rivera, tre afable salutis S-ro Jiméñez Mora kaj diris al li: "adiaŭ komandanto, estu certa ke mi ne forgesos ĉi tion, Dankon!".

Je tutlanda skalo, la situacio de la esperantista movado estis tiel bona kiel en nia Asturia regiono; tiu estis la ora erao de la esperantismo en Hispanio. Sed oni devas memori ke ekzistis tiam granda divido kaj kvereloj inter la hispanaj esperantistoj. Ŝajnas, tamen, ke tiu divido kaj polemikoj ne estis signo de krizo en la movado, sed tute male: ĝi estis signo de viveco kaj florado.

La esperantistaj kontraŭdiroj iome montriĝis ankaŭ en la **8a Hispana Kongreso de Esperanto** en Oviedo. Ĝi komenciĝis la 14an de septembro. Ni citas la **Analoj**:

...je la 11,30 matene, okazis la solena Malfermo, kiun prezidis, kun samideano Jiménez Mora, la generalo

Zubillaga, reprezentanto de Lia Reĝa Moŝto Alfonso la 13a; ankaŭ kunprezidis la reprezentanto de la Provinca Deputitaro kaj la Urbestro de Oviedo. Parolis unue la Prezidanto Jiménez Mora por danki la kongresanaron pro la partopreno en la Kongreso, kaj tuj poste, liveris al la generalo Zubillaga la oran emajlitajn insignon de la Kongreso por ke li ĝin transdonu al la Reĝo. Post li parolis la Prezidanto de la Provinca Deputitaro, kiun sekvis la Urbestro de Oviedo, ambaŭ esprimis sian dankon kaj bonvenon al la kongresanoj nome de la Regiono kaj la Urbo. Post la protokolaj paroloj, la muzikistaro de la regimento "Princo" ludis kaj la kongresanaro samtempe kantis la himnon de Asturio kaj "La Espero". Post la Malfermo, ĉiuj iris al la Urbodomo, kie la Urbestro regalis la kongresanojn per malavara lunĉo.

Posttagmeze, oni vizitis la arta-historiajn monumentojn de Oviedo, kaj poste, ekster la urbo, ankaŭ la palacon de Ramiro la 1a (824-850) "Santa María de Naranco", kaj la preĝejon "San Miguel de Lillo" de sama epoko, ambaŭ konstruitajn sur la deklivo de la monto Naranco je kelkaj kilometroj for Oviedo, de kie oni ĝuas belegan panoramon. Revene, en la ĉefsalono de la Ateneo de Oviedo, unua laborkunsido de la kongreso, prezidata de la ĵus elektita Jiménez Mora, kaj oficis kiel Sekretario Rodríguez Escartín. Oni debatis fundamentajn temojn de la Asocio, kaj eĉ proponis krei tute novan organismon, ĉar la solvendaj problemojn estis tiel komplikaj ke eble, kelkaj opiniis, estus preferinde ne tuŝi ilin. La situacio estis ja tre delikata, kaj ĉiuj konsciis pri tio, tial la debatoj estis trankvilaj kaj metodaj...

La 15an, dua kongrestago, je la naŭa matene, solena Diservo kun kapelorkestro kaj ĥoroj kaj prediko en Esperanto de la kompetenta kaj fervora pioniro pastro Cristóbal Fournier. Post la Diservo, inaŭguro de la Internacia Ekspozicio de Slojdoj, organizita de esperantistoj per materialo sendita de geinstruistoj el 18 landoj. La oficiala Malfermo altiris la atenton ne nur de la kongresanoj sed ankaŭ de la profesiuloj de la instruado, kaj estis nia samideano Luis García Fernández, iniciatinto kaj organizinto de tiu publika elmondo, kiu unue parolis dum tiu Malfermo por emfazi la utilon de Esperanto por tiaj instruistaj taskoj, kaj metis kiel ekzemplon pri kunlaborado tiun Ekspozicion. Tuj poste, parolis la ĉefinspektoro pri Publika Instruado de la provinco S-ro Anieva, kiu esprimis sian profundan impreson pro tiu riĉa materialo kiun la Ekspozicio montras, kaj sian admiron pro la multvalora kunlaborado de tiom da landoj, sendube danke al Esperanto. Li esperis ke la esperantistoj programos estonte Ekspoziciojn kiel tiu, ĉar vere ĝi enhavas gravajn valorojn didaktajn.

Posttagmeze, ekskurso aŭtobuse al Noreña, bela vilaĝo en la valo de sama nomo, kie la vilaĝestro regalis la kongresanojn per kukoj, konfitaĵoj, ŝinko, bona vino kaj bongusta cidro. Bedaŭrinde, dum la tuta vespero milde pluvadis, kio ne ebligis la okazigon de la Kamparresto projektita liberaere, estis do necese sin ŝirmi de la pluvado en salono de Klubo de la vilaĝo, kie okazis la tipaj kantoj kaj dancoj asturaj, kiuj plezurigis la kongresanojn. Dum en la paŭzoj oni gustumis la lokajn produktojn: kolbason, fromaĝon kaj bonegan cidron, kiuj plene kontentigis la esperantistojn.

Nokte, je la deknua, dua laborkunsido, kiu plu debatis la malfacilajn problemojn de la hispana Esperanta Movado ĝis altaj horoj de la noktomezo, kiam S-ro Azorín konsideris oportune ĝin fini, kiel Prezidanto de tiu laborkunsido.

La 16an de Septembro, matene, tria laborkunsido prezidata de la vigla Prezidanto de la O.K.K. S-ro Jiménez, kaj, kiam ĝi finiĝis, ĉiuj kongresanoj iris al la palaco de la Provinca Deputitaro, kie oni honorigis ilin per grandioza Muzikfesto fare de "Orfeón Ovetense" (Ĥoro el cent voĉoj de gekantistoj), kiuj faris la plezuron de la kongresanaro per la plej belaj popolkantoj de la Astura Folkloro. Dum paŭzo de la Festo, oni ornamis la esperantistajn flagojn kaj tiun de la Ĥoraro per silkaj verdaj ru-bandoj rememorigantaj la Kongreson de Oviedo. S-ro Maynar, en la nomo de la esperantistoj, elokvente kaj bonhumore dankis la asturojn pro tiu bela Festo. S-ro Luis García Fernández, de la O.K.K. proklamis tie la premiitajn Lernejojn el tiuj konkursintaj en la Ekspozicio de Slojdoj...

Posttagemeze Fakaj kunvenoj: Astura Esperantista Federacio, Hispana Fervojista Esperantista ligo, kaj parolado de la eminenta samideano Emilio Herrera pri lia vojaĝo al Ameriko per Zeppelino, kiun la parolanto ilustris per lumbildoj. Tre interesa prelego!

La sekvan tagon estis peraŭtobusa tuttaga ekskurso de la kongresanaro al Villaviciosa, Mirador del Fito, Cangas de Onís, Covadonga, Infiesto...

La 18an de Septembro, lasta kongrestago, la kongresanoj frumatene vojaĝis per trajne al la proksima tre grava industria urbo Gijón, en kies stacidomo atendis la geesperantistoj de tiu urbo kun siaj elstaraj gvidantoj pastro Fournier, kaj la inĝenieroj Menéndez Rúa kaj Castro. Alvenintoj kaj akceptintoj kuniris manifestacie kun verdaj standardoj ĝis la Urbodomo, kie oni lasis la flagojn por iri al la malnova haveno, kie ĉiuj enŝipiĝis kaj mareksurse iris por viziti la modernan kaj ampleksan havenon "Musel", kies Direktoro estis la elstara esperantisto Inĝeniero Eduardo de Castro, kiu klarigis al la kongresanoj la signifon kaj utilon de ĉiu instalaĵo. Tuj poste, elŝipiĝinte, per grandaj, luksaj aŭtobusoj oni vizitis la ĉirkaŭaĵojn de Gijón kaj la proksiman marbordon. Je la tagmezo, komuna tagmanĝo en la Parko Somió, kies menuo konsistis precipe el tipaj manĝaĵoj, kaj inter ili la fama "fabada" (fazeoloj, kolbaso kaj ŝinko), kiu sufiĉe superŝutita de bongusta cidro faris la plezuron de la gekongresanoj.

En tiu sama loko oni legis kaj aprobis la konkludojn de la Kongreso, kaj poste:

Kiam tiu labortagmanĝo estis finita, ĉiuj kongresanoj kuniris al la Urbodomo, kie okazis la solena Fermo de la Kongreso, kiun prezidis Lia Reĝida Moŝto Jaime de Borbón, Provincaj kaj Urbaj Aŭtoritatoj kaj Prezidanto de Astura esperantista Federacio Antonio Jiménez Mora. Post la protokolaj paroladetoj de la Fermo, la Urbestro de Gijón regalis la gekongresanojn per bongusta lunĉo en alia salono de la Urbodomo. Poste, per samaj aŭtobusoj, vizitado de la stratoj de Gijón, la Popola Ateneo, la Mara Klubo, ktp. Tiu promenado, estis la lasta Programero de la Kongreso, kaj post ĝi, multaj kongresanoj foriris trajne al Oviedo por reiri hejmen. Ekster la Kongreso, samideanoj el Madrido kaj Andaluzio, akompanis samideanon Francisco Azorín al la Popoldomo de Gijón, kie li faris belegan paroladon pri Esperanto, por la laboristaro.

Eble en tiu akto partoprenis esperantistoj de Gijón kiuj sin tenis, dum tiuj tagoj, marĝene de la esperantista festado okazinta en Asturio kaj en tiu-ĉi urbo mem. Verdire, tio estas nur supozo, ĉar ni ne

disponas je informo pri tio. Sed ne povas ne surprizi nin la fakto ke el la esperantistaro de nia urbo, tiuj kiuj akceptis la kongresanaron kaj rilatis kun ĝi estis nur elstaraj samideanoj kiel Menéndez Rúa kaj la pastro Fournier, t.e. perantoj de la unua kaj la kvara E-rondoj fonditaj en nia urbo (**Astura Esperanta Asocio kaj Ĥiĥona Espero**) kaj neniu el la aliaj du E-grupoj, t.e. tiuj kiuj havis sian sidejon en la Laborista Ateneo. Kaj ni scias ke almenaŭ unu el ili, kaj eble la du, daŭre funkciadis dum tiuj jaroj. Eble la kialo de tiu ne-akordo estis tiu situacio de dividiĝo kaj polemiko tiam ekzistanta en la sino de la hispana esperantista movado. Fakte, dum la jaroj kiuj restis ĝis la komenciĝo de la hispana civilmilito, la malakordo, streĉiĝo kaj kvereloj en la esperantistaj vicoj de nia lando estis konstanta kaj kreskanta. La kaŭzo de tiu interfrontiĝo, ŝajne, estis malakordo pri la maniero organizi la E-movadon en Hispanio. Sed tiu malakordo estis nur reflektado de la socia situacio de la lando. Nur kvar monatojn post la Kongreso de Oviedo, la diktatoro Primo-de-Rivera sin sentis devigita demisii, kaj la monarkio mem restis tre malfortigita. Fine de la jaro 1930 okazis iu militista ribelo kontraŭ la monarkio. La ribelo estis sufokita kaj la ribelintaj oficiroj estis leĝe kondamnitaj al morto per fusilado; la monarkia reĝimo restis mort-vundita. En aprilo de la sekva jaro okazis en Hispanio balotado por elekti la urbajn kaj municipajn konsilantarojn. La fakto ke en la grandaj urboj de la lando venkis la kandidataroj de la respublikanoj montris ke la Reĝo ne disponis je civitana apogo. Estis starigita Respubliko, sed ankaŭ ne tiu reĝimo ĝuis je stabileco. Iomete pli ol unu jaro post la starigo de la Respubliko estis provo de militista puĉo kontraŭ ĝi. La puĉo fiaskis sed iompostiom konkretiĝis procezo de evoluo al faŝismo laŭ la skemo de la taktikoj de la nazistoj en Germanio kaj Aŭstrio. Kiel reago al tiu procezo okazis proleta revolucio kiu komence sukcesis nur en Asturio, sed poste ĝi estis sufokita kaj okazis granda masakrado de revoluciuloj. Rezulte de nova baloto, en februaro de la jaro 1936, la Maldekstraro reakiris la politikan povon, sed post kromajn kvin monatojn, en Julio de la jaro 1936 okazis nova militista puĉo, ĉi-foje sukcesa. Sed la sukceso ne estis kompleta; en kelkaj regionoj la ribelo tute fiaskis, kaj tiele Hispanio restis dividita en du partojn preskaŭ egalaj en kio rilatas al loĝantaro, teritoria amplekso, ekonomiaj rimedoj kaj militista forto. La scenejo estis preta por nova interfrata milito inter la hispanoj. Tiele komenciĝis nova periodo de la historio de Hispanio, kiu estas ankaŭ nova periodo de nia esperantista historio.



HISPANIO kontraŭ HISPANIO



Grava historia krizo trafis Hispanion en monato Julio de la jaro 1936. La respubliko estis suferinta, laŭlonge de la 5 jaroj ekde ĝia naskiĝo, militistan puĉon, de politike dekstra orientiĝo, kiu fiaskis, en la jaro 1932, kaj proletaran revolucion, ankaŭ fiaskintan, en la jaro 1934. Sed ĉi foje nova puĉo, eĉ se nur partece sukcesinta, okazigis komenciĝon de civilmilito kiu daŭris ĝis la jaro 1939. Por la lando tio signifis granda katastrofo. La ribelintaj militistoj efektivigis, en la teritorio kontrolita de ili, reakcian, diktatorecan politikon.

Ĉiuj esperantistaj centroj estis perforte fermitaj kun la escepto de FRATECO de Zaragozo pro la influo, inter la ribelinta militistaro, de la Prezidanto de tiu esperantista asocio, la komandanto Ramón de Salas. Tamen, kvankam oficiale ne fermita, ĝia aktivado estis nula. Male, en la landaj zonoj kontrolitaj de la Respublika armeo, la esperantistaro povis libere aktivadi, sed la milito mem estigis malfacilaĵojn por tiu aktivado. Fakte, nur en Valencio kaj Barcelono regule aperis esperantistaj revuoj kaj bultenoj. Laŭ la iompostioma konkerado de la lando fare de la faŝistaj trupoj, la esperantista ĉeesto malaperadis. Multaj hispanaj esperantistoj, inter ili ankaŭ gravaj lideroj de nia E-movado, mortis dum tiuj militaj jaroj, kelkaj el ili kiel rektaj viktimoj el la milito kaj la sekva perforta subpremo kaj persekutado.

Menciindas tio ke la hispana Respubliko ne ĝuis apogon de la eŭropaj demokratioj dum la ribelintaj militistoj ricevis malavaran kaj efikan subtenon de la faŝismaj reĝimoj, tiuj de Germanio kaj Italio. Estas famkonata la esperantista afiŝo plendanta pro tiu situacio.

Sed oni malmulte scias pri la politikaj inklinoj de la hispanaj esperantistoj. Supozeble, kaj simile al tio okazinta en aliaj eŭropaj landoj, la Esperantista movado ĝenerale teniĝis neŭtrale en la politika te-

reno. Sur la esperantistaj vicoj de nia lando ne multe efikis la divido tiam intensiĝinta en la popolo, inter la diversaj soci-klasaj pozicioj, sed, jes ja, estis ia kontraŭdiro inter la esperantistoj rilate al teniĝo favore al *centrisma ŝtato* aŭ la *regionaj aŭtonomismoj*. Ĉefe inter la katalunaj geesperantistoj estis tendenco ligi la aktivadon por Esperanto kun la defendo de la kataluna lingvo kaj kulturo.

Ne mankis en Hispanio esperantistaj rondoj kun maldekstra ideologio. De antaŭ kelkaj jardekoj estis fonditaj kelkaj el ili, kiel la grupo "Libera homo" de la madridaj socialistoj, kreita en 1911. Estis laboristaj grupoj ankaŭ en Bilbao, Valencio, Barcelono kaj Gijón. Tamen ne estis politika antagonismo inter tiutipaj E-rondoj kaj la vere neŭtralaj, kaj eĉ burĝaj esperantistoj de nia lando.

Specialan atenton kaj mencion meritas la kazo de la militista esperantisto kaj framasonisto Julio Mangada. Kiam komenciĝis la militista ribelo en Julio 1936, li decide rezistis la ribelintojn. Li gvidis popolajn volontulojn, rapide formiĝintajn al trupo, kaj atingis iujn venkojn kontraŭ ribelintaj fortoj forpuŝi la komencan minacon al Madrido; la loĝantoj akklamis lin kiel popolan heroon. Iam li deklaris ke li estas esperantisto ne pro tio, ke li konsideras Esperanton kiel nuran internacian lingvon, sed ĉar ĝi entenas la ideon de vera frateco kaj per tutmonda

uzado servas kiel plej efika elemento kontraŭ la malbenata milito kaj la interhoma malamo. Liaj trupoj proklamis lin "generalo de la popolo", kvankam la registaro rekonis al li nur la rangon je kolonelo. Oni aljuĝis al li la Oran Medalon de la Madruda Urbo, Oni asignas lian nomon al iu urba strato... Tiuj eventoj estis rapide diskonigitaj en fremdaj landoj, kaj inter la esperantistoj de la tuta mondo li fariĝis simbolo de la rezistado kontraŭ la faŝismo.



Sed tiu kazo de Mangada estis eksterordinara. Ĝenerale, la interveno de la armeaj esperantistoj en la milito pli dependis de la loko kie trafis ilin la komenciĝo de la konflikto. Ni vidu, ekzemple, la kazon de la kolonelo Antonio Jiménez Mora, Prezidanto de **Astura Esperantista Federacio**. La komenco de la milito trafis lin en norda Afriko, do en la zono kie la armeo ribelis kontraŭ la Respubliko. En novembro li estis destinita komandi militistan taĉmenton, kaj en tiu rolo li disvolvis avangardajn frontajn militagojn en la ĉirkaŭoj de Madrido (li komandis la trupojn konkerintajn la Palacon de la Moncloa, nuna sidejo de la hispana registaro). Dum la milito, li estis priesplorita fare de la armeaj aŭtoritatoj, por kontroli lian lojalecon. La suspektoj pri la vera lojaleco de la armeanoj al la flanko en kiu ili deĵoris estis tre ĝeneralaj en ambaŭ kontraŭbatalantaj armeoj, ĉar oftis la kazoj de militistoj batalantaj en loko kontraŭa al siaj konvinkoj, ĉar la puĉo trafis ilin en nedezirita loko. La suspektoj kontraŭ Jiménez Mora estis pro ebla rilato kun la framasonaro, kio tre gravis por la frankismaj fortoj, tre malamikaj al tiu socio. Tiu enketado rilatis ankaŭ al Esperanto. Aperas kiel rezulto de la enketo ke li membris en esperantista asocio, kvankam poste li ne kunlaboris en grupo partoprenanta en la "Popola Fronto". Male, li eĉ intencis konvinki siajn armeajn superulojn por ke

Esperanto estu uzita por kontraŭi la propagandon de la Respubliko, sed li fiaskis en tiu plano; Esperanto ne estis simpatia por la nova reĝimo. Rilate al la propagando en Esperanto favore al la Respubliko, menciindas ke oni publikigis dum tiuj militaj jaroj E-gazetoj eldonitaj de maldesktrulaj organizaĵoj, kiel tiu de la anarkiistoj **CNT-AIT-FAI**. Pli ofta kaj regula aperado estis tiu bulteno titolita **POPOLA FRONTO**. Ĝi estis gazeto eldonita de Luis Hernández Lahuerta kaj Guillermo Bosch en Valencio kiu publikigadis la vidpunktojn de la respublikana flanko tutmonde, en tre flua lingvo. Ĝi aperigis ĉefe oficialajn informojn, sed ankaŭ entenis novaĵojn pri la partopreno de esperantistoj kaj de la helpo de diverslandaj simpatiantoj. Oni devas prikonsideri tion ke inter la volontuloj de la t.n. **Internaciaj brigadoj**, estis ne malmultaj esperantistoj. Restas nur aldoni ke ni ne disponas je informo pri la situacio kaj agado de la asturaj E-grupoj dum la epoko kiam ankoraŭ ne estis enirintaj en nian regionon la trupoj de Franko. De tiam ne plu estas kono pri la Unua Prezidanto de Astura Esperanto Asocio, Francisco Menéndez Rúa. Ni ne scias ĉu li mortis antaŭ, dum aŭ post la civilmilito. Kio, ja, estas certa, estas tio ke post falo de Asturio sub la povo de la faŝisma armeo ne plu povis esti esperanta agado en nia regiono dum multaj jaroj.

2.ª JARO N.º 5 DUONMONATA ESPERANTO-GAZETO 1 JANUARO 1937

Popola Fronto

INFORMA BULTENO INTERNACIA PRI HISPANA LUKTO KONTRAŬ LA FAŜISMO

ELDONO DE GRUPO LABORISTA ESPERANTISTA
REGAKCIO K ADMINISTRACIO: STRATO MAR, NUM. 25 VALENCIA (Hispanio)

GEOGRAFIA BILANCO Nova Jaro...

La plej grandaj de hispana ribelo bezonis ne nur travigi sian kriman aventuron, kiel plenumon de sankta komiso, sed ankaŭ ili avidis, antaŭ la grincadoj de siaj fremdaj dungantoj, montri kapabolez por movi la armeon kiu uzis la ŝtatajn armilojn kontraŭ la lego, la ordo k la vivo de sia propra nacio. Plano, zorge polurita, pri vendo de pecoj el sia patrio, ŝajnis al ili ofero facila, kvazaŭ strategia ludo aŭ esenca promenado. La rapida subita popola respondo, de la ekpenco de l' komploto, detruis tiujn iluziojn. Nur la loĝantaro de kelkaj urboj k vilaĝoj, en mizeraj provincoj, lais viktima sub influo de la tirano. La ĉefaj urboj, la plej riĉaj regionoj, aroge piedpremis la araneon k transformigis vigle je apogaj punktoj, kun morala simbolo, en industriaj bazoj k ekonomiaj centroj, por la unua serioza batalo en la mondo, pri kiu la faŝismo devas aliezi kankeladi. La fantasma intenco pri absoluta k tuta subpremo estis ja fiasko! La fiulanda reakcio dubis jam pri la kapablo de siaj hispanaj servistoj kun ĝenerala kostumo. La tero fremis konvulsie. Estis necese fabriki urĝe fidon pri la nepra venko de l' faŝismo.

Lab ankve kalkulo, por la mezuro de tempo, trota jaro ĵas vesaligis. Nova antikva da lego atinkas jolatas pri la mistero de sia influo sur la sorto de la homoj.

Nelam, en komenco de jaro, oni sentis nel linerejo lo bezono rapidigi la akcion de datna k anca surando de rilatoj k hooj... Ĉar ankve pensio, da nun, la valoro de kelkaj semajno, aŭ de kelkaj monatoj, estas sote grava k sote decida por la destino de nia lando k, el tute certe, por la prognozo de la homaro.

Soporo hooj, soporo fugas alten, en celo tre nobla, kvazaŭ sago karga able peccerante en la enigmoj blonka de la nova periodo sena.

Dapri la milojn durn la nova jaro! Jen agoro karmine de nia gupoto, karm de patino per voĉo muelata, pro jamo akceca. Balbulo de intelo nova. Penco de anabito, kun veno de ano en la koro. Kio dum batalo de jano penite adito. Harde kankvinko de dai latino, en impeto sena, kormo k fakano. Suroro viberite en zero. Penco satura, en impeto de subof, cekko per fono muelata k pompa tra la kamovabulo de niaj fabrikoj. Marmuro alaga, kio lutas karece, laŭ sun de vosto el sarko, nekvarna lidele la ligno de la libro, trajnante la indole de mano perfile senite per teno lute ad per garmet subterreno.

Venki la faŝismo durn la nova jaro! Jen solena promeco al la saio mondo. Destino nova k ankvarne aligita, per ribeloj el sango, kun fortoj tralot, sur la impono pord de la nova jaro.

Nova jaro, nova kapero, nova ŝuo, nova fiato per kankviga la venko en sia kankve milita, necesa kankvigo k sote rindoo por nova civilizo k nova kulturo...

Esperanto, nio lingvo de ano k paco, en sia manura juticio, en la nova aŭto festolero, solvata en la mondo, per laŭto kankvigoj de l' fiatoj k vortoj, kun alitke feleno k rezido, i

Ekfunkcia perfekta propaganda aparato per brua skandalo, per cinika mensogado, pri jam preskaŭ submendo de la tuta lando. Tamen... blufu ne estas pruvo de konvinko, per blekoj de rado de mensogoj, pri la amperacia kario geografila de Hispania jaro, montri ni internacia ol rektor de la zigaga lino de la observi, kun serena rigardo, la parto maldense loĝata, kun ma komenco, sen ŝojo en la vivo loĝale teritorio, kie la popolo, mastro de sia medio, estas preta oferi tion por elviti la ombon, kio ankoraŭ nun estas funebra stampo sur duono de la lando.

kio portas genite, kun ledere, viretojen dezon de ore sioalio por la nova ŝpako.

CNT AIT FAI

INTERNACIAJ BRIGADISTAJ MOJTO

INFORMA BULTENO

TRABA KONFEDERACIO DE L'LANDO

ANARKISTA FEDERACIO

Nia komuna tasko

Al la barikadoj

Kontraŭ faŝisma presaro en Esperanto en la hispana zono kontrolita de la Respublikanaj fortoj dum la civilmilito.



Frat' fraton atakas ŝakale

Pro la konkero de la tuta Hispanio fare de la frankisma armeo, helpita de la itala faŝismo kaj la germana naziismo, la esperantista aktivado ĉesis en la tuta lando kadre de tiu plorinda situacio en kiu dronis ankaŭ la hispana demokratio kaj kulturo.

Sed la katastrofo por Esperanto, la kulturo kaj la homaro ĝenerale ne limiĝis al la hispana teritorio. La eŭropaj demokratioj kiuj spektis senintervene la masakradon de la hispana Respubliko fare de la faŝismo devis siavice suferi agresadon de la samaj faŝismaj potencoj. En septembro de la jaro 1939, malmultaj monatoj post la finiĝo de la hispana milito, komenciĝis nova Mondmilito en la 20a jarcento.

Tiu Dua Mondmilito estis tiom brutala kaj pli longdaŭra ol la Unua. Estis en ĝi pli da viktimoj ol en la antaŭa kaj krome intervenis en la batalado pli da landoj. Ankaŭ la armiloj estis pli potencaj; la milito finiĝis en la jaro 1945 per la eksplodigo de du atombomboj ĵetitaj sur japanaj urboj. Sed estis en ĉi tiu milito iu novaĵo kiu meritas apartan atenton. Temas pri la rasismo, rasmortigo, la koncentroj por la ekstermo de etnoj kiel la ciganoj kaj ĉefe la judoj. En Germanio aperis tiu stranga varianto de faŝismo, kiu emfazis teorion de supereco de la propra germana raso kaj asignis al ĝi la taskon gvidi la mondon kaj malaperigi rasojn kaj etnion kiuj ne kongruas kun tiu rasisma doktrino. Rezulte de tiu freneza politiko estis mortigitaj preskaŭ ses milionoj da gejudoj.

Ne estas la celo de ĉi tiu raporto priesplori kiel povis aperi tia hororaĵo kaj barbareco en klera kaj civilizita lando kia Germanio. La sociologiistoj kaj psikologiistoj pri amasmovadoj havas antaŭ si la gravan kaj malfacilan taskon klarigi tion, kaj fakte ekzistas multaj verkoj kiuj pritemas tiun aferon kvankam ŝajnas ke ankoraŭ oni ne alvenis al ia definitiva konkludo. Ankaŭ ne estas nia tasko priskribi la batalojn kaj la politikajn aspektojn de la Mondmilito. Ekzistas multe da historiaj verkoj kiuj priskribas ĉiujn aspektojn de la konflikto kaj ties disvolviĝo.

Kio, jes ja, koncernas al ni estas mencii la gravan damaĝon kiun la nova konflikto alportis al la tutmonda esperantista movado. Dum la militaj jaroj aperis eĉ ne unu sola gazeto esperantista. La movado ĉesis funkciadi, ĉefe en Eŭropo, kie la esperantismo pli estis disvastiĝinta ĝis tiam. Tiu milito estis signo de la fiasko de ĉiu porpaca kaj progresema ideo, kia Esperanto pretendis esti. Tiu periodo estis nigra nokto ĉirkaŭ ni.

Dume en Hispanio persiste regis neracia ŝovinismo, persekuto kaj timo. Malaperis ĉiuj esperantistaj rondoj, escepte **Frateco** de Zaragozo, kiu, kvankam oficiale ĝi ne malaperis, tamen, ne povis dum tiuj jaroj organizi E-kursojn. Nur de tempo al tempo la estraro kunvenis en la sidejo de la asocio. La 10an de novembro de la jaro 1941, je la oka horo vespere, estante la Prezidanto Orós kaj alia estrarano atendante la alvenon de la ceteraj estraranoj, alvenis dudeko da junaj membroj de faŝista organizaĵo kaj rompis kaj detruis ĉion, forprenis la arkivon kun libroj kaj dokumentoj kaj fine arogante foriris trankvile. Kvankam estis prezentita denunco pri tiu banditaĵo estis neniu respondo el la Provincestro, kion interpreteblas kiel aprobo aŭ komplika konsento fare de la aŭtoritato.

En tiuj jaroj la ŝovinismo kaj agresemo evidentiĝis tre ofte en nia lando. Tiu kontraŭkultura etoso kreita de la naciismaj teorioj de la milit-venkintoj radikaliĝis ankaŭ kontraŭ Esperanto kaj ĝenerale kontraŭ ĉio kio signifis eksternaciaĵon: liberalismo, internaciismo, demokratio, socialismo, progresemo, liberpenso...

En la militantaj landoj, ĉefe en la eŭropaj, landoj okupitaj de la germana armeo, al la malfacilaĵoj de la milito mem oni devas aldoni la persekutadon. Ni jam menciis la masakradon de la juda popolo. Similan persekutadon suferis la komunistoj, socialistoj kaj maldekstruloj ĝenerale, kaj inter ili spe-iale la geesperantistoj. En la naziaj koncentroj, inter multaj miloj da judoj mortis ankaŭ la geparencoj de L.L.Zamenhof, la iniciatinto de Esperanto. Liaj du filinoj, Sofia kaj Lidia, mortis en

koncentrejoj, kaj lia filo, Adamo, estis mortpafita. El lia idaro saviĝis nur lia eta nepo, kun ties patrino, kiu por eskapi el la nazia persekutado, ŝanĝis sian familian nomon de Zamenhof al Zaleski. Menciindas ke vivas ankoraŭ nuntempe tiu nepo de L. L. Zamenhof kaj havas du filinojn.

Milionoj da viktimoj kaj granda regreso de homa kaj kultura vidpunkto estis la heredaĵo de tiu nigra periodo por la mondo kaj speciale por Eŭropo. La fiasko de la paco, de la kulturo kaj de nia esperantista afero povas esti esprimita per tiu kantteksto verkita de nia samideano Alcibiades González Meana, imitante la esperantistan himnon sed kun mala senco kaj titolo: **LA MALESPERO**,

kiun ni aperigas ĉi-paĝe. Se **LA ESPERO** estis verkita en epoko de optimismo kaj favora vento, la epoko kiun ni priskribas nun inspiris tian pesimisman senton.

Jes, oni povas temi pri regreso ankaŭ de lingva vidpunkto. Ne estis nur ke la paco, kiel esperantista idealo, troviĝis en sia plej malfavora situacio. Estas ankaŭ la fakto ke la lingva solvo al la mondaj problemoj fariĝas fakte dumlonge ne aplikebla. Eble la tiamaj esperantistoj ne perceptis tion, sed Esperanto estis kreita en Eŭropo por Eŭropo, pensante kaj kalkulante je Eŭropo. Kaj la venko en tiu monda milito neniel povus esti venko de Eŭropo. Japana venko ne alportus avantaĝon al Eŭropo kaj al Esperanto. Germana venko estus venko de rasisma kaj ŝovinisma gento kiu amas nur sin mem, ne Eŭropon kaj Esperanton. La alternativa venko, kiu konkretiĝis, alportis avantaĝon nur al Usono kaj Rusujo, kiuj havis sian propran kulturan areon kaj influon kaj ne bezonas Esperanton. En Eŭropo rompiĝis por ĉiam, favore al la angla lingvo, la idioma kaj kultura ekvilibro kiu iam postulis neŭtralan komunan lingvon kaj konsistuis ŝancon por Esperanto.

Sed ĉi tiuj prikonsideroj eblas nur nun, vidate de la perspektivo de la tempo pasinta de tiam. La tiamaj esperantistoj zorgis pri la tiamaj problemoj.

Grava tiama problemo de la **Universala Esperanto Asocio** estis tio ke la venko de la Hitlera diktaturo en Germanio okazigis la perdon de multe da membroj en tiu lando tradicie forta de esperantista vidpunkto. Dume ankaŭ en la Sovetunio regata de Stalin la esperantistoj suferis persekutadon, sed tie **UEA** havis tre malmultajn membrojn.

Alia problemo estis tio ke kiam la estraro de **UEA** decidis en la jaro 1936 translokigi la asocian sidejon de Ĝenevo al Londono, protestis grupo da svisaj membroj pro ne adekvata proceduro. Iu svisa tribunalo pravigis ilin. Okaze de tio okazis en la monda esperantistaro ia skismo, disdividiĝo. Multaj aktivaj membroj kaj kelkaj landaj asocioj for-

lasis la **Universalan Esperanton Asocion** kaj fondis apartan organizaĵon: **Internacia Esperanto-Ligo (IEL)** kun ties nova presorgano **Esperanto Internacia**. Kelkaj, malmultaj, restis en la tiel nomata **ĝeneva UEA**, kiu plu havis kiel presorgano la revuon **Esperanto**. La skismo daŭris kelkajn jarojn, konkrete ĝis la jaro 1947, jam post la finiĝo de la mondmilito. Tiam reunuiĝis ambaŭ internaciaj esperantistaj organizoj sub la tradicia nomo de **Universala Esperanto Asocio**.

Sed tio estis organizaj problemoj kiuj ne nepre respegulas la staton de la movado. Ĉi-kaze la veraj problemoj de la esperantista movado estis pli gravaj ol ties de ĝia organi-

za strukturo. Fakte, dum la jaroj de la skismo, pli grave ol la skismo mem estis tio ke preskaŭ ĉiuj landaj asocioj havis, pro la problemoj de la milito, preskaŭ nulan esperantistan aktivadon.

Ĉar ni pritemas la historion de la esperantista movado je loka, urba kaj regiona nivelo, ni devas memori ke pro la postmilitaj cirkonstancoj de nia lando, la movado malaperis, same ol en la cetero de Hispanio, en kio koncernas al la organiza aspekto. Sed kvankam ankaŭ forpasis kelkaj gravaj membroj de la astura esperantistaro, restis tamen personoj pretaj reorganizi la esperantistan aferon kiam la cirkonstancoj pliboniĝus.

LA MALESPERO

**En la mondon venis malkontento,
Tra la mondo iras sanga ŝoko.
Pro fiagoj de nehoma gento,
Nuna vivo ŝajnas kruda moko.**

**Ve! Al bombo korpojn kreviganta
ĝi la homan tiras familion.
Al la mond' senĉese batalanta
ĝi permesas daŭre la defion.**

**Sur ĥaosa lingva fundamento,
malfidante unu la alian,
la popoloj vivas en turmento
vivon mornan, tedan, anarkian.**

**Forte staras firmigitaj baroj
inter la popoloj dividitaj.
Kaj persistos ili dum miljaroj,
de tenaca stulto subtenitaj!!**



La silenta jardeko

Baldaŭ post la finiĝo de la 2a Mondmilito komenciĝis la reviviĝo de la esperantista Movado. En la t. n. “socialista bloko” la situacio de la E-movado estis malsama inter iuj landoj kaj aliaj. En Rusio, kie tre estis disvastigita la Internacia Lingvo post la revolucio de 1917, estis, dum la regado de Stalin, ne oficiale malpermesata sed fakte persekutata kadre de la reprezalioj kontraŭ trotckistoj kaj aliaj internaciistoj. Post la milito la situacio restis simile ĝis la morto de Stalin. Poste, Esperanto estis nek persekutata nek favorata, do, en situacio simila al ties de la kapitalistaj landoj.

En aliaj socialistaj landoj, kiel Romanio kaj Albanio, Esperanto estis persekutata ĝis la falo de la reĝimo en la 90aj jaroj. Male, en Hungario, Bulgario kaj Polujo, Esperanto ĝuis ne nur la permeson sed eĉ la ofialan apogon de la socialistaj reĝimoj. En tiuj landoj la politikaj ŝanĝoj de la fino de la jarcento pli damaĝis ol favoris Esperanton.

En la kapitalista mondo la disvastigado de Esperanto ĝuis neniun oficialan apogon, sed ankaŭ ne estis oficiala persekutado, kun iuj esceptoj, kiujn ni pritraktos poste. Tamen Esperanto neniel rehavis la situacion ekzistintan antaŭ la monda milito. Revenante al la jaro 1945, oni devas rimarkigi ke la renaskiĝo de Esperanto en Okcidento havis esceptojn kiuj tre koncernas nin. Temas pri la kazoj de Portugalio kaj Hispanio, kies faŝistoidaj reĝimoj plurestis post la mondmilito, kaj en ili plurestis la malfacilaĵoj por la esperantista movado. En la kazo konkreta de nia lando, en kio rilatas al Esperanto, oni povas difini “silenta jardeko” la periodon post la jaro 1945. Verdire, ne estis tuta jardeko post tiu jaro; la esperantista silento estis nur relativa post 1948, sed ni ne forgesu ke ĝi estis jam ekde la jaro 1939, do, jes ja, estis jardeko de esperantista silento en Hispanio.

Silento, sed ne komplete ne-aktivado. Kvankam multaj hispanaj esperantistoj mortis dum la civilmilito, multaj aliaj troviĝis en malliberejoj kaj multaj aliaj devis ekziliĝi fuĝante el la reprezalioj de la venkintoj, tiuj, kiuj restis en la lando klopodis rekonstrui la movadon eĉ en la tre malfavoraj kondiĉoj tiam ekzistantaj. Komence ne povis ekzisti organizitaj E-grupoj kaj rondoj, sed la hispanaj E-aktivuloj praktikadis Esperanton pere de korespondado kun fremdaj gesamideanoj. Estis

ankaŭ ebleco ricevi E-revuojn eldonitajn eksterlande. Tiuj, loĝantaj en sama urbo kunvenadis en la loĝejo de iu el ili.

Ankaŭ ne estis ebleco organizi E-kursojn. Tio iom post iom, nur tre malrapide pliboniĝis. Tiurilate la afero estis malsame en iuj kaj aliaj lokoj, kaj multaj kursoj organizitaj tiam estis sekretaj, ne laŭleĝaj. Ŝajnas ke la unuaj E-kursoj realigitaj en Hispanio post la civilmilito okazis en la jaro 1946 en la karceroj de Alikanto kaj Barcelono.

Fine de la jaro 1947 okazis la oficialigo de **Hispana Esperanto Federacio (HEF)**, kun sidejo en Valencio. Sed la oficiala tolero estis nur relativa, fakte persistis multaj malfacilaĵoj. En la jaro 1948 estis iu E-kurso en Zaragozo, kurso oficiale permesita sed subkondiĉe ke ĝi estu ne anoncita, senpropagande; partoprenis en ĝi malmultaj lernantoj. Pli sukcesa estis alia organizita la saman jaron en Reus. En Valencio okazis tiam la unua prelego pri Esperanto post la civilmilito. Notendas ke la tolero, eĉ relativa, ne estis sama en ĉiuj lokoj en la lando; la afero dependis de la provincaj guberniestroj. Eĉ kiam Esperanto ne estis oficiale malpermesata, tamen en iuj okazoj la aŭtoritatoj faris ĉion eblan por malhelpi la normalan disvolviĝon kaj progreson de la Esperanto-Movado. La **Analoj de la Esperanta Movado en Hispanujo** rakontas tiun kazon de kurso organizita en Zaragozo: kelkaj lernantoj de tiu kurso estis dumnokte, je la dua aŭ tria horo, vizitataj de polico por demandi al ili kial ili lernas Esperanton; tiuj lernantoj restis timigitaj kaj ne plu revenis al la E-klasoj.

Temante ankaŭ pri tiuj jaroj, ĝis 1954, oni povas enkalkuli ilin en la periodo de Esperanta silento: la kursoj estis maloftaj, senpropagandaj. La revuo de HEF estis redaktata plejparte en la hispana lingvo, eĉ la titolo mem de la revuo “Boletin”, kiun ĝi ankoraŭ nuntempe konservas, estas hispanlingva, ne Esperanta, vorto.

La unua numero de **Boletin** estis ok-paĝa bulteno eldonita en januaro de 1949 kun modesta prezentiĝo. Dum kelkaj jaroj tiu bulteno daŭre estis dulingva, kelkaj artikoloj en la hispana kaj aliaj en Esperanto, kaj daŭre ankoraŭ estis ok-paĝa revuo (poste 12-paĝa), sed ĝis la jaro 1957 ĝia eldonado estis pli ofta kaj regula ol nuntempe, 11 numerojn ĉiujare.

En la sama jaro, 1949, okazis la fondiĝo de **Katolika Esperantista Hispana Asocio**, en Zaragozo. Estis necesa la permeso de la Ĉefepiskopo kaj de la Provincestro.

Same kiel antaŭ la civil-milito, ankaŭ dum tiuj jaroj, kiujn ni priskribas, la hispana esperantista movado estis pli forta en la regionoj de Valencio kaj Katalunio ol en la cetero el la lando. Menciinda kaj menciita estis ankaŭ la kazo de Zaragozo. La movado estis relative forta en aliaj lokoj, kiel Madrido, Bilbao... kaj tre malpli en la cetero el la lando. En Asturio, kaj ĉefe en nia urbo Gijón, kelkaj entuziasmoj de nia esperantista ideo intencis restarigi la movadon. Gvidis la aferon Alberto Menéndez, deveninta el la **Astura Esperanta Asocio** ekzistinta antaŭ la milito, kaj Alfredo Villa Villa, kiu apartenis al kaj estris la E-grupon ekzistintan en la sama epoko en la Laborista Ateneo. Malaperintaj tiuj asocioj ekde la civil-milito, ili ne povis esti reorganizitaj en tiuj post-militaj jaroj, tamen, la survivantaj membroj de ambaŭ rondoj kamaradece kunlaboris en la restarigo de la esperantista afero en nia urbo kaj nia regiono.

Krome ili, ĉefe Alfredo Villa, kunlaboris ankaŭ kun **Hispana Esperanto Federacio** kaj ties presorgano **Boletín**.


En la jaro 1951, unuafoje post la landa milito, okazis en Hispanio landa Kongreso de Esperanto, la 12a. Tio estis tre valora kaj altsignifa por nia landa E-movado ĉar signifis la oficialan permeson publike agadi favore al Esperanto, la eblecon vekti multajn malnovajn hispanajn esperantistojn kiuj ankoraŭ ne kuraĝis partopreni en la porEsperanta aktivado ĉar ili ne fidis je la reganta reĝimo, kaj la fakto ke oficiala okazigo de tutlanda kongreso rolus kiel pluvombrelo antaŭ tiuj provincaj aŭtoritatoj kiuj sin tenis, rilate al Esperanto, pli reakcie ol la centra registaro.

Tiu **12a Hispana Kongreso de Esperanto** okazis en Terrasa. Tiujare estis ankaŭ grava Esperanto-Ekspozicio en Madrido. En la jaro 1952 estis fonditaj novaj rondoj de Esperanto kaj/aŭ refonditaj malnovaj E-asocioj kiuj estis malaperintaj dum kaj fine de la landa milito. La **13a Hispana Kongreso de Esperanto** okazis tiujare en Valencio. Kaj estis alia grava Esperanto-Ekspozicio, ĉi-foje en Moia (Katalunio).

Dum la jaro 1953 daŭris la fondiĝo de Esperantogrupoj en Hispanio: Madrido, Bilbao... La esperantistoj de Gijón, kvankam tre aktivaj (ili estis pri-konsiderante la eblecon organizi landan E-kongreson en nia urbo) ne sukcesis fondi oficialan organizon kvankam ili ne-oficiale laboradis sub la nomo: **Gijón Grupo Esperantista** kaj eĉ intencis oficialigi ĝin, sed la afero ne prosperis. La unua esperantista rondo kreita en Asturio post la milito aperis en loko kie antaŭe ekzistis nenia esperantista tradicio, konkrete en "El Entrego". Tiu E-grupo estis kreita kaj gvidita de Alcibiades González Meana. La nomo de la grupo estis **La Verda Kolombejo** kaj publikigis, dum pluraj jaroj, kelkajn numerojn de bulteno titolita **HELECO**.

En Bilbao okazis tiujare la **14a Hispana Kongreso de Esperanto**. Ankaŭ en 1953, Iu hispana esperantisto, Juan Régulo Pérez, doktoro de la Universitato de La Laguna (Kanaria Insulo Tenerifo) estis elektita kiel membro de la **Akademio de Esperanto**.

La **15a Hispana Kongreso de Esperanto** okazis en la jaro 1954 en Zaragozo, kaj estis en ĝi la plej alta nombro da aliĝintoj el la hispanaj post-militaj kongresoj. Spite al la nedubebla progresado de nia afero oni povas diri ke, iamaniere, daŭris en Hispanio la esperant(ist)a silento. La lingvo parolata en tiuj hispanaj kongresoj de Esperanto estis la... hispana! La junaj esperantistoj ofte plendadis pro tio, sed plejparto el la esperantistaro de nia lando ne kuraĝis en tiuj jaroj publike uzadi la Internacian Lingvon.



Front-paĝo de iu numero de la bulteno **HELECO** de la E-grupo **La Verda Kolombejo**.

Fine de la Kongreso en Zaragozo estis diskuto pri la sekvontjara kongresurbo. La esperantistoj de Gijón intencis proponi sian urbon sed, post zorga pripensado, ili dubis ĉar verŝajne dumsomere la tieaj hoteloj estas plenplenaj kaj S-ro Villa opiniis tre malfacila gastigi la kongresanojn. Alia problemo estis, ke en Gijón ekzistis malmultaj esperantistoj kaj la laboro farota estus tro granda, ne subtenebla de malmultenombra anaro. Tamen post interveno de kelkaj samideanoj kiuj konsilis al la Gijónanoj pri tiuj malhelpoj, fine, S-roj Villa kaj Menéndez, kiel reprezentantoj de la Grupo de Gijón konsentis organizi la 16an Hispanan Kongreson de Esperanto en sia urbo. La gekongresanoj aplaŭde aprobis tiun proponon.



16^a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO



La numeroj de **Boletín** de la lastaj monatoj de 1954 kaj tiuj de 1955, antaŭ la Kongreso en Gijón, sufiĉe anoncis tiun eventon. Jam en la numero de majo de la antaŭa jaro estis publikigita artikolo pri Asturio verkita de Adonis G. Meana, el la E-grupo **La Verda Kolombejo**. Notindas ke en la anoncoj de la bulteno de **HEF** pri la Loka Kongresa Organiza Komitato oni indikis jenan adreson:

16^a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO
23 – 27 de Julio de 1955

Adreso de la Organiza Komitato: Grupo Esperantista del
Centro Asturiano
Paseo de Begoña, 26-28, GIJÓN, Asturias

Tio ŝajne indikas ke fine la tiamaj samideanoj de nia urbo donis al si ian organizan strukturon, sed la afero estis iom pli komplika. Fakte, ekde kelkaj monatoj antaŭ la kongreso, tiu E-grupo de la Asturia Centro de Havano jam ne plu ekzistis. En la sekva ĉapitro ni montros la organizajn sorto-ŝanĝojn travivitajn de la esperantistoj de Gijón en tiu epoko, ĝis la definitiva fondiĝo de stabila E-rondo en ĉi tiu urbo.

La membroj de la Organiza Komitato estis: Prezidanto: **Alfredo Villa González**; Sekretarioj: **Alfredo Villa Villa** kaj **Alberto Menéndez González**; Fakuloj: **Nicanor García y García**, **José Palacio Tuero**, **Juan Fernández Rodríguez**, **José Manuel Paraja**, **Florencio Villa García**, **Salvador García y García**, **Dimas González Argüello**, **Manuel Blasco Chico**, **José Fernández Álvarez**, **Luis García**, **Alcibiades González Meana**, **Adonis González Meana**, **Manuel Gutiérrez**, **Juan Manzano Bartolomé** kaj **Francisco Ignacio Taibo**. En tiu listo estas esperantistoj el la diversaj E-grupoj iam ekzistintaj en Gijón kaj ankaŭ kelkaj samideanoj el la aliaj astura E-grupo tiam ekzistanta, **La Verda Kolombejo**.

La Prezidanto, Alfredo Villa González estis filo de Alfredo Villa Villa, kiu estis la vera ĉefa prizorganto, kune kun Alberto Menéndez, de la Kongreso kaj de la E-movado en Gijón. Ambaŭ aktivuloj rolis kiel sekretarioj de la Kongreso.

Ampleksan raporton pri la Kongreso oni povas legi en la **Analoj de la Esperanta Movado en Hispanujo** kaj ankaŭ en la numero 80a de **Boletín de HEF**. Neniu el tiuj fontoj komunikas la nombron da aliĝintoj kaj partoprenantoj en la Kongreso; nur oni informas ke estis malpli ol en la Kongreso de la antaŭaj jaroj. Per la foto de la kongresanaro, kiun ni prezentas sur la sekva paĝo, oni povas konstati ke estis preskaŭ ducent personoj...

multe pli ol en la nuntempaj landaj E-kongresoj.

Traleĝante la menciitajn raportojn oni povas konkludi ke la Kongreso en nia urbo estis brila kaj kontentiga por la ĉeestantaro. La urbaj kaj provincaj aŭtoritatoj bone kontribuis al la sukceso de la evento.

La solena Malfermo de la Kongreso okazis en la Teatro Jovelanos, kaj la kongresaj laborsejnoj estis en la Liceo Jovelanos. Dimanĉe, la 24an de julio estis meso en la preĝejo Sankta Petro, kun prediko en Esperanto de pastro Casanovas. Tiutage estis vizito de la gekongresanaro al la Labora Universitato. Tie estis farita la kongresa foto.

Inter la kutimaj programeroj de ĉiu kongreso de Esperanto estas menciindaj ĉi kaze la t. n. **Literatura Festo**, beletra konkurso, en kiu oni konkuris per altkvalitaj verkoj. Estis premioj pro Originala Poezio, Prozo Originala, Poezia traduko kaj Prozo Tradukita. La unuan premion en Originala Poezio atingis S-ro Francisco Vilá, el Barcelono, pro lia poemo **Medalo**, kiun ni prezentas sur la apuda paĝo.



En iu el la laborkunsidoj rolis kiel sekretario Alci-
biades G. Meana, Prezidanto de **La Verda Kolombejo**.

En la Asembleo de **Hispana Esperanto-Federacio** oni pristudis la problemaron de la hispana Esperanta movado. Inter la pritraktitaj aferoj estis tiu de la manko, tre grava tiam, de bonaj vortaroj inter Esperanto kaj la hispana lingvo. Kiel eventuala solvo al tiu problemo oni anoncis tie la baldaŭan eldonon de la vortaro de D-ro Tudela. Hodiaŭ la Vortaro de Tudela Flores estas jam io relative malnova kaj de tiam aperis aliaj pli kompletaj vortaroj Hispana/Esperanto/Hispana kvankam la problemo ne tute solviĝis ĉar mankas ankoraŭ vortaro Esperanta-Hispana simile granda al tiu Hispana-Esperanta de Dro Fernando de Diego. Post studi la eblecon ke la sekvontjara Kongreso de Esperanto okazu en Barcelono, la Asembleo aprobis jenan rezolucion de la Kongreso:

Unue) La 16a Hispana Kongreso de Esperanto sin turnas al la Hispana Komisiono ĉe UNESKO, kun propono pri kunlaboro de la Hispana Esperanto-Federacio por ĉio en rilato kun la lasta decido de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Montevideo pri Esperanto, kaj petas al tiu Komisiono, ke ĝi akceptu reprezentanton de nia Federacio kiel membron de la dirita Komisiono.

Due) La 16a Hispana Kongreso de Esperanto sin turnas al la Ministro pri Nacia Edukado, kun peto pri permeso libere instrui Esperanton en ĉiuj lernejoj, kiuj havas kapablan instruistaron por la lernigo de tiu lingvo.

Trie) La 16a Hispana Kongreso de Esperanto sin

turnas al la Direkcio pri Poŝto kaj Telegrafo, kun propono pri eldono de Esperantaj poŝtmarkoj. Marde, la 26an de julio, la kongresanoj veturis al Oviedo. Tie ili vizitis la Urbodomon, en kies ĉefsalono, la Provincestro, la Urbestro, la Rektoro de la Universitato kaj aliaj aŭtoritatuloj akceptis la kongresanaron. Post gustumi tie asturtipajn frandaĵojn, la kongresanoj vizitis la Katedralon, Arkeologian Muzeon kaj aliajn vizitindajn lokojn. Post oficiala bankedo, subvenciita de la Provincestro kaj spekti tipajn asturajn dancojn, multaj kongresanoj suprenpromenis al la monto kie estas gravaj monumentoj de la 11a jarcento: la preĝejojn Sankta Maria de Naranco kaj Santa Mikaelo de Lillo.

Poste okazis la solena Fermo de la Kongreso en la Paraninfo (protokola aŭlo) de la Universitato de Oviedo. Inter aliaj, parolis tie la Provincestro S-ro Labadie. Post plua spektaklo, ĉi foje pri kantado, la kongresanoj revenis al Gijón.

La lastan kongrestagon la partoprenantoj ĝuis tuttagan ekskurson. Post alveni al Infiesto, kie la kongresanaro matenmanĝis, ili plu vojaĝis ĝis Cangas de Onís kaj admiris la belan romian ponton tie ekzistantan. La ekskurso pludaŭris poste ĝis la historia loko Covadonga. Post viziti la grotan kapelon, la Ba-

zilikon kaj la Seminarejon, la kongresanoj estis akceptitaj de la Ĉefepiskopo.

La kongresanaro restis kontenta je sia restado en nia regiono dum tiuj tagoj; tiurilate la Kongreso estis sukcesa. Sed, ĉu ĝi estis profita ankaŭ por Esperanto en Asturio? Eble jes, ĉar tiam komenciĝis nova etapo por la Esperanta movado en Asturio ĝenerale kaj en Gijón konkrete.

Medalo

Feliĉo

**Antaŭ mi nokto serena,
ĉe la koroj idil'.**

**La pokalo amo plena,
belulino, trinku ni!**

**Eden' estas la ĝardeno,
rozaj floras tie ĉi.**

**Flor' de l' tago la reveno,
Ĉarmulino, trinku ni!**

**Kantas nun la najtingalo,
nin kortuŝas melodi'.**

**Reaplenu la pokalo,
Amikino, trinku ni!**

**Ĝuu ni ĝis nia fino!
Kisu min via gracia!**

**Brakoj, lipoj, blanka sino,
amatino, trinku ni!**

Afliĉo

**Alta febro, pulm' malsana;
Doktor' penas je medit'.**

**Patrinlarmoj, ĉio vana!
L' infan mortas sur la lit'.**

**Nigra nokto, pluvas ventas,
Etuĝemoj, frunta ŝvit'**

**la gepatrojn ja turmentas.
L' infan mortas sur la lit'.**

**Kruelpuno, sort' amara!
Ne plu vivus la spirit'.**

**Se ne vivus filiĉo kara.
L' infan mortas sur la lit'.**

**Patrin' preĝas: Mia Dio,
Se ne iĝis Vi grani't',**

**Savu lin el l' agonio!
L' infan mortas sur la lit'.**





La Grupo Esperantista Jovellanos, en kiu estis organizitaj la esperantistoj de Gijón dum multaj jaroj, naskiĝis en aprilo de 1958. Sed ni jam vidis ke antaŭ tiu dato estis esperantista aktivado en tiu urbo kaj, krome, estis organizita tie la 16^a Hispana Kongreso de Esperanto en la jaro 1955. Do, kian organizon formon donis al si la gijonaj samideanoj antaŭ aprilo de 1958?

Fakte, ili funkciis sub la nomo Gijón Grupo Esperantista. Sed tiu rondo ne havis oficialan ekziston. Kiam Alberto Menéndez intencis legalizi tiun grupon, la koncerna aŭtoritato rifuzis tion argumentante ke al tiu grupo mankis taŭgan socian sidejon. Do, por la organizado de la Kongreso de 1955 oni kreis iun enton kies nomo estis: Esperantista Grupo de la Asturia Centro de Havano. En la propagando de Boletín de HEF pri la Kongreso oni indikis la adreson de tiu Centro. Tamen la vivo

de tiu E-Grupo ne daŭris ĝis la Kongreso. La 15an de februaro de 1955 la estraro de la Asturia Centro nuligis la E-Grupon kaj malpermesis ĉiun ajn esperantistan agadon en la ejo de la institucio, kaj tiele estis publikigita en la inform-tabulo de la Centro.

La laboroj de la organizado de la Kongreso estis plenumitaj de Alfredo Villa kaj Alberto Menéndez helpitaj de iu junulo, José Ordieres Dacosta. Tiu samideano, kiu vivas ankoraŭ, estis poste, dum multaj jaroj, membro de la E-grupo de Gijón kaj rolis kiel sekretario.

En la jaro 1957 kontaktis kun la esperantistoj de Gijón Luis Serrano Pérez, el Palencio, laborulo de la fabriko ENSIDESA. Dum du jaroj li restis en nia urbo kaj tre aktivis en la loka esperantista movado. Nun Luis Serrano daŭre estas aktiva membro de la hispana esperantismo sed li ne plu

La atesto de Luis Serrano



Mi povas iomete rakonti pri mia restado en Gijon, kiel esperantisto. Malgraŭ ke jam pasis 50 jaroj, mi bone rememoras mian restadon en tiu urbo.

La hispana kongreso en Gijon okazis en la jaro 1955 kaj mi alvenis al Gijon en 1957 kaj restis tie ĝis novembro de 1959, Antaŭe mi loĝis en Aviles kaj laboris en ENSIDESA kiel masonisto. Sed en Aviles, ne estis esperantistoj, aŭ mi ne konis ilin. Do mi decidis kun iu amiko translokiĝi al Gijon. En la Adresaro de HEF, mi legis tri aŭ kvar nomojn de esperantistoj en Gijon. La unua estis S-ro Alfredo Villa Villa, do, mi skribis al li. Li tuj respondis al mi kaj proponis rendevuon en la Centro Cubano, en la promenejo La Habana.

Mi, ĉiam akompanata de mia amiko (kiu jam mortis) iris al Gijon kaj la intervidiĝo okazis en tre agrabla etoso, pro la fakto ke por li estis granda surprizo. Nu, mi decidis forlasi Aviles kaj iri al Gijon. Intertempe mi konis alian samideanon, José Ordieres, kiu promesis serĉi laboron por mi, kio ne estis necesa ĉar mi mem solvis la aferon.

La vero estas ke dum mia restado en Gijon, mi nur konis tri esperantistojn. José Ordieres, Alberto Menendez kaj S-ro Villa, sed pro politikaj kialoj S-ro Villa ne havis permeson eniri en la Ateneon "Jovellanos". Verŝajne en iu okazo, kiam la Ateneo estis en alia loko, li eldiris vortojn ne konvenaj en tiuj tempoj.

Ĉiuj tri organizis belegan Esperanto-ekspozicion en la enir-halo de la Ateneo. Estis granda tablo plena da libroj, (iujn mi kunportis de mia hejmo). Al la ekspozicio venis la aŭtoritatoj, eĉ tiuj militistaj. Entute estis granda sukceso. La loka oficejo de la poŝto dediĉis poŝtmarko-stampaĵon specialan por la ekspozicio. Sekvis kurson, al kiu aliĝis 83 personoj, el kiuj restis ege malmultaj.

Kurioze por mi restis la fakto, ke mi devis aniĝi al Ateneo kaj post tri aŭ kvar monatoj la polico telefone interesiĝis pri mi. Mi pensas, ke tio estis afero de la Ateneo, aŭ pro la fakto, ke mi ricevis multajn leterojn el Bulgario kaj Rusujo. Iam mi estis alvokita al la poŝta oficejo kaj iu funkciulo prezentis al mi leteron, kun la demando, kial vi ricevas leterojn de Rusio?, li prezentis unu al mi, kaj mi devis lin korekti ĉar la letero estis de Ruse (Bulgario) Ankaŭ loĝante mi en Gijon, oni petis informojn al la pastro de la vilaĝo en kiu mi naskiĝis Osorno (Palencia) pri mi. Sed la vivo havas tiuj kuriozaĵojn, mi fratino estis la servistino de la pastro.

Fine kun la deziroj flugi iomete pli, mi iris al Germanio, kun la intenco salti al Bulgario, kie junulino "kaptis" min, sed postaj aferoj de la vivo revenigis min al Hispanio, al Sabadell, kie mi feliĉe maljuniĝas. Mia jam estas 82-jara.

loĝas ĉe ni sed en Sabadell.

Pri la periodo de nia historio, kiu komenciĝas nun, ni disponas je iu informo-fonto kiu mankis al ni por la antaŭaj etapoj. En la arkivo de la Asocio ni trovis tekono kun dokumentaro (leteroj kaj aliaj skribaĵoj) de 20 jaroj de la vivo de la Grupo Esperantista Jovellanos, kreita en Gijón kaj gvidita de Alberto Menéndez dum multaj jaroj. Estas ankaŭ la aktlibro de la asocio kun raporto de ĉiuj kunsidoj de la estraro kaj assembleoj de la membraro de la Grupo.

En la jaro 1958 eblis krei E-grupon en la Ateneo "Jovellanos". La Ateneo Jovellanos estas priklutura asocio kreita en la jaro 1953, dank' al la iniciato kaj apogo de aro da elstaraj civitanoj de Gijón

subgvide de S-ro Tor-cuato Fernández Miranda. Ĉi lasta estis homo tre ligata al la frankisma politika reĝimo, kaj lia kreaĵo, la Ateneo, tre ege troviĝis en la orbito de tiu politiko. Kvankam Alfredo ne membris ĉe la Ateneo Jovellanos, li tre kunlaboris kun la esperantistoj kiuj aniĝis al ĝi. Fakte, estis li kiu redaktis la oficialan peton al la Prezidanto de la Ateneo por la fondo de E-grupo kadre de tiu institucio. Tiu peto havis da-

ton je 19a de aprilo 1958.

La respondo de Ignacio Bertrán, Prezidanto de la Ateneo, estis sufiĉe malvarma kaj malkuraĝiga. Kvankam oni permesis la kreadon de la E-grupo, oni neis al ĝi ejon por la sekretarioj de tiu grupo kaj la lernoklasoj de Esperanto. Ŝajnas ke en la teksto de la peto, ellaborita de Alfredo Villa estis iuj aludoj kiuj vekis rifuzon de la gvidantaro de la

Ateneo. En aŭgusto de tiu jaro la membroj de la grupo elektis iun provizoran komitaton por fari iujn demaŝojn celante venki la oponon de la Ateneestroj. Fakte la grupo estis jam funkcia kaj por atesti pri tio Alfredo Villa verkis artikolon por ĝin publikigi per la presaro kaj radio, kaj oni sendis ĝin al la Prezidanto de la Ateneo mendante lian permeson, sed rezultis ke tiu sinjoro tute kontraŭstaris ke la grupo funkciu laŭ la komenca permeso. Tiam la elektita dupersona komitato konstituita de Alberto Menéndez kaj José Ordieres intervidiĝis kun Ignacio Lavilla, Prezidanto de la Ateneo sekcio de Belarto, kiu tre afable akceptis ilin, kaj de tiam li tre varme defendis la aferon de la esperantistoj. Ekde la 1a de septembro de 1958



La gijona geesperantistaro. Somero de 1959

La gijona geesperantistaro. Somero de 1959



Decembro de 1959. Ekspozicio pri Presaro

Sekve de tio, Alfredo Villa sin ekskludis el tiu-ĉi E-grupo. Tamen li daŭre kaj dum la cetero de sia vivo kunlaboris kun la esperantistoj de Gijón, kaj ĉi tiuj ĉiam proponis lin por la estraro de HEF.

La 6an de septembro la E-grupo havis sian unuan oficialan kunsidon, kiun prezidis Alberto Menéndez. Oni elektis la estraron:

Prezidanto: Alberto Menéndez Menéndez .

Sekretario: José Ordieres Dacosta.

Unua voĉdonanto: Luis Serrano Pérez.

La unuaj disponoj de tiu komitato estis la organizado de ekspozicio pri Esperanto kaj la intervidiĝo kun la samideanoj de Oviedo.

En la Asturia ĉefurbo ekzistis tiam iu E-rondo nomata Esperanta Klubo “Nordo” enkadrigita en la oficiala (de la reĝimo) klubo-reto nomata “Edukado kaj Ripozo”, kaj gvidata de Luis García y Eloy Noriega. Ne eblas al ni scii ĉu tiuj samideanoj esperantiĝis antaŭ la milito, kiam ekzistis en Oviedo vigla E-grupo. Pli verŝajne ili eniris en la esperantistan mondon kadre aŭ subinflue de la Kongreso okazinta la jaron 1955 en Gijón. Ĉiukaze, notindas ke de tiam kaj dum kelkaj jaroj tiu E-grupo de Oviedo regule kunlaboradis kun tiuj de Gijón kaj El Entrego.

La unua kunlaboro de tiuj grupoj estis por la organizado de la menciita Ekspozicio de Esperanto en Gijón. Temis pri prezentado de esperantaĵoj:

ĵurnaloj, poŝtkartoj, afiŝoj... el fremdaj landoj. Per tiuj ekspozicioj niaj samideanoj celis montri al la publiko ke pere de la Internacia Lingvo Esperanto eblas interrilati kun fremdaj personoj kiuj havas malsamajn gepatrajn lingvojn. Por la organizado de la ekspozicio multe devis labori niaj samideanoj. Ili petis materialojn al landaj kaj fremdaj Esperanto-organizaĵoj, al ambasadejoj kaj ĉiutipaj institucioj en- kaj eksterlandaj. La ekspozicio estis inaŭgurita la 4an de decembro de la jaro 1958, kaj dum kelkaj tagoj vizitis ĝin inter 8 kaj 10 mil personoj, inter ili kelkaj aŭtoritatoj kaj elstaruloj de la urbo.

Dum la okazado de la ekspozicio oni anoncis la baldaŭan komenciĝon de kurso de Esperanto. Estas trafa atesto de la sukceso de la ekspozicio la fakto ke por la kurso enskribiĝis 80 personoj: 50 viroj kaj 30 virinoj. La kurso komenciĝis la 9an de decembro kaj okazis en la Ateneo subgvide de Alberto Menéndez. Dum la unuaj semajnoj la nombro da gelernantoj malpliĝis al 55 aŭ 60. Poste tiu nombro plialtiĝis sed post la Kristnaska ferieto, kiel kutime, malpliĝis denove, restante nur 40 ge-

lernantoj. La kurso finiĝis la 7an de marto kun 30 novaj samideanoj; oni konservas iun foton faritan tiutage al la kursanoj kiun ni prezentas en la sekva paĝo. Alberto Menéndez aperas en ĝi en la dua vico, apud angulo de la portreto de Zamenhof. Plejparto el la personoj kiuj aperas en tiu foto estis novaj gelernantoj, sed estis ankaŭ aliaj kiuj estis aktivaj esperantistoj de antaŭ iom da tempo, kiel Juan Fernández, en la supra vico, maldekstre en la foto, aparteninta al la E-grupo iam gvidita de Alfredo Villa en la Laborista Ateneo. En la dua vico, dekstre en la foto, sidas samideano Ordieres, tiama sekretario de la E-grupo, kaj malantaŭ li, staras Luis Serrano. La ino sidanta en la dua vico, maldekstre en la foto, nomiĝis Carmen Argüelles; ŝi aktive partoprenis poste dum multe da tempo en la laboroj de la E-grupo ĝis ŝia translokiĝo al alia urbo. Estas konstatinda ekde tiu epoko la partopreno de virinoj tiel en la E-movado de nia urbo.

Kun optimismo la E-grupo de Gijón faris projektojn por estonta agado, iuj el ili ne realigeblaj tiam, kiel la organizado de landa kongreso de Esperanto por la jaro 1961. Alia projekto estis or-

ganizi, kune kun la E-Klubo Nordo de Oviedo, ekspozicion de eksterlanda presaro, kaj novan kurson de Esperanto en Gijón. La kurso komenciĝis la 9an de marto de 1959 kaj daŭris ĝis la 2a de junio. La skribita in-

formo je kiu ni disponas asertas ke tiu kurso estis bonsukcesa en kio rilatas al la nombro da gelernantoj kaj ties fervora lernado, sed ne informas pri la kvanto da lernantoj kaj kiom da ili estis partoprenintaj antaŭan E-kurson, kio estas ofta okazaĵo en nia movado.

Ankaŭ estas ofta kaj normala afero en la esperantista mondo tio ke gelernantoj kiuj faris unu aŭ pli kursojn, poste ne plu interrilatas kun la E-movado. Aliaj restas kiel membroj de E-grupo dum kelke da tempo, aliaj dum la cetero de sia vivo ne aktivante en la movado sed estante nuraj grupanoj. Krome estas aliaj kiuj, ja, fariĝas veraj esperantistoj, aktivuloj, kaj tiel ili restas dum kelkaj jaroj sed poste ĉesas en tiu aktivado kaj restas kiel nuraj membroj de E-rondo, aŭ eĉ tute forlasas la rilaton kun la esperantismo. Fine, estas tiuj kiuj, kontaktinte kun la esperantista movado, aktive partoprenas en ĝi dum la cetero el sia vivo. Nu, el la multaj gelernantoj kiuj partoprenis la du unuajn E-kursojn de la Esperantista Grupo Jovellanos rezultis ĉiutipaj teniĝoj: iuj ne plu interrilatis kun la esperantistaj rondoj. Aliaj restis kiel membroj de la



ESPERANTISTA GRUPO "JOVELLANOS"

ATENEJO JOVELLANOS - GIJON (HISPANUJO)



Lernokurso 1958-1959

E-grupo aldone al tiuj, ankoraŭ vivantaj tiam, kiuj jam apartenis al la esperantistaj organizaĵoj ekzistantaj en nia urbo antaŭ la milito, sed sen esperantista aktivado.

Sed estis ankaŭ la kazo de novbakitaj aktivistoj por nia movado, kiel Carmen Argüelles (Carmina) kiu, post partopreni la unuan kurson de Alberto Menéndez, restis kiel Esperanto-aktivistino dum la tempo kiam ŝi loĝis en Gijón. La finan tagon de la dua kurso, la 2an de junio 1959, ties instruisto Alberto Menéndez ne povis pro tio prezidi asembleon de la membraro de la grupo. Demarŝis la kunsidon la sekretario, José Ordieres. Inter la prioritaj aferoj estis tiu de la organizado de ekspozicio pri presaro. Por tiu tasko estis elektita komisiono konstituita de Alberto Menéndez, José Ordieres kaj la menciita Carmina. Sed en la akto de tiu sama kunsido aperas la nomoj de pluaj novbakitaj aktivuloj de la E-grupo: alia decido de la kunveno estis la kreado de revueto aŭ bulteno de la Esperanto-grupo. Tiam oni decidis eĉ la nomon de tiu bulteno: *Ŝpruci*. Oni debatis ĉu la bulteno estu dulingva (Hispana-Esperanta) aŭ nur Esperanta; fine la decido estis ke oni publikigu ĝin nur Esperantlingve. Sed tre interesas rimarkigi ĉi tie ke la komisiono nomumita por la ellaborado de tiu revueto estis konstituita de personoj tute novaj en nia historio de la gijona esperantismo, sendube esperantigitaj en la du unuaj kursoj de la Esperantista Grupo Jovellanos.

La membroj de tiu komisiono estis:

Direktoro: Fernando Miguens. Foto-Reportero: Floreal Bedriñana Peláez. Reporteroj: María del Carmen Amez, María Gloria Triviño, Florita Palacios kaj Santiago Mulas.

Tajpistino: María del Carmen Argüelles.

Esceptante la maŝin-skribistinon, Carmina, kiun jam oni menciis por alia komisiono, la ceteraj aperas unuafoje en nia historio. Plejparto el ili, post aktivadi dum iom da tempo en la E-movado, fine forlasis la porEsperantan laboradon. Speciala kaj aparta estas la kazo de Santiago Mulas. Ni rimarku ke la jaro 1959, pri kiu ni estas raportante, troviĝas ĝuste meze de la jarcenta periodo de la historio de la astura esperantismo. Nu, samideano Santiago Mulas travivis kiel konstanta E-aktivulo la ceterajn 50 jarojn de tiu historio ĝis la nuntempo. Laŭlonge de la cetero de nia historia raporto lia nomo aperos ofte kaj multfoje.

La 4an de aŭgusto estis nova asembleo de la membraro de la grupo. Inter aliaj organizaj aferoj, ĉefe en rilato kun la planita ekspozicio, oni elektis novan estraron. En ĝi jam ne plu estis Luis Serrano, kiu translokiĝis al alia lando pro personaj kaj laboraj kialoj. Restas la samaj prezidanto kaj sekretario, kaj eniras ses novaj komitatanoj: kiel kasis-to, Floreal Bedriñana Peláez, voĉdonantoj: Santiago Mulas Gallego, Fernando Miguens, José Palacio Tuero, Carlos Peinador Martínez kaj María del Carmen Argüelles Juanes. Krome al S. Mulas oni komisiis ankaŭ la servon de la korespondado de la grupo kaj la reorganizado de la biblioteko. Inter la novaj komitatanoj estas tiu José Palacio Tuero, kiu ne estas nova en nia historio; li apartenis jam al **Astura Esperanta Asocio** en la 20aj jaroj, kaj krome li estis membro de la Loka Organiza Komitato de la **16a Hispana Kongreso de Esperanto** okazinta en Gijón en 1955. Tiu samideano vivas ankoraŭ nuntempe (li estas jam centjaraĝa) kaj li daŭre membras ĉe nia E-asocio.

La ekspozicio pri presaro estis eĉ pli sukcesa ol tiu de la antaŭa jaro. Preskaŭ 20.000 personoj vizitis ĝin dum la lastaj semajnoj de oktobro. Tre informis pri ĝi la loka presaro kaj radio, kaj ankaŭ la Nacia Radio de Madrido amplekse raportis pri tiu esperantista ekspozicio en Gijón. Fine de ĝi oni enskribis 30 gelemantoj por nova kurso de Esperanto en la Ateneo. La entuziasmo de la membroj de la E-grupo pro tiu sukceso respoguliĝas en la akto de la estraro en ties kunsido de la 3^a de januaro de 1960. Oni faris en tiu kunsido tre belajn kaj optimismajn planojn por la estonteco, inter ili la kreadon de sekcioj de ŝak-ludado kaj fotoamatoroj ene de la esperantista grupo. En la du sekvaj kunsidoj de tiu estraro, la 3an de februaro kaj la 4an de marto, oni perceptas, per la koncernaj aktoj, similan optimismon kaj emon fari planojn. Oni traktis en tiuj kunsidoj pri la plueldonado de Ŝpruci, fiksado de abonkotizo por la grupanoj... Konsiderante tiun entuziasmon rezultas strange ke la sekva akto en la libro de la grupo estas de dato 12an de decembro de la jaro 1966! Preskaŭ ses sinsekvaj jaroj sen kunvenoj de la estraro nek asembleoj de la membraro!. Por tiu sesjara periodo utilas al ni neniom la aktlibro de la E-Grupo. Ni devas eltiri la informon el la leter-arkivo kiu, jes ja, enhavas sufiĉe da materialo de tiuj jaroj.

Dank' al tiu arkivo ni povas scii ke dum tiu tempo tute ne ĉesis la aktivado de la grupo kvankam ĝi estis malpli intensa. Per iuj skribaĵoj ni scias ke en januaro de 1960 komenciĝis en Avilés kurso de Esperanto. Ŝajnas ke ties gvidanto, Angel García, havis ian rilaton kun la grupo de Gijón; eble li esperantiĝis en iu el la kursoj de Alberto. Ni povas konstati ankaŭ ke estis vigla korespondado kaj rilato de la grupo kun aliaj grupoj en Asturio, kun HEF kaj hispanaj E-Grupoj kaj kun eksterlandaj esperantistaj grupoj kaj organizaĵoj. Funkciis ankaŭ la biblioteko de la grupo kaj estis aĉetado de novaj libroj. Ŝajnas ke dum tiu tempo estis publikigitaj pluaj numeroj de Ŝpruci.

La esperantistoj de Pontevedro volis fari, kadre de la 21^a Hispana Kongreso de Esperanto, ekspozicion similan al ties okazintaj en Gijón. La samideanoj de tiu urbo mendis tiucele materialon al la E-Grupo Jovellanos per ilia letero de la 7^a de aprilo de 1960. Nia E-Grupo prunte-sendis al ili ses pakajojn da libroj kaj revuojn en Esperanto.

En tiu jaro 1960, la esperantistoj de la grupo de Oviedo komencis publikigi informan bultenon en Esperanto. En Pravia oni konstituis E-grupon, kies iniciatinto estis Manuel Manteca. Ankaŭ tie oni volis organizi ekspozicion kaj oni petis helpon kaj materialon al la grupo de Gijón. Sed ŝajnas ke



La atesto de Santiago Mulas

Mi kontaktis kun la esperantista grupo de Gijón en la jaro 1959, iomete antaŭ la foriro de Luis Serrano. Baldaŭ mi komencis kunlabori kun la areto da aktivuloj de la E-movado en tiu-ĉi urbo. En junio de tiu jaro mi estis elektita, kune kun aliaj gesamideanoj, por la ellaborado de iu bulteno de la Grupo, en Esperanto, nomata **Ŝpruci**. Ni eldonis kelkajn numerojn de tiu revueto. Post la foriro de Luis Serrano oni reorganizis la estraron de la E-Grupo, en monato aŭgusto de tiu jaro 1959; mi estis elektita inter la aro de novaj membroj de tiu komitato. De tiam mi ĉiam partoprenis en la PorEsperanta laborado en Gijón, ĉefe en la instruado de la Internacia Lingvo. Estas al mi neeble kalkuli kiom da kursoj de Esperanto mi gvidis laŭlonge de 50 jaroj, ekde tiu epoko ĝis nuntempe.

Post la forpaso de Alfredo Villa en 1969 kaj la retiriĝo de Alberto Menéndez en 1970 la E-movado iom malfortiĝis en Gijón. Tiam mi penis subteni la aferon gvidante pliajn E-kursojn ene kaj for de la Ateneo Jovellanos. Mi speciale memoras iun kurson kiun mi gvidis en la **Kultura Asocio de Pumarín**. En la epoko de tiu kurso kunvokis min la polico por pridemandi min pri la agado de iuj lernantoj kiuj, laŭ la polica aserto, estis komunistoj. En alia okazo la polico kunvokis min kaj konsilis al mi ke mi ne dediĉiĝu al la porEsperanta agado. Ili ordonis al mi legi tradukaĵon de letero en Esperanto kiun mi estis ricevinta el Rusio; dum mi estis legante mian tradukon ili estis kontrolante mian version kun traduko kiun ili havis.

Ekde la jaro 1976, kiam reorganizis la E-grupo, mi prezidis ĝin. Krome mi daŭre gvidis E-kursojn sed la ĉefa evento de la sekvintaj tri jaroj estis la okazigo de landa Kongreso de Esperanto en nia urbo, en la jaro 1979. Mi prezidis la Lokan Kongresan Organizan Komitaton. Fine de tiu sama jaro estis alia grava okazaĵo por la gijona esperantistaro. La **Esperantista Grupo Jovellanos** ĉesis aparteni al la Ateneo kaj de tiam dependas de la Universitato, konkrete de ties Katedro Jovellanos, kaj ŝanĝis sian nomon al **Astura Esperanta Asocio**, reprenante la nomon de la unua E-organizaĵo ekzistinta en nia urbo.

Mi daŭre prezidis tiu asocion kaj senĉese gvidis pliajn kursojn. En Avilés mi gvidis plurajn E-kursojn kaj ties partoprenintoj kreis poste la E-grupon **Antaŭen** de tiu urbo. En la nova etapo estis en Gijón alia Kongreso de Esperanto sed ĉi-foje ne estis landa kongreso sed Asturi-regiona.

De antaŭ malmultaj jaroj estas alia Prezidanto en Astura E Asocio, Carlos E. Carleos, kaj mi estis elektita Honora Prezidanto. Sed de tiam mi plu daŭre gvidis kursojn en Esperanto.

poste la afero ne prosperis.

La E-grupo de Gijón organizis renkontiĝon de ĉiuj konataj esperantistoj de Asturio. La renkontiĝo okazis en nia urbo la 10an de julio de 1960 kaj venis samideanoj el Oviedo, Avilés, Pravia, Langreo... Tiujare oni perceptis intereson pri la Internacia Lingvo ankaŭ en Cangas de Onís, sed ne estas posta informo pri formiĝo de Esperanto-grupo en tiu loko.

En la sekvintaj jaroj oni ripetis la renkontiĝon de la geesperantistoj de Asturio en Gijón dum la somero.

Post longa silento, la aktlibro de la E-grupo de Gijón priskribas kunsidon, la 12an de decembro 1966, de Restrikta Estraro de la grupo, konstituita nur de Alberto Menéndez, Prezidanto, José Ordieres, Sekretario kaj Kasisto, kaj Santiago Mulas, Bibliotekisto. Oni decidis la organizadon de ekspozicio de muraj kalendaroj el la tuta mondo, esperantistaj kaj ne esperantistaj. Estis alia kunsido de la sama Restrikta Estraro la 12an de januaro de 1967. En ĝi oni plu traktis la aferon de la organizado de la ekspozicio de muraj kalendaroj.

En la Organiza Komitato de tiu ekspozicio estis inkluditaj Carlos, Florita kaj Carmen Argüelles.

La sekva akto, de la 10a de marto, temas pri kunsido de la tuta Organiza Komitato de la ekspozicio por plu trakti pri la laboroj de preparado

kaj la kosto de la ekspozicio. Dum la lastaj semajnoj de tiu monato la publiko de Gijón povis vidi tiun ekspozicion kaj la rezulto tiel estis sukcesa kiel tiuj de la jaroj 1958 kaj 1959. La lokaj presaro kaj radio amplekse informis pri tiu esperantista akto. La loka radio emisiis iun kulturalan noton, verkitan de Alfredo Villa, pri la



Marto de 1967. En la ekspozicio pri mur-kalendaroj. De dekstre al maldekstre: Alberto Menéndez, Carmina Argüelles, Santiago Mulas kaj José Ordieres Dacosta.

graveco kaj situacio de Esperanto en la mondo kaj en rilato kun UNESKO.

La 1an de aprilo kunsidis la tuta estraro de la grupo por analizi tiun rezulton de la ekspozicio kaj en ĝi oni decidis la organizadon de nova kurso (intensiva) de Esperanto en la Ateneo Jovellanos. Tiun kurson gvidis Santiago Mulas; tiele estis registrita en la aktlibro temante pri kunsido de la estraro kiu okazis la 5an de majo. En ĉi tiu kunsido oni informas pri la plano de du vintraj E-



Marto de 1967. Ekspozicio pri Mur-kalendaroj



kursoj, unu supera, gvidota de Alberto Menéndez, kaj alia baza, gvidota de Santiago Mulas.

En aŭgusto de la jaro 1968 okazis en Madrido la **53a Universala Kongreso de Esperanto**. Post la Universala Kongreso de la jaro 1909, (la saman jaron de la fondiĝo de **Astura Esperanta Asocio**) en Barcelono, kun la ĉeesto de D-ro Zamenhof, ne estis alia Kongreso Universala de Esperanto en Hispanio ĝis tiam. En ĉi tiu partoprenis du membroj de la **Esperantista Grupo Jovellanos**: Alberto Menéndez, kaj Santiago Mulas. Krome iris ankaŭ Alfredo Villa Villa kaj iu samideano el Mieres, Cándido Cienfuegos, ĉef-zorganto de esperantista grupo kiu estis kreita en Mieres. Sur ĉi tiu paĝo ni prezentas foto-raporton kun bildoj de la kvar asturaj kongresistoj kun aŭ sen la akompano de aliaj samideanoj.

En kunsido de la estraro de La **Grupo Esperantista Jovellanos**, de dato 30a de aŭgusto,

Alberto kaj Santiago informis pri la Kongreso kaj ties sukceso. Partoprenis en tiu forumo pli ol 1700 personoj; nur el Jugoslavio venis 6 aŭtobusoj kun 300 gesamideanoj. La informo respegulis la entuziasmon kaj optimismon kiun oni kutime spertas kaj travivas en tiaj internaciaj renkontiĝoj de la geesperantistoj.

La informantoj aldonis ankaŭ tion ke oni antaŭvidas ke en iu el la sekvaj tri jaroj okazos **Hispana Kongreso de Esperanto** en Mieres. La Esperanta grupo laste fondita en tiu astura urbo subgvide de Cándido Cienfuegos kuraĝas entrepreni la taskon organizi tiun Kongreson.

La lasta akto aŭ aktlibra raporto de tiu periodo estis tiu de kunsido de la estraro de la Esperanto-grupo de Gijón, okazinta la 17an de februaro 1969, en kiu Santiago Mulas informis ke estis komenciĝinta la 6a Esperanta

kurso sub lia gvidado, kun partopreno de 18 gelnantoj. Oni bedaŭris tion ke estis malsukcesa la



José Palacio Tuero

Asturaj samideanoj en la 53a Universala Kongreso de Esperanto, en Madrido, aŭgusto de 1968



Santiago Mulas Gallego



Alfredo Villa kun D-ro Herrero



Cándido Cienfuegos kun kataluna geparo



Alberto Menéndez antaŭ la kongresejo



Cándido Cienfuegos kaj Santiago Mulas



Cienfuegos kaj Alfredo Villa kun pola samideanino



53° UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO MADRID – AŬGUSTO – 1968

rezulto de la alvoko farita al la gelernantoj de la antaŭaj kursoj okazintaj en la urbo por ke ili partoprenu en ĉi tiu lasta. Fakte preskaŭ ĉiuj geesperantistoj de tiu epoko por ĉiam forlasis la esperantistan movadon aŭ almenaŭ la esperantistan aktivadon. Iamaniere la gijona E-grupo estis alveninte tiam al la fino de ciklo kiu komenciĝis post la **16a Hispana Esperantista Kongreso**, en la jaro 1955. Ni vidis per la sekvaj ĉapitroj de ĉi tiu historia raporto ke poste venis por la esperantismo de nia urbo nova epoko kun novaj protagonistoj, eĉ se el ĉi tiu antaŭa periodo persistis la ĉeesto kaj la aktivado de personoj kiuj portis la torĉon de la esperantismo kaj transpasigis ĝin de iu generacio al alia; ĉi tiu fenomeno estas normala okazaĵo en la esperantista movado... kaj en aliaj. Fine de la prikomentata aktlibra teksto, oni deklaras ke la estraro de la Grupo dankis al Santiago Mulas pro la entuziasmo kun kiu li entreprenas la instruadon de Esperanto. En ĉi tiu jaro, 1969, dum la samideanoj de Mieres organizadis la kongreson de la sekvonta jaro,

kelkaj esperantistoj de Gijón komencis fari planon por ties partopreno en tiu **30a Hispana Kongreso de Esperanto** kiun oni fiksis, fine, por la monato julio de 1970 en Mieres. Sed estis iu grava es-

perantisto de nia urbo kiu ne povis ĉeesti tiu kongreson: la 7an de aprilo de tiu jaro forpasis Alfredo Villa Villa. Tiele finiĝis vivo de homo kiu dediĉis al Esperanto preskaŭ sesdek jarojn de sia ekzistado. Li esperantiĝis en la jaro 1910, kaj ekde la jaro 1911, kiam estis fondita la esperantista grupo de la Laborista Ateneo de Gijón, li apartenis al ĝi kaj poste gvidis ĝin. Li estis ankaŭ redaktoro de la revuo **Diagonalo** de tiu Esperanta grupo kaj ofte kunlaboris en **Boletín** de **HEF** kaj aliaj gazetoj esperantistaj. En la jaro 1955 li estis la ĉefa zorganto en la organizado de landa Kongreso de Esperanto en Gijón. Per lia morto malaperis unu el la plej elstaraj figuroj de la esperantismo en nia



Alfredo Villa Villa

urbo. Lia forpaso kaj la baldaŭe posta retiriĝo de Alberto Menéndez estis aliaj signoj aŭ lim-ŝtonoj de la menciita epoko-ŝanĝo por la gijona organizita esperantismo.



HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO EN MIERES

Somere de la jaro 1970 okazis alia grava esperantista evento en Asturio. Estis la **30a Hispana Kongreso de Esperanto**, organizita de la esperantista grupo de tiu urbo, subgvide de Cándido Cienfuegos. Kelkajn monatojn antaŭ la okazado de la Kongreso ŝajnis ke ĉi tiu ne povus okazi ĉar malŝanĝis S-ro Cienfuegos, la ĉefa prizorganto de la Loka Organiza Komitato. Feliĉe, savis la situacion Javier Núñez Yáñez, kiu estis tiucele komisiita de la Urbestro de Mieres kaj agadis kiel Kunprezidanto de la Loka Kongresa Organiza Komitato dum la lastaj semajnoj antaŭ la Kongreso. Rolis kiel Vicprezidanto de tiu Komitato Manuel Ardura kaj kiel Sekretario Carlos Ortega Movillo.

La Kongreso, en kiu partoprenis kelkaj samideanoj de la Grupo Jovellanos de Gijón, la Verda Kolombejo de El Entrego kaj aliaj E-grupoj de Asturio, normale disvolviĝis dum la tagoj 18a al 23a de julio. Pri ties disvolviĝo fajne informas al ni la **Analoj de la esperanta movado en Hispanujo**.

En la posttagmezo de la 18a de julio, la gekongresanoj jam alvenintaj al Mieres amasiĝis en la Akceptejo por ricevi la kongresan dokumentaron kaj solvi la kutimajn problemojn pri loĝado k.s. Nokte okazis la interkona kunveno en etoso de gaja festo.

La 19an, dimanĉon matene, okazis Meso en Esperanto celebrita de pastro A. Cortina kiu ankaŭ predikis en Esperanto. Je la 11a horo, okazis la solena Malfermo de la Kongreso kiun prezidis, kun la HEF-Prezidanto, Ángel Figuerola, la Urbestro de Mieres G. Lorenzo Suárez kaj la fakta Prezidanto de la Organiza Komitato, Javier Núñez. Ĉi tiu, post danki la gekongresanojn pro ili partopreno, dediĉis specialajn omaĝajn vortojn honore al la forpasinta pioniro de la esperantismo en Gijón, Alfredo Villa Villa.

La HEF-Prezidanto Figuerola emfazis per lirikaj frazoj la belecon de Asturio, kaj ankaŭ dediĉis

laŭdajn vortojn al nia samideano Alfredo Villa. Li ankaŭ sciigis ke samideano Cándido Cienfuegos, pro kormalsano, devis rezigni sian postenon kiel Prezidanto de la Organiza Kongresa Komitato, kaj deziris al li baldaŭan resaniĝon. Paroladis ankaŭ la Urbestro de Mieres, kiu faris apologion de la grandaj virtoj de la asturoj kaj de la senkompara beleco de la Asturia Regiono, kaj deklaris malfermita la Kongreson. La komuna kunkantado de “La Espero” metis finon al tiu kunsido.

Post tiu protokola akto, la kongresanaro iris al la Parko je Atrakcioj, kie la Urba Konsilantaro regalis ilin per malavara lunĉo. Posttagmeze kelkaj kongresanoj vizitis la “Domo de la Junularo”, kie okazis sportaj konkuroj. Aliaj, en granda nombro, veturis al Oviedo por viziti la Asturian ĉefurbon.

La 2an de julio la kongresanaro dediĉis la matenon al Fakaj kunsidoj, por demarŝi siajn specifajn aferojn. Posttagmeze okazis la kutima kunsido de la HEF-estraro kun la delegitoj de grupoj, kies precipa celo estas studi la problemojn de la Federacio antaŭ la oficiala kunsido.

Vespere, je la 18a horo, denove la Urba Konsilantaro regalis la gekongresanojn per tipa astura festo, kiu okazis ĉe iu “Llagar” (cidro-keelo), kaj partoprenis ĝin la Urbestro mem. La difino de la tipa astura “Espicha”, laŭ la **Analoj**, estas: *oni trinkas cidron post la manĝo, kaj por retrinki oni devas antaŭe remanĝi. La cidron, per mane alte levita oni verŝas kontraŭ la glashordon, oni trinkas ĝin tuj, kaj oni devas elfeti el la glaso la lastan iomon, kiel feĉon. Tiom da iomoj naskas sur la planko fluan flakon kreskantan samritme kiel malaperas de sur la tablo la “gravedaj bulkoj”... kiuj rebezonas trinkon. Dume, en tipaj kostumoj, oni kantas laŭ la kadenco kaj melodio de sakfluto...* la Festo tre plaĉis al la kongresanoj.

Ĉi tie ni mencias, kiel anekdoto, ion kion rakontis la samideanoj de Gijón partoprenintaj tiun Kon-

greson: Ĉeestis la Kongreson iu esperantisto el Kanado kiu neniam antaŭe estis drinkinta cidron. Post partopreni en la antaŭe menciita Espicha-festo, tiu samideano en la ceteraj tagoj de la Kongreso, kiam li aliris al la hotela kafejo por la matenmanĝado, li ĉiam insiste petis al la kelneroj cidron por matenmanĝi.

Sekvintage matene okazis Ĝenerala Kunsido de HEF, en kiu oni debatis kelkajn aferojn. Oni legis kaj aprobis la Raporton de la agado de la Federacio dum la lasta jaro, kaj la finanĉan situacion. Oni informis pri la projekto de la Federacio starigi en Madrido konstantan Oficejon. Oni petis helpon al la Ministrejo pri Edukado kaj Scienco, kiu donacis 100.000 pesetojn por la projekto. La Asembleo prenis iujn decidojn pri la Eldona Fako, la Libro-Servo kaj la redaktado de “Boletín”, ĉio demarŝata de iu aktivulino, Inés Gastón, de Zaragozo.

Posttagemeze de tiu tago estis prelego de Profesoro Félix Díez Mateo, pri la temo “Ĉu la hispana lingvo estas en mortdanĝero?”, sed la teksto de la prelego estis legita de la Sekretario de HEF, ĉar la profesoro Mateo ne povis persone ĉeesti. Vespere okazis tre interesa koncerto: la urba orkestro de Mieres ludis, honore al la gekongresanoj, la himnon “La Espero”, kaj tri aliajn muzikpecojn. Tuj poste, la ĥoro de la sama urbo kantis kelkajn belajn kanzonojn, kiuj tre komplezis la ĉeestantaron. La 22an de julio, antaŭlasta tago de la Kongreso, unue estis prelego en Esperanto de la HEF-Prezidanto Ángel Figuerola Auque, pri la temo “Sincereco, objektiveco kaj vereco, fundamentaj nor-

moj por la disvatigo de Esperanto”. La preleganto avertis kontraŭ falsaĵoj, kontraŭ blufoj, kontraŭ ĉio nevera. Li asertis, ke ĉar Esperanto estas seriozaĵo, ĝi trudiĝos venke pro socia bezono, nepre, sed sur bazo de sincereco.

Pro miskompreno, ne okazis la kutimaj ekzamenoj de Esperanto, kaj anstataŭe kunvenis proksimume dudeko da gesamideanoj, kiuj faris kaj respondis lingvajn demandojn, rakontis kuriozajn anekdotojn kaj amuzajn spritaĵojn, kaj bone profitis la tempon praktikante la lingvon, kio, ja, estas unu el la ĉefaj celoj de la Kongresoj de Esperanto.

Je la 19a horo, okazis la oficiala fermo de la Kongreso, kiun prezidis la Urbestro de Mieres, la Provinca Delegito de la Ministerio pri Informado kaj Turismo, kaj la Prezidanto de **Hispana Esperanto-Federacio**. Post paroli la Urbestro kaj la provinca delegito pri Turismo, esprimante ilian esperon pri la sukceso de Esperanto, fine, la Prezidanto Figuerola, dankis al ambaŭ aŭtoritatoj pro ilia helpemo kaj gastameco, kaj konfirmis la decidon de la hispana esperantistaro obstine persisti en sia strebado por sukcesigi nian lingvon, la pacan instrumenton de bela idealo por la homaro. Kaj li deklaris fermita la Kongreson de Mieres. Je la 22a horo, okazis, kun la ĉeesto de la tuta kongresanaro, la oficiala bankedo, per kiu regalis ilin la Provinca Deputitaro kaj la Urba Konsilantaro de Mieres.

La lasta tago estis plenplene dediĉita al ekskurso: al Kovadongo, Ribadesella... vizito al la cidrofabriko “El Gaiteru”, apud Villaviciosa.





La kursoj de Santiago Mulas



La Esperanta instruado far de Santiago Mulas Gallego estis persona dediĉo kiu etendiĝis laŭlonge de tuta duonjarcento, ekde la jaro 1959 ĝis la nuntempo, ekde la epoko de Alberto Menéndez kaj Alfredo Villa ĝis la nuna kunlaborado kun pli junaj samideanoj, en la **Ateneo Jovellanos** kaj en ĉiu alia loko kie eblus tion fari kaj estis personoj

kiuj interesiĝis pri nia afero, unue kadre de la **Esperantista Grupo Jovellanos** kaj poste kadre de la renomita **Astura Esperanta Asocio**, ĝenerale en Gijón sed ankaŭ, foje, en aliaj lokoj, kiel Avilés...

Tiutipa dediĉo al la Internacia Lingvo ne estas, por la personoj kiuj plenumas ĝin, peniga per si mem, male, la Esperanta instruado povas doni al la instruantoj grandan plezuron kaj memkontenton, tamen, estas kelkaj cirkonstancoj, kiuj alportas al tiuj instruistoj egan frustriĝon kaj fiaskosenton. Ĉiuj, kiuj iam dediĉiĝis al tiu tas-

ko, scias ke la gelernantaro iom-post-iom malpliĝas laŭlonge de ĉiu kurso. Ĉefe, post ĉiu ferieto de Kristnasko-tempo aŭ de Pasko-tempo la aro da lernantoj restas duonigita aŭ trionigita. Nur eta nombro da lernantoj, kiuj komencis la kurson, persistas ĝis la kurso-fino. Iuj el ili malaperas tiam kaj la instruisto neniam scios ĉu ili plu praktikados la akiritan konon pri la Internacia Lingvo. Aliaj lernantoj ripetas plurfoje la Bazan Kurson kaj iuj eĉ lernas poste la Perfektigan Kurson. Kutime, inter ĉi-lastaj ne mankas tiuj, kiuj aliĝas al la loka Esperanta Grupo kaj eble ankaŭ al iu E-revuo dum iom da tempo, kvankam ne ĉiuj ili restas kiel ak-

tivuloj de la E-movado. Sed eĉ inter la malmultaj kiuj aktivadas dum kelkaj jaroj en tiu movado estas iuj kiuj forlasas ĉion ekde difinita momento por ne plu reveni al la porEsperanta laborado. Tial, ĉiu Esperanto-instruisto, same ol Santiago Mulas mem, ofte povas dubi ĉu efektive iome utilis sian sindediĉon al la Esperanta instruado.

Kiel dirite, Santiago travivis tiun sperton dum multe da tempo. Sed el tiom longa, 50-jara periodo, ni deziras speciale emfazi la sepjaran periodon inter la jaroj 1969 kaj 1976. Kial? Ĉar dum tiuj jaroj la agado de la Esperantista Grupo Jovellanos tre malpliĝis; ĝi preskaŭ tute falis, kaj la kursoj de Santiago Mulas, kiuj plu daŭris tiam, oni povas diri ke ili estis preskaŭ la sola vivosigno de la urba esperantismo kaj la kerno ĉirkaŭ kiu oni povis poste reartikigi la grupon. Ja, post la forpaso de Alfredo Villa kaj la ĉeso de la gvida aktivado far

de Alberto Menéndez, multaj iamaj membroj de la grupo kaj ankaŭ kelkaj estraranoj forlasis la porEsperantan aktivadon rezultante kvazaŭ psaralizo de la E-grupo. En tiu kunteksto, la persisto de samideano Mulas savis la kontinuecon de la esperantisma tradicio en Gijón kaj evitis la kolapson de la movado en la urbo, kio estus povinta signifi ĝian definitivan malaperon kiel okazis en aliaj lokoj. El la kursoj gviditaj de S. Mulas dum tiuj jaroj restis novaj aktivuloj de la grupo, kiaj Marina Piqueiro, Luis Muñiz, Julio Argüelles, Ildefonso Domínguez... kies nomoj aperos poste en nia historio en rilato kun E-aktivado kaj taskoj de la E-grupo.





El la foto-teko de kursgvidanto

Okazis en tiu epoko iu cirkonstanco kiu igis kreski la nombro de la esperantistoj en nia urbo. La E-Grupo de **El Entrego**, **La Verda Kolombejo**, kiun ni kelkfoje menciis en nia raporto, ĉesis en sia aktivado; plejparto el ĝiaj membroj forlasis tiun urbon kaj translokiĝis al aliaj lokoj. Kelkaj el ili ekloĝis de tiam en Gijón, kaj de tiam membris ĉe nia esperantista rondo. Fakte iuj el ili estis pli ol nuraj membroj, sed veraj aktivuloj: Juan Manzano, Sacramento Collado kaj, ĉefe, Adonis González Meana.

Pliaj membroj kaj aktivuloj estis barbitaj, fine de la periodo kiun ni priraportas, inter la ĉeestintoj de la kurso 1975-1976. La lernantaro de tiu kurso estis pli multenombra ol tiu de la antaŭaj jaroj. Partoprenis en ĝia komenco kelkdeko da gelernantoj. Eĉ konsiderante ke kelkaj el ili estis ĉeestintaj jam antaŭajn kursojn, tamen la nombro da novbakitaj samideanoj estis konsiderinda. Iu el tiuj novaj E-lernantoj memoras la komenciĝon de tiu kurso, kiun li priskribas tiel:

La unua klaso de la kurso havis ian solenan karakteron. Krom la lernantaro, sufiĉe multenombra, estis tie kelkaj elstaraj personoj de la urba kaj regiona esperantistaro. Antaŭe mi estis koninta preskaŭ neniun el tiuj personoj; nur poste mi sciis

*la rolon kiun ili ludis en la disvastigado de Esperanto en Asturio. Ekzemple, estis tie Alberto Menéndez, kiu, kvankam li jam ne plu dediĉiĝis al la Esperanta instruado, tamen li plurfoje vizitadis nin dum la kurso. Estis ankaŭ la fratoj González Meana, Alcibiades kaj Adonis. La unua ne loĝadis en Gijón kaj ne estis membro de la E-grupo de tiu-ĉi urbo, sed tamen estis li kiu gvidis la unua klason. Poste, la cetero el la kurso estis gvidita de Santiago Mulas. Laŭlonge de la kurso iom-post-iom la nombro da gelernantoj sufiĉe malpliĝis, tamen, proksimume deko da ili persistis ĝis la Kurso-fino kaj restis poste kiel membroj de la E-Grupo Jovellanos. En la landa kongreso de Esperanto, kiu okazis en **El Ferrol** en 1976 kelkaj el ni atingis la titolon de "kapabla esperantisto" en la ekzamenoj kiujn ni partoprenis tie.*

Menciindas tio ke la tiuepoka prospero de Esperanto en Gijón koincidis kun paralela dekadenco de la E-movado en la cetero el la Asturia regiono. Eble la kialo de tiu kontrasto estis la fakto ke tiam Gijón estis kreskiĝanta urbo de industria vidpunkto kaj de loĝantaro.

La plivigliĝo de la urba esperantistaro permesis entrepreni la reorganizon de la E-grupo kun elekto de nova komitato kaj normala organiza funkciado dum la sekvintaj jaroj.



En la aktlibro de la Grupo Esperantista Jovellanos, post la kunsido de la 17a de februaro de la jaro 1969, en kiu oni analizis la rezulton de la kurso gvidita de Santiago Mulas kaj oni bedaŭris ke ne estis favora respondo de la gelernantoj de la antaŭaj kursoj, al kiuj oni alvokis per speciale presita salutkarto, ne estas aliaj aktoj ĝis la 29a de septembro de la jaro 1976. Estas, do, iu silento de pli ol 7 jaroj kaj duono pri la vivo de la esperantista grupo. La nova akto, kaj tiuj sekvantaj, ne plu estas subskribataj de J. Ordieres sed de nova Sekretario, Faustino Castaño, kaj kiel Prezidanto subskribas nun Santiago Mulas. Iamaniere, en la teksto de tiu akto de septembro 1976 oni intencas resumi la historion de la E-grupo dum la antaŭaj sep jaroj. Sed, indas ke ni transskribu ĉi tie la tutan akton tial ke estas en ĝi plia interesa informo. Ĝi tekstas tiele:

Ekde la lasta akto de la 17a de februaro–1969, la Grupo de Esperanto travivis periodon en kiu eĉ se la agado iome malpliĝis, tamen ĝi ne tute interrompiĝis. Oni povas resumi la historion de la Grupo dum tiuj jaroj jene:

En la jaro 1970 S-ro Santiago Mulas definitive anstataŭis Alberton Menendez-n kiel instruisto de la kursoj de Esperanto. Oni faras kelkajn kursojn kun mez-nombra ĉeestantaro; oni partoprenis en la landaj E-kongresoj kaj oni organizis en la Ateneo de Gijón kunvenojn de la esperantistoj de Asturio, samkiel iu ekspozicio de almanakoj.

Speciale multenombra estis la ĉeestantaro de la kurso 1975-1976 kiu estis komencita de pli ol 60 gelernantoj, el kiuj finis ĝin deko da ili. Je la fino de tiu kurso oni reorganizis la estraron de la Grupo, kiu restis tiele:

*Prezidanto: Santiago Mulas Gallego
 Direktoro: Adonis González Meana
 Sekretario: Faustino Castaño Vallina
 Kasisto: Quiterio G. Ballesteros
 Bibliotekistino: María Nieves García
 Voĉdonantoj: José Ordieres Dacosta,
 Vicente González,
 Heriberto Coto,
 Marina Piquero*

Decidinte poste la eldonadon de iu malgranda esperantista gazeto, dumonata, titolita Heleco, el kiu jam estas publikigita la unua numero.

Oni decidis ankaŭ la partoprenon de gijona ĉeestantaro en la 36^a Hispana Kongreso de Esperanto, en El Ferrol. Oni akordis ankaŭ la realigadon de nova E-kurso, tiu de 1976-1977 kies komenciĝon oni antaŭkalkulas por la venonta 4a de oktobro, kaj alia regiona kunveno de la asturaj geesperantistoj, okazonta venontan 24an de oktobro.

Rimarkindas ke la nova estraro de la Grupo, supre transskribita respegulas la kvar diversajn devenojn de la asocia membraro. Estas en ĝi homoj kiel Santiago kaj Ordieres, kiuj reprezentas la antaŭan etapon de la urba esperantismo. Marina Piquero apartenas al la aro da geesperantistoj kiuj aldoniĝis al nia movado sekve de la E-kursoj kiujn gvidis dum tiuj jaroj Santiago Mulas ene kaj for de la Ateneo. Alia deveno estas reprezentata de Adonis G. Meana en la komitato. La nomo de tiu samideano aperis jam kelkfoje en nia historio sed kiel membro de la E-Grupo **La Verda Kolombejo** de El Entrego. De nun li aperos multfoje en nia historia raporto sed jam kiel membro kaj Subprezidanto de nia gijona E-grupo. Okazas ke tiam jam ne plu ekzistis **La Verda Kolombejo** ĉar ties membraro translokiĝis al aliaj urboj pro labor-kialoj; grandparto el ili venis al nia urbo kaj membris de tiam en la **Esperantista Grupo Jovellanos**. La kvin ceteraj membroj de la grupa estraro devenas el la ĉeestantaro de la E-kurso 1975-76. Kompreneble, el ĉiuj kvar devenoj de la estraranoj estis en la grupo pliaj membroj, kies nomoj kaj agado estos menciataj laŭlonge de la cetero de nia historio.

Menciindas ankaŭ tio ke kiam nia grupo volis krei gazetan presorganon oni ne reprenis la nomon **Ŝpruci**, de la antaŭa etapo de la grupo, sed **Heleco**, kiun jam uzis iam **La Verda Kolombejo**.

Do, ni vidas ke tiam estis transira etapo en nia grupo esperantista de Gijón, sed la transira situacio daŭris ĝis la fino de la periodo, kiam nia esperantista rondo ŝanĝis sian leĝan staton kaj reakiris la antikvan nomon **Astura Esperanta Asocio**.

Sed tiun ŝanĝon ni pritemos kiam nia rakontado alvenos al tiu momento. Nun ni nur aldonu ke la transireco de la epoko rilatis ankaŭ al aliaj aferoj for de la esperantista tereno: malmultajn tagojn post la komenciĝo de la menciita kurso 1975-1976 forpasis la hispana ŝtatestro F. Franko, kiu gvidis la landon diktatorece ekde la civil-milito 1936-1939. Ĝuste “transireco” estis la nomo kiun ricevis la periodo de tiuj jaroj pasintaj ekde la malapero de la diktatoro ĝis la plena restarigo de la demokratio en Hispanio.

En julio de 1976 okazis en El Ferrol la **36a Hispana Kongreso de Esperanto**. Partoprenis en ĝi sufiĉe granda nombro da geesperantistoj de Gijón. Iris la Prezidanto, Santiago Mulas, kaj iuj el la antikvaj membroj de la Grupo. Sed, ĉefe, ĉeestis la kongreson grandparto el la gelernantoj kiuj finis la kurson 1975-1976. Ĉi tiuj partoprenis en la ekzamenoj pri Esperanto, kiuj normale okazas en la kongresoj, kaj atingis la oficialan titolon de “kapabla esperantisto” kiun liveras **Hispana Esperanto-Federacio**.



La atesto de Ildelfonso Domínguez

La unua scio kiun mi havis pri Esperanto estis dum mia infana aĝo, kiam mia kara patro parolis pri la afero kun unu el siaj amikoj. Ambaŭ laŭdis la ideon de internacia lingvo por interkompreniĝo de homoj de malsamaj kulturoj kaj lingvoj. Jam matura, en ĉirkaŭ 1960 iu el miaj laboraj kunuloj aŭtodidakto pri Esperanto, informis min pri la lingvo, pri la facileco lerni la verbojn, pri la maniero formi en Esperanto novajn vortojn uzante prefiksojn aŭ subfiksojn... Post pluaj 3 aŭ 4 jaroj, en ekspozicio en Ateneo Jovellanos, mi eksciis pri proksima komenciĝo de kurso de Esperanto. Mi aliĝis al la kurso kaj de tiam startis mia travivaĵo en la E-mondo. Je la fino de tiu unua kurso nur restis du homoj, unu el ili, mi. Post tiu komenco, mi partoprenis almenaŭ kromajn du kursojn. La gvidanto estis ĉiam S-ro. Santiago Mulas.

Mi leterkorespondis kun eksterlandaj geesperantistoj, kio utilis al mi por ne forgesi tion lernintan, pliperfektigi mian lingvo-konon kaj informiĝi pri eksterlandaj aferoj. Mi aniĝis al la **Grupo Esperantista Jovellanos**. Iam mi proponis al la estraranoj de la grupo la eldonon de esperantista gazeto. La ideo havis bonan akcepton kaj ekde 1976 ĝis nuntempe la gazeto daŭre aperas kun la nomo **HELECO**. Ĝi spertis diversajn ŝanĝojn laŭlonge de la jaroj por adaptiĝi pli taŭge al la bezonaĵoj de la legontoj kaj ankaŭ al la ekonomia situacio de la grupo. Komence, la gazeto aperis dumonate kaj ĝia ellaborado estis kvazaŭ artefarita, maŝinskribita je unu nura flanko kaj enhavanta nur 9 aŭ 10 paĝojn. Dum longa tempo-periodo estis mi kiu okupiĝis pri la kunordiĝo de la gazeto: aranĝo de informoj, tajpado, desegnado kaj lanĉado.

Mi partoprenis tri Hispanajn E-Kongresojn: Sabadell (Julio 1977), Gijón (Julio 1979) kaj Zaragoza (Julio 1983), samkiel la duan Asturan E-Kongreson, okazinta en Gijón, en kiu eblis al mi konversacii kun eksterlandanoj.

Dum la Hispana E-Kongreso de Gijón, oni inaŭguris straton nomata “Esperanto”. La unua strat-plato kiu montris tiun nomon en unu el ĝiaj anguloj, estis desegnita de mi. Estas verkoj miaj ankaŭ aliaj desegnaĵoj: la nuna logotipo de la grupo, stampiloj anoncantaj niajn kongresojn, skizo por speciala poŝmarko-stampilo por uzi dum nia landa Kongreso, kaj plejmultaj el tiuj aperintaj en la gazeto por ornami raportoj. Aliaj priesperantaj taskoj miaj estis la kompilado de asturaj kanzonoj tradukitaj de Alcibiades G. Meana, teatraĵo verkita de Tadeusz Rostanski pri la vivo de Zamenhof, kaj “Cuñataí Porá” (“Bela Knabino”), verkita de “Katalin” (Rafael Díaz Morilla). El ambaŭ verkoj estis eldonitaj broŝuroj, kiel suplementoj de **HELECO**.

Cetere, kaj kiel aktivulo de la gijona E-grupo, mi kunlaboris kun ceteraj grupanoj en la taskoj de tiu rondo: deĵori en stando en Astura Montrofoiro kaj de la t.n. “Foiro de la lingvoj”, por informi pri Esperanto al la publiko. Fine, mi povas menci i alitipan E-verkadon mian: kunlaboraĵoj en Avilés-a gazeto “Antaŭen” kaj en “Boletín” de filatela societo pri Esperanta filatela temaro.

En la oficiala malfermo de tiu kongreso tiuj novaj geesperantistoj de Gijón havis ian protagonismon. Ili, en tiu publika akto, per la transdono al Santiago Mulas de iu donaceto, omaĝis al la instruisto kiu incis ilin pri la Internacia Lingvo.

La 24an de oktobro de tiu jaro okazis en la ejo de nia E-Grupo la renkontiĝo de la esperantistoj de Asturio. Ĉeestis pli ol 50 personoj. En ĝi oni proponis kaj aprobis la ideon de iu tut-regiona esperantista asocio. Oni elektis delegitojn por la organizado de la afero en diversaj asturaj lokoj kie estis esperantistoj, sed en la realo rezultis nenio el tiu plano. Plejparto el la ĉeestantoj el aliaj lokoj ekster Gijón estis maljunaj personoj kaj fakte la esperantismo malaperadis en iliaj loĝlokoj kiam ili forpasis laŭlonge de la sekvaj jaroj.

La 1an de marto de 1977 la estraro de la grupo kunsidis denove por pritemi kelkajn aferojn. Pri tiu kunveno ni disponas je du aktaj tekstoj aŭ raportoj, ambaŭ verkitaj de la sekretario. La unua estas la serioza versio, ĝi estas la teksto kiu aperas en la aktlibro; ĝi estas teda, malvarma, serioza,

oficiala... kiel ĉiuj aktlibraj raportoj, la dua estis speciale verkita por ties publikigo en la dua numero de **Heleco**. Ĝia teksto estas pli libera aŭ pli ĝuste, sprita, bonhumora... Paradoxse, la dua respegulas pli bone ol la unua la etoson kaj la intervenojn de la kunsido. La legantoj de la retpaĝo de nia **Astura Esperanta Asocio** povos ĝui tiun tekston kiam la kompleta kolekto de **Heleco** estos metita en la interreton.

Nun, pri tiu kunsido ni diru ke en ĝi oni elektis novan estraron de la Grupo Esperantista Jovellanos.

Verdire, tiu komitato restis tia kia ĝi estis antaŭe sed kun la aldono de tri novaj voĉdonantoj: Antonio Román Cantón, Julio Argüelles García kaj Ildefonso Domínguez Losada. Julio Argüelles estis antikva membro de la Grupo; li esperantiĝis, same kiel Santiago Mulas, jam en la kurso 1958-1959, gvidita

de Alberto Menéndez. La du ceteraj esperantiĝis en kursoj poste gviditaj de S. Mulas.

Ildefonso Domínguez dediĉiĝis poste, dum multaj jaroj, al la ellaborado de la revuo **Heleco** (la unua numero estis ellaborita de Vicente González). **Heleco** komence estis nur ok-paĝa broŝureto; poste, subkontrolde de Ildefonso ĝi iompostiom pligrandiĝis kaj pliboniĝis.

Estis multaj novaj gelernantoj en la E-kruso 1977-1978. Kelkaj membroj de la E-grupo planis partopreni en la Universala E-kongreso de 1978 en Varna (Bulgario). Por kontribui al la pago de la vojaĝo, la grupo decidis fari lotadon de Kristnaska korb; simila lotado estis farita la antaŭan jaron.

La 7an de aprilo de 1978 estis Ĝenerala Asembleo de la membraro de la E-grupo por pritemi la formon disdoni la monhelpon de la E-grupo al la membroj kiu ĉeestos la E-kongreson en Bulgario. Sed komence la Prezidanto informis ke la estraro de la **Ateneo Jovellanos** komunikis al li ke la esperantista grupo estas akceptata de la **Katedro Jovellanos pri Universitata Disvastigo** kaj ke pro tio oni asignos al ni iun ejon en la plejsupera etaĝo de la konstruaĵo.

Dum tiuj jaroj: 1977, 1978, 1979... la Grupo de Esperanto normale funkciadis; estis kursoj, la estraro kelkfoje kunsidis por la normalaj aferoj de la organizaĵo kaj eĉ estis plurfoje kunvokita la ĝenerala asembleo de la membraro por preni iujn decidojn, oni sendis notojn al la presaro informante pri nia agado... Sed estas ĉefe menciinda la fakto ke

eĉ la membroj de la grupo kiuj ne partoprenadis la kursojn, regule vizitadis la ejon de la grupo por praktiki la lingvon kaj helpi se necese. Por mezuri la bonan sanon de iu esperantista rondo utilas ne nur la E-kursoj kiujn ĝi organizas kaj la nombro de ties partoprenantoj sed ankaŭ la ofta partopreno de la membraro de la asocio en ĉi ties taskoj. Tiurilate, en tiu epoko la sano de la **Grupo Esperantista Jovellanos** estis tre bona.

En kunsido de la estraro, la 4an de julio 1978 oni decidis proponi kiel kandidato de Asturias al la estraro de **HEF**, samideanon el nia grupo, Adonis G. Meana.

Ne malpli ol 7 membroj de nia esperantista grupo de Gijón partoprenis en la Universala Kongreso de Esperanto en Varna, kiu, cetere, estis tre grava kaj sukcesa. En kunsido de la grupo, la 7an de sep-

tembro, oni informis pri tiu esperantista

evento en Bulgario. Ĉeestis ĝin la Prezidanto S. Mulas, la Vicprezidanto Adonis G. Meana kaj aliaj gesamideanoj. En tiu sama kunveno oni decidis proponi al la Asembleo de **HEF** ke Gijón estu la sidejo de la **Hispana Kongreso de Esperanto** de la jaro 1979.

Ekde julio de la jaro 1976 ĝis oktobro de 1979 estis eldonitaj ne malpli ol 9 numeroj de **Heleco**. Kiel informo-fonto por nia historio, ekde tiu epoko ni disponas ankaŭ de tiu revueto, kiu, kvankam ĝia celo ne estis raporti nur pri la agado de la grupo sed pritrakti ĉiun ajn temon, tamen ĝi utilas ankaŭ por trasekvi la spurojn de la vivo de la E-grupo. Krome, estas ankaŭ la viva memoro de tiuj ni, kiuj jam travivis tiun epokon de la esperantista rondo. En oktobro de la jaro 1978 komenciĝis en nia sidejo du kursoj de Esperanto: unu **Baza Kurso** gvidata de Santiago Mulas kaj alia **Progresiga Kurso**, gvidata de Adonis González Meana, por tiuj gelernantoj de antaŭaj bazaj kursoj, iuj el kiuj jam posedis la titolon de Kapabla Esperantisto.

La **38a Hispana Kongreso de Esperanto** de tiu jaro 1978 okazis, en dato pli malfrua ol kutime, en la urbo Leono. El nia urbo partoprenis en tiu kongreso sufiĉe granda nombro da gesamideanoj. En la tiea kaj tiama Ĝenerala Asembleo de **HEF**, La Prezidanto de la grupo Jovellanos, Santiago Mulas, proponis la urbon Gijón kiel sidejo de la sekva landa E-Kongreso. La Asembleo aprobis tiun proponon, do, nia E-grupo pretiĝis por organizi tiun gravan esperantistan eventon.



Kurso 1978-1979

En Asembleo de la E-grupo, de dato 28a de oktobro, oni decidis ke la 39a Hispana E-Kongreso okazu de la 21a al la 26a de julio 1979. Oni komencis plani la organizadon de la Kongreso; estis deciditaj tiam kelkaj kongresaj programeroj: inaŭguro de unu strato en la urbo kun la nomo **Esperanto**, kongresa ekskuso al Kovadongo, iu akademia akto en la Universitato de Oviedo... Krom tio, oni decidis kelkajn tujajn demarŝojn, kiel vizito al kelkaj urbaj kaj provincaj aŭtoritatoj, kaj oni pristudis la eblecon eldoni kelkajn poŝkartojn de la urbo kun la emblemo de la kongreso.

La lasta dispo de tiu kunsido estis kunvoki ĉiujn geesperantistojn de la Grupo por ĉeesti la kunsidojn, kiuj okazos ĉiuĵaŭde por kontroli la organizadon de la kongreso, disponi taskojn, asigni respondecojn kaj analizi la faritajn laboraĵojn. Tiu dispo estis poste akurate plenumita. Okazis tiaj kunvenoj la 2an, la 9an kaj la 16an de novembro. En ili oni decidis, interalie, sendi al diversaj Esperanto-revuojn publikigendan noton petante fotojn de esperantistaj grupoj por ekspozicio kiun oni prezentos dum la kongreso. La vizito al la provincaj aŭtoritatoj estis prokrastita ĝis kiam oni klarigu la politikajn funkciojn de la aŭtonomia ento kiu estis formiĝanta tiam. En la kunsido de la 9a de novembro oni decidis ke la Loka Kongresa Organiza Komitato estu la sama estraro de la E-Grupo kun la sola escepto ke la funkcio de kasisto estu plenumata de Pilar Alonso Moro.

En tiu sama kunveno oni traktis aferon kiu ne rilatis al la organizado de la Kongreso: Ordieres komunikis ke li estis interparolante kun la Prezidanto de la **Katedro Jovellanos** kaj ke ĉi tiu esprimis egan surprizon kaj dubon pri la aparteno de nia E-Grupo al la Katedro, kaj ke, ĉiukaze, tiu aparteno estus nekongruebla kun la aparteno al la **Ateneo**. La ĉeestantoj en la kunveno decidis ke oni pristudu ĝisfunde tiun aferon kaj oni klarigu la situacion de la **Grupo de Esperanto** tiurilate.

Pludaŭre okazadis la ĉiuĵaŭdaj kunsidoj por la kongresa organizado. Santiago kaj Adonis okupiĝis pri la vizitoj al la aŭtoritatuloj. Ili informis ke la provinca Guberniestro ne povis ricevi ilin sed li delegis por tiu funkcio en la urbestro de Gijón. Ĉi tiu informis ke ni disponas je oficiala permeso por la okazigo de la Kongreso, sed ke la Guberniestro ne povos okupiĝi pri tiu afero ĝis post la balotado de sekvonta 1a de marto por elekti la landajn par-

lamentanojn. Julio Argüelles okupiĝis pri la demarŝoj por la luado de aŭtobusoj por la ekskurso kaj ankaŭ pri la serĉado de loĝejoj por la gekongresanoj. Dume oni estis ricevante fotojn de esperantistaj grupoj por la ekspozicio. En la Ŝparkaso estis kreita bankkonto por la kongresa spezado **POLA ESPERANTO-TEATRO** oferis sian spektaklon por la kongreso sed pro la troa kosto de la vojaĝo de ĉiuj membroj de la teatra teamo, la Organiza Komitato disponis kontrakti spektaklon de tiu grupo en kiu intervenas nur du personoj.

En kunsido de la 6a de februaro oni decidis ke de tiam la kunvenoj de Organiza Komitato okazu ne unufoje en la semajno sed dufoje: ĉiumarde kaj ĉiuĵaŭde. En la sama kunsido oni decidis la publikigon de la tria numero de **HELECO**.

De tiam, kaj ĝis monato junio, la Organiza Kongresa Komitato kunsidis dufoje ĉiusemajne kaj en iuj okazoj eĉ trifoje. Ekde la 20a de junio, fakte, la kunsidoj estis preskaŭ ĉiutagaj. Por la loĝado de la kongresanoj oni adoptis duoblan solvon: unuflanke, la Rektoro de la Labora Universitato oferis ke

en tiu centro povus gastigi ĝis 300 personoj. Aliflanke, por la kongresanoj kiuj dezirus hotelon aŭ alitipan gastejon, ni transpasis tiun demarŝadon al iu vojaĝagentejo. La Asturia Ŝparkaso koncesiiis monan subvencion kiel helpo por la kongreso. Aliaj bankoj, al kiuj oni

mendis similan monhelpon, sentis kaj montris nenian intereson pri la afero. Tiurilate ni transkribas, el la akto de la kunsido de 20a de junio, la parton kiu pritemas tion:

Oni sendis leteron al ĉiu banko kun oficejoj en nia urbo mendante tiun monhelpon samtempe ke oni salutis al ties direktorojn kaj oni invitis ilin al la solena Malfermo de la Kongreso. Tial ke oni ricevis eĉ ne unu sola respondo, iu komisiono de la Organiza Komitato faris viziton al la ĉefaj bankoj por taksi la eblecon ricevi tian monhelpon, ricevante negativan impreson pri tiu ebleco. En iuj lokoj ŝajne oni ne sciis ĉu ili ricevis aŭ ne nian leteron, kaj aliaj konfesis esti ricevintaj ĝin sed laŭŝajne ili ne ĝin legis. Tiuj kiuj, jes ja, estis leginte ĝin, sin montris malmulte pretaj koncesii iun ajn helpon. En iu el tiuj bankoj, la vizitanta komisiono esprimis la eblecon ke iu el la kongresaj aktoj, kiun la Banka Konsorcio povus financi estus la inaŭguro de monumento al D-ro Zamenhof, aŭtoro de Esperanto. La bankestro respondis ke tiukaze eblus atingi tiun finan-



cadon kondiĉe ke en la monumento, en ties dediĉ-tabulo aŭ en alia videbla loko, estu ia gravurita enskribo informante ke tiu monumento estis starigita dank' al la helpo de la Banka Konsorcio kun sidejo en Gijón. Tial ke tiu propono okazigis interkontraŭantajn opiniojn en la sino de la Organiza Komitato, oni kunvokis oficialan kunsidon de ĉiuj membroj de la Komitato por pridiskuti ekskluzive tiun aferon. La malkonsento kiun iuj membroj de la komitato esprimis pri tiu plano de la monumento estis je du tipoj: Unuflanke oni taksis ke ia monhelpo centrita ekskluzive sur la starigo de la monumento ne respondis al la realaj necesoj de la organizado de la Kongreso ĉar oni bezonas efektivan monon por aliaj kongresaj programeroj, kaj la antaŭkalkulata kosto de la monumento (250.000 pesetoj) multe preterpasis kaj kontrastis kun la monkvanto kiun oni povus dediĉi al aliaj pli interesaj aktoj de la Kongreso. Aliflanke, oni esprimis rezervojn je etika kaj morala karaktero al tio ke monumento dediĉita al la aŭtoro de la Internacia Lingvo povus utili kiel porĉiama propagando de la bankoj. Pro ĉio-ĉi, la plenkomitato decidis respondi al la ĉefaj bankoj mendante helpon senkompromise dediĉi ĝin al monumento, kaj kaze je starigo de tiu monumento senkompromise de la propagando kiun ili metis kiel kondiĉo. Tial ke ankaŭ ne estis respondo pri tiu afero, oni decidis tute forlasi ĝin.

Sed estis aliaj institucioj pli malavaraĵoj. La urbestro de Gijón promesis financi "espiĉon" por la kongresanaro, kun spektaklo de folkloraj dancoj. Tiun promeson faris la antaŭa urbestrara korporacio, do post la balotado de la 3a de aprilo estis necese konsulti la novelektitan korporacion, kiu konfirmis la promeson. La Universitata Katedro Jovellanos, al kiu tiam nia E-grupo jam apartenis plenaryte kontribuis permesante al ni la uzadon de sia konstruaĵo kiel sidejo de la Kongreso: la granda salono por la solenaj aktoj de Malfermo kaj Fermo de la Kongreso kaj kelkaj aŭloj por prelegoj, kunsidoj kaj ceteraj kongresaj sesioj. La Rektoro de la Universitato de Oviedo konsentis la celebradon de akademia akto en la ejoj de tiu institucio, kaj la Urbestro de tiu urbo akceptis ricevi, la saman tagon, la kongresanaron en la Urbodomo.

Unu monaton antaŭ la kongreso estis aliĝintaj 253 personoj, inter ili kelkaj eksterlandanoj. Kun **POLA ESPERANTO-TEATRO** oni interakordis ke du geaktoroj de tiu grupo ludos ĉe nia kongreso la teatran verkon **La Hipnoto**. La Ĝenerala Direktoro de la Poŝtservo konsentis ke dum tri el la tagoj de la Kongreso (la 18an, la 19an kaj 20an de julio) estu speciala afrank-stampilo en la kongresejo.

La reĝa Domo akceptis ke estu Prezidento de la Honora Komitato de la Kongreso Lia KronPrinca Moŝto Filipino de Borbono (Princo de Asturio). Aliaj membroj de tiu Honor-Komitato estis la Provinca Guberniestro, la Militista Guberniestro, la Ĉefepiskopo de la Diocezo, la Urbestroj de Gijón kaj Oviedo, la Rektoroj de la Universitato de Oviedo kaj de la Labora Universitato de Gijón, La Prezidento de la Katedro Jovellanos... kaj kromaj

kelkaj gravaj personoj. Verdire, la kompono kaj la ekzisto mem de tiuj Honoraj Komitatoj estas nura protokolaĵo sen ia ajn efiko sur la Kongreso mem. Fakte, neniu aŭ preskaŭ neniu el ili ĉeestas eĉ se nur la solenajn kongresajn sesiojn.

Por la solena Malfermo de la Kongreso oni sendis invititon al aliaj aŭtoritatuloj, prezidantoj de kulturaj societoj, direktoroj de inform-medioj, de la Komerca Foiro, de la Asturia Enciklopedio, de la Asturia Centro de Havano...

La emblemo de la Kongreso, elektita de la Organiza Komitato, estis foto de la korto de la Labora Universitato tra la ĉefa portiko. La sama desegno estis



Filipo de Borbono, Princo de Asturio, prezidis la Honoran Komitaton de la Hispana Kongreso de Esperanto de la jaro 1979 en Gijón.

uzita por la speciala poŝtmark-stampilo.

Kiel propagando de la Kongreso, **Boletín de HEF** publikigis iun artikolon verkitan de Alcibiades G. Meana. Por publike diskonigi la programon de la Kongreso estis kunvokita, la 19an de junio, gazetara konferenco al kiu oni invitis ĉiujn inform-mediojn, sed partoprenis en ĝi nur **Radio-Oviedo** kaj la ĵurnalo **El Comercio** de Gijón. La unua dissendis intervjuon kiun ili faris al la Prezidanto Santiago Mulas, kaj la ĵurnalo publikigis artikolon kun la programo de la Kongreso kune kun foto-grafaĵo de la Loka Organiza Komitato. Oni povas vidi tiun foton sur la sekva paĝo. Por la rilatoj kun la presaro, koncerne al la kongreso kaj al la E-Grupo ĝenerale, la Komitato nomumis iun Responsulon pri Informado; por tiu tasko estis elektita samideano Sacramento Collado.



Loka Organiza Komitato de la 39a Hispana Kongreso de Esperanto. De dekstre al maldekstre: Antonio Román Cantón, Julio Argüelles, Sacramento Collado, Ildefonso Domínguez, Santiago Mulas Gallego, Faustino Castaño, Adonis G. Meana, José Ordieres Dacosta kaj Luis Muñiz.

Krom la organizado de la Kongreso, la E-Grupo ne malatentis pri siaj normalaj taskoj. Normale daŭris kaj finiĝis la kurso 1978-1979. Ankaŭ disvolviĝis normale la editado de la revuo **HELECO**; antaŭ la Kongreso aperis 8 numeroj.

Meze de monato marto vizitis nian Grupon de Esperanto iu germana esperantisto, Uwe Joachim Moritz, kiu estis redaktoro kaj eldonanto de iu esperantlingva revuo *Etnismo*, kiu temas pri la problemaro de la etnaj minoritatoj. Li estis dum kelkaj semajnoj en Asturio, kaj pri etniaj aferoj de nia regiono li amplekse publikigis poste en iu numero de lia revuo. En la ejo de nia E-Grupo li faris prelegon en Esperanto, kun projekciado de diapozitivaj, pri lia germana regiono. Nia grupo organizis konferencon lian en la Asturia Centro de Havano, en la hispana lingvo, temante pri Esperanto. En monato junio nia E-Grupo ricevis alian viziton de fremda esperantisto, ĉi foje japana, kiu tiujare loĝadis en Barcelono, kie li estis verkante libron pri la hispana civil-milito. Tiu samideano, Hirai Jukio, faris alian prelegon en la ejo de nia Grupo, ankaŭ li kun projekciado de diapozitivaj, pri lia lando kaj Sud-Koreujo, ĉio en rilato kun la esperantista movado. La eksplikado de la diapozitivaj farita en tre fajna Esperanto, estis sekvita kaj komprenita de ĉiuj gijonaj gesperantistoj, eĉ de tiuj kiuj partoprenis en la tiujare finiĝantan kurson.

Dum la lasta monato antaŭ la kongreso, la organiza laboro daŭris eĉ pli intense ol ĝis tiam, kunvenante la Komitato preskaŭ ĉiutage. Oni faris grandajn afiŝojn por publika anoncado de la Kongreso.

Por kontroli la faritan laboron vizitis nian Grupon, la 23an de junio, la Prezidantino de **Hispana Esperanto-Federacio**, Rafaela Urueña kaj ties edzo, la Sekretario de tiu Federacio.

Rezultis sukcesaj la demarŝoj faritaj por ke la urbestro konsentu pri la asigno de iu strato kun la nomo **Esperanto**. Oni demarŝadis ankaŭ por disponi dum la kongreso je la arta ludado de la Gijona Polifonia Koruso kaj la Grupo de Ĥoroj kaj Dancoj. Postulis aktivan demaŝadon ankaŭ la afero de la kongresa ekskurso, la lokoj vizitotaj dum tiu ekskurso...

Alcibiades González Meana realigis iun adaptigon de la Asturia Himno al Esperanto por esti kantata en Kovadongo, far de la tiea Koruso, dum la meso en Esperanto okazonta tie la tagon de la ekskurso. Tiu traduko aŭ adaptigo de la Asturia Himno al Esperanto estas videbla en nia interreta paĝo, kune kun aliaj tri faritaj de aliaj personoj; ni memoru ke unu el ili estis verkita, antaŭ multajn jarojn, de samideano Alfredo Villa.

La lastajn tagojn antaŭ la Kongreso estis de intensa laborado por la membroj de la E-Grupo kaj ĉefe por la Loka Organiza Komitato. Preparado kaj enkovertigo de la kongresa dokumentaro, solvi problemojn pri la gastado de la kongresanaro...

Dimanĉe, la 15an de julio, antaŭtago de la komenciĝo de la Kongreso, komencis alveni al la urbo kelkaj gekongresanoj, inter ili la pola geparo kontraktita por ludi dum la Kongreso la teatran verkon titolitan "La hipnoto".

La 39a Hispana E-Kongreso estis preta komenciĝi.



39-A HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO GIJON 16-21 Julio 1979



En Hispanio, la Kongresoj de Esperanto estas el du tipoj. Estas, unue, la modestaj, tritagaj kongresoj, ĝenerale okazantaj dum semajfino, aŭ profitante iun festotagon proksime al dimanĉo. En tiaj kongresoj malabundas la distraj, amuzaj, folkloraj kaj ekskursaj programeroj; en ili estas preskaŭ nur labor-sesioj, kiel eble plej limigitaj. Kadre de ili okazas la nepraj kunsidoj kiel la ĝenerala asembleo de HEF k.s. Krome estas ankaŭ la longaj kongresoj, kun daŭro je proksimume unu semajno. Ĉi lastaj havas ian karakteron sufiĉe turisman. Ne mankas en ili la laborsesioj, male, en ili la prelegoj, akademiaj aktoj kaj ĉiutipaj kunvenoj estas eĉ pli multenombraj ol en la tritagaj kongresoj, sed ĉefe abudas en ili la distraĵoj kaj spektakloj, bankedo, lunĉoj, tuttaga ekskurso... Laŭ tiu skemo, la 39a landa Kongreso, okazinta en Gijón de la 16a ĝis la 21a de julio 1979 apartenas al la dua grupo, al la turismaj kongresoj.


Sed komence ni devas rekonigi ke ne ĉio estis brila en la disvolviĝo de la esperantista renkontiĝo, kvankam ĝenerale la rezulto estis bona. La problemoj aperis jam en la unua kongrestago kiam kelkaj el la kongresanoj kiuj estis elektintaj gastoj en la **Labora Universitato** abomenis pri tiu loko kaj oni devis serĉi por ili, aŭ trovis ili mem, aliajn pli komfortajn gastejojn. Verdire, ne estis bona ideo proponi tiun lokon kiel loĝejo.

Sed esceptante tion, ĉio cetera rezultis sufiĉe bona en la Kongreso organizita de la gijonaj esperantistoj. Laŭlonge de la lundo, 16an de julio, oni disdonadis la kongresan dokumentaron al la samideanoj kiuj prezentiĝis en la kongresejo. Entute estis 340 aliĝintoj tamen multaj el ili ne ĉeestis la Kongreson. Vespere de tiu tago, krom ekfunkciigi la libroservon de **HEF**, ankaŭ estis inaŭgurita la esperantista ekspozicio. La ricevitaĵoj de esper-

antistaj grupoj en la mondo ne estis abundaj, do, por la ekspozicio, al tiu materialo estis aldonitaj publikigaĵoj en Esperanto, poŝtaj kovertoj de leteroj el ĉiuj landoj kaj poŝtkartoj interŝanĝitaj de geesperantistoj el la tuta mondo.

Je la 9a horo nokte okazis la "Interkona Vespero" en iu apudmara restoracio de la urbo. Partoprenis en tiu akto multaj gekongresanoj kaj estiĝis tie tre bona etoso.

Marde, la 17an de julio. Matene okazis la Solena Malfermo de la Kongreso en la teatr-salono de la kongresejo. Ĉeestis ĝin la Urbestro de Gijón, José Manuel Palacio, kaj aliaj provincaj aŭtoritatuloj. Santiago Mullas, Prezidanto de la Loka Organiza Komitato, esprimis sian bonvenon al ĉiuj kongresanoj, kaj rememorigis la forpasintajn asturajn samideanojn kiuj tiel elstare viglis en antaŭaj kongresoj. Poste salutis ankaŭ la reprezentantoj de la ĉeestantaj delegitaroj, kaj ankaŭ la eksterlandanoj: Angel Corral, el Argentino, S-ino Plamenka, el Bulgario, S-ro Fighiera, el Italio, S-ino Pieńkiewicz, el Pollando, S-ino Olga Almeida, el Portugalio, S-ino A. F. Sikorska kiel redaktorino de **HEROLDO de Esperanto**. Fine salutis ankaŭ la reprezentantoj de Fakaj Organizoj: **ILEI, HEFA, MEM, ILERA...** La plej longaj intervenoj estis tiuj de Ada Sikorska kaj de la peranto de **MEM (Mondpaca Esperantista Movado)**, Feliciano Oliván Guiu. Fermis la akton iu interveno de S-ino Rafaela Urueña, Prezidantino de **Hispana Esperanto-Federacio**. Ŝi eksplikis la signifon de la esperantistaj kongresoj, la celon de la Internacia Lingvo. Lerte, ŝi prezentis tre instruan temon pri la aĝo de la lingvoj, kaj substrekis ke Esperanto kun siaj 92 jaroj estis nur bebo. Fine, per afablaj vortoj, la Delegito de la Ministrejo pri Kulturo S-ro Barraco, deklaris inaŭgurita la Kongreson.



Posttagmeze okazis la kutima laborkunsido de la estraro de **HEF** kun la ceestantaj estraroj de la esperantistaj grupoj kaj delegitoj de **HEF**-sekcioj. Sekve estis iu prelego en Esperanto far de S-ro Llibert Puig Gandía, Prezidanto de **Centro Esperanto Sabadell**, anstataŭ la planita de de S-ro Juan Régulo Pérez ĉar ĉi tiu ne povis ĉeesti la Kongreson. La prelego titoliĝis “Esperanto kiel intergenta lingvo” kaj temis pri la problemaro de la etniaj minoritatoj kaj la rolo kiun Esperanto devos ludi en ties solvado. Llibert Puig disvolvis tre kompetente la temon pri la lingvoj de la homaj malplimulto, kiu rezultis tre interesa por la ĉeestanta esperantista publiko.

Merkrede, la 18an de julio, je la 10a horo matene komenciĝis la Fakaj Kunsidoj, t. e. kunvenoj de la diversaj sekcioj: **ILEI**, **HEFA**, **MEM** k.t.p. Tiu de **MEM** estis la unua Ĝenerala Asembleo de la Hispana Sekcio de **Mondpaca Esperantista Movado**. Sekve okazis la Oficiala Akcepto de la kongresanoj en la Urbodomo de Gijón fare de la Urbestro J. M. Palacio, kiu, per paroladeto, dankis la esperantistojn pro ilia vizito kaj deziris al ili sukcesan kongreson. Respondis al li elokvente la Prezidantino R. Urueña, kiu menciis la gastamecon de Gijón kaj la lokajn esperantistajn pionirojn.

Vespere la kongresanaro tanslokiĝis al la urbo-kvartalo “El Coto”, kie oni inaŭguris straton kun la nomo “**ESPERANTO**”. Je la 6a horo vespere oni faris la ekzamenon por la akiro de la oficiala titolo “kapabla esperantisto” de **HEF**. Partoprenis en tiu ekzameno grandparto el la gelernintaro de la lastaj kursoj de nia E-Grupo.

Je la 8a horo, en la teatrejo de la **Labora Universitato** okazis astur-folklora spektaklo de elektitaj tipaj dancoj kaj kanzonoj far de la **Gijona Polifonia Koruso** kaj de la **Grupo de Ĥoroj kaj Dancoj**. La festivalo atingis kompletan sukceson; estusiasmigis la geesperantistojn la fakto ke, je la fino, la Asturia himno estis fajne kantita en Es-

peranto far de ambaŭ artaj grupoj kune. El la kvar Esperantaj versioj ekzistantaj de tiu himno, en tiu okazo oni kantis la version de Alfredo Villa.

Ĵaŭde, la 19an de julio estis tago destinita al la kongresa ekskurso. Frumatene eliris tri aŭtobusoj destine al Kovadongo. Sed unue la ekskursista ekspedicio iris al Ribadesella kie la esperantistoj povis viziti la faman antikvan groton **Tito Bustillo**. Temas pri gravega kaverno kie la kongresanoj admiris miljarajn pentraĵojn iam faritajn de niaj praŭloj sur la ŝtonmuroj de tiuj kavernoj. El tie la kongresaj ekskursantoj iris al Kovadongo, grava historia loko de nia lando kiu jam altiris la intereson kaj la viziton de la partoprenintoj de antaŭaj kongresoj de Esperanto en Asturio.

Kvankam la vetero ne estis belsuna, tamen la tuttaga ekskurso estis agrabla. En la Baziliko de Kovadongo estis meso en Esperanto oficita de pastro Cortina kaj kun prediko de pastro Fuentes. Fine de la Diservo la “Infana Ĥoro” de la Baziliko kantis la himnon de Kovadongo en Esperanto, laŭ la traduko farita de samideano Alcibiades González Meana. Elirinte el tiu akto, oni faris la oficialan foton de la Kongreso, kiun ni prezentas sur la sekva paĝo. Indas menciigi ke en ĉiuj gravaj aktoj de la Kongreso oni abude fotis far de “Foto Angel”; ĉi tiu profesia fotisto, Angel,

estis esperantisto de nia urbo, partopreninto en iu el la kursoj kiujn gvidis Santiago Mulas dum la antaŭaj jaroj. Ĉiutage en la Kongresejo estis publike prezentitaj la fotoj faritaj la antaŭtagon por ke la kongresano akiru tiujn kiuj interesus al ili.

La ekskurso sekvis per la tanslokiĝo al Cangas de Onís, kie oni faris la tagmanĝadon, por eliri poste destine al Villaviciosa kie la kongresanaro vizitis la Cidro-farejon “El Gaiteru” kaj ties kelojn plenajn je cidro-tinoj. La fabrikestro afable invitis la geesperantistojn gustumi la bongustan trinkaĵon tie ellaboritan (cidro kaj ĉampano). Post unuhora ripozado en Villaviciosa, la ekskursantoj revenis al Gijón.



En la Solena Malfermo de la Kongreso





Vendrede, la 20an de julio, dum la mateno estis alia ekskurso, ĉi-foje al Oviedo, la Asturia ĉefurbo. Unue la esperantistoj vizitis, ekstere de la urbo, la preromanikajn artajn kaj historiajn monumentojn Sankta Maria de Naranko (jaroj 824a-850a) kaj la preĝejon de sama epoko Sankta Mikaelo de Lillo, ambaŭ konstruaĵoj sur la deklivo de monto Naranko. Post tiu vizitado al la monumentoj, la kongresanoj revenis al la urbo kaj estis akceptitaj en la Universitato de Oviedo, kie la **HEF**-Prezidantino Uruëña, Profesorino pri Internacia Juro en la Universitato de Valladolid, prelegis pri la temo “Esperanto kaj la Europaj Internaciaj Organismoj”, tre dokumentita prelego krome interesa kaj aktuala por la esperantistoj, kiun ŝi tre majstre kaj elokvente prezentis. Post tiu akademia akto, akceptis tie la gekongresanojn la Moŝta Rektoro de la Universitato de Oviedo S-ro Teodoro López Cuesta, kiu salutis la ilim, kiujn li difinis kiel “representantoj de praktika viva kulturo”, kaj bedaŭris ne povi, pro profesiaj devoj, akompani ilin longan tempon....

Post tiu prelego, la Prezidantino kaj kelkaj **HEF**-estraranoj estis tre amike akceptitaj de la Urbestro de Oviedo en la Urbodomo. Paralele al tiu vizito, la gekongresanoj promenis tra la urbo admirante la vidindaĵojn de Oviedo, precipe la katedralon.

Vespere de tiu tago, denove en la kongresejo en Gijón, okazis la Ĝenerala Asembleo de **Hispana Esperanto-Federacio**, kiun prezidis S-ino Uruëña. La Sekretario S-ro Hernández, post la legado de la akton de la antaŭa Kongreso en Leon, raportis

pri la agado de la lasta periodo kaj prezentis la financon situacion de **HEF**. Prezentis raporton ankaŭ kelkaj sekcioj de la Federacio. Post arde dabati la solvon de diversaj problemoj, oni aprobis jenajn du rezoluciojn de la Kongreso: Unua: Mendi al la Ministroj pri Kulturo kaj Edukado la enkondukon de la lernigo de Esperanto en la programojn de la Baza kaj Meza Instruado. La aprobo kaj sendo de tia oficiala peto estas kvazaŭ rita programero de ĉiu kongreso de Esperanto, kiun oni faras –senutile– de antaŭ multaj jaroj. La dua rezolucio estis mendi al la Asturia Ŝparkaso la finacadon de la konferenco de la **HEF**-Prezidantino. Fine de tiu ordinara asembleo, samideano Casquero proponis Madridon kiel kongresurbo por la sekva jaro, kio estis aprobita de la ĉeestantaro. Tuj sekve, kaj en la sama loko, okazis alia Asembleo, ĉi-foje Eksterordinara, de tiu Federacio por pridiskuti kaj aprobi la ŝanĝon de iuj statutaj artikoloj de la asocio.

La lasta programero de tiu tago okazis, nokte, en la restoracio “Bella Vista” (Bona Vidaĵo), la sama loko kie antaŭ kelkajn tagojn okazis la Interkona Vespero. Estis la Oficiala Bankedo de la Kongreso, kiu okazis en gaja kaj bonhumora etoso.

Dum la tagoj 18a, 19a kaj 20a funkciis en la kongresejo poŝt-afrankejo kun speciala afrankilo de la Kongreso. Krome, dum la tuta daŭro de la Kongreso estis en la kongresejo telefonaj budoj speciale dediĉitaj al la servo de la kongresanoj. Ankaŭ la libro-servo funkciis en la kongresejo dum ĉiuj kongrestagoj

La lasta tago de la Kongreso estis la sabato, 21a de julio. Matene la kongresanaro vizitis la Muzeon Jovellanos, kiu tiam troviĝis en Cimadevilla, en la naskiĝdomo de Jovellanos. La Direktoro de la centro, post afable akcepti la kongresanojn, faris, en la hispana lingvo, la prezentadon de la pentraĵoj kaj aliaj objektoj tie ekzistantaj. Iu samideano de nia E-grupo tradukadis esperanten tiun prezentadon ĉefe por la fremdaj kongresanoj kiuj ne konis la hispanan idiomon.

Je la 5a horo vespere de tiu tago estis en la salono de la kongresejo (Katedro Jovellanos) teatra spektaklo; la polaj geaktorj, Zbigniew Dobrzyński kaj ĉi ties edzino Kalina Pieńkiewicz, de **POLA ESPERANTISTA TEATRO**, ludis la teatr-verkon “La Hipnoto”. La teatr-ludado meritis la aprobon kaj la aplaŭdodon de la spektantoj.

Sekve, en la sama salono, okazis la Solena Fermo de la Kongreso. En tiu akto oni faris la liveradon de la diplomoj al tiuj geledantoj kiuj aprobis la ekzamenon pri Esperanto farita antaŭ kelkajn tagojn.

La Prezidantino Urueña, en sia fina interveno, resumis la plej gravajn atingojn de la Kongreso. Oni prezentis al la kongresanaro kaj ĉi tiu aprobis, jenajn rezoluciojn:

Unue: Peti de la “Asturia Ŝparkaso” ekonomian helpon por eldoni la prelegon “Esperanto kaj la Eŭropaj Internaciaj Organismoj” de la Prezidantino en la Universitato de Oviedo.

Due: Komisii la Lokan Kongresan Komitaton por ke, nome de la kongresanaro, ĝi insistu ĉe la Urbestro de Oviedo, por la inaŭguro de iu strato en tiu urbo kun la nomo “Esperanto”.

Trie: Rekomendi al ĉiuj hispanaj Esperanto-Grupoj intensigi siajn proprajn interrilatojn, kaj plifortigi tiujn al **HEF**.

Kvare: Agnoskante la rajton de ĉiu popolo uzi sian propran lingvon, intensigi la instruadon de Esperanto kiel plej taŭgan rimedon por la intergenta kompreniĝo.

Kvine: Komisii la **HEF**-estraron por ke ĝi faru sian eblon por revivigi la Junularan **HEF**-Sekcion.

Sese: Akcepti la proponon de Madrida Esperanto-Liceo organizi la venontjaran kongreson en Madrido.


La lasta programero de la Kongreso estis la “Espicho--Vespermanĝo, regiona speciala manĝeto kun multe da cidro, kiu okazis en la etniisma muzeo “Pueblo de Asturias” (“Astura Vilaĝo”). Tiu akto estis financita de la Urbestro de Gijón. Dum la vespermanĝado dancis por la kongresanaro iuj folkloraj grupoj de la urbo.

La resumo de ĉi tiu E-Kongreso kun sidejo en nia urbo kaj organizita de nia esperantista grupo estas ke ĝi rezultis sufiĉe brila kaj bone organizita, sen pliaj incidentoj ol tiu de la loĝado en la Labora Universitato. Ne ĉiuj enloĝintoj en tiu loko ŝanĝis la gastojn, kaj por tiuj, kiuj restis tie, dum la kongresaj tagoj funkciis specialaj aŭtobusoj.

Alia rimarkinda afero estis tiu de la loka presaro. En la unua tago de la kongreso estis presara intervjuo al la Prezidanto Santiago Mulas, kaj el iu radio-stacio estis telefonalvoko por peti informon pri la kongreso. Ĉar tiumomente ne troviĝis tie la Prezidanto, informis al ili la Sekretario. Nia Grupo ricevis, post la kongreso, la ekonomian helpon donacitan de la **Provinca Deputitejo**.



En la kongresa bankedo



Polaj geaktorj teatr-ludante “La hipnoto”-n



FOTO-RAPORTO DE LA KONGRESO
Kongresaj solenaĵoj: Malferma Asembleo kaj akcepto de la gekongresanoj en la Urbodomo.



Inaŭguro de la strato Esperanto



Prelego de D-rino. Urueña en la Universitato de Oviedo



Cidro-drinkado de la ekskursantaj gekongresanoj en la keloj de "El Gaiteru" (Villaviciosa)



Astura Esperanta Asocio reakiras sian nomon



Post la hispana E-kongreso okazinta en Gijón en la somero de 1979 estas en la akt-libro de la Esperantista Grupo Jovellanos nur unu sola akto, la lasta de tiu E-grupo, datita la 31an de decembro de tiu jaro. Por pli bone kompreni kio okazis, ni preferu transkribu la tekston de tiu akto. Jen ĝi:

Ĉi tiu estas la fina akto de la Esperantista Grupo "Jovellanos". Fine de la jaro 1979 ĉesas ekzisti ĉi tiu grupo. Sekve oni eksplikas la cirkonstancojn, kiuj kondukis al tiu decido. La Esperantista Grupo "Jovellanos" ne havis propran juran identecon sed ĝi funkciadis kiel sekcio dependanta de la Ateneo Jovellanos. Laŭ peto de la Prezidanto de tiu Ateneo oni entreprenis en 1978 la demarŝojn celante enkonduki la Grupon de Esperanto en la Katedro Jovellanos pri Universitata Disvastigo. Tiu enkonduko estis atingita kun la incidentoj registritaj en ĉi tiu aktlibro. Sed poste la estraro de la Ateneo Jovellanos, rokonsiderinte sian antaŭan decidon, sin oponis al tio ke la grupo funkcianta en la Katedro Jovellanos pri Universitata Disvastigo uzadu la nomon "Esperantista Grupo Jovellanos", ĉar tiu nomo estis ligita al la Ateneo kaj havis neniun identecon for de ĝi. Tiele prezentita la afero estis necese elekti inter:

-meti finon al la esperantista agado kadre de la Katedro pri Universitata Disvastigo kaj reveni al la Ateneo, aŭ:

-ĉesigi ĉiun ligaĵon kun la Ateneo kaj mendi la leĝan oficialigon de iu nova esperantista asocio. Tial ke oni ne deziris pluajn rilatojn kun la Ateneo Jovellanos kaj, jes ja, kun la Katedro Jovellanos pri Universitata Disvastigo, la membraro de la Esperantista Grupo "Jovellanos" unuanime decidis ne plu ligi sian esperantistan aktivadon kun la nomo de tiu grupo, kiu de tiam havas neniun enhavon ene de la Ateneo, kaj entrepreni la legalizon de iu nova esperantista aso-

cio, por kiu oni povus repreni la nomon ASTURA ESPERANTO-ASOCIO, kiu apartenis al iu asocio kiu ekzistis en ĉi tiu sama urbo antaŭ multaj jaroj.

Tiele la geesperantistoj de Gijón reprenis la nomon de la unua esperantista asocio ekzistinta en tiu-ĉi urbo... aŭ preskaŭ. Ŝajne neniu rimarkis

tiam ke ekzistis iu eta diferenco inter la antikva kaj la nova nomo. La asocio ekzistinta inter la jaroj 1909 kaj 1937 nomiĝis **ASTURA ESPERANTA ASOCIO** kaj tiu, kiun oni entreprenis en 1980, de tiam, ĉiam estis nomata **ASTURA ESPERANTO-ASOCIO**, kaj tiele aperis la nomo en ĉiuj niaj skribaĵoj, en la stampilo de la asocio, en la revuo HELECO, en la flago kiun oni preparis poste... Nur lastatempe, en la lasta statutararo, oni korektis tiun erareton kaj de tiam ni intencas ke ĉiuj niaj presaĵoj kaj emblemoj montru la saman nomon de la unua esperantista asocio fondita en nia urbo antaŭ ĝuste unu jarcento.

Por la daŭrigado de nia historio de nun ni devas uzi la aktlibron de la nova asocio. Jen la teksto de ĝia Konstitua Akto:

En Gijón, estante la 19a horo de la 18a de Januaro de 1980, kunvenas la personoj menciataj paĝo-marĝene, ĉiuj plenaĝaj kaj enloĝantoj de tiu-ĉi urbo, cele konstitui asocion por promocii

la divastigadon de la Internacia Lingvo ESPERANTO.

Unue oni decidas konstitui tiun asocion kun la nomo ASTURA ESPERANTO ASOCIO.

Sekve oni procedas al la elektado de iu Demarŝa Komitato, kiu restas konstituata tiele:

-Prezidanto: Santiago Mulas Gallego.

-Vicprezidanto: Adonis González Meana.


-Sekretario: Faustino Castaño Vallina.

-Kasisto: Ildefonso Domínguez Losada.

Fine oni procedis ekzameni la projekton de statutararo, kiu restis aprobita.



Emblemoj de Astura Esperanta Asocio. Supre tiu de la AEA ekzistinta inter 1909 kaj 1937. Sube tiu de 1980 ĝis nuntempe.



Demarŝa Komitato de ASTURA ESPERANTA ASOCIO, de maldekstre al dekstre: Santiago Mulas Gallego, Adonis González Meana, Faustino Castaño Vallina kaj Ildefonso Domínguez Losada.

La personoj menciitaj paĝo-marĝene de tiu akto estis nomlisto konstituita de la membraro de la E-rondo, estante ĉekape la nomo de Alberto Menéndez, kiu, kvankam ne plu kiel aktivulo, tamen ĉiam restis kun la gesamideanoj de ĉi tiu urbo kaj akompanis ilin en la gravaj momentoj de la esperantista kolektivo.

De tiam, la Demarŝa Komisiono plenumis sian taskon: fari la necesajn demarŝojn por la oficialigo aŭ legalizo de la nova asocio. La sekva noto en la aktlibro estas inventaro de la havaĵoj de la asocio. Fakte, Astura Esperanto Asocio heredis ĉion aparteninta al la Grupo Esperantista Jovellanos, tiel en kio koncernas al la personaro kiel al ĉiutipaj havaĵoj. **HELECO** daŭre estis la presorgano de la asocio, portante ekde ties 9-10a numero (kiu raportis pri la 39a Hispana Kongreso de Esperanto), indikon pri ties aparteno al **AEA**.

Notindas ke ĉiuj ĉi ŝanĝoj kaj eventoj ne interrompis la okazigon de kursoj de Esperanto en nia sidejo.

La 22an de majo de 1980, plenuminte sian komision la Demarŝa Komitato, kunvenis la membraro de la asocio por elekti novan estraron. Le elektita gvidantaro de **AEA** estis:

- Prezidanto: Santiago Mulas Gallego.
- Vicprezidanto: Adonis González Meana.
- Sekretario: Luis Muñiz Martínez.
- Kasisto: Ildefonso Domínguez Losada.
- Kontisto: Manuel Fernández Suárez.
- Bibliotekisto: Julio Argüelles García.
- Voĉdonantino: Pilar Alonso Moro.
- Voĉdonanto: Antonio Román Cantón.
- Voĉdonanto: Gervasio Colunga Fernández.
- Voĉdonanto: Faustino Castaño Vallina.
- Voĉdonanto: José Ordieres Dacosta.


Inter nomoj jam konataj de antaŭaj komitatoj aperas iu nomo de nova samideano varbita el la lastaj

kursoj. Sed speciale menciinda estas la ŝanĝo en la sekretarieco de la grupo. La akto de tiu kunsido venas jam subskribata de la nova Sekretario: Luis Muñiz Martínez. Lia nomo aperis jam en nia historio en rilato kun aliaj taskoj en la E-rondo. Sed nun ni volas reliefigi la fakton ke aperis jam alia Luis Muñiz en nia historio kiam ni menciis la samideanojn kiuj aperas en tiu antikva foto de la jaro 1929. Tiu alia estis patro de la nuna Luis Muñiz kaj krome li estis vivanta ankoraŭ en tiu epoko kiun ni priraportas. Ne estas ofta okazaĵo ke patro kaj filo samtempe membras ĉe esperantista rondo. Tiu ŝanĝo en la sekretarieco ne signifis malpli-intensiĝo de la aktivado de Faustino Castaño. Fakte, de tiam li okupiĝis pri la biblioteko de la asocio kaj krome gvidis E-kursojn.

Por la lerno-jaro 1980-1981, **AEA** organizis du kursojn de Esperanto, la Baza Kurso estis gvidata de Faustino Castaño, kaj Santiago Mulas gvidis la la Progresigan Kurson, al kiu oni invitis la gelnintojn de la antaŭaj jaroj.

Ildefonso Domínguez, krom lia komitata tasko je kasisto, daŭre okupiĝis ankaŭ pri la ellaborado de la revuo **HELECO**. Tiam la bulteno ne estis mult-paĝa, sed ĝi ofte aperadis; ĉiu du-monato estis akurate eldonita nova numero de la revuo. La ek-

zempleroj, presitaj per foto-kopiado, estis senditaj al ĉiu membro de la asocio kaj ankaŭ al diversaj E-grupoj landaj kaj eksterlandaj same kiel al kelkaj korespondamikoj de la membroj de nia asocio. Foje el tiuj korespondamikoj ni ricevadis kunlaboraĵojn por la revuo, fakte, estis en ĝi iu sekcio nomata “Niaj geamikoj el...” kaj tie estis publikigitaj tiuj kunlaboraĵoj. Alia kutima sekcio de **HELECO**, kiu daŭre ekzistas ankoraŭ, estis tiu nomata “Kuirante kun Pilar”. Tie oni metis, kaj daŭre oni metas, kuirreceptojn de samideanino Pilar Alonso Moro, membro de nia asocio.



Luis Muñiz

La atesto de Faustino Castaño



Ekde mia infanaĝo mi sciis pri la ekzistado kaj la celo de Esperanto. Tamen dum la unuaj tri jardekoj de mia vivo neniam mi pensis lerni tiun lingvon kaj eĉ malpli fariĝi aktivulo por ties disvastigado. Miaj filologiaj interesoj adresiĝis aliflanken. Dum multe da tempo mi lernis la francan lingvon. La anglan mi nepre devis lerni por mia profesia laboro (informadiko). Krome dum mia gimnazia studado mi lernis ankaŭ la latinan kaj la grekan lingvojn. Kiam mi estis tridekdujara mia intereso estis lerni la hebrean por legi la Bibliion en ties originala lingvo. Sed en tiu epoko (jaro 1975) ne eblis al mi trovi en mia lando lernolibrojn kaj vortarojn pri tiu lingvo. Tiam, hazarde, mi vidis anoncon komunikante la baldaŭan komenciĝon de kurso de Esperanto en mia urbo. Tion vidinte, venis al mi la ideo ke, ĉar estas esperantistoj en ĉiuj landoj, mi povus, pere de Esperanto, interrilati kun esperantistoj el Israel kaj akiri, pere de ili, lerno-materialon pri la hebrea.

Do, mia komenca intereso pri Esperanto estis profit-cela, kaj aliĝinte al tiu kurso, kiun gvidis Santiago Mulas, mi konstatis ke Esperanto estis la plej facila el ĉiuj lingvoj kiujn mi estis lerninta. Post kvarmonata lernado mi flue paroladis en Esperanto, kaj post la finiĝo de la kurso mi ĉeestis landan E-kongreson en El Ferrol, en kiu estis, ankaŭ, kelkaj eksterlandadoj. Tiam estis por mi granda surprizo sperti kiom facile estas interkomunikiĝi kun alilingvanoj pere de Esperanto. Tio ne estis okazinte al mi kun la ceteraj idiomoj kiujn mi lernis. De tiam mi fariĝis entuziasmulo de la Zamenhofa lingvo; ŝajnis al mi frenezaĵo ke la homaro ne alprenis tiun lingvan solvon de antaŭ multe da tempo por la tutmonda interkomunikado. Mi fariĝis aktivisto de la Esperantista movado, gvidis kursojn, partoprenis en la organizado de E-kongresoj, verkis multajn artikolojn en tiu internacia lingvo, aliĝis al kelkaj Esperantaj organizaĵoj, propagandis pri Esperanto ĉiam, kiam eblis tion fari, en intervjuoj presaraj, radiaj, televidaj... Nun mi okupiĝas pri la ellaborado de la revuo HELECO de Astura Esperanta Asocio kaj la demarŝado de la interreta paĝo de tiu E-rondo.

Mia esperantista aktivado ne estas limigata al mia urbo. Kune kun aliaj samideanoj, mi kunlaboris en la starigo de la hispana sekcio de MEM (Mondpaca Esperantista Movado) kaj dum kelkaj jaroj mi rolis kiel Prezidanto de IKEK (Internacia Komunista Esperantista Kolektivo).

Pri la unua E-kurso kiun mi gvidis, tiu de la lerno-jaro 1980-1981, mi havas ian neforgeseblan memoraĵon. Vespere de iu tago de februaro 1981 (kiu poste estis konata kiel 23-F) mi estis en mia hejmo, post la alveno el la fabriko, kun granda kapdoloro, Tiumatene estis tre intensa la sindikata aktivado de la Komitato de la ENSIDESA-fabriko, al kiu mi apartenis. Sed tiutage estis E-klaso kaj mi volis ĉeesti ĝin spite al la migreno. Kiam mi pretis eliri el la hejmo por adresiĝi al la sidejo de la E-grupo, alvenis mia edzino kaj diris al mi ke ŝi ĵus vidis ie televidan elsendon montrante ke io grava estis okazante en la Parlamentejo de la lando. Ŝajne militistoj eniris tien perforte, pafante... Mi tuj alkuris ŝalti la televid-aparaton kaj konstatis ke, ja, estis vera puĉo survoje. Survoje sed haltigita ĉar dum multaj horoj oni ne sciis kion povus rezulti el tio. Mi devis decidi kion fari, kaj ĉar ne eblis al mi iamaniere efiki sur tiuj okazantaĵoj, mi decidis iri gvidi la E-klason kvazaŭ nenio grava estus okazante. Dum la klaso mi neeviteble estis pensanta ke eble tio estos mia lasta faro, ĉar se sukcesus la puĉistoj sendube okazus en mia lando la kutimaj masakroj kaj reprezalioj oftaj en similaj kazoj, kaj mia nomo sendube troviĝus en ĉiuj listoj kiujn tiuj personoj povus ellabori por la masakrado.

Alia menciinda aktivado de membro de nia E-rondo estis tiu de samideano Sacramento Collado Llana. Dum multaj jaroj li okupiĝis pri la propagando de Esperanto antaŭ la socio, ĉefe pere de presaro. Inter la tuno da paperaĵoj de la arkivo de nia asocio, kiujn ni devis traserĉi por la ellaborado de ĉi tiu historio, ni trovis multenombrajn eltranĉaĵojn de ĵurnaloj kun artikoloj, notoj kaj informoj, pri Esperanto kaj esperantistaj eventoj, verkitaj de samideano Sacramento, kiujn li sendadis al la ĵurnaloj por publikigo.

Ses anoj de nia asocio partoprenis en la 40a Hispana Kongreso de Esperanto en Madrido. Tie ili kontaktis kun iu aktiva esperantistino el Bulgario, Lili Koleva, kiu estis invitita viziti nian urbon. Ŝi

faris tiun viziton dum la tagoj 28a al 31a de julio. De la 2a al la 9a de aŭgusto okazis en Stokolmo la 65a Universala Kongreso de Esperanto. Ĉeestis ĝin, kaj reprezentis tie nian **A. E. Asocion**, nia samideano Julio Argüelles.



Nia asocio sendis anoncon al kelkaj E-revuoj je tutmonda disvastiĝo mendante leterojn kaj poŝtkartojn por la lertervespero kiun ni planis fari fine de la E-kursoj de la lerno-jaro 1980-1981. Ni ricevis amason da tiuj poŝtaĵoj kaj la lertervesperoj, fine de la kursoj, estis vere riĉenhavaj. Krome kelkaj el la novaj gelernintoj abonis iujn E-gazetojn, ĉefe **“El Popola Ĉinio”**.

Alia aspekto de nia aktivado estis tiu de la esperantista festo, kutime nomata Zamenhofa Tago ĉar

okazas en dato proksima al la 15a de decembro, naskiĝdato de la iniciatinto de Esperanto. En Gijón, same kiel en aliaj lokoj kie ekzistas esperantistoj, ne mankis tiutipa celebrado. Sed ekde la epoko kiun ni priskribas nun, (jaro 1981) la organizado de tiu festo estis nepra ĉiujara tasko de la esperantista asocio.

En kunsido de la asocia estraro, de 3a de aprilo 1981, oni organizis eblan vojaĝon de la partoprenontoj de nia E-grupo en la Hispana Kongreso de Esperanto de tiu jaro, okazonta en Murcio. En tiu sama kunsido oni decidis la ellaboradon de flago por la **Astura Esperanto Asocio**. Tiu, kiun ni uzis ĝis tiam, apartenis al la jam ne plu ekzistanta **Grupo Esperantista Jovellanos**. Kompreneble, tiu de la antikva **AEA** estis tiam netrovebla kaj verŝajne eĉ ne ekzistanta, kaj krome ĝia desegno rilatis al la iama Katolika Centro, ankaŭ ne ekzistanta.

Al la Kongreso de Murcio iris kvar el la membroj de nia gijona esperantista asocio. La grupo mone helpis ilin per la profito atingita de la vendado de loterio de la Asocio kadre de la lotado de Kristnaska tempo de la antaŭa jaro. Por tiu jaro 1981a oni planis fari similan lotvendadon por atingi monon destine al tiuj gesamideanoj, kiuj partoprenus la kongresojn de Esperanto de la jaro 1982.

En junio de 1982 okazis en Hispanio la Tutmondaj Futbalmatĉoj kaj kvar el tiuj matĉoj aŭ futbalkonkuroj okazis en nia urbo. Tiucele la urba konsilantaro aranĝis la uzadon de la urba Foirejo por la akceptado de la spektantoj de tiuj sportaĵoj, inter kiuj, eventuale, povus esti eksterlandanoj kun

kiuj oni devus interkomuniki iamaniere. Por tia interkomunikado kaj samtempa propagando pri la internacia lingvo, nia esperantista rondo mendis kaj akiris la uzadon de iu el la standoj en tiu Foirejo. Dum la tagoj de la futbal-ludado kelkaj membroj de nia asocio deĵoris en tiu stando kaj tio tre utilis por diskonigi informon pri la ekzistado de la Esperanto kaj ties utilo en la internacia komunikado. Oni eĉ faris al ni intervjuon por radio-

stacio provizore situata en tiu foirejo.

La 4an de oktobro de 1982 komenciĝis nova Esperanto-kurso en nia sidejo; gvidis ĝin Santiago Mulas kun la kunlaborado de aliaj membroj de la asocio. Krom tiu kurso en la ejo de la asocio, en la lerno-jaro 1981-82 estis aliaj kursoj de Esperanto for de la Katedro Jovellanos. Konkrete, Julio Argüelles instruis pri la Internacia Lingvo en iu publika lernejo de la urbo kaj ankaŭ en iu lernejo de akceptistinoj de la Foirejo. Por la celebrado de la esperantista festo de la jaro 1982a nia asocio organizis sufiĉe solenan kaj brilan akton en la teatrosalono de la Katedro Jovellanos. Estis folkloraj dancaj festivaloj. Sekve la festantaj samideanoj translokiĝis al la strato **Esperanto**

por flora omaĝo antaŭ la nom-tabuloj de tiu strato, inaŭgurita antaŭ du jarojn, dum la **39a Hispana Kongreso de Esperanto**. Tiu akto fariĝis de tiam kvazaŭ deviga ceremonio aŭ protokolaĵo por ĉiuj postaj esperantistaj festoj en nia urbo. La festo kulminis poste per bankedo de la geresperantistoj kaj gesamfamilianoj. Ankaŭ tiutipa frata bankedo fariĝis nepra komponaĵo de la ĉiujaraj esperantistaj renkontiĝoj.



Esperantista stando en la urba Foirejo okaze de la Tutmondaj Futbalmatĉoj de la jaro 1982.



Nia diligenta kolegaro...

La jardeka periodo 1980-1990 karakteriĝis, por nia Esperantista Asocio, pro la reguleco de la E-laborado de ĉi ties membraro. Kompreneble, samkiel en ĉiuj aliaj E-grupoj en la mondo, la membraro-nombro neniam estis granda proporcie al la loĝantar-grando, kaj ne ĉiuj membroj estis aktivuloj. Sed tamen, en tiu periodo, kaj male al tio okazanta nuntempe, en la porEsperanta aktivado de la grupo kunlaboris deca nombro da gesamideanoj.

Dum la sep jaroj de 1980 al la Jubilea jaro de Esperanto, 1987, ne malpli ol 40 numeroj de la revuo **HELECO** estis eldonitaj. Tiam, kaj en la sekvintaj jaroj, sub la gvido kaj demarŝado de Ildefonso Domínguez, tiu gazeto aperis tre regule kaj akurate. Ĝia paĝaro ne estis granda, 8 aŭ 10 paĝoj en ĉiu numero, sed krom ĝia reguleco estas menciinda ankaŭ la fakto ke ĝia enhavo estis la rezulto de kunlaborado de kelkaj gesamideanoj, kio ne okazas hodiaŭ. Plejparto el la kunlaborantoj estis de nia E-rondo, sed estis ankaŭ forraj. Preskaŭ en ĉiu numero estis artikolo de Luis Serrano kiu, kvankam loĝanta en Sabadell de antaŭ multaj jaroj, li ĉiam sin sentas ligita al nia E-grupo, en kiu li iam aktivadis. Alia kutima kaj konstanta kunlaboranto en la gazeto estis Adonis G. Meana, Vicprezidanto de **AEA**, kaj sufiĉe ofte ankaŭ lia frato Alcibiades sendadis ion por publikigo.

Kaj estis aliaj signoj de kolektiva aktivado de la E-rondo. En majo de 1981 la grupo organizis publikan ekspozicion de fotografiaĵoj pri Bulgario, okaze de la Jarmila Jubileo de tiu lando. La urba presaro informis pri tiu ekspozicio, kiu estis vizitata de multaj personoj. Aliflanke, ni jam menciis ke en tiu lerno-kurso, 1980-1981, nia E-asocio havis du

samtempajn kursojn de Esperanto, unu Baza kaj alia Progresiga. Kaj ke en la sekvinta jaro, 1982, okaze de la Tutmondaj Futbal-konkuroj en nia lando, **Astura Esperanta Asocio** havis en la urba Fojrejo stando por informi pri la Internacia Lingvo al la vizitantoj.



La strato **Esperanto**, inaŭgurita dum la 39a Hispana E-Kongreso, fariĝis renkontiĝloko de la geesperantistoj en la Zamenhof-festoj.

La 22a numero de **HELECO** informas ke la Katedro Jovellanos asignis subvencion de 25.000 pesetoj al nia E-Asocio kiel helpo por nia biblioteko. Tiu sama numero de la revuo informas pri tio ke Oscar Trabanco, lernanto de E-kurso de nia Asocio, sendis al la tiama brita Registrar-Prezidentino, S-ino Teacher, du leterojn, unu en la hispana lingvo kaj alia en Esperanto, pledante favore al la uzado de Esperanto kiel komuna internacia lingvo. La revuo publikigas la tekston de tiuj du leteroj kaj la respondoj, en la angla lingvo, de la brita regantaro, kiu asertis ke la propono ne estas taksata kiel praktika kaj ke por la internacia komunikado bone rolas la angla.

En julio de 1982 okazis en Malago la **42a Hispana Kongreso de Esperanto**. Estis en ĝi deca partopreno

de nia grupo: sep membroj de la Gijona E-rondo kun ties respektivaj familioj. Krom partopreno estis ankaŭ ia interveno. Unu akto de tiu Kongreso estis Simpozio pri Fakaj E-organizaĵoj en nia lando. Inter la diversaj organizaĵoj partoprenintaj tiun Simpozion, **ILEI**, **HEJS**, **HEFA**, **HEKA**, estis ankaŭ la hispana Sekcio de **MEM (Mondpaca Esperantista Movado)** kies unua kaj fondiga asembleo estis okazinta en la kongreso en Gijón en 1979. Nu ĉi-okaze la Simpozio utilis al tiu E-fako kiel publika prezentado antaŭ la hispana esperantistaro. La prezentadon faris la Sekretario de tiu hispana MEM-Sekcio, Faustino Castaño, de

nia Gijona E-asocio, kiu partoprenis en la kreadon de tiu organizaĵo kune kun Luis Serrano, Adonis G. Meana kaj aliaj hispanaj samideanoj.

La numero 27a de **HELECO** (julio-aŭgusto de 1982) informis ke estis asignita al tiu gazeto iu distingo farita de la hispana Sekcio de **ILEI** (In-

ternacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj).

La distingo konsistis en pokalo, kies desegnon oni montras en la revuo, kaj Honora Diploma “kiel pruvo de entuziasmo, inter-

tereso kaj aktivado por la Internacia Lingvo Esperanto”, laŭ tekstas la diploma mem. Vere, la eco kiu igis **HELECO**-n meriti tian distingon estis la reguleco en ĝia eldonado; ĝuste kaj akurate ciu dumonato aperadis nova numero de tiu modesta broŝuro. Ekde la komenciĝo de la jaro 1983 ŝanĝiĝis la desegno de la titolo aŭ kapo de tiu revuo.

En tiu jaro 1983 la **Hispana Kongreso de Esperanto** okazis en Zaragozo. Ne malpli ol dek personoj de nia urbo ĉeestis ĝin. Kadre de tiu kongreso, inter la fakaj asocioj kiuj profitis ĝin por okazigi siajn asembleojn estis tiu de la hispana Sekcio de **MEM** (**Mondpaca Esperantista Movado**).

Ni memoru ke du samideanoj de nia Gijona E-grupo estis membroj kaj kunfondintoj de tiu organizaĵo, nome Adonis G. Meana kaj Faustino Castaño kiu estis la Sekretario de tiu asocio.

La asembleon ĉeestis, inter aliaj membroj el diversaj lokoj de la lando, Luis Serrano, kiu estis la Prezidanto de tiu **MEM**-Sekcio, kaj ankaŭ la Ĝenerala Sekretario de **MEM**, la franco W. Gilbert. Ĉi lasta surbrustigis la honor-insignon de **MEM** al kelkaj membroj de la pacdefenda asocio, inter ili la Sekretario, pro ties aktivado en la starigo de la hispana Sekcio. Proksimume en tiu epoko, kelkaj membroj de tiu porpaca Esperanta rondo, inter ili la du menciitaj gijonanoj, subgvide de Luis Serrano entreprenis la kreadon de

hispana sekcio de alia internacia Esperanta movado, konkrete, **IKEK** (**Internacia Komunista Esperantista Kolektivo**).

Ĉar, iamaniere, nia historia raportado kaj precipe ĉi-tiu ĉapitro, titolita “**Nia diligenta kolegaro...**” estas kvazaŭ omaĝo al la Esperantistaj aktivuloj de

nia Gijona E-asocio aŭ en ia rilato kun ĝi, indas ke ni menciigu ankaŭ la agadon de samideano Julio Argüelles. En la epoko pri kiun ni raportas nun, li okupiĝis pri la

biblioteko de la Esperanta grupo, kaj poste li havis aliajn respondecojn en la komitato de la grupo, kaj ni jam menciis ke li gvidis kursojn de Esperanto en publikaj lernejoj de la urbo, sed lia plej notinda aktivado disvolviĝis en alia tereno, en kiu li estis

unika. Li estis dum multaj jaroj la demarŝanto de ĉiu ĝena afero de interrilato kun burokrataraj k.s. instancoj: luado de aŭtobusoj por ekskursoj kaj serĉado de gastejoj por kongresanoj, serĉado de restoracioj por la E-bankadoj, organizado de la solenaj kaj spektaklaj aktoj de la esperantistaj festoj... En iu numero de la kolekto de **HELECO** de la jaro 1983 troviĝas iu akrostika poeziaĵo kiun dediĉis al li Alcibiades González Meana substrekante tiun lertecon de Julio por tia-specaj taskoj. En alia numero de la sama jarkolekto de la gazeto estas simila poeziaĵo sed ĉifoje dediĉita al Santiago Mulas pro ĉi ties dediĉado al la gvidado de lernokursoj de Esperanto. En ĉi tiu ĉapitro ni prezentas la tekston de ambaŭ akrostikoj kiel omaĝo al tiuj du samideanoj, ankoraŭ vivantaj, kaj samtempe al la propra poeto, Alcibiades, kiu forpasis jam antaŭ kelkajn jarojn.

Por la lerno-jaro 1983-1984 nia asocio organizis du kursojn de Esperanto, gviditaj de Santiago Mulas kaj Adonis González Meana. Same estis okazinta por la antaŭa lerno-kurso. Radio Gijón kaj la urba ĵurnalo informis pri kurso komenciĝinta en nia sidejo la 17an de oktobro.



Kongresa foto de Zaragozo 1983



Oni surmetas al Faustino Castaño la Honor-insignon de MEM

Se iam vi venos viziti Ĥiĥnonon,
Amiko legant' nekonata,
Nenial forgesu ekkoni personon
Tutkore de ĉiuj amata
Interne de nia ĥiĥona rondeto.
Aktivis li tie senlace,
Gvidante de longe jam kursojn. Lumeto
Obstine brilanta kaj pace.

Multegon ni ŝuldias al lia laboro,
Utila videble al nia agado.
Li krome prezidas dum vigla deĵoro
Asturan sekcion de nia movado.
Saluton al tia sinjoro!

Ju pli li laboras, des pli li mirigas,
Unika li estas por iu ajn tasko.
Lerteco simila nin ĉiuj instigas
Imiti lin ciam (Por nia fiasko!!).
Obstakloj forestas en lia laboro.

Aktivis li ĉie efike sen peno.
Reale, li vivas en daŭra deĵoro,
Giganta vigleco, sindona sinteno,
Utilon donanta al nia movado.
Ekzemplo li estas de samideano
Luktanta por venki, per digna strebado,
La barojn survoje al paca lontano.
Ekkriu, honore al tia agado:
Saluton, amiko de tre lerta mano!!

Akrostikoj verkitaj de Alcibiades González Meana dediĉe al Santiago Mulas kaj Julio Argüelles. Iliaj nomoj, ja, legeblas vertikale, formitaj de la komencliteroj de ĉiuj verslinioj.

Por la dumvintra foiro de nia urbo, **AEA** mendis kaj atingis standon en la urba foirejo, por propagandi pri Esperanto tie. En la stando estis esperantaj libroj, revuoj, afiŝoj, bildkartoj, k. c. Tie ankaŭ estis aĉeteblaj libroj, vortaroj... Super la stando kaj videbla de ĉiu angulo de la foirejo kaj el ekstere, flirtis la esperantista flago, kaj ĉe la lintelo, sur granda tabulo, oni povis legi en Esperanto kaj en la hispana lingvo: Esperanto, unu lingvo por ĉiuj.

Speciale solena estis la celebrado de la esperantista festo de tiu jaro 1983 por festi la 124an datrevenon de la naskiĝtago de D-ro Zamenhof. La loko de la renkontiĝo por ĉiuj invititaj geesperantistoj el Asturio estis, kiel kutime, la strato Esperanto, kie oni metis florbukedojn apud la nomtabuloj de la strato. Poste, en la teatrsalono de la Katedro Jovellanos S-ino Rafaela Urueña prelegis pri la temo "**Esperanto:**



E-kursanoj de Avilés

ĉu utopio aŭ socia neceso?". Sekve, iu juna knabo, Javier Suárez Quirós, tre lerte muzik-ludis sur orgeno diversajn kompoziciojn, inter ili "La Espero". Poste iu folkloro koruso de la urbo kantis por la esperantistaro. Fine la festantoj bankedis en iu restoracio de nia urbo. Januare de 1984, Santiago Mulas komencis gvidi kurson de Esperanto ankaŭ en alia astura urbo: Avilés. La klasoj okazis en la Akto-salono de la Ŝparkaso de tiu urbo. La unuan klason de tiu kurso gvidis Alcibiades González Meana, kiu priskribis ĝin tia-

maniere:

...kelkajn minutojn antaŭ la difinita komenĉo, la 8a vespere,

sub la sankta signo de l' espero,
 kolektiĝis multaj geaŭdantoj,
 por ekkoni ion pri la afero,
 kiun vartas ni, la esperantoj.

Laŭlonge de tiu kurso, kaj dum kelkaj pluaj lernojaroj, S. Mulas instruis aron da gelernantojn el tiu urbo, el kiu formiĝis poste la esperantista grupo de Avilés, **ANTAŬEN**, kies unua Prezidanto estis Nicolás Muñiz.

En monato majo de tiu jaro, 1984, la Vicprezidanto de nia E-asocio, Adonis G. Meana, suferis gravan akcidenton. La aŭtobuso per kiu li vojaĝis destine al lia laborejo koliziis kontraŭ alia veturilo. Rezulte de tiu akcidento mortis du personoj kaj multaj aliaj, kiel nia samideano, restis vunditaj. Adonis devis resti dumlonge en hospitalo pro la granda frapo kiun li ricevis surkape. Feliĉe, post kelkaj monatoj HELECO denove povis publikigi liajn kunlaboraĵojn, eĉ se lia resaniĝo ne estis komplete; de tiam li ne plu revenis al sia laborejo.

En la lerno-jaro 1984-1985 daŭre estis du kursoj de Esperanto en nia asocio. Iun el ili gvidis Santiago Mulas, kiu plue instruadis Esperanton en Avilés, kaj la alian gvidis samideano el Kantabrio, Miguel Gutiérrez Adúriz, kiu tiam estis en nia regiono pro laboraj kialoj. Li parolis al la asturaj esperantistoj en la Zamenhofa festo de 1984 atentigante ilin pri la fakto ke tiu festo-tago estas precipe “la tago de la libro” en nia E-movado. Ankaŭ la tiujara festo estis brila kun la lerta partopreno de kelkaj artistoj.

Denove en tiu vintro funkciis la esperantista stando en la Vintra Foiro de nia urbo. La ĉefa deĵoranto en tiu loko estis samideano Julio Argüelles kiu, cetere, daŭre gvidis E-kurson en iu urba publika lernejo.

Grava esperantista evento de la jaro 1985 en Asturio estis la ŝpruco de Esperanto en la urbo Navia. Tie formiĝis E-rondo kaj estis kurso en kiu partoprenis multaj gelernantoj. Plejparto el ili ricevis la Esperantan diplomon en oficiala kaj solena akto kiu okazis post la ekzame-

noj. Partoprenis en tiuj aktoj kelkaj estraranoj de nia E-grupo de Gijón. La aŭtoro de tiu esperantista miraklo en Navia estis S-ro Chapoli.

Somere de 1985 vizitis nian E-grupon kelkaj alilokaj gesamideanoj: geedzoj Luis Hernández kaj Rafaela Urueña el Valladolid, Ramón Manau kaj


Luis Serrano el Sabadell, Tarô Nisiumi kaj edzino el Tokio... En la numero de **HELECO** de Septembro-Oktobro de tiu jaro estis publikita artikolo de L. Serrano raportante pri tiu vizito lia al urbo kie li esperantiĝis antaŭ preskaŭ 30 jarojn. Li renkontiĝis kun Alberto Menéndez kun kiu li aktivadis favore al Esperanto en tiu pasinta epoko.

Denove en la vintro 1985-86 nia E-asocio publike propagandis pri Esperanto en stando en la urba Foirejo, kun la ĉefa deĵorado de Julio Argüelles, kiu vendis tie kelkajn E-librojn.

Denove estis la kutimaj du E-kursoj en nia sidejo dum la lerno-jaro 1985-1986. Gvidis ilin Adonis G. Meana kaj Santiago Mulas. Ankaŭ en iuj urbaj lernejoj estis kursoj de Esperanto gviditaj de Julio Argüelles. Daŭre estis E-kurso en Avilés sed de tiam gvidis ĝin iu el la lernantoj de la antaŭaj kursoj de S. Mulas.

Ankaŭ la esperantista festo de 1985 havis brilan celebradon. Post la kutima flor-ofero en la strato **Esperanto** la gesamideano de nia regiono kunsidis en la teatr-salono de la Katedro Jovellanos, kaj post la salutado de la Prezidanto Santiago Mulas estis parolado de Alfredo Villa González, Sekretario de la Gijona urbo-domo kaj honora membro de nia Asocio. Li estas filo de nia karmemora Alfredo Villa Vi-

lla kaj iam estis prezidinta Hispanan Kongreson de Esperanto en nia urbo. En lia parolado, Alfredo Villa González priskribis la medion kie L. L. Zamenhof iniciatis la internacian lingvon kun la celo ke ĝi konsistigu taŭgan interkomprenilon por la



Pliaj akrostikoj de Alcibiades



Somere de la jaro 1985 kelkaj samideanoj, kaj landaj kaj eksterlandaj, vizitis la esperantistaron de nia urbo. Jen fot-raportaĵo de tiuj renkontiĝoj de esperantistoj.

tuta Homaro, sed ĉefe por la tutmonda laboristaro kiu tute ne disponis la necesajn ekonomiajn kapablojn por lerni alilandajn lingvojn. Post tiu prelego, estis belega kantado far de la “Infana Ĥoro” de la Urba Muzik-Lernejo, kaj iu la infanaj membroj de tiu ĥoro deklamis en Esperanto poeziaĵojn de G. A. Becker.

En la Ĝenerala Asembleo de la membroj de Astura Esperanta Asocio, okazinta la 13an de februaro de 1986, partoprenis S-ro Chapoli, la ĉefzorganto de la Esperanta afero en Navia. Oni trankzamenis la agadon de nia A. E. Asocio de la antaŭa jaro kaj programis tiujn de la nova. Samideano Chapoli temis pri la faritaĵoj kaj la planoj de la E-rondo de Navia. Li informis ke oni estis instruante Esperanton a 23 gelemantoj de la Mezlernejo de Navia kaj ke 12 instruistoj de alia mezlernejo, kun 150 gelemantoj, sin preparis por atingi la titolon de E-instruistoj. Estis ankaŭ kurso de Esperanto per Radio-Navia. Li havis grandajn planojn por esperantista agado en tiu urbo, kaj faris la proponon organizi tie la **Unuan Asturan Kongreson de Esperanto**. Oni aprobas tiun proponon kaj decidas ke la dato de tiu kongreso estu de la 20a al la 22a de junio de tiu jaro 1986. En tiu sama kunsido oni pristudis ankaŭ la partopreno de la astura esperantistaro en la celebrado de la **Centjara Jubileo de Esperanto** kiu estis okazonta en la sekva jaro 1987.

La **Unua Astura Kongreso de Esperanto** efektive okazis en Junio de 1986, sed ne en la menciita dato sed unu semanon poste. Ties sidejo estis la

urbo Navia kie antaŭe estis preskaŭ nenia esperantista tradicio kaj subite floris nia afero sub la vigla iniciato kaj laboro de samideano José Carlos Chapoli Motta.

Partoprenis en tiu kongreso, krom la samideanoj de tiu urbo, ankaŭ geesperantistoj alvenintaj el Avilés kaj Gijón. Vendrede, la 27an de junio okazis la Interkona Vespere kiu disvolviĝis per la kutime distra kaj emociiga etoso de tiaj programeroj. Sekvinttage, la 28an de junio, matene estis la ekzamenoj pri Esperanto en kiuj partoprenis, krom gelemantoj el Navia, ankaŭ iuj de Gijón. Vespere estis la solena Malfermo de la Kongreso, al kiu sekvis iu folkloro festo. Dimanĉe la 29an, estis kollokvo pri la temo: “La Eŭropa Ekonomia Komunumo bezonas nian Internacian Lingvon”.

Oni devas reliefigi, ke en tiu **1a Astura Kongreso de Esperanto**, oni larĝe honoris nian Asturan Esperantan Asocion per aljuĝado fare de **I.L.E.I.** de diplomoj al niaj samideanoj Santiago Mulas, Julio Argüelles kaj Adonis G. Meana pro sia entuziasmo, intereso kaj aktivado en la porEsperanta laborado. La diplomojn transdonis Sro. Francisco Zaragoza. Sed ankoraŭ pli honorigaj estis la okaze de tiu Kongreso starigitaj premioj: **Sindona por-Esperanta laborado** dum la tuta jaro al Francisco Zaragoza; **Esperanta Literaturo**, aljuĝita al Santiago Mulas, pro la historieto “La katineto de mia avino”, publikigita en **HELECO**, kaj **Internaciaj Rilatoj nome de A.E.A.**, aljuĝita al Julio Argüelles. Tiuj-ĉi premioj konsistis el belaj surgravuritaj metalaj platoj.

La Kongreso aprobis jenan deklaron:

KONSIDERANTE ke por atingi siajn celojn ĉiaj fakoj de la socio sukcesas nur per politikumado, t.e. senĉese efektivigante ian politikon, ĉu ekonomian, ĉu arme-asociigan,

KONSIDERANTE ke nia Lingvo atinganta jam sian Centjaran Jubileon ankoraŭ ne sukcesis esti agnoskita de la tutmondaj registaroj, malgraŭ la sindona laborado de ĉiuj esperantistoj kaj kelkaj sporadaj sukcesoj.

AKCENTAS la gravecon de adekvata politikumado far ni ĉuj, kiu tute ne temu pri la ordinara politikumado, kiun ni havas mense, sed pri serioza kaj deca Lingva Politiko ĉe ĉiaj gravaj Oficialaj Institucioj, ĉu lokaj, ĉu provincaj, ĉu naciaj.

ALVOKAS por vigla strebado atingi ke kiel eble plej multaj esperantistoj enoficiĝu en tiaj Oficialaj Institucioj, tiele disponigante gravan apogon por la citita Lingva Politiko.

INSISTAS por ke ĉiu esperantisto ekagu per la koncernaj demarŝoj ĉe la lokaj Oficialaj institucioj kaj aŭtoritatoj, kial urbodomoj kaj simile, proponante Esperanton kiel plej trafa solvo por la rilatoj internaciaj, por altiri la mondan turismon k.t.p.

Nia gijona E-grupo partoprenis, pere de iuj el ĝiaj membroj, en tiu kongreso esperantista de Asturio. Sed sammaniere ĝi partoprenis ankaŭ en la landa E-kongreso, kiu tiujare okazis en Vigo. Tien alportis niaj

ĉi-urbaj samideanoj la rezolucion de la Astura E-Kongreso, kiu estis akceptita sen opono kaj ankaŭ sen ia ajn komento.

Alia E-kongresa partopreno de nia **Astura Esperanta Asocio** estis tiu de nia samurbano Julio Argüelles en la **Universala Kongreso de Esperanto** kiu okazis tiujare en Pekino. La urba presaro informis pri tiu fakto. En la 52a numero de **HELECO** estis publikigita artikolo de Julio priskribante liajn impresojn pri tiu kongreso. En la sama numero de la revuo estas ankaŭ artikolo de Santiago Mulas raportante pri la **Hispana Kongreso de Esperanto** en Vigo.

En kunsidoj de la estraro de **A.E.A.** en septembro 1986 oni pritemis, ĉefe, tri aferojn: renovigo de la estraro de la grupo, partopreno de kelkaj membroj de nia asocio en la eksterordinara Universala E-Kongreso okanzonta en Polujo en 1987 por festi la Centjaron de Esperanto, kaj ebla kontribuo de nia E-grupo al la solenado de tiu Centjara Jubileo.

La renovigita estraro de A.E.A. restis tiele:

Prezidanto: **Santiago Mulas Gallego**.

Vicprezidanto: Adonis **González Meana**.

Sekretario: **Julio Argüelles García**.

Kasisto: **Ildefonso Domínguez Losada**.

Kontistino: **María del Carmen Junco**.

Bibliotekisto: **José M^a Rodríguez Folgueras**.

Voĉdonantoj: **María Jesús Fernández,**

Luis Muñiz Martínez,

Pilar Alonso Moro,

Faustino Castaño Vallina,

kaj **Antonio Román Cantón**.

Por la lerno-jaro 1986-1987 oni disponis la okazigon de unu sola kurso, gvidota de S. Mulas.

En kunsido de la nova estraro, la 18an de novembro, en kiu partoprenis Nicolás Muñiz, Prezidanto de la Grupo **ANTAŬEN** de Avilés, ĉi tiu informis pri aktivado de tiu E-rondo. Interalie li komunikis ke la eksministro S-ro Fernando Morán akceptis sian nomumon kie Honora Membro de tiu esperantista grupo de Avilés, kaj ke oni estas tradukante al Esperanto la verkon “La Profeto” de

tiu eksministro. Nicolás informis ankaŭ pri tio ke la E-grupo **ANTAŬEN** planas organizi, por la sekva jaro, la **2an Asturan Kongreson de Esperanto**.

La celebrado de la Zamenhofa tago aŭ esperantista festo de la jaro 1986 estis simile solena kaj

riĉenhava kiel tiuj de la antaŭaj jaroj. Post la renkontiĝo de la esperantistoj en la strato **Esperanto** kaj tiea flor-omaĝo, en la teatra salono de la Katedro Jovellanos, Julio Argüelles faris la prezentadon de Miguel Gutiérrez Adúriz, el **Kantabra Esperanto-Asocio**, kiu parolis pri “**100 jaroj de Esperanto**”.

Poste la arta ensemblo “Nobla Ligno” per orgeno kaj flutoj ludis belajn muzikaĵojn de G. C. Riccio, de G. Belli kaj de Haëndel. Sekve la “Infana Ĥoro” de la urba Muzik-Lernejo lerte kaj bele kantis diversajn kanzonojn kaj Kristnasko-kantojn kiujn ili kronis per “Paca Nokto” en Esperanto. Fine, kiel kutime, en iu restoracio okazis la komuna bankedo de la festanta esperantistaro.

Sendube, la sepjara periodo laste priaportita karakteriĝis, kompare al aliaj epokoj de nia historio, pro la intensa, konstanta kaj regula aktivado de nia diligenta kolegaro tiel en nia urbo kiel en aliaj lokoj de la Asturia regiono.



En la Hispana Kongreso de Esperanto de 1986, en Vigo



Centjara Jubileo de Esperanto

La 26a de julio de la jaro 1887 aperis libro de Lazaro Ludoviko Zamenhof, la aŭtoro de Esperanto, prezentante al la publiko tiun Internacian Lingvon. Kvankam tiam la idiomo estis jam finpreta kaj estis jam farita multe da laboro pri kaj por ĝi, tamen oni konsideras tiun daton kiel la oficiala naskiĝo de **Esperanto**.

Do, en la jaro 1987 la tutmonda esperantistaro sole nis tiun eventon per divers- tipaj aktoj. **Universala Esperanto-Asocio** okazigis la tiujaran Universalan Kongreson de Esperanto en Polujo, patrolando de la inici- atinto de la Lingvo Internacia. Kelkaj membroj de **Astura Esperanta Asocio** partoprenis en tiu grava fo- rumo de la tutmonda esper- antismo. La Prezidanto, S. Mulas, kaj la Sekretario, Julio Argüelles, ĉeestis an- kaŭ la landan kongreson de Esperanto, kiu tiujare oka- zis en Madrido.

Sed nia Gijona E-rondo el- pensis kaj entreprenis alian gravan faron por inde festi la Centjariĝon de Esperan- to. La iniciato de la samide- anoj de nia urbo estis la el- donado de libro en Esper- anto, konkrete, antologio de asturaj verkistoj de la jar- cento pasinta ekde la apero de la internacia lingvo.

La elektitaj aŭtoroj de la Asturia regiono estis:

- Ramón de Campoamor, kaj ties verko "La trajno ekspresa", kiun esperantigis Fernando de Diego.
- Ramón Pérez de Ayala, el kiu estis io tradukita de Fernando de Diego: la "Universala Danco".
- Ángel González, el kiu majstre tradukis al Esper- anto kelkajn poemojn Jorge Camacho.
- Armando Palacio Valdés, el kiu estis prenitaj, por nia eldonaĵo, du verketoj: "La bobeloj" kaj "Peĉjo la bona", esperantigitaj de Liven Dek.
- Leopoldo Alas (Clarín), kaj ties verkoj "Adiaŭ Cordera" k.a. tradukitaj de Fernando de Diego.

Oni povas diri ke la komuna trajto de la menciitaj verkistoj estas, ke ili tre engaĝis sin en la spirito de sia epoko, de tiu jarcenta periodo dum kiu plen- umiĝis la plej kolosa evoluo kaj progreso de la ci- vilizacio. Tiu jarcento al kies progressa karaktero kontribuis ankaŭ la Internacia Lingvo, Esperanto, kies Centjaran jubileon oni festis per la eldono de ĉi tiu volumo.


La eldonado de la libro es- tis ebla dank' al la subven- cio kiun malavare koncesiis al ni la "**Asturia Ŝparka- so**". La volumo enkadriĝas en esperantista kolekto no- mata "Hispana Literaturo" en kiu estas E-tradukaĵoj de aliaj famkonataj verkoj kiel "La Familio de Pascual Du- arte", "La domo de Bernar- da Alba", "Sanga nupto", "Platero kaj mi"...


Plian informon pri tiu el- donado oni povas trovi en la retpaĝo de nia E-asocio, konkrete en la retadreso: <http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/abukedo/abukedo.html>

Por la prezentado de la libro **A.E.A.** kunvokis gazetaran konferencon. Ĝi rezultis su- fiĉe brila akto. La prezent- adon faris la Oficiala Urba Kronikisto, Patricio Adúriz. Poste la informmedioj iom publikigis pri la afero. Kon- krete, la Regiona Astura

Televizio intervjuis, por la prezentado de la libro, niajn samideanojn Santiago Mulas kaj Adonis González.

Ankaŭ kadre de la Centjara Jubileo de Esperanto, la E-grupo de Avilés, **ANTAŬEN**, havis alian iniciaton: al la priKultura Fonduso de tiu urbo, la tieaj gesamideanoj mendis proponi por la premio "Princo de Asturio al Konkordo" la internacian lingvon Esperanton. La Urba Kultura Fonduso de Avilés akceptis tiun peton kaj demarŝis la kon- cernan proponon, sed la afero ne prosperis. Krom tiu speciala aktivado rilate al la Jubileo de Esperanto, la E-grupoj de Asturio pludaŭris en sia





La asturaj aŭtoroj el kies verkaro oni prenis materialon por la libro en Esperanto: “Astura Bukedo”: Ramón de Campoamor, Ramón Pérez de Ayala, Ángel González, Armando Palacio Valdés kaj Leopoldo Alas (Clarín)

kutima agado. Estis alia kurso de Esperanto en Radio Navia, kaj same daŭris la Esperanta instruado ĉe la grupo ANTAŬEN de Avilés. En Gijón, en kunsido de la estraro de A.E.A. de la 18an de septembro oni decidis ke la 19an de oktobro komenciĝu kurso de Esperanto gvidata de Julio Argüelles, Faustino Castaño kaj Santiago Mulas. Menciindas ke tiujare Adonis G. Meana grave malsaniĝis; li devis resti dum dekduo da tagoj en hospitalo kaŭze de hidrocefalo el kiu originis iskemio, kio malfortigis lian dekstran kruron kaj sekve de tio li restis lama. Sed kvankam li ne plu povis okupiĝi pri kursgvidado, tamen li daŭre verkis siajn kutimajn kunlaboraĵojn por HELECO.

Rilate al la revuo, pri kies ellaborado daŭre okupiĝis tiam Ildefonso Domínguez, en la estrarkunsido de 12a de novembro oni decidis ke iu tri-persona komisiono dediĉiĝu al la kontrolo de la publikigenda materialo. La grupanoj elektitaj por tiu komisiono estis: Santiago Mulas, Adonis G. Meana kaj F. Castaño.

Ankaŭ tiujare nia E-grupo ricevis viziton de landaj kaj fremdaj gesamideanoj. Komence de monato februaro venis iu bulgara samideanino, Bojana Prodanova. Gelernantoj de la tiama E-kurso de nia Asocio povis pratiki Esperantan paroladon kun eksterlandano kiu lerte superregis la lingvon. Sur ĉi paĝo ni prezentas foton de vizito de tiu ino al nia ejo. Aliaj vizitantoj estis Luis Serrano kaj ties edzino, kiuj venis somere al nia urbo. Tiel li

kiel samideanino Prodanova verkis poste, por publikigo en HELECO, artikolojn raportante ties vizitojn.

Alia esperantista vizito, okazinta en monato marto, estis iome ekstertipa, kaj pri ĝi okupiĝis ankaŭ la presaro, tiel la urba kiel la regiona. Temis pri tri esperantistaj biciklantoj aŭ biciklistoj kiuj, portante esperantistan propagandon sur iliajn biciklistaj kostumoj, pasis tra nia urbo destine al Varsovio por partopreni tie en la Jubilea **Universala Kongreso de Esperanto**. La biciklanta grupo, kiu esperis pliampleksiĝi per la aldoniĝo de pliaj bicikl-veturantaj samideanoj survoje al Polujo, estis gvidita de Georges Comte “Jorgos”, kiu estis intervjuita de kelkaj asturaj ĵurnaloj, rolante kiel interpretistoj Santiago Mulas kaj Adonis G. Meana.



Bulgara samideanino vizitas nian E-grupon

La esperantista festo de tiu Jubileo Jaro estis en nia urbo la 13an de decembro simile splende kiel la antaŭaj jaroj. La afero komen-

ciĝis, kiel kutime, en la strato Esperanto, kie la movadanoj kunestis por la protokola akto de surmetado de florbukedoj apud la nomtabuloj de la strato. Sekvis poste, en la teatrejo de la Katedro Jovellanos, parolado de samideano Alcibiades González Meana pri la temo “En la unua centjaro de Esperanto”. La prelego estis en la hispana lingvo por la neesperantista publiko kiu ĉeestis la akton. Post spektaklo de kantado kaj dancado far de “Gijon Arta Grupo”, la festantaj gesamideanoj ĝuis fratan bankedon en iu restoracio de la urbo.

Asturaj Kongresoj de Esperanto

Ni jam raportis pri la **Unua Astura Kongreso de Esperanto**, kiu okazis en Navia en la jaro 1986. La du ceteraj esperantistaj urboj de Asturio, Avilés kaj Gijón, organizis siajn proprajn kongresojn en iuj el la sekvintaj jaroj. Poste ni priskribos ilin. Sed nun ni devas menciigi ke en la epoko kiun ni priraportas nun (jaroj 1988-1990), Navia jam ne plu troviĝis en la klubo de la esperantistaj urboj de nia regiono. Ni indikis ke la aŭtoro de la miraklo de la subita ŝpruco de Esperanto en tiu urbo estis samideano José Carlos Chapoli Motta. Tiu sinjoro estis Direktoro de la tiurba sukursalo de iu banko. Kiam tiu financa entrepreno destinis lin al alia urbo for de nia regiono, la E-movado en Navia ne persistis. Ne estas malofta okazaĵo en nia E-movado tio ke la persisto de la esperantista aktivado en iu loko dum kelke da tempo dependas de la laboro de unu sola persono, kaj se tiu persono mankas, la afero disfalas.

Feliĉe, ĝis nun en nia urbo, Gijón, dum la daŭro de tuta jarcento ne mankis la aktivado de unu aŭ pluraj diligentaj gesamideanoj. Iu el ili, kiu reprezentis tiun esperantistan kontinuecon en Gijón dum la malfacila epoko de la civilmilito kaj la posta silenta jardeko, estis samideano Alberto Menéndez. Li ligis la etapon de la unua **Astura Esperanta Asocio**, gvidita de Francisco Menéndez Rúa, kun la etapo de la renaskiĝinta **AEA**, subgvide de Santiago Mulas. Tiun longan tempo-periodon li kovris kun sia esperantista aktivado kun la helpo kaj akompano de Alfredo Villa, José Ordieres... Ni faras ĉi tiun memoraĵon ĝuste en ĉi tiu parto de nia historia raportado tial ke Alberto Menéndez mortis precize je la komenciĝo de la periodo priraportata, en januaro de la jaro 1988.

Cetere, post la jam priskribita festado de la Centjara Jubileo de Esperanto, la aktivado de **AEA** daŭre disvolviĝis kiel kutime. En marto de la jaro 1988 nia E-grupo ricevis la viziton de usona samideano James Fonseca; pri tio oni informas en la numero 61a de **HELECO**.

Temante pri tiu revuo ni diru ke ĝis la mezo de tiu jaro 1988 ĝia aperado estis regula, aperis unu nu-

mero ĉiu dumonato. Sed la numero 63a estis la sola dum la sesmonato julio-decembro de tiu jaro. Kiel ia kompenso por la legantaro ĝi havis 18 paĝojn anstataŭ la 12 de la ceteraj numeroj de tiuj jaroj. La numero 64a de la revuo normale revenis al la 12-paĝa normaleco kaj dumonateco (januaro-februaro 1969). Ĝi informis pri la modesta celebrado de la esperantista festo de 1988: florofero en la strato Esperanto kaj bankedo. Ĝi informis ankaŭ pri tio ke Julio Argüelles prelegis pri Esperanto en tri publikaj lokoj de nia urbo, kaj ke Santiago Mulas komencis gvidi novan E-kurson en Avilés.

Alia informo kiun liveras al ni tiu 64a numero de **HELECO** estis ke samideano Nicolás Muñiz, Prezidanto de la E-grupo **ANTAŬEN** de Avilés gajnis en televida konkurso altvaloran premion konsistantan en libroj en kaj pri Esperanto, kiun li transdonacis al la Kultura Servo de la magistrato de Avilés.

Pri tiu 64a numero de la revuo ni devas aldoni ke ĝi estis la lasta ellaborita de samideano Ildefonso Domínguez Losada. Li senlace plenumis tiun taskon dum dekdu jaroj kaj laŭlonge de tiu tempo li preparis 63 nu-

merojn de la gazeto. De tiam, kaj ĝis la nuntempo, okupiĝas pri tiu tasko Faustino Castaño. La ŝanĝo de redaktoro signifis ankaŭ ŝanĝon en la kapo-desegno de la titol-paĝo de la revuo. Sed estis pli gravaj ŝanĝoj. De tiam la revuo estas ellaborata tute per komputilo; antaŭe ĝi estis kvazaŭ manlaboraĵo, t.e. farita per skribmaŝino.

La 65a numero de **HELECO**, unua ellaborita de la nova redaktoro, informis pri la **Dua Astura Kongreso de Esperanto**, kiu okazis en Avilés dum la tagoj 22a kaj 23a de aprilo 1989. Tiu esperantista renkontiĝo estis sufiĉe brila ene de la modesteco de la teritoria amplekso de la koncerna esperantistaro (ne landa sed regiona, kaj krome de malgranda regiono kia Asturio). Partoprenis en ĝi, krom la gesamideanoj de Avilés kaj Gijón, ankaŭ iuj el aliaj regionoj.

Inter la debatoj de tiu kongreso estis planoj kaj projektoj pri starigo de multregiona E-organizaĵo nomata "Asocio de amikoj de Orienta Atlantiko".



Inter la partoprenantoj en tiu debato estis ia mal-konsento. Iuj opiniis ke ekzistis jam sufiĉe da asocioj kaj tamen malmulte da informado pri la Esp-Movado en tiaj asocioj. Ĉiukaze, la afero ne prosperis. Rigardata la afero ekde la perspektivo de la tempo pasinta de tiam, oni povas konkludi ke eble ne estis bone difinitaj aŭ tute ne ekzistis la komunaj celoj kiuj povus doni sencon al tiel ampleksa organizaĵo aŭ kunaĵo de E-grupoj apartenantaj al malsamaj landoj kaj kun la sola komuna trajto ke ĉiuj ili situas ĉe la Eŭropa bordo de la Atlantika Oceano.

La gekongresanoj estis poste akceptitaj de la urbestro de Avilés. En tiu protokola akto, Nicolás Muñiz profitis por donaci, por la koncerna kultura fako, la librojn kiujn li gajnis en la televida konkurso, kiujn la Urbestro akceptis kaj dankis. Post interparolado kun la urbestro kaj kun la ĵurnalistoj la gekongresanoj estis invititaj trinki aperitivon kun almanĝetoj en famkonata urba restoracio, kaj la Urbestro promesis nomi Esperanto unu el la stratoj de la urbo. Vespere S-ino Rafaela Urueña prelegis, hispane pri “Esperanto kaj internaciaj rilatoj”. Sekvintan tagon la gekongresanoj kune kun amaso da neesperantista publiko spektis artan kantadon far de la **Ĥoro de la Asturia Centro**.

Pri tiuj aktoj kaj aliaj pli malpli protokolaj kaj kutimaj en la kongresoj de Esperanto pli detale informas la menciita 65a numero de la revuo **HELECO**. Ĉi tie ni preferas atenti pri la kongresaj rezolucioj, kiuj estis jenaj:

1. **Peti de la Hispana Registaro, ke okaze de ĝia Prezidanteco en la Komuna Eŭropa Merkato, Hispanio proponu Esperanton kiel helplingvon por la rilatoj inter la landoj de tiu Komunumo.**
2. **Proponi Esperanton kiel parto de la lecionaro en la Baza Ĝenerala Instruado.**
3. **Aprobante la proponon de la Grupo “ANTAŬEN” por ke oni aljuĝu la Premion de la Konkordo “Princo de Asturio” al Esperanto, insisti per petskriboj al**

diversaj urbestroj por ke ili, siavice, esprimu sian apogon al tiu ĉi peto.

4. **Krei oportunan komisionon por iniciati la efektivigon de la propono pri ADLOE (Amikoj de la Orienta Atlantiko).**

5. **Sendi leterojn al la Moŝtoj Federico Mayor Zaragoza kaj Fernando Morán, al ili komunikante la rezoluciojn de la Kongreso.**

En iu akto de tiu kongreso en Avilés, la Prezidanto de **Astura Esperanta Asocio**, Santiago Mulas, anoncis ke la **Tria Astura Kongreso de Esperanto** okazos la senvan jaron en Gijón. La sama numero 65a de **HELECO** kiu informis pri la kongreso de Avilés inkludis jam alvokon al la gesamideanoj de nia urbo por partopreni en la organiz-laboro de tiu forumo.

La Universala E-Kongreso de tiu jaro okazis en Brajtono (Britio). El nia urbo partoprenis en ĝi Julio Argüelles, kaj iris ankaŭ kelkaj gesamideanoj el Avilés, kun sia Prezidanto Nicolás. Pri tiu vojaĝo amplekse raportis Julio en la 86a numero de **HELECO**. La esperantista festo aŭ Zamenhofa Tago de la jaro 1989 sekvis saman skemon ol la antaŭaj jaroj. Kunvenis en Gijón geesperantistoj el tiu-ĉi urbo kaj el Avilés, kaj post la ofero de florbukedoj en la strato Esperanto, la kunfestantoj partoprenis bankedon

en iu restoracio. Tie, antaŭ la bankedo estis disertacio, preskaŭ prelego, de iu franca samideano, Jean Françoise Bouyge, el Clermont Ferrand. Li estis juna studento kiu, por studi kaj praktiki la hispanan lingvon, ĉeestis kurson en nia urbo. Li raportis pri la Esperanto-grupo de lia franca urbo.

La 7an de februaro 1990 okazis ĝenerala kunveno de la membraro de **Astura Esperanta Asocio** por pritemi la tiaman ĉefan taskon de tiu E-rondo: la organizadon de la **Tria Astura Kongreso de Esperanto** en nia urbo. Oni prezentis la provizoran programon ellaboritan de la Organiza Komitato kaj oni kontrolis la staton de la organizado de ĉiuj planitaj programeroj.



En la Dua Astura Kongreso de Esperanto (Avilés, 1989)

Tiam ankoraŭ estis farotaj kelkaj demarŝoj, ĉefe por ricevi la necesajn mon-rimedojn kaj ceteran oficialan apogon (la kutimaj problemoj de ĉiuj kongresoj).

Sed antaŭ la priskribo de la kongreso, kiu okazis en oktobro, oni devas menciigi alian eventon kiu koncernas al la du E-grupoj de Asturio. La 29a al 30a de aprilo okazis en la urbeto "Piedras-Blancas" (Castrillón) la 10a datreveno de la interfratiĝo de tiu astura urbo kun la franca urbo Eysines.

La festado de la datreveno konsistis el du renkontiĝoj: la unua, tiu de Castrillón, kaj dua kelkajn monatojn poste en Eysines. Kelkcento da gefrancoj el Eysines kaj Bordeaux vizitis tiuokaze Castrillón. Ili estis akceptitaj, gastigitaj kaj regalitaj de proksimuma nombro da geasturanoj el tiu urbeto.

La festa programo de la renkontiĝo alĝustigiĝis al la modelo de tiaspecaj renkontiĝo-festoj inter ĝemelitaj urboj el malsamaj landoj. Sed ni iome atentis pri ĉi tiu urbfgrat-festo tial ke en ĝi estis io interesa de vidpunkto de Esperanto. Ne okazas ofte, almenaŭ ne en nia regiono, ke en tiaj renkontiĝoj partoprenu geesperantistoj el ambaŭ ĝemelitaj urboj. Ĉi-foje okazis renkontiĝo ene de la renkontiĝo. El Eysines venis tri samideanoj, kaj renkontiĝis kun ili gesamideanoj el la E-grupoj de la asturaj urboj Avilés kaj Gijón. Ĉiuj ili aperas en ĉi-paĝa fotografajo.

Kiel priskribi la diferencon inter ambaŭ renkontiĝoj, la esperantista kaj la ne-esperantista? Amikeco, afableco, reciproka simpatio kaj ĝentileco, ja, estis en ambaŭ kolektivoj kaj ĉiuflanke. Sed komunikado, vera interkomunikado, per flua interparolo kun konversacia interŝanĝo de informoj, konceptoj kaj opinioj, estis nur en la esperantista rondo. Ankaŭ la ceteraj interparolis, sed interparolis gefrancoj kun grfrancoj kaj gehispanoj



Zamenhofa Tago de la jaro 1989

kun gehispanoj. Por la ekster-nacia komunikado mankis al la ne-esperantistoj la lingva instrumento. Ĉiuj provoj uzi alies lingvon –ĉefe inter la gestudentoj kaj tiuj kiuj iam lernis la lingvon de

siaj fremdaj geamikoj – ĝenerale ne pasis el la ritualaj saluto-frazoj.

En tiaj okazoj la Internacia Lingvo atestas pri sia utileco, kaj tio devus esti evidenta por ĉiuj. Tamen la fakto mem de nia malgranda nombro ene de la tuta ĉeestantaro igas nin eĉ ne rimarkindaj. Fakte, la ge-

esperantistoj tie kunvenantaj pristudis tiun bazan problemon de la nia movado serĉante realigeblajn solvojn.

Samideanoj Gisele, Ginette kaj Ana kunvenis lunde la 30a de aprilo kun asturaj geesperantistoj. La kunveno estis tre agrabla kaj en ĝi oni interŝanĝis vidpunktojn rilate al la esperantista movado en Francio kaj en Hispanio. Gisele, nome de

la E-grupo de Eysines donacis por niaj grupoj bildkartojn kaj du belajn pergamenojn. La teksto de la pergameno destinita al la grupo de Gijón diras:

Al la gijonaj geesperantistoj

Okaze de la vojaĝo al Hispanio, kadre de la ĝemeliĝo Castrillon/Eysines, ni estas feliĉaj konatigi kun vi.

Delonge ni sopiris pri tia vojaĝo, do, hodiaŭ, ni transdonas al vi saluton de la tuta eyzina grupo.

Ni deziras realan komunan agadon per kaj pri Esperanto, kaj fruktodonajn inter-ŝanĝojn. Ni esperas ke tiu vojaĝo estos la unua el multaj aliaj, de Avilés al Eysines kaj inverse.

Ĝis la venonta fojo.

Elkorajn salutojn.

Esperanto-Grupo Eysines

Francio

Eysines, la 20an Aprilo 1990



Castrillón la 29a de aprilo de 1990. Francaj kaj asturaj gesamideanoj en ĝemeliĝ-festo de tiu urbo kun Eysines (Francio)



Julio de 1990. Foto de la partoprenantoj en la 49a Hispana Kongreso de Esperanto, en Sant Cugat del Vallés. Kelkaj membroj de la E-grupoj de Gijón kaj Avilés partoprenis en ĝi.

La informo pri tiu vizito estis prenita el la 69a numero de HELECO. En tiu sama numero de la revuo estas kelkaj artikoloj pritemante la procezon de politikaj ŝanĝoj tiam okazintaj en la socialista bloko de Orienta Eŭropo kaj ties politikan signifon. En la frontpaĝo de la revuo venis bildo de la afiŝo de la 3a Astura Kongreso de Esperanto kiu tiam estis preparata de la gijonaj samideanoj.

La kongresa programo estis sufiĉe ambicia, se konsideri ke temis pri regiona, ne landa kongreso. Fakte, ĝi enhavis tiom da aktoj kaj programeroj kiel la tritagaj landaj kongresoj. Ankaŭ ĝi estis tritaga, kaj havis ĉiujn elementojn ekzistantajn en la landaj E-kongresoj de la lastaj jaroj. Krome la nombro da partoprenantoj, eĉ se ne tiel granda kiel ties de la landaj kongresoj, tamen estis sufiĉe granda por regiona E-kongreso. Estis kongresanoj ne nur el la esperantistaj grupoj de Asturio sed ankaŭ de aliaj lokoj en la lando: Madrido, Valladolido, Kantabrio, Eŭskadio, Galicio...

Laŭ la tradicia kutimo de la kongresoj de Esperanto, ĉi tiu havis iu "Honora Komitato", en kiu estis la ĉefaj altranguloj kaj aŭtoritatoj, kiaj la Prezidento de la Asturia Princlando, la Urbestro de Gijón, la Direktoro de la Katedro Jovellanos k.a.

La Loka Kongresa Organiza Komitato estis:

- Prezidanto: Santiago Mulas Gallego.
- Sekretario: Julio Argüelles García.
- Kasisto: Ildefonso Domínguez Losada.
- Voĉdonanto: Faustino Castaño Vallina.
- Kunlaboranto: Nicolás Muñiz Alonso.

La kongreso okazis dum la tagoj 12a al la 14a de oktobro de tiu jaro 1990. Estis en ĝi laborsesioj: prelegoj, informado pri la agado de la Esperanto-grupoj de la regiono... Kaj estis ankaŭ la kutimaj distraj programeroj de la E-kongresoj: danc-spektaklo, turismaj vizitoj, meso en Esperanto, bankedo aŭ festa vespermanĝo...

Partoprenis en tiu kongreseto D-ro. Antonio Alonso Núñez, tiama Prezidanto de **Hispana Esperanto-Federacio**. Li prelegis pri la temo: *"Ĉu nova homa rajto?: la rajto je komunikado"* en kiu li pritraktis la lingvan problemon de la nuntempa mondo kaj la nekapablon ĝin solvi far de la

mondaj instancoj kiuj ne juste privaloras la rolon de Esperanto. Temante pri la ekzistanta komunikad-tipo, li diris ke ĝi iras de supre al malsupre kaj mankas en ĝi la vera interhoma komunikado je ĉiuj niveloj, kiu povas okazi nur tra rekta komunikado pere de komuna lingvo. En la 70a numero de HELECO, en kiu oni raportas pri la kongreso, estas ampleksa kaj detala recenzo de tiu interesa prelego kaj la riĉenhava debato kiu sekvis ĝin, en kiu oni pridiskutis la strategiojn per kiuj nia E-movado celu solvi la lingvan

haoson kaj la mankon je interkomunikado en la malfavoraj por ni cirkonstancoj de la nuna epoko. Ankaŭ la aliaj prelegoj de la kongreso estas detale recenzitaj en la menciita numero de la revuo.

Alia konferenco, ĉi foje en la hispana lingvo, estis tiu de D-rino. Rafaela Urueña, Profesorino pri Internacia Ĵuro. Ŝi prelegis, fakte, pri la sama



temo, sed rigardata de jurisprudenca vidpunkto. En sia parolado ŝi reliefigis la fakton ke kiam oni parolas pri nova internacia ekonomia ordo por reguligi la ekonomiajn interrilatojn de la evoluintaj landoj kun tiuj landoj kiuj ankoraŭ troviĝas en la disvolviĝa etapo, tamen preskaŭ tute ne oni temas pri la neceso je “nova monda ordo pri la informado kaj komunikado”. La prelego titoliĝis, precize, “Esperanto kaj la Nova Internacia Ordo pri Komunikado”. Ŝi analizis kiamaniere la diversaj leĝo-sistemoj estis alfrontantaj tiun defion de la epoko, kiam la alte evoluinta teknologio ebligis ian interkomunikadon, je tutmonda skalo, por kiu, tamen, oni ne trafe pri-konsideris la lingvan instrumenton.

Ŝi finis priskribante la rolon de Esperanto en la Nova Monda Ordo pri Informado kaj Komunikado kaj informante pri la entreprenitaj planoj kaj projektoj por uzado de Esperanto en la Eŭropa Unio.

Estis krome alia konferenco, kiu pli ĝuste povas esti konsiderata artaĵo. Miguel Fernández Martín, tradukinto al Esperanto de la verkaro de Federico García Lorca, amuzigis la gekongresanojn per sia prelego, fakte belletraĵo, titolita “Sur la spuroj de Federico García Lorca”. Krom priskribi la vivon kaj la verkaron de la andaluza poeto, la preleganto deklamis kaj kantis iuj poemetojn de tiu verkaro fajne esperantigita de li mem.

La kongresaj laborsesioj pritemis, ĉefe, la funkciadon kaj la problemaron de la esperantistaj organizaĵoj, speciale tiuj de la Asturia regiono: agado de la E-movado, organizado de kursoj, eldonado de la revuetoj de la E-grupoj... Estis tre utila en tiu studo la partopreno de gesamideanoj de aliaj regionoj: ili informis pri la propra sperto en tiu tereno de la funkciado de la E-grupoj kaj organizado de ties laboro. La Prezidanto de **Hispana Esperanto-Federacio** detale priskribis la

disvolviĝon de liaj planoj por la organizado de preuniversitataj kursoj de Esperanto. La membroj de la du asturaj E-grupoj pri-konsideris kun intereso tion kio povus utili al ili, al ni, por la tasko disvastigi Esperanton al tiuj zonoj de la regiono kie ankoraŭ ne ekzistis esperantistaj organizaĵoj. Menciindas ke ĉi tiu Tria E-kongreso de Asturio tre estis objekto de informado fare de la amas-komunikiloj. Presaro, Radio kaj Televido je regiona nivelo, sufiĉe anoncis la okazadon de la kongreso kaj informis pri ties disvolviĝo. La distraj programeroj de la kongreso estis same altnivelaj ol la prelegoj kaj laborsesioj. En la dua



En la Tria Astura Kongreso de Esperanto

kongrestago estis per-aŭtobusa dumvespera ekskurso tra la ĉirkaŭaĵoj de Gijón: Labora Universitato, kie oni faris la kongresan foton, apud-mara zono nomata “La Providencia”, antikva kvartalo “Cimadevilla”, kaj fine la okcidenta flanko de la urbo kie troviĝas monto ŝirmanta la havenon “Musel” kontraŭ la nordaj ŝtormoj. Kaj kiel kulmino de tiu bela ekskurseto, la gekongresanoj estis invitataj al “espicha-vespermanĝo” en iu restoracio. Kiel kutime, tiutipa vespermanĝo konsistis el drinkado de la tipa cidro de la regiono, kun manĝado de kolbasoj, kalmaroj, olivoj, sinko, frit-aĵoj...

Alia kongresa programero estis la meso en Esperanto kiu okazis en

preĝejo situanta ĝuste en la strato Esperanto. Kiam la kongreso estis jam tute finita oni faris alian akton ekster-programan kaj ne-atenditan de la gekongresanoj. Ĉi tiuj ricevis inviton de **Astura Esperanto Asocio** al alia espicha-vespermanĝo” ĉi kaze en la bieno de iu samideano de la E-grupo de Gijón, Faustino Castaño. Tie, meze de la tipe verda Asturia pejzaĝo, la gesamideanoj kiuj ankoraŭ ne estis reveninte al iliaj loĝlokoj, povis ĝui ankoraŭfoje la gajan etoson de la esperantistaj renkontiĝoj.



Gijón, oktobro 1990. Tria Astura Kongreso de Esperanto.

La 70a numero de la revuo HELECO prezentas ampleksan informon pri tiu regiona E-kongreso kaj, interalie, iomete pritemas ankaŭ la **75an Universalan kongreson de Esperanto** kiu tiujare estis Havano. La informo pri la **Tria Astura Kongreso de Esperanto** finas per la jenaj:

Konkludoj de la kongreso:

1e. Danki al la institucioj kaj al la Socio ĝenerale, ĉefe al la Urba Konsilantaro de Gijón, Katedro "Jovellanos" pri Universitata Disvastigo, Asturia Ŝparkaso, Agrokampara Ŝparkaso kaj Regiona Departamento pri Turismo, pro ties apogo por la celebrado de la kongreso.

2e. Danki al ĉiuj publikaj informiloj de la regiono pro ties atento kaj informado pri la kongreso kaj pri la problemoj de la internacia komunikado. Kadre de tiu procezo ASTURA ESPERANTO ASOCIO esperas ke la sukceso de ĉi tiu kongreso havu kiel fruktoj la realigon de Esperanto-kursoj pere de Radio kaj Televido samkiel estis dissenditaj per tiuj medioj aliaj kursoj pri fremdaj kaj regionaj lingvoj.

3e. Informi al la Institucioj kaj la Socio ĝenerale, ke la esperantista movado staras serve de la socio kaj ke sur tiu vojo oni entreprenas diversajn projektojn de kultura intereso, kiel la organizado, en nia lando, de internaciaj preuniversitataj kursoj en Esperanto, okazontaj en la jaro 1993. Por la sukceso de ĉi tiu plano, estas necesa institucia apogo kaj monhelpo,

kiel okazis en similaj projektoj. ASTURA ESPERANTO ASOCIO esperas ke ankaŭ en Asturio oni atingos helpon kaj kunlaboron por tiel ambicia projekto.

Post tiu regiona kongreso, ĝis nun okazis neniu alia en Asturio. Ne estas pliaj urboj kun esperantista organizaĵo. Ĝis nun fiaskis niaj klopodoj starigi E-grupon en Oviedo kaj/aŭ aliaj lokoj de nia regiono. Fakte, unu el la ĉefaj labor-sesioj de tiu Tria E-Kongreso de Asturio estis tiu en kiu oni pristudis la problemaron de la E-movado kaj ties disvastigo. En la informo pri **AEA**, la prezidanto, inter alie, diris:

Lastjare ni ne organizis E-kurson. La ĉefa tasko de ĉiu E-grupo, la disvastigo de la Internacia Lingvo, ne estis entreprenita de nia E-organizaĵo dum la lerno-kurso 1989-1990. Ne mankas al nia esperantista kolektivo la kapablo organizi E-kurso. Fakte, ekde la jaro 1975 ni ĉiujare gvidis bazan kurson de Esperanto, kaj iujare eĉ duan, progresigan kurson. Sed ni devas konstati kaj pristudi la fakton ke lasttempe draste malpliiĝis la nombro da personoj interesitaj pri la Esperanto-lernado. La lastaj kursoj de ni organizitaj altiris la atenton de nur tre malmultaj lernantoj, kiuj, multkaze, ne persistis ĝis la fino de la kurso...

Pri la revuo **HELECO** oni prenis en tiu kongreso la decidon ke ĝi estu du-lingva, en Esperanto kaj en la hispana lingvo, laŭ sugesto de la HEF-Prezidanto Antonio Alonso Núñez.

HELECO *organo de Heleco* **Evoluo de Heleco** *Astura Esperanto Asocio* Presorgano de Astura Esperanto Asocio

Ĉi tie ni pritraktas nur la gijonan kolekton de **HELECO**, flankenlasante la fakton ke sama titolo havis iam la bulteno eldonita de la E-grupo **La Verda Kolombejo** de El Entrego.

Ekde ĝia ekapero, en la jaro 1976, ĝis la nuntempo, la revuo **HELECO**, presorgano de la esperantista organizaĵo de Gijón, estis objekto de multaj kaj grandaj ŝanĝoj. La fakto ke unue ĝi estis presorgano de la **Esperantista Grupo Jovellanos** kaj poste de **Astura Esperanta Asocio**, ne estis grava ŝanĝo por la revuo ĉar ambaŭ organizaĵoj estis la sama, kiu ŝanĝis sian nomon. Jam ni menciis en la antaŭaj ĉapitroj kelkaj ŝanĝoj kiujn la revuo ricevis en la frontpaĝa titolo. Kaj ĝis la 70a numero, kiu informas pri la **Tria Astura Kongreso de Esperanto**, **HELECO** iomete kreskiĝis en kio rilatas al la nombro da paĝoj. La numero 70a havis 20 paĝojn, pli ol ĉiuj antaŭaj numeroj. En la sekvintaj numeroj pli kreskiĝis la paĝnombro, sed la ŝanĝoj kiujn ricevis de tiam la revuo havis alian karakteron kaj rilatis al gravaj zorgoj.

La startpunkto de tiu ŝanĝo-procezo estis, precize, la **Tria Astura Kongreso de Esperanto**. En tiu kongresa laborsesio, en kiu oni pritemis la problemaron de la E-movado, la informo de **AEA** estis tre akre kritika kontraŭ la propra bulteno de la asocio. Temante pri ĝi, la informo konkrete diras:

La eldonado de nia revuo eblas ĉefe dank' al la helpo de la Katedro "Jovellanos" pri Universitata Disvastigo, en kies sidejo troviĝas la ejo de nia Esperanto-Grupo kaj okazas nun ĉi tiu kongreso. Nia tasko estas verki la artikolojn, akcepti la kunlaboraĵojn kaj komposti la fotokopiendajn foliojn. Ĉi tiu laboro estus daŭriginda se la rezulto estus bonkvalita publikigaĵo utila por nia E-Movado. Tamen niaj gelegantoj bone scias ke ne estas tia la kazo de nia HELECO. Ĝi kontribuas neniom al la disvastigo de la Internacia lingvo kaj al la prestiĝo de nia Movado. Ĝia sola utilo estas la esprimo de la agado kaj la ekzistado mem de nia urba E-asocio. Debati pri la konveneco aŭ ne de la daŭrigo de tiu eldonado estas alia celo de la kongreso kaj konkrete de ĉi tiu kunsido.

En la debato kiu sekvis pri tiu temo, la ĝenerala opinio de la kunvenantoj estis ke ĝi prefere estu daŭrigata. La kvalito de ties enhavo devas esti pli-

bonigata, kaj ankaŭ ĝia ekstera, –presa– aspekto, kaj profiti la fakton ke la Katedro “Jovellanos” helpas nin en ĝia eldonado. Krome ĝi utilas por registri kaj reliefigi la agadon de nia grupo. Resumante ĉies opiniojn pri tiu temo, la **HEF**-Prezidanto, Antonio Alonso Núñez, diris: “Prefere konservi la revuon, eĉ en ĝia nuna formo, ol nenio”. Sed li aldonis sugestojn, unue pri la enhavo de la revuo, pri kiu li diris ke la eldonado devus esti dulingva... por plifaciligi la aliron al ne-esperantista publiko, kiu konstituas la terenon de nia disvastigo. La enhavo, kompreneble, devus temi pri gravaj informoj.

Akceptinte tiun proponon, la 71a numero jam estis du-lingva: Esperanta kaj hispanlingva. Tamen oni devas diri ke ĝi ne aperis ĝis la fino de la jaro 1991 kaj krome ne havis pli ol 18 paĝoj. Sed la pres-kvalito iom pliboniĝis. Ni jam diris ke ekde la 65a numero la revuo estis ellaborita tute per komputilo. Sed la presado de la kliŝoj estis farita per matrica presilo. Nu, la 71a numero havis kelkajn foliojn –ne ĉiuj– por kiuj oni uzis laser-presilon. Tiam ni ne disponis je tiu ilo, sed afable presis tiujn paĝojn Miguel Gutiérrez Adúriz per sia komputilo. La sistemo iome estis ĝeniga ĉar ni devis sendi al li la presigendan materialon, surgravuritan sur disketoj, per la ordinara poŝto –ĉar tiam ankoraŭ ne estis ĉe ni Interreto– kaj li sendadis al ni per la sama medio la presigitajn foliojn por ties multobligado ĉe la Katedro Jovellanos.

En la jaro 1992 estis eldonita neniun numero de **HELECO**. La numero 72a aperis fine de la jaro 1993, sed ĝi havis 38 paĝojn, kaj ĉiuj ili, escepte la frontpaĝo, estis bele skribitaj per la leserpresilo de samideano Adúriz kiu, krome, devis trakti niajn skribaĵojn per teksto-programo por la presado.

El la du-lingva **HELECO** ni presis pli da ekzempleroj ĉar estis destinita al pli ampleksa publiko ol antaŭe. Kiam ĝi estis nur esperant-lingva, ni presadis nur kelkdekon da ekzempleroj, por la membroj de la E-grupo kaj por iuj E-grupoj landaj kaj malmultaj eksterlandaj. Sed la du-lingveco estis precize por alveni al ne-esperantista publiko. Ni sendadis la revuon, krom al la antaŭaj kutimaj ricevantoj, ankaŭ al publikaj bibliotekoj, mezlernejoj, gimnazioj, civitanaj asocioj, sindikatoj, poli-

tikaj partioj... Nia E-asocio devis elspezi neniom ĉar la Katedro Jovellanos efektivigis la fotokopiadon de la revuaj folioj, sed ni devis pagi la afrankadon de la sendaĵoj, kaj tio postulis sufiĉe da mono. Tio eksplikas la malofteco de nia eldonado. Estis alia ŝanĝo en la revuo kiu, ankaŭ ĝi estis rezulto de la du-lingveco de eldonaĵo. Ĝi daŭre estis

priEsperanta kaj porEsperanta. Sed la por-Esperanta materialo dependas ĉu ĝi estas destinita al esperantista aŭ al neesperantista publiko. La esperantistoj jam konas multajn aferojn de la E-movado kiuj devas esti esplikataj al la ne-esperantistoj. La distingo iome efikas sur la enhavo de la revuo.

La 73a numero de HELECO estis eĉ pli multpaĝa: 40-paĝa, kaj estis la sola numero de la jaro 1993. Ĝia ĉefa temo estis la **78a Universala Kongreso de Esperanto** kiu, tiujare, estis en nia lando, konkrete en Valencio. Por la leser-presado de tiu revuo ne estis necesa la interveno de Adúriz. Tiam ni jam disponis de tia ilo kaj povis presi ĉiujn paĝojn tre altkvalite. Tiurilate ŝajnis ke ĉi tiu HELECO-numero devus esti plena sukceso sed tamen la afero ne estis tia: okazis vera katastrofo. La fotokopiilo de la Katedro Jovellanos tiam malbonstatis kaj ties servistino, spit' al ĉio, faris la multenombrajn fotokopiaĵojn kiuj, ja, estis vera fuŝaĵo. La presita teksto estis tre nigra, kaj la fotoj multe pli. Preskaŭ ĉiuj paĝoj estis malpure nigraj, ne indaj por prezentado kaj eĉ ne eble legeblaj. De tiam ni sciis ke ni ne plu povos kalkuli je la fotokopiado de nia revuo far de la Katedro. La revuo ne estis sendita al ties kutimaj ricevantoj; tiurilate oni povas diri ke la kolekto restis nekompleta. Post iom da tempo, elektante inter la malplej malpuraj paĝoj ni povis aranĝi iun ekzempleron relative akceptinda de la revuo por nia arkivo, ĉar krome ne eblis rehavi la kliŝojn. Tiun arkivan ekzempleron ni estas uzanta nun por meti ĝin en la interreta paĝo de nia Asocio. Kiam la

legantoj de tiu retpaĝo povos vidi tiun numeron de HELECO ili konstatos ke eĉ se la teksto de la artikoloj estas legebla, tamen la fotografaĵoj estas tro nigraj, escepte iuj kies bildo ni povis rekonstrui kaj kiuj aperas eĉ kolore. Celante plibeligi la eldonaĵon, en tiu numero kaj en la sekvaj por la kolekto en nia interreta paĝo estis iome kolorigitaj

laŭeble kvankam la eldonaĵo estis nigr-inka.

En la jaro 1994 ne estis eldonita iu ajn numero de HELECO. Post la fiasko en la fotokopiado de la antaŭa numero ni restis iom perpleksaj ne sciante kion fari, ĉu daŭre ellabori la revuon aŭ ne. Poste ni povis profiti okazon kiam tiu fotokopiilo de la Katedro funkciis relative kontentige.

En la 74a numero de la revuo estis raporto de Julio Argüelles pri la 79a Universala E-Kongreso, en Koreujo, kiun li ĉeestis. Estis ankaŭ kelkaj kontribuoj de Luis Serrano, inter ili iu resumo de la komenco de la E-movado en Hispanio, speciale destinita al la ne-esperantistaj legantoj de HELECO.

Post la eldonado de la 74a numero ni estis sen revuo dum kelkaj jaroj. Dum tiu tempo la E-grupo ne ĉesis funkcii. Daŭre estis E-kursoj eĉ se kun ne multaj gelemantoj.

Ankaŭ daŭris la kutimo festi la Zamenhofan tagon ĉiujare, meze de monato decembro. De tiu epoko la kutimo estis ke unu jaron la festado okazis en Gijón kaj sekvan jaron en Avilés. La membroj de ambaŭ asturaj E-grupoj kuniris en la koncertan urbon kaj tie estis ofero de florbukedo (En Avilés estis inaŭgirita parka promenejo kun la nomo Esperanto), poste estis meso en Esperanto kaj fine la

bankedo en restoracio. Restas al ni nur informi pri tio ke en ĉi tiu periodo, konkrete la 4an de aŭgusto de la jaro 1996, mortis samideano Adonis González Meana, kiu dum multaj jaroj aktivis en La Verda Kolombejo, de El Entrego, kaj en nia E-asocio en kiu li rolis en kiel Vicprezidanto.

Heleco



Pres-organo de:
Astura Esperanto-Asocio



Numero 73		Diciembre 1993	
Adreso de A.E.A. Strato Begolla, 25 33206 - GIJON Telefon-numero: 5 34 19 18		Dirección de A.E.A. Calle Begolla, 25 33206 - GIJON Teléfono: 5 34 19 18	
Enhavo	Paĝ	Contenido	
Rezoluĉio	2	Rezoluĉio	
Kongreso temo: Klerigo por la 21-a jarcento	3	Tema kongresala: Edukado por la siglo XXI	
Rendevus Tabalo	6	Tablo de Citas	
78-a U. Kongreso de Esperanto - Valencio	8	78º Congreso Universal de Esperanto - Valencio	
Salutoj al la Kongreso	11	Saludos al Congreso	
Premioj en la Belarta Konkurso Internacia Kongreso Universitato	13	Premios del Concurso de Bellas Artes Universidad Internacional del Congreso	
Historio de la Esperanto-Movado en Hispanio	14	Historia del Movimiento Esperantista en España	
Finitoj de la Komfort-Socio	16	Final de la Sociedad de Bienestar	
Klerigo por la 21-a jarcento en la interraciaj rilatoj	20	Educación para el siglo XXI en las relaciones internacionales	
TURKIO-vojaĝo	23	Viaje a TURQUÍA	
Anoncoj kaj komunikaĵoj	30	Anuncios y comunicados	
38			
La enhavo de la tekstoj de ĉi tiu revuo ne esprimas la oficialan opinion de A.E.A. Pri ili respondecas la verkintoj mem.		El contenido de los textos de esta revista no expresa la opinión oficial de A.E.A. De ellos responden sus autores.	
Leĝa Registro, n-ro 0/319/85		Depósito Legal, número 0/319/85	

Heleco



Pres-organo de:
Astura Esperanto-Asocio



Numero 74		Junio 1995	
Adreso de A.E.A. Strato Begolla, 25 33206 - GIJON Telefon-numero: 5 34 19 18		Dirección de A.E.A. Calle Begolla, 25 33206 - GIJON Teléfono: 5 34 19 18	
Enhavo	Paĝ	Contenido	
Miaj travivaĵoj dum la 79-a Universala Kongreso	2	Mis vivencias durante el 79º Congreso Universal	
Honore al D-ro Zamenhof	6	En honor del Dr. Zamenhof	
La hispanoj pri ni antaŭ 600 jaroj kaj pli malfrue	7	Los españoles acerca de nosotros desde hace más de 600 años	
Kultrante kun Pilar	11	Cocinando con Pilar	
La laboristaro kaj la Esperanto-Movado	12	Los trabajadores y el Movimiento Esperantista	
Paca preĝo	22	Oración de la paz	
Sinjoro Mulas kaj la malrapideco de lia fotomaldonado	23	El Sr. Mulas y la lentitud de su máquina fotográfica	
Interesa vojaĝadenturo enlande de Hispanio kaj en Maroko	24	Interesante viaje por España y Marruecos	
Historio de la Esperanto-Movado en Hispanio	30	Historia del Movimiento Esperantista en España	
38			
La enhavo de la tekstoj de ĉi tiu revuo ne esprimas la oficialan opinion de A.E.A. Pri ili respondecas la verkintoj mem.		El contenido de los textos de esta revista no expresa la opinión oficial de A.E.A. De ellos responden sus autores.	
Leĝa Registro, n-ro 0/319/85		Depósito Legal, número 0/319/85	



Dum la lastaj jaroj de la 20a jarcento nia Astura Esperanta Asocio plu ricevis vizitojn de landaj kaj eksterlandaj gesamideanoj.



Dum la jaroj 1991 al 1998 la gesperantistoj de Gijón kaj Avilés kunfestis la Zamenhofan Tagon alterne en ambaŭ urboj. La festado kutime estis meso en Esperanto kaj frata bankedo. Foje estis iu prelego aŭ simila kultura akto. Ankaŭ oferado de florbukedo en strato kaj placo Esperanto.



Dum la jaroj 1999 al 2005 la porEsperanta agado de **Astura Esperanta Asocio** estis konstituita de samaj taskoj kiel en la antaŭa periodo. Ni trarigardos ilin. Eldonado de la revuo **HELECO**: post kelkara ne-aperado de revuo, estis eldonita la 75a numero en decembro de la jaro 1999. Jam ni informis pri la malfacilaĵoj ekzistantaj por la eldonado kaj sendado de la revuo. Ekde tiu dato la afero iomete pliboniĝis: en la ses sekvintaj jaroj estis eldonitaj kvin numeroj de la revuo. Ili estas jam videblaj en la ret-paĝo de la Asocio. Oni povas konstati ke la nombro da paĝoj fluktuis inter 42 kaj 54, kaj krome ekde la 78a numero la frontpaĝo kaj la malantaŭa paĝo de la revuo estis koloraj. La eldonado de tiu revuo eblis dank' al la subvencioj kiujn nia E-grupo atingis de la Urbeŝtrara Komisiono pri Kulturo por tion fari. Sed oni ne pensu ke ĉiuj niaj problemoj tiurilate solviĝis. Fakte, la subvencio helpis sed tamen neniam sufiĉis por pagi ĉiujn ekzemplerojn kiujn ni devis sendi. **AEA** devis elspezi monon por kompletigi la pagon de la presitaj (fotokopiitaj) ekzempleroj kaj por ilin sendi perpoŝte al la legantoj.

Alia kutima tasko estis la kursoj de Esperanto. Dum la menciita periodo daŭre estis ĉiujare bazaj E-kursoj en nia ejo, kiujn gvidis Santiago Mulas, kaj estis ankaŭ, en du lerno-jaroj, progresigaj E-kursoj, gviditaj de Faustino Castaño, por la gelnantoj kiuj jam estis partoprenintaj en la unua kurso. Ne progresis, tamen, iu tiama provo nia de organizi E-kurson en Oviedo

Sed dum la jaroj 1999 al 2005 estis ankaŭ alia nova aktivado kiu neniam okazis ĉe ni antaŭ la jaro 1999 kaj ankaŭ ne post la jaro 2005. Temas pri la t.n. "Festo de la Lingvoj". La Festo de la Lingvoj estis ne-esperantista sed relative oficiala afero. Dum la tagoj 11a al 13a de marto de la jaro 1999 okazis la unua el tiuj festoj. Temis pri iu aranĝo kiu celis promocii la praktikadon de la idiomoj kaj la renkontiĝo inter kulturoj. La evento estis enkadrigita en Eŭrop-nivela programo celanta potenciigi la dinamikan praktikadon de lingvoj kaj montri la riĉecon de la kulturaj diferencoj kaj diversecon, disvolvigante la akceptemon kaj komunik-kapablon de la civitanoj, samkiel reliefigi kaj altiri la publikan atenton pri diversaj kul-

turaj iloj utilaj por aliri al la scipovo de fremdaj lingvoj.

Estas evidenta ke temis pri penado en la procezo de solvado de la lingva problemo en tiu Eŭropo kiu antaŭenmarŝadas al ĝia unuigo.

Nia esperantista asocio konsideris ke ni devis partopreni en tiu Festo kun nia mesaĝo "ke ekzistas kaj bone funkcias efika solvo por alfronti la lingvan diversecon de nia kontinento kaj de la mondo ĝenerale: **Esperanto**."

En nia stando en la festejo ni prezentis ampleksan kolekton de esperantista materialo: revuoj, ĵurnaloj, libroj, afiŝoj... Krome ni respondis la demandojn de la interesitaj personoj kaj disdonis inter la publiko ekzemplerojn de speciala broŝuro de **HEF** kaj flŭfoliojn ellaboritajn de ni mem, per kiuj oni informis pri la taŭgeco de **Esperanto** en ĉiuj sferoj de la homa vivo.

Inter la interesaj personoj kun kiuj ni kontaktis dum la deĵorado en nia stando estis speciale menciinda la kazo de Abelardo González, radio-parolisto de **RADIO SELE**. Tiu radio-stacio dissendadis laŭ modulita frekvenco sed aspiris tiam al pli potenca dissend-kapablo. La dissendado de tiu radio-stacio okazis, ĉefe, en la astura lingvo (Bablo). Tiu informilo troviĝis inter la asturiismaj instancoj kiuj volis labori por la rehavo kaj promociado de la kultura heredaĵo de nia regiono. Unuavide povas ŝajni ke la celo de tiu radiostacio tute kontraŭas la celon de internacia lingvo kia Esperanto, al kiu ni dediĉas nian atenton, intereson kaj laboron, kaj tamen la afero tute ne estas tia; tiu estas eraro, sufiĉe disvastigita. La defendo de la minacataj etnaj lingvoj kaj kulturoj tute ne kontraŭas la celon disvastigi internacian lingvon Ambaŭ lingvo-tipoj –la etnismaj kaj la internacia– rolas en sia specifa tereno. Esperanto celas esti ponto inter la diversaj lingvo-parolantoj, kiuj plenrajtas defendi kaj konservi siajn proprajn naciajn kaj etnismajn lingvojn. Menciinde estas ke Abelardo dissendadis tra **RADIO SELE** ĉiumerkrede je la 19a horo programon dediĉitan al Esperanto. En kelkaj sesioj de tiu programo intervenis membroj de la estraro de **Astura Esperanta Asocio** por diskonigi aferojn rilate al nia temo. Pri ĉio-ĉi amplekse raportis la 75a numero de **HELECO**.

Per la sama numero de la revuo ni informis ankaŭ pri tio ke la esperantista festo de tiu jaro okazis en Avilés, fajne organizita de la Prezidanto de la E-Grupo **ANTAŬEN**, Nicolás Muñiz. Sed, malfeliĉe, tiu kara samideano ne povis ĉeesti la festerojn. Ĝuste la antaŭtagon de la festo li suferis infarkton. Laŭ ekspresa deziro lia kaj de lia familio oni plenumis la planitan festo-programon. Iu el la programeroj estis meso en Esperanto. Dum tiu religia ceremonio la asturaj gesamideanoj speciale preĝis por la resaniĝo de Nicolás kaj poste iu delegacio de la ĉestantoj adresiĝis al la hospitalo kie li troviĝis; tie oni informis al ili ke la stato de la malsanulo estis mortdanĝera. Ĝuste tiutage, kiam ankoraŭ ne estis finiĝanta la bankedo de la geesperantistoj, ni eksciis pri la forpaso de tiu sindonema aktivulo de nia regiona E-movado.

En la jaro 2000 okazis la 2a Festo de la Lingvoj de la 14a ĝis la 17a de marto, unu tagon pli ol la antaŭa jaro. Nia **Astura Esperanta Asocio** partoprenis en ĝi per simila stando kiel tiu de la festo de la jaro 1999. Tie ni disdonis materialon propagandante pri la lingva solvo kiun konsistigas **Esperanto**. Unu el tiuj propagandiloj estis bildstria aranĝo kun teksto en Esperanto kaj en la hispana lingvo entenantanta mesaĝon pri la utileco de la Internacia Lingvo.

Kadre de nia partopreno en tiu Festo de la Lingvoj okazis prelego de nia samideano D-rino María José Álvarez Fado pri la temo "Necesito de internacia lingvo tra la historio". La kompletan tekston de la prelego oni povas vidi en la 75a numero de **HELECO**.

Krome, apartaj grupoj de gestudentoj kaj gelernantoj vizitantaj nian standon ricevis iaspecan unuan lecionon pri la esperantaj kulturo kaj lingvo.

Alitipa agado, ankaŭ cele de la propagando kaj diskonigo de nia afero, estas tiu rilate al la inform-

medioj. En tiu jaro 2000, membroj de la estraro de **AEA** estis intervjuataj de **RADIO-SELE** kaj la Gijona Televido. Ni profitas tiajn okazojn por diskonigi nian mesaĝon ke ekzistas lingva solvo por la interrilatoj inter la homoj de la diversaj popoloj kaj kulturoj.

La 54-paĝa numero 76a de **HELECO**, en kiu oni informas pri la okazintaĵoj de la jaro 2000, publikigas ampleksan intervjuon al Faustino Castaño pri la **59a Hispana Kongreso de Esperanto**, okazinta en la apudMadrida urbo de San-Sebastián-de-los-Reyes, kiun li ĉeestis, kaj alia al Julio Argüelles pri la **85a Universala Kongreso de Esperanto**, okazinta en la

Israela urbo Tel-Aviv, en kiu li partoprenis.

Ĉio koncerne al la vivo de nia E-grupo, kaj de la Asturia esperantismo ĝenerale, inter oktobro de la

jaro 2000 kaj oktobro de 2001 estas priskribata en la 77a numero de **HELECO**, ankaŭ ĝi 54-paĝa. Dank' al tiu fonto ni povas informi ke la Zamenhofa Tago de la jaro 2000 okazis en Gijón, kun ĉeesto de geesperantistoj el la du asturaj urboj kie estas E-grupoj. Estas en nia fotokolekto iu fotografajo de la partoprenintoj en tiu festo, farita en la strato Esperanto. Ni publikigas tiun foton en la sekva paĝo. Sed estas tie alia foto, tiu de samideano Alcibiades González Meana. Estas grava kialo por speciale memori pri li ĉiokaze. La 10an de decembro de la jaro 2000 li forpasis en Oviedo, estante 83-jaraĝa. Lia nomo estas ligata al la renaskiĝo de

la esperantisma movado en Asturio post la kolapso kiun signifis por la internacia lingvo en Hispanio la Civila Milito. Kune kun sia frato Adonis kaj aliaj simpatiantoj de nia afero, li fondis en El Entrego (Langreo) iun Esperanto-grupo kiu jam ne plu ekzistas sed kies membraro nutris nian gijonan E-grupon antaŭ kelkaj jardekoj. Alcibiades estis dumlonge kunlaboranto de nia revuo ĉefe en temoj pri arto kaj literaturo.



Nicolás Muñiz



En la jaro 2001 ripetiĝis nia partopreno en la Festo de la Lingvoj de nia urbo. Laŭ la propagando far de ties organizintoj, la festoj celas promocii la lernadon kaj praktikadon de idiomoj. Verdire, oni intencas konsciigi la gestudentojn kaj ĝenerale la tutan loĝantaron, pri la lingva problemo.

Lingva problemo de la mondo, sed konkrete de tiu-ĉi Eŭropo kiu antaŭenmarŝas al sia unuiĝo. Menciindas ke spite al la granda oficiala apogo kiun ĝuas la Festoj de la Lingvoj, mankas la amasa

apogo de la publiko en la agado de la festoj, sed la institucia apogo garantiis konkretan tipon je ĉeestantaro, nome, gelernantaro, la gestudentoj de diversaj lernejoj kaj gimnazioj, tiel de nia urbo kiel de aliaj lokoj de nia regiono. Dum la kvar tagoj de la festo-daŭro de tiu jaro senĉese defilis tra la festejo iu juneca publiko al kiu oni povis prezenti ian realaĵon kaj ian lingvan problemon pri kiuj ĝi estis koninta nenion antaŭe. La lernejoj kaj la instruaj medioj povas multe fari por konsciigi la gelernantaron pri la eŭropa situacio rilate al la lingva afero kaj promocii konvenajn solvojn.

Sed oni ne pensu ke tiu festa aranĝo rekte favoras nia esperantistan aferon. La internacia lingvo kiun ni vartas devas konkuri kun aliaj pensoj en tiuj medioj kiaj la Festo de la Lingvoj kiun ni priskribas. Al ni oni permesis diskonigi nian mesaĝon, sed, fakte, la ĉefa solvo kiun ŝajne volas promocii la organizantoj kaj la oficialaj apogantoj de tiu festa aranĝo estas la plurlingvismo, la lernado de kelkaj lingvoj, kaj inter ili, ĉefe... la angla. En la 77a numero de nia revuo, pritraktante ĉi tiun aferon, estas sufiĉe ampleksa rezonado nia kunfrontante la lingvan solvon, kiun ni proponas,

kontraŭ la multlingveco aŭ plurlingveco implicate proponita de la gvidaj sferoj de la socio.

Por la propagando favore al Esperanto en nia stando ni preparis kelkan materialon. Unue estis alia bildstria aranĝo simila al tiu de la antaŭa jaro, kun dulingva teksto. Sed estis krome aliaj folioj

per kiuj ni montris pere de bildaj kaj tekstaj ekzemploj la facilecon de la internacia lingvo: verboj, sufiksoj... Tiun materialon ni abude disdonis al la vizitantoj de la stando, ĉefe al la gestudentoj. Ankaŭ dum tiu jaro 2001 la informmedioj de nia

urbo sufiĉe okupiĝis pri ni kaj traktis nin favore. La 4an kaj la 5an de septembro la Gijona televido dissendis programon de intervjuo farita al kelkaj estraranoj de **Astura Esperanta Asocio** temante pri la internacia lingvo.

Same la tagĵurnalo de nia urbo, **El Comercio**, publikigis la 26an kaj la 27an de septembro artikolojn pri Esperanto kaj intervjuojn faritajn al membroj de nia E-grupo. En ĉi tiu paĝo ni prezentas fotografiaĵon kiun oni faris al ni por la revuo de iu organizaĵo, **PM40**, iu asocio de senlaboruloj kiuj aĝas pli ol 40 jarojn.

La sekvan jaron, 2002, la Festo de la Lingvoj daŭris unu tagon pli ol la antaŭaj. Ĝi okazis dum la tagoj 11a al la 15a de marto. Nia partopreno en ĝi estis eĉ pli intensa ol dum la antaŭaj tri Festoj de la Lingvoj. La termino "festo" aplikata al tiu-ĉi aranĝo rilatis al tio ke estis ludo-tipaj plejparto el la aktoj kiuj konstituas ĝin eĉ se la celo kaj la enhavo de tiu fojro pli koncernis al studo, erudicio, laboro... Verdire, la ĝenerala publiko ne interesiĝis pri ĉi-tipaj foiroj celante kulturalan disvolviĝon. Sed estis granda ĉeestantaro konstituita de "kaptita" publiko konsistanta el

gelernantoj kaj gestudentoj kiuj tiamaniere ĝuis ion kvazaŭ ferio-tagon.

Samkiel la antaŭajn jarojn, nia **Astura Esperanta Asocio** partoprenis en la festo por plu propagandi inter la juna publiko pri nia lingva afero. Same kiel en la antaŭaj festoj, ankaŭ ĉi jare ni prezentis bildstrian

rakonteton portante mesaĝon favore al komuna, facila kaj neŭtrala lingvo por internacia uzado. Ni uzis lerno-materialon speciale preparitan por tiaj specaj okazoj, kiel tiuj Festoj, kie ne eblas diserti dumlonge pri la temo ĉar la fluo de la gevizitantoj estis vigla kaj intensa.



En la strato Esperanto de Gijón.
Festante la Zamenhofan Tagon de la jaro 2000



Alcibiades G. Meana



La Prezidantino de PM40 intervjuis estraranojn de AEA por la revuo de sia Asocio.

MI NOMIGAS JOHANO KAJ ESTAS ESPERANTISTO DE GIJÓN
Je, frijara okazas en ĉi-tiu urbo, la "Festo de la lingvoj!"
Fues sí, por tercer año tiene lugar en esta ciudad la "Fiesta de las lenguas."
Me llamo Juan y soy un esperantista de Gijón.

GIJÓN 13,14,15,16 Marzo 2001
1907-2007 60 ANIVERSARIO DEL ESPERANTO
LENGUAS: Organizada por la Unión Europea y el Consejo de Europa.

Ĉi-tiu aranĝo celas la promociadon de la lernado de lingvoj fare de la publiko.
Este festival pretende promover el aprendizaje de idiomas por parte del público.

Krome, ĉi-jare tiu festo okazas ĉe la ĉefa pordo de la celebrado de la Eŭropa Jaro de la Lingvoj, ĉu ne?
Además este año la fiesta se enmarca en la celebración del Año Europeo de las Lenguas, 2001 es así?

Ĝes, la Eŭropo celanta sian unuigon devas affronti la defion de la multilingveco
Si; la Europa que aspira a su unificación debe afrontar el reto del multilingüismo

La laboristoj kaj la civitanoj de ĉiuj eŭropaj landoj devas batali kune pro nia komuna problemaro
La forĝo de la interŝtataj limoj estas nenio se dume persistas la lingvaj baroj.

Ni, la eŭropanoj, ne komprenas unu la alian...
All la Eŭropa Unio estas koverna kio panta lingvo facila kaj neŭtrala.

LABORO SOLIDARECO
Los trabajadores y los ciudadanos de todos los países europeos debemos luchar juntos por nuestra problemática común

La eliminación de las fronteras no resuelve nada si persisten las barreras lingüísticas.
Los europeos no nos comprendemos unos a otros...
A la Unión Europea conviene una lengua puente fácil y neutral.

La personaj inter-rilatoj, la amikeco trans la landlimoj kaj ceteraj baroj...
Las relaciones personales, la amistad sobre las fronteras y demás barreras...

ANKAU POR LA TURISMO...
También para el turismo...

60a Hispana Esperanto-Kongreso
San Javier, 13-16 de Julio 2001
86-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO 13-16 julio 2001 Zagreb, Kroatio
77-a Internacia Kongreso de Esperanto Fiesta, 20 julio - 1-a aŭgusto 2001

El Movimiento Esperantista difunde esta Lengua Internacional

ĜALUTON, AMIKINDO BONE KE VI VENIS AL GIJÓN POR VIDI LA 4-an FESTON DE LA LINGVOJ!
¡SALUDOS, AMIGOS! QUÉ BIEN ME VISTE A GIJÓN PARA VER LA 4ª FIESTA DE LAS LENGUAS!

VI SCIAS KE NENIEL MI KONSENTUS PERDI TIUN OKAZAJON.
SABES QUE DE NINGUN MODO ME PERMITIRIA PERDER ESA OCASION

KROME TRE PLACAS AL MI VIZITI TIUN URBON ESTAS EN ĜI MULTAJ BELAJ KONSTRUKTAĴOJ!
ADEMÁS ME GUSTA MUCHO VISITAR TU CIUDAD. HAY EN ELLA MUCHOS EDIFICIOS BONITOS.

ĈU JARE OKAZIS IO EKS-TRAORDINARA? NE ESTAS TROBODINDA? LA AŬTO NECESAS ĈANGI AL AŬTO ALIENIGI ALVIŜI LAŬTO!
ESTE AÑO OCURRIÓ ALGO EXTRAORDINARIO. NO FUE NECESARIO CAMBIAR EL DINERO CUANDO LLEGUE A TU PAÍS.

KOMPRENIBLE, NUR LA SAMA MONDO LA SAMA VERTUO LA EGRO. ESTAS UZATA EN ĈIuj LANDOJ DE LA EŬROPA UNIO DE NIAK, ESTAS KONFERCA KAJ MONA UNUE-TO EN ESPANO.
Y SIN EMBARGO, SIGUE SIN HABER UNIDAD LINGÜÍSTICA EN NUESTRO CONTINENTE...
CLARO, AHORA EL MISMO DINERO LA MISMA DIVISA EL EURO, SE UTILIZA EN TODOS LOS PAISES DE LA UNIÓN EUROPEA. TENEMOS UNIDAD COMERCIAL Y MONETARIA EN EUROPA.

KAJ SIBARE DEVOS BESTI TIU ĈU LINGVA NACIA, ETNIA... ESTAS KULTURA HEREDAĴO DE LA KONSTRUKTA KOMUNISMO. TIUJ LINGVOJ NE DEVOS MALPARI KIEL MALKONFER- LA MON-VALUTOJ DE LA EŬROPAJ LANDOJ!
Y DEBERA SEGUIR SIENDO ASÍ. CADA LENGUA NACIONAL, ETNICA, ES UNA HERENCIA CULTURAL DE LA COMUNIDAD CORRESPONDIENTE Y NO DEBEN DESAPARECER COMO LAS UNIDADES MONETARIAS DE LOS PAISES EUROPEOS.

SED PĴI KAJ PĴI FARIBAS NECESA LA INTER-KOMUNIKADO DE LA HOMOJ DE TIUJ LANDOJ!
PERO SE HACE CADA VEZ MÁS NECESARIA LA COMUNICACIÓN ENTRE LA GENTE DE ESOS PAISES.

TĴAL ESTAS NECESA LA PENO KAJ FACILA, KIA ESPERANTO.
POR ESO ES NECESARIO ALGÚN ESFUERZO INTENTANDO APRENDER LOS IDIOMAS DE OTROS...

KAJ ĈE ESTAS LA SOLVO DE KOMUNA LINGVO, NEUTRALA KAJ FACILA, KIA ESPERANTO.
Y SOBRE TODO, ESTÁ LA SOLUCIÓN DE UNA LENGUA COMÚN, NEUTRAL Y FÁCIL, COMO ESPERANTO.



Krom tiu laboro, realigita en la stando, ni disvolvis alian agadon. Konkrete, ni organizis prelegon pri la temo kiun ni titolis "Necese je komuna lingvo". Tiu-ĉi prelego pri Esperanto okazis en la lasta tago de la Festo. La temo estis prezentita de samideanino de nia E-grupo, María del Mar Pescador, Magistrino pri Psikologio. La numero 78a de HELECO tre detale raportas pri tiu Festo de la Lingvoj kaj nia partopreno en ĝi. Kaj krom aliaj artikoloj, kontribuajoj kaj interesaj temoj, priskribas ankaŭ la vivon de la E-grupo ekde oktobro de la jaro 2001 ĝis oktobro de 2002. Same, la 79a numero de la revuo okupiĝis pri jara periodo de oktobro al oktobro. Kaj ankaŭ en tiuj du jaroj, 2003 kaj 2004, estis Festo de la Lingvoj similaj al la ĝis nun prirakontitaj, kun simila partopreno nia.

En la jara asembleo de AEA de dato 6a de februaro de 2003, interalie, estis renoviĝo de la estraro, kiu konkretiĝis en la reelekto de Faustino Castaño kiel Sekretario kaj Julio Argüelles kaj Pilar Moro kiel voĉdonantoj. La revuaj numeroj de tiuj jaroj sufiĉe priskribis ankaŭ la landajn kaj la universalajn kongresojn de




Prelegas Maria del Mar Pescador

Esperanto. Pri la universalaj indas mencii ke kutime partoprenis en ili Julio Argüelles, membro de nia E-asocio. Sed en la jaro 2004 ni ne eldonis la revuon. La malfacilaĵoj fariĝis ne-elteneblaj. La subvencioj fare de la priKultura Komisiono de la Gijona Urbestraro malpliĝis kaj la eldonado de HELECO fariĝis tre multekosta por nia E-asocio. Krome ni konstatis ke la sistemo sendi ekzempleron de la revuo al tiom da lernejoj kaj organizaĵoj ne alportis la esperitan rezulton de kreskiĝo de la publika kono pri Esperanto. Ni venis al la konkludo ke la revuoj senditaj al la lernejoj kaj gimnazioj, fakte, neniam alvenis al la manoj de la gelnantoj kaj gestudentoj. Multaj el tiuj ekzempleroj eĉ ne estis eksponitaj en la lernejaj bibliotekoj. Ni devis affronti tiun realaĵon kaj formuli alian strategion por la diskonigo de la internacia lingvo en la socio. Tio estis pli necesa de tiam se konsideri ke post la Sesa Festo de la Lingvoj, en la jaro 2004, oni ne plu organizis tiun aranĝon kiu tre utilis al ni, dum ses sinsekvaj jaroj, por amase propagandi kaj informi pri nia afero, eĉ se la tasko estis tre peniga kaj intensa laborado dum kvar aŭ kvin tagoj




En la festoj de la Lingvoj, dum ses sinsekvaj jaroj. Presentado de Esperanto al la vizitantaj gelernantoj.

Verbos



LA VIRO PORTAS LA SAKON LA SAKO ESTAS PORTATA	LA VIRO PORTIS LA SAKON LA SAKO ESTIS PORTATA	LA VIRO PORTOS LA SAKON LA SAKO ESTOS PORTATA	LA VIRO PORTUS LA SAKON LA SAKO ESTU PORTATA	PORTU LA SAKON LA SAKO ESTU PORTATA

Sufijo -er elemento



LI PUBAS	LI TIRAS	LI LEVAS	LI MALLEVAS	LI GRIMPAS	LI DRONAS	LI OLITAS	LI NAĜAS
LI PALAS	LI PENDAS	LI SALTAS	LI RAMPAS	LI JETAS	LI EKZERĜAS	LI LUDAS	LI PORTAS
LI BORMAS	LI DANĜAS	LI RIDAS	LI PLORAS	LI PREĜAS	LI RAJĜAS	LI TENAS	LI VETURAS

I OS AS IS U US

AMI	ANOS	AMAS	AMIS	AMU	AMUS
DIRI	DIROS	DIRAS	DIRIS	DIRU	DIRUS
DONI	DONOS	DONAS	DONIS	DONU	DONUS
ESTI	ESTOS	ESTAS	ESTIS	ESTU	ESTUS
FALI	FALOS	FALAS	FALIS	FALU	FALUS
HAVI	HAVOS	HAVAS	HAVIS	HAVU	HAVUS
KURI	KUROS	KURAS	KURIS	KURU	KURUS
LUDI	LUDOS	LUDAS	LUDIS	LUDU	LUDUS
METI	METOS	METAS	METIS	METU	METUS
RIDI	RIDOS	RIDAS	RIDIS	RIDU	RIDUS
SIDI	SIDOS	SIDAS	SIDIS	SIDU	SIDUS
TENI	TENOS	TENAS	TENIS	TENU	TENUS
VOLI	VOLOS	VOLAS	VOLIS	VOLU	VOLUS

MIN·VIN·ĜIN·ILIN·SIN·LIN·NIN

MI LAVAS MIN	VI LAVAS VIN	LI LAVAS ĜIN	SI LAVAS SIN	TI LAVAS LIN	NI LAVAS NIN
MI LAVAS MIN	VI LAVAS VIN	LI LAVAS ĜIN	SI LAVAS SIN	TI LAVAS LIN	NI LAVAS NIN

SIN


LI LAVAS SIN	SI LAVAS SIN	TI LAVAS SIN	NI LAVAS SIN	LI LAVAS SIN	SI LAVAS SIN

Español	Francés	Inglés	Italiano	Esperanto					
pan	miga	pain	mie	bread	crumb	pane	briciola, mollica	pano	panero
agua	gota	eau	goutte	water	drop	acqua	gocciolo	akvo	akvero
arena	grano	sable	grain	sand	grain	sabbia	acino	sablo	sablero
dinero	moneda	argent	monnaie	money	coin	denaro, soldi	soldo	mono	monero
fuego	chispa	feu	étincelle	fire	spark	fuoco	scintilla	fajro	fajrero
cadena	estabón	chaîne	chainon	chain	link	catena	anello	ĉeno	ĉenero
nieve	copo	neige	flocon	snow	snowflake	neve	fiocco	neĝo	neĝero
lluvia	gota	pluie	goutte	rain	drop	poggia	gocciolo	pluvo	pluvero
pavimento	adoquín	pavage	pavé	pavement	paving stone	pavimento selciato	selce	pavimo	pavimero
madera	viruta	madère	copeau	wood	shaving	legno	truciolo	ligno	lignero
polvo	mota	poussière	poudre	dust	mote	polvere	polvere	polvo	polvero
lana	hebra	laine	brin	wool	thread	lana	gugliata	lano	lanero
hierba	una hierba	herbe	herbe	grass	grass	erba	erba	herbo	herbero
maiz	grano	maïs	graine	maize	grain	mais	grano	maizo	maizero
granizo	grano	grête	graine	hail	hail	grandine	grandino, chicco	hajlo	hajlero
arroz	grano	riz	graine	rice	grain	riso	grano	rizo	rizero
cereal	grano	céréale	graine	cereal	grain	cereale	grano	grano	grenero
paja	una paja	paille	paille	straw	straw	paglia	paglia	pajo	pajlero
separar	demenzajar	séparer	émietter	to separate	to crumble	separate	sminzare	disigi	diserigi
hoja	cada una de las hojitas constitutivas de una hoja compuesta, como por ejemplo, las de la acacia.							folio	foliero

Sufijo -ist profesión



Sufijo -ej lugar



Español	Francés	Inglés	Italiano	Esperanto					
trabajo	obrero, trabajador	travail	travailleur	work	worker	lavoro	lavoratore	laboro	laboristo
flor	florista	fleur	fleuriste	flower	florist	fiore	florista	floro	floristo
diente	dentista	dent	dentiste	tooth	dentist	dente	dentista	dento	dentisto
mar	marinero	mer	marinier	sea	marine seaman	mare	marinaro	maro	maristo
reloj	relojero	horloge	horloger	clock	clockmaker	orologio	orologiaio	horloĝo	horloĝisto
puerta	portero	porte	portier	gate	porter	portier	portiere	pordo	pordisto
tambor	tamborilero	tambour	tambourinaire	drum	drummer	tamburo	tamburo	tamburo	tamburisto
escritor- artista	autor	écrivain	écrivain	work of art	author	œuvre	skritore	verki	verkisto
enseñar, instruir	profesor, maestro	enseigner	instruire	to teach	teacher	instruire, insegnare	istruttore	instrui	instruisto
cocinar	cocinero	cuire	cuisinier	to cook	cook	cuinare	cuoco	kuiro	kuiristo
curar	médico	guérir	médecin	to cure	medical	curare, sanare	medico	kuraci	kuracisto
deporte	deportista	sport	sportif	sport	sports	sport	sportivo	sporto	sportisto
vender	vendedor	vendre	vendeur	to sell	selling	vendere	venditore	vendi	vendisto
cantar	cantante	chanter	chanteur	to sing	singer	cantare	cantante	kanti	kandisto
asar	hornero	rôtir	rôtisseur	to roast	roasting-jack	arrostitore	fornaio	baki	bakisto
granja	granjero	ferme	fermier	farm	farmer	fattoria	fattore	farmo	farmisto
farmacia, botica	farmacéutico, boticario	pharmacie	pharmacien	pharmacy	pharmacist	farmacia	farmacista	apoteko	apotekisto
banco	banquero	banq	banquier	bank	banker	banco	banchiere	banko	bankisto
danza, bailar	bailarin	danser	danseur	to dance	dancer	ballare	ballerino	danci	dancisto
ojo	oculista	oeil	oculiste	eye	oculist	occhio	oculista	okulo	okulisto
foto	biógrafo	photo	photographe	photo	photographer	foto	fotografista	foto	fotoisto

Español	Francés	Inglés	Italiano	Esperanto					
estudiar	escuela	étudier	école	to study	school	studiare	scuola	lerni	lernejo
cocinar	cocina	cuire	cuisine	to cook	kitchen	cocinare	cucina	kuiro	kurejo
beber	bar, taberna	boire	bar	to drink	bar, tavern	bere	bar, bettola	drinki	drinkejo
comer	comedor	manger	salle à manger	to eat	dining-room	mangiare	sala da pranzo	manĝi	manĝejo
nadar	piscina	nager	piscine	to swim	swimming-pool	nuotare	piscina	naĝi	naĝejo
rezar	templo, iglesia	prier	temple, église	to say	church	pregare	templo	preĝi	preĝejo
libro	librería	livre	libraire	book	bookcase	libro	libreria	libro	librejo
soldado	cuartel	soldat	quartier	soldier	barracks	soldato	caserma	soldato	soldatejo
tumba, sepultura	ceneterio	tombe	cimetière	tomb	cemetery	tomba, sepoltura	cimitero	tombo	tombejo
jugar	sala de juegos	jouer	récréatif	to play	playing-field	giocare	salone dell gioco	ludi	ludejo
café	cafetería	café	caféier	coffee	coffee house	caffè	buffet	kafo	kafejo
horniga	horniguero	fourni	fournilière	ant	ans' nest	formica	formicaio	formiko	formikejo
caballo	cuadra	cheval	écurie	horse	stable	cavallo	stalla	ĉevalo	ĉevalejo
cerdo	pocilga	porc	porcherie	pig	pigsty	porco	porcile	porco	porkejo
toro	establo	taureau	étable	bull	cowshed	toro	stalla	bovo	bovejo
paloma	palomero	colombe	colombier	pigeon	pigeon loft	colomba	colombais	kolombo	kolombejo
perro	perreira	chien	chenil	dog	kennel	cane	canile	hundo	hundejo
cordero	aprisco	agneau	bergerie	lamb	sheepfold	agnello	stalla	ŝafo	ŝafejo
gallina	gallinero	poule	poulailler	hen	henhouse	gallina	pollajo	kokino	kokinejo
apacentar	pradera	paître	prairie	to pasture	grassland	pascolare	prato	paŝti	paŝtejo
	senda	aller	sente	to go	path	andare	sentiero	iri	irejo

Parto el la lerno-materialo uzita en la Festoj de la Lingvoj por montri al la gestudentoj la facilecon de Esperanto.



En interreto



En la Ĝenerala Asembleo de la membroj de la Asocio, de dato 17a de februaro de 2005, oni renovigis la estraron, kiu restis tiele: Prezidanto: Santiago Mulas Gallego, Sekretario: Faustino Castaño Vallina, Kasisto: Juan Manzano Bartolomé, Bibliotekisto: Ángel García Sánchez, Voĉdonantoj: Carlos Enrique Carleos Artime, María del Mar Pescador Benavente, Cristina Díez Álvarez-Cienfuegos, Alejandro Rodríguez kaj María Luisa Castaño.

Post la jaro 2004 sen revuo, la numero 80a de **HELECO** estis eldonita en oktobro de la jaro 2005. Ĉi foje la eldonado eblis dank' al la Katedro Jovellanos kiu, tiam, disponis de bona fotokopiilo. El la Komisiono pri Kulturo de la Urbeŝtaro ne eblis ricevi subvencion kiu kompensu la elspezon de la fotokopiado. Iu novaĵo de tiu numero de la revuo estis ke ĝi estis tute kolora, sed tio ne povis esti perceptata de la ricevantoj de la revuo, ĉar la fokopiaĵoj de la paĝoj estis blank-nigraj; pro la alta kosto, nur la fronta kaj la dorsa paĝoj estis presite kolore. Sed oni povas vidi en sia kolora versio en la interreta paĝo de nia Asocio, ĉar la ĉefa karakterajo de ĉi tiu lasta periodo de nia jarcenta historio estas tio ke **Astura Esperanta Asocio** eniris en **Interreton** kun propra paĝo, en kiu ni metas ne nur la revuon sed multe da materialo kiu rilatas ne nur al **Esperanto** sed al ĉiu ajn afero.

Iu el la pri Esperantaj aferoj estis la raportoj de la festado de la Zamenhofa Tago far de la asturaj geesperantistoj. Ekde la festo de la jaro 2003, la membroj de **Astura Esperanta Asocio** de Gijón kaj **ANTAŬEN** de Avilés povas eltiri el tiuj subpaĝoj la fotojn kiujn ili dezirus, ĉar la raporto ne estas nur priskribado de la festoj sed ankaŭ, kaj ĉefe, kolekto de la fotoj faritaj dum la festado.

La ĉefa temo de la numero 80a de **HELECO** estis la verko de Cervanto, DonKihoto, ĉar en tiu jaro 2005 oni festis la 4an Centjaran Jubileon de la unua eldono de la unua parto de tiu majstrverko de la hispana literaturo.

Dum la lernojaroj 2004-2005 kaj 2005-2006 daure estis la E-kursoj gvidataj de Santiago Mulas.

La 30an de marto de 2006 okazis la tiujara Ĝenerala Asembleo de **AEA**. En ĝi oni elektis novan estraron de la Asocio, nome:


-Honora Prezidanto: Santiago Mulas Gallego. -Prezidanto: Carlos Enrique Carleos Artime. -Vicprezidantino: María del Mar Pescador Benavente. -Sekretario: Faustino Castaño. -Presaro: Faustino Castaño. -Kasisto Santiago Mulas Gallego. -Bibliotekistino: María Luisa Castaño. -Voĉdonantoj: Ildefonso Domínguez Losada, Eduardo Montoto kaj Celia Rendueles.

Kiel dirite, oni festis en Hispanio en 2005 la 4an Centjaran Jubileon de "La Kihoto". La hispana esperantistaro aldoniĝis al tiu festado kun sia propra programo. La **Fundacio de Esperanto** kontribuis al tio per la disdonado, al bibliotekoj kaj aliaj prikulturaj centroj, de la esperantlingva versio de tiu verko. Nia **Astura Esperanta Asocio** kunlaboris kun la Fundacio en tiu tasko per la transdonado de du ekzempleroj de la Kihoto laŭ la esperanta versio de Fernando de Diego, al kiuj ni aldonis ekzemplerojn de nia propra eldonaĵo, **ASTURA BUKEDO**.

Sed tiuj aktoj, pri kiuj estas abuda informo en nia interreta paĝo, okazis en la jaro 2006, tamen en la unuaj monatoj de la jaro kaj kadre de la festado de la Centjara Jubileo. La unuan transdonon oni faris al la Universitato de Oviedo, la 3an de marto. Profesoro Carlos Enrique Carleos Artime, el la estraro de **Astura Esperanta Asocio**, kaj doktorino María José

Álvarez Faedo transdonis la libron de la Kihoto en Esperanto al la Vicrektorino de la Universitato, Margarita Fuente Noriega, kaj al la Direktoro de la Biblioteko de la Universitato, Ramón Rodríguez Álvarez. La prezentado de la akto estis farita de Luis Valdés Pelaez, tiama Direktoro de la **Katedro Jovellanos de Universitata Disvastigo**, institucio en kiu estas enkadrigata nia Asocio de Esperanto.

Seleco



Seleco





Partopreno de Astura Esperanta Asocio en la festado de la 4a Cenjara Jubileo de la "Kihoto"

Sed tiu dato de la 3a de marto de 2006 estas memorinda por ni ankaŭ pro alia kialo. Tiutage komenciĝis en la Universitato de Oviedo kurso de Esperanto, kiun gvidis la menciitaj María José Álvarez Faedo kaj Carlos Enrique Carleos Artime. Estis la unua fojo en kiu okazis io simila en nia regiono.

La dua transdono de la Kihoto en Esperanto far de nia **AEA** okazis la 20an de aprilo en la Fakultato pri Filologio de la Universitato de Oviedo, en iu akademia akto. Profesoro Antonio Valen prelegis pri la traduk-verkado de Fernando de Diego ĝenerale, kaj ĉefe pri ties tradukado de la Kihoto al Esperanto. Prezintis la preleganton doktorino María José Álvarez Faedo, el tiu Universitato de Oviedo. Poste oni efektivigis la transdonadon de la ekzemplero de la Kihoto en Esperanto, donita de la **Fundacio de Esperanto**, kaj ekzempleron de la verko **ASTURA BUKEDO**, donita de **Astura Esperanta Asocio**, al Isabel Suárez Melgar, direktorino de la biblioteko pri humanismaj studoj de tiu Universitato de Oviedo. Ankaŭ pri tiuj aktoj estas ampleksa informo en nia interreta paĝo.

Alia akademia akto en la sama fakultato de tiu Universitato de Oviedo okazis la 19an de majo de tiu sama jaro. Tiutage estis la fermo de la kurso de Esperanto kiun estis gvidinte tie María José Álvarez Faedo kaj Carlos Enrique Carleos Artime.

Kiel ferma akto de la kurso estis prelego pri Esperanto kaj ties iniciatinto L.L. Zamenhof. La prelegon faris Faustino Castaño kaj krom la gestudentoj partoprenintaj la kurson estis ankaŭ alia invitita publiko al kiu interesis la temo.

Pri tiu akto estas raporto en la interreta paĝo. Ekde ĝia ekfunkciado, tiu paĝo atestas pri ĉiuj aktoj de la vivo de nia E-asocio sed krome ankaŭ pri multaj aliaj aferoj ĉar ĝi estas malfermata al ĉiutipaj temoj cele montri al la publiko ke pere de esperanto oni povas pritrakti ĉiutipajn temojn.

La 81a numero de **HELECO**, kiu aperis en oktobro de 2006 estis speciale dediĉita al Kristoforo Kolombo kaj ties famaj geografiaj malkovroj rememorante la morton de tiu fama maristo kiu okazis ĝuste antaŭ 5 jarcentoj. Ankaŭ ĉi tiu numero de la revuo estas tute kolora. Post 15 jarojn, la revuo ĉesis esti du-lingva kaj denove estis eldonita nur en Esperanto. Krome oni ne faris el ĝi tiom da ekzempleroj por distribuado kiom antaŭe. Jam ni menciis tion ke la sperto de tiu dekkvinjara periodo estis ke tiuforma eldonado ne estis rentebla de esperantista vidpunkto kaj krome rezultis tre alte-kosta de ekonomia vidpunkto. Cetere, ĉar la revuo estas publikigata en la retroŝto de la Asocio, ĝi povas esti vidata en ĉiuj mondpartoj kaj en plejparto el la mondo la hispana lingvo ne estas pli bone konata ol Esperanto mem.



Prelego kiel ferma akto de la unua kurso de Esperanto en la Universitato de Oviedo

La esperantista festo de la jaro 2006 okazis la 17an de decembro. Tiu jare organizis ĝin nia **AEA**, sed tamen ĝi ne okazis en Gijón kiel kutime ĉe ni, sed en Candás. Unue estis meso en Esperanto en la preĝejo de tiu urbo kaj poste la gesperantistoj de la du asturaj E-grupoj bankedis en restoracio.

La kurso de Esperanto de la lernojaro 2006-2007 estis komencita de Santiago Mulas, sed li povis gvidi la klasojn nur dum la unua trimonato, ĝis la ferieto de Kristnasko-tempo. En unu el tiuj feriotagoj li suferis gravan akcidenton kiu devigis lin ripozi por kuracado dumlonge. La klasoj de la cetero de la kurso estis gviditaj de Carlos E. Carleos kaj Faustino Castaño.

Fine de monato aprilo de 2007, Aida Álvarez, ĵurnalistino de "El Comercio", faris intervjuon en la ejo de nia Asocio. Ĉeestis ĝin la gelernantoj kaj la instruistoj de la lerno-kurso. La demandoj temis pri la historio de Esperanto kaj nia Asocio, pri la trajtoj de la lingvo (ĉefe ĝia lernofacilo), k.t.p. Oni publikigis la intervjuon la trian de majo de 2007.

Malmultajn semajnojn post tiu intervjuo de "El Comercio" (la dudekkvaran de majo) telefonis ĵurnalistino de **TPA** (Televido de la Asturia Princlando) telefonis al la Prezidanto de nia Asocio, Carlos E. Carleos, por fari raporton pri la Asocio. La rendezuo okazis en Oviedo, en la Universitata Kampuso Llamaquique, kie tiujare estis disvolvigata Esperantokurso. La demandoj estis pri Esperanto, nia Asocio...

Ĉar nia **Astura Esperanta Asocio** estas enkadrigata en la Katedro "Jovellanos" pri Universitata

Disvastigo, kiam, en monato junio de 2007, post la finiĝo de ĉiuj kursoj en la Domo de la Katedro, oni efektivigis la translokigon, ĉiuj dependaĵoj, ankaŭ nia Esperanto-Grupo, estis translokitaj al nova konstruaĵo, en la numero 1 de la strato Tomás y Valiente. En tiu nova loko oni disponigis al ni bone situitan ejon, multe pli ampleksa ol la antaŭa kaj tre taŭga por niaj laboroj de Esperanto-instruado, kunsidoj...

La informo pri ĉiuj ĉi aferoj, kompreneble, estas registrata en la numeroj de **HELECO** de tiuj jaroj, sed ekde majo de la jaro 2006 nia E-grupo havas alian informilon. Ĝia titolo estas, precize, **AEA-Infomilo**. Tiu publikigaĵo, el kiu ĝis nun aperis 5 numeroj, estas destinita nur al la membroj de la Asocio, kaj ĝia enhavo posedas nur esperantistan intereson. La kolekto de **AEA-Infomilo** troviĝas, ankaŭ ĝi en la retpaĝo de nia E-Asocio.

En la E-kurso de la lerno-jaro 2007-2008 Santiago Mulas, povis, post la resaniĝo el la sekvoj de la akcidento kiun li suferis la antaŭan jaron, reintegrigi al la instruado. Estis instruado de baza kurso, sed tial ke estis gelernantoj de antaŭaj jaroj, kun pli da sperto, kaj novaj lernantoj, estis necese fari duan kurson, ankaŭ bazan, kiun gvidis Carlos E. Carleos. La klasoj de tiuj kursoj okazis jam en la nova loko de la Katedro.

En septembro de 2007 estis eldonita la 82a numero de **HELECO**. Kiu estas videbla, same kiel la antaŭaj, en la Interreta paĝo de nia E-Asocio. La temaro estis tre diversa, sed inter la abunda materialo rimarkindas serion da artikoloj kaj prelegotekstoj pri la problemoj de la paco kaj la milito.



Zamenhofa Tago de la jaro 2006 en Candás

La atesto de Carlos E. Carleos



Mi aĝis ĉirkaŭ dek unu jarojn kiam, promenante kun mia patro en la Ŝiŝona komerca foiro, renkontis budon dediĉitan al "Esperanto". Tiun vorton mi jam konis, kvankam mi ne komprenis ĝin tute. En la budo propagandis por esperanto S-ro Santiago Mulas, kiu plene konvinkis min kaj mian patron pri la bonecoj de tiu stranga artefarita lingvo. Mi estis tre legema, do mia patro koncedis aĉeti al mi interesan libron vendatan en la budo: E-Hispana kaj Hispana-E Poŝvortaro, de Eldonejo Sopena.

Ankoraŭ ofte mi portas en mia poŝo tiun bonegan vortaron. Mi ŝatas ĝin pro ĝia malgranda amplekso, ĝia kompleteco kaj ĝia konciza gramatiko, kiu enhavas klarigojn tiajn, kiajn mi trovis nenie alie.

Per tiu libro mi mem lernis la bazojn de Esperanto, kio ebligis min legi internaciajn revuojn kaj bultenojn antaŭ ol komenci lerni la anglan en lernejo (tiam en publika lernejo oni kutime komencis lerni unu eksterlandan lingvon ekde la aĝo de dek du jaroj). Mi memoras ekzemple la bultenon Esperanto-95, eldonata de franca E-grupo, kie mi ekkonis la Siberian Lulkanton de Julio Baghy.

Ŝajnas ke mi estis tiam tro juna, kaj de mia vilaĝo (Candás) mi ne kuraĝis iri al Gijón por la renkontiĝoj en la sidejo de AEA. Ankaŭ iel mi korespondis kun neniuj; mi malfacile emas skribi leterojn. Do, poiome, mi perdis intereson pri E-o. Ŝajnis al mi ke neniuj plu uzas ĝin. Dum la postaj jaroj mi studis la anglan kaj la francan en lernejo, kaj eksterlerneje mi provis la italan kaj la germanan. Konstatinte ke mi neniam flue parolos neniun fremdan lingvon, kaj post mia tria malsukcesa provo eklerni la germanan, mi memoris pri la instruaj avantaĝoj de E-o. Krome, jam ekzistis Interreto! Do mi ekkonsciis ke, kvankam relative malmultaj, en la planedo estis kelkaj miloj da E-parolantoj kun tre interesaj aferoj preparolindaj.

Tiam mi decidis rekontakti la lokan asocion. Mi rerenkontis S-ron Santiago Mulas (al kiu mi redankas mian enkondukon en E-ujon pri kiu li kulpas) kaj ekkonis la ceterajn membrojn de AEA. Mi dankas ilin ĉiujn pro la agrablaj horoj pasigitaj kune: en E-kursoj, en Zamenhofaj tagoj, en prelegoj... eĉ en la ordinaraj asembleoj! Kompreneble, AEA ĉiam estis kaj plu estas malfermita por kunlabori kun iu ajn interesata pri Esperanto. Ofte ni traktas kun nia frata asocio, Antaŭen el Avilés. Ni kunlaboras kun la docento de Universitato Oviedo d-rino María José Álvarez Faedo por aranĝo de E-kursoj. Ni vizitas la bienon de nia amiko Valentin', membro de Pasporta Servo, kiam li gastigas E-istojn.

Multaj karaj membroj kaj simpatiantoj de AEA jam forlasis nin, bedaŭrinde. Ni esperu ke dum multaj jaroj AEA estu utila por la movado E-isma en Asturujo. Ni plu laboru tiucele.

Por feliĉa dua jarcento de AEA, hura!

Estas ankaŭ ampleksa historia raporto pri la mezepokaj templo-kavaliroj tial ke tiujare estis la sepa centjaro de la procezo al tiu ordeno, kiu kulminis kun ties nuligo.

Dum tiu jaro 2007 pludaŭris la enkondukado de novaj materialoj en nian interretan paĝon. Feliĉe ni disponas je sufiĉe ampleksa storejo por tiu celo ĉe Interret-servisto kiun disponigis al ni Carlos E. Carleos. En nia paĝo oni povas trovi, krom informado pri la agado de nia Asocio, ankaŭ tradukaĵojn el naci-lingvaj verkoj, raportoj, artikoloj, kantoj, tekstoj pri historio, religio, politiko, filozofio, scienco, informadiko, recenzoj de libroj kaj filmoj... Interreto permesas transsalti, en la interkomunikado, la geografiajn limojn de la loĝloko. Eblas ke nia retpaĝo estu vidata en ĉiu ajn loko en la mondo. Fakte, ni ricevas iujn mesaĝojn de personoj el fremdaj landoj kiuj vizitis ĝin. Por ni estas tre agrabla la fakto ke de tre malproksime oni diras al ni ke oni vidis nian Esperantan materialon. Okazas ankaŭ ke en kelkaj aliaj retpaĝoj de esperantistoj ekzistas ligiloj al la lastaj numeroj

de nia revuo **HELECO**, aŭ estas tie la kompleta revuo kiun estis prenita por disponigi ĝin, ekde alies retpaĝoj, al la interret-navigantoj. Tio signifas ke niaj Esperantaj ellaboraĵoj estas interesaj por iuj en la mondo.

Temante pri la vizitoj de geesperantistoj kiujn ni ricevas de tempo al tempo, ni devas mencii tiun de la somero de la jaro 2008. Temis pri renkontiĝo kiun havis kelkaj membroj de nia E-Grupo kun aro da geesperantistoj el diversaj landoj de la Eŭropa Unio. Tiu renkontiĝo okazis en Pruvjo, ĉe la bieno de la kuracisto Valentín Pérez, aliĝinta al la Pasporta Servo, La gastoj estis dekduo da geesperantistoj el Germanio, Britio, Polujo, kaj ĉefe Francio, kiuj adresiĝis, pere de buso speciale luprenita de ili, al Kompostelo kiel manifestaciantoj favore al Esperanto. Dum ilia vojaĝo disdonadis por Esperantan. Sed ĉefe interesa estis alia aktivado kiun ili realigas, Temas pri vere politika aktivado okaze de la balotado por la Parlamento de la Eŭropa Unio. La geesperantistoj



Vizito de gesamideanoj el kelkaj landoj de Eŭropa Unio



de iuj eŭropaj landoj prezentadas proprajn kandidatarojn en la balotkampanjo, kio ebligas kaj rajtigas al ili propagandi per la publika televido de iliaj landoj kaj per afiŝoj favore al siaj kandidataroj kaj pere de tio, fakte, favore al la Internacia Lingvo.

La lasta ĝis nun eldonita numero de la revuo estas la 83a, kiu aperis en septembro de la jaro 2008. Tial ke tiu jaro estis la dua Centjaro de la invado de Hispanio far de la armeo de Napoleono, la ĉeftemo de tiu revuo estis priskribo de tiamaj historiaj eventoj, kaj al ili estis dediĉitaj multaj paĝoj de la revuo.

La 27a de marto de la jaro 2009 okazis Ĝenerala Asembleo de la asocia membraro. Inter la pritraktita temaro estis la organizado de propagando rilate al la ĉi-jara festado de la Centjaro de **Astura Esperanta Asocio**. Estis ĝenerala interakordo pri tio ke nia esperantista rondo ne estas sufiĉe forta por granda festado. Tia estas la afero: unu jarcento post la fondiĝo de la unua esperantista grupo de Esperanto en Gijón kaj en Asturio, ĉiuj geesperantistoj de ĉi tiu urbo kaj eĉ de la tuta regiono povus esti portataj de unu sola aŭtobuso, kaj ankoraŭ restus sufiĉe da liberaj sidlokoj en ĝi. Kion instruas al ni tiu sperto por la dua jarcento de nia asocio, kiu komenciĝas nun? Unue, ni devas ne malatenti la porEsperantan propagandon en nia urbo. Ĝis nun ne mankis ĉe ni tiutipa propaganda agado, ĉu pere de intervjuoj de la informedioj aŭ de notoj niaj senditaj al la presaro, kaj estis ankaŭ la aktivado ĉe la Festoj de la Lingvoj. Tio ne

sufiĉis por vekti en nia urbo intereson pri Esperanto. Oni devas pristudi aliajn manierojn alveni al la publiko. Ĉu ni devos probi agadon similan al de tiuj fremdaj gesamideanoj kiuj prezentadas esperantistan kandidataron por la Parlamento de Eŭropa Unio?

Kaj due, pere de la ret-paĝo propagandi favore al la internacia lingvo ankaŭ for de niaj lokaj limoj. Nia mesaĝo en Interreto povas alveni al ĉiu ajn loko en la mondo, jes, sed tio ne signifas ke vidos ĝin ĉiuj personoj konektitaj al Interreto. En Interreto oni trovas nur tion kion oni serĉas. Personoj kiuj ne interesiĝas aŭ tute ne scias pri **Esperanto** ne povas trovi ion pri Esperanto en la reto. Ĉi tiun seneliran rondon oni povas rompi per la metado en Interretan de amasa informo kaj materialo per- kaj pri-Esperanta tiamaniere ke la interetaj serĉiloj kiel la programo **Guglo** (Google), respondante al petoj pri kiel eble plej da materioj kaj temoj, provizu ankaŭ esperantlingvajn paĝojn kiuj estu kapablaj vekti la atenton kaj la intereson de la serĉantoj.

Laŭmezure de nia forto kaj kapablo ni devas agadi en tiuj du frontoj: la loka pere de lokaj rimedoj kaj la universala pere de Interreto.

Pasintan 4an de junio de la nuna jaro **Astura Esperanta Asocio** fariĝis centjara. Tiutage ni sendis per reto poŝto esperantistan mesaĝon al tre granda nombro da geesperantistoj kaj esperantistaj organizaĵoj en la kvin kontinentoj, kies retadreson ni

povis atingi. En la sekva paĝo ni prezentas la tekston kaj la bildon de tiu mesaĝo, kiu portis ankaŭ la kantadon de **La Espero**.

Seleco




Pres-organo de:
Astura Esperanto-Asocio



Seleco

Pres-organo de:
Astura Esperanto-Asocio





Astura Esperanta Asocio Centjara



Hodiaŭ, la 4an de junio 2009, la Esperantista grupo de Gijón (Asturio – Hispanio), **ASTURA ESPERANTA ASOCIO**, fariĝas centjara. Ja, ĝi estis fondita ĝuste antaŭ unu jarcento. Ĝi estis la unua esperantista rondo en nia urbo kaj en la Asturia regiono. Poste aperis aliaj E-grupoj tiel en la urbo de Gijón mem kiel en aliaj lokoj de la sama regiono. Iuj el tiuj grupoj malaperis kaj aliaj estis refonditaj, sed en nia urbo neniam mankis esperantista tradicio kaj aktivado laŭlonge de tiu jarcento, spite al ĉiutipaj malfacilaĵoj kaj la indiferento de socio kiu ne konscias pri la lingva problemo kaj ne estimas la utilon de la solvo proponita de L. L. Zamenhof.

Kadre de la celebrado de nia centjariĝo, la sekva numero de **HELECO**, la presorgano de nia Asocio, kiun ni estas preparante, prirakontos la historion de **ASTURA ESPERANTA ASOCIO** kaj ĝenerale de la esperantismo en nia urbo kaj nia regiono laŭlonge de tiu jarcento. La revuo estos publikigita en nia interreta paĝo:


<http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/>

kie estas jam la antaŭaj numeroj, kune kun aliaj materialoj.

Okaze de sia Centjaro, **ASTURA ESPERANTA ASOCIO** sendas fratecan saluton al ĉiuj geesperantistoj en la mondo, kiuj agadas, en simile malfacilaj cirkonstancoj, favore al la nobla idealo de la intergenta paco kaj la homa interkompreno.

Ni instigas nian diligentan kolegaron, ke ili

**en laboro paca ne laciĝu
ĝis la bela sonĝo de l' homaro
por eterna ben' efektiviĝu.**





La Kongreso okazis en urba Junulara Gastejo, tre taŭga por okazigi ĉi tiajn eventojn. La Kongreson ĉeestis ĉirkaŭ naŭdek geesperantistoj. Okazis multaj prelegoj, kiuj konstituis la kernon de la Kongreso. Funkciis libro-servo bone provizita de libroj, zorgata de nia samideano Pedro Sanz. Estis kursetoj de Esperanto kaj ekzamenoj, kontrolitaj de Perla Martinelli kaj Andres Martin; bone sukcesis kelkaj gejunuloj, kiuj atingis la titolon je **“Elementa lernado”**. Du belaj junulinoj prezentis du filmetojn (dek minutojn ĉiu) en Esperanto, en kiuj ili estis la aktoroj kaj la reĝisoroj. Sukceson al vi junulinoj! Estis prezentitaj aliaj tri filmetoj, ĉiuj originalaj en Esperanto. **Mi malfermas mian pardon kaj elpaŝas partoprenantojn** de Eloy Fructuoso. Aliaj du filmetoj: **Cent kaj “Footage”** de la menciitaj junulinoj. Nia amiko Solo prezentis sian muzikon en DVD-disko. Ankaŭ oni prezentis ekspozicion **“Esperanto, Lingvo kaj Kulturo”**.

La subskribinto de ĉi tiu raporto, malfermis la serion de prelegoj per la sia, kies temo estis **Solidareco**, kiun oni povas resumi jene: Mi intencas klarigi, ke Solidareco, tute simple estas fiasko de la socio en kiu ni vivas. La solidareco hodiaŭ, estas kvazaŭ peti almozon. Ekzemplon, kial oni petas solidarecon por kuraci kanceron? tio estas tasko de la registaro, anstataŭ aĉeti armilojn.

En la Kongreso troviĝis Maciej Jaskot, pola samideano, kunlaboranto en Pola Radio, kiu troviĝis en Granado. Li plibonigas en tiu urbo sian scipovon de la hispana lingvo. Longa ekspono, sed en bona Esperanto, pri la laboro de tiu radio-stacio, kiu, malgraŭ ke nunjare okazas la UEA-kongreso, ĝi travivas malbonan situacion, kun eblecoj de malapero.

Prelegis ankaŭ samideanino Perla Marinelli Pri **“La infana raso”**, informo pri la laboro de nia bedaŭrata samideano Willaim Auld. Ŝi elektis tiun faman libron, por omaĝi tiun elstaran samideanon. Vendrede la 3an de julio okazis la Malfermo de la Kongreso. Prezidis ĝin Pedro Hernandez, kiu rememoris diversajn aspektojn de nia hispana movado. Sed la plej granda tempo-spaco estis dediĉata al la ebleco ke Malago estu **“Urbo de la Kulturo”** en la jaro 2016 ene de Eŭropa Unio, distingo al kiu aspiras pluraj hispanaj urboj. S-ano F. Martín del Pozo, kiu verŝajne estas urba komisiito tiucele,

bonege kaj en Esperanto klarigis la celojn kaj avantaĝojn por Malago. Hispanio devas elekti du kandidatojn kaj Polio aliajn du.

Scivoleme mi atendis la tradician salutadon al la Kongreso fare de grupdelegitoj kaj individuaj personoj, sed ĝi ne okazis. Do, mi ne povis saluti nome de **KAE**, nek de neniuj aliaj. Mi ankaŭ ne povis prezenti la **“Semajnon” (INTERNACIA E-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO)**. Kvankam mi ĝin bone diskonigis.

La Esperanto-Grupo de Malaga eldonis, okaze de Kongreso, la faman libron **“Platero kaj mi”**. Nia samideano Miguel Gutierrez Aduriz, bone analizis la valoron de la verko, ĝian mesaĝon kaj la facilecon de ĝia aŭtoro Juan Ramón, kun la rekomendo ĝin aĉeti.

Samideano Aŭgusto Casquero, informis pri sia longa restado en Ĉinio kaj la taskoj de li realigitaj en tiu vastega lando. Pri Ĉinio li diris al ni ke tie estas diversaj ŝtupoj por ĉeesti lernejojn, kaj iuj el ili estas pagendaj. Ekzistas multaj kaj diversaj lingvoj parolataj en konkretaj regionoj. La lernado de la angla lingvo estas deviga en tiu lando. Kompreneble, li ankaŭ aludis al tiuj fotoj, en kiuj li aperas ĉirkaŭata de multaj junaj ĉininoj. Li klarigis, ke en la kursoj pri la hispana kaj Esperanta lingvoj 90% estis junulinoj, jen la kialo de tiuj fotoj.

Jen samideanino Perla Marinelli en alia prelego. **Kontribuo de virinoj al la Esperanto-literaturo**. Ŝi menciis, kun sia vervo kaj posedo de la lingvo, multajn virinojn, kiuj fervore agadis en la Esperanta movado. Iuj el ili, ŝi diris, verkis sen tabuoj pri amo kaj amoro.

Ankaŭ prelegis nia kara amiko Wolfgang Guenther. **Esperanto-ekologiaj, ekonomiaj kaj sociaj argumentoj por neŭtrala Internacia Lingvo**. Li rilatigas Ekonomion, Naturon kun Internacia Lingvo. Li opinias prave, la neceson aktivi en la Ekologio, se ni deziras, ke nia planedo restadu taŭga loko por loĝado kaj por bona interkompeno en mondo sen polucio. Estas necese internacia lingvo, kiu ebligas sanan kaj fratan kunvivadon.

Samideano José Maria Salguero, profesie instruisto amplekse informis pri la **Programo Come-nius**, kiu konsistas je kunvivado de lernantoj el diversaj landoj kaj lingvoj. Li kun siaj lernantoj de Esperanto, ĝuis tiun programon en Italio, kie kune

kun italaj lernantoj de Esperanto, bone profitis la okazon por kunvivi en malgranda Esperantujo. Se iu instruisto de Esperanto interesiĝas pri la temo, volu lin kontakti.

Pedro Hernández, nia Prezidanto, bone kaj detale informis pri instruo de Esperanto al la idoj, kiun li nomis **Denaskiĝo**. Li instruas Esperanton al siaj du filoj, kvankam unu el ili estas ankoraŭ bebo, la alia sesjara jam bonege parolas Esperanton.

Revenis nia samideano Aduriz kun sia serio Sferoj, multaj detaloj, kiel li pretigis tiun libron, kiuj bone sukcesas en la Esperanta merkato.

Ne povis manki nia laborema Rafaela Urueña, kiu per la temo **Kial baloti al la Eŭropa Parlamento**, Rememorigis la longan vojon trairitan ĝis nun. Laŭ ŝi, estas necesa la Eŭropa Unuiĝo se ni deziras, ke nia kontinento, estonte, daŭre estu potenco.

La Ĝenerala Kunsido de HEF. La nunjara kongreso estis tre simila al aliaj kongresoj, en kiuj oni instigas al plia laboro, precipe “akiri” pliajn membrojn. Tiucele la Prezidanto prezentis siajn vidpunktojn. Unu el tiuj opinioj estas, kvazaŭ dividi la landon en regionojn por aktivigi kontaktojn. De ekonomia vidpunkto verŝajne HEF troviĝas en kontentiga situacio kaj por 2010 ne estos plialtigo de la kotizoj.

Ankaŭ oni prezentis la eblecon de UEA-kongreso en 2010, kiu naskiĝis de privata entrepreno, sed nun en manoj de HEF. En septembro vizitos Madridon Osmo Buller.

Pro rezigno de la Prezidanto (elektita pasintjare) estis elektita **Prezidanto**, Pedro Hernández Ubeda, ĝis nun vicprezidanto de HEF.

Luis Serrano Pérez



SOLIDARECO

Prelego de Luis Serrano en la 68a Hispana Kongreso de Esperanto

Unu el la vortoj plej parolataj en la mondo, estas la vorto **Solidareco**. Tiu vorto estas en la menso de ĉiu homo, ĝi akompanas nin konstante. Surstrate oni vidas multajn anoncojn, kiuj atentigas nin pri tiu vorto. Konstante oni marteladas nin pri tiu socia temo. Ĉu tiel grava estas la solidareco? Permesu al mi ke, unue, mi klarigu al vi, kion estas solidareco laŭ **Plena Ilustrita Vortaro**. **Solidara. 1. prenanta sur sin la respondecon pri la agoj de aliaj personoj: -esti solidara kun la samideanoj; senti sin solidara kun la tuta pensanta mondo. 2. Akceptinda respondeco pri la ŝuldoj de aliaj personoj: la edzo estas ŝulda kun sia edzino (analoge) niaj interesoj estas solidaraj. Solidareco. Reciprokra dependenco, komunumeco de interesoj, sentoj kaj agoj. Liberigi la esperantistojn de ĉia suspekta solidareco kun miaj privataj politikaj kaj religiaj konvinkoj (opinio de Zamenhof), striko de solidareco. Interdependa respondeco pri ŝuldoj, mondevoj kaj tiel plu. La solidareco de la heredintoj.**

En tiuj difinoj pri solidareco en la **Plena Ilustrita Vortaro**, estas esprimoj aŭ pensoj, kiuj jam estas for de nia moderna kunvivado. Ekzemple: **la edzo estas ŝulda kun sia edzino**, estas evidente, ke laŭ moderna vivmaniero aŭ laŭleĝe la edzo ne bezonas esti ŝulda kun sia edzino, ĉar la nunaj leĝoj, almenaŭ surpapere ni estas komplete egalaj kaj kun la samaj devoj kaj rajtoj. Mi nenian aŭdas diri, tiu sinjoro ne estas ŝulda

kun sia edzino. Ĉio evoluas en la vivo, mi supozas ke por la bono, kvankam survoje ĉiam troviĝas ŝtonoj kiuj malhelpas nian iradon. Aliaj kurioza frazeto estas **liberigi la esperantistojn de ĉia suspektable solidareco kun niaj privataj politikaj konvinkoj**. Mi konsideras ĉi tiun koncepto altrudita al la esperantistaro, absolute ne akceptebla. Ĉu mi ne povas esti solidara kun miaj privataj konvinkoj ĉu politikaj ĉu religiaj? Tiu konsilo de Zamenhof pensigas min pri la influo de la politiko kaj religio en tiuj tempoj. Ĉu la politiko kaj la religio estis malfavoraj al Esperanto? Almenaŭ mi, hodiaŭ nepre estas solidara kun mia, laŭ vidpunkto privata, kun aliaj personoj, kies pensoj politikaj aŭ religiaj estas similaj al tiuj miaj. Se mi ne sentus tian solidarecon, kia samideano mi estus? Kompreneble, ke tiun senton mi aplikas ankaŭ al miaj Esperantaj gesamideanoj. Kaj se tiu sento al la esperantistoj koincidas kun tiuj aliaj politikaj aŭ religiaj, mi jam estus duobla samideano. En tiu priskribo rilate al solidareco de la **Plena Ilustrita Vortaro 2005**, estas io kion mi ne komprenas: **Kiel interdependa respondeco pri ŝuldoj, mondevoj... la solidareco de la heredintoj**. Mi ne scias, kia estas solidareco de la heredintoj, ĉu temas pri la Esperanta heredo al niaj filoj? Eble en tiuj tempoj, tiu deklaro pri la solidareco estis ĝusta kaj justa. Aŭ la penso de Zamenhof iris for de la limoj de la esperantismo. Ĉar Esperanto estas solidara kun ĉiuj kaj ne povas fari distingojn kun tiuj, kiuj scias aŭ ne scias Esperanton. Sed fakte Esperanto estas lingva movado, kiu povas esti ege valora en la homa komunumo, sed ni ne forgesu ke ĝi estas movado lingva. Apliki ĝin en ĉiuj facetoj de la vivo estas nia devigo. Ĉu tio signifas, ke ni povas esti solidaraj kun aliaj personoj, evidente ni povas helpi aliajn personojn solvi la lingvajn problemojn. Tamen ni devas kompreni kaj akcepti, ke la solidareco estas homa ago kiu anstataŭas taskojn, kiuj jam devis esti plenumitaj de la socio. Jes, ni pere de nia Esperantomovado povas solidare helpi aliajn grupojn. Sed la demando estas, kial se ni havas la kapablon solvi tiujn sociajn problemojn la koncernaj aŭtoritatoj ne kapablas starigi leĝojn, por oficialigi Esperanton? Do la solidareco en ĉi tiu tereno lingva, se vi serioze pensas la aferon, povas konstati, ke nia solidareco funkcias kontraŭ ni mem, ĉar nia interveno evitas, ke la aŭtoritataj diktu specialajn leĝojn por la instruado de Esperanto. Ĉi tio dirite tiamaniere ŝajnas granda absurdo, kaj fakte ĝi estas vera absurdaĵo, ke konante la rimedojn, ĉiam parolante pri la lingva problemo, ni troviĝas en sama situacio. Eble tiu priskribo de la **PIV** bezonas adaptiĝi al novaj tempoj, al la nova pensomaniero de la homo. Estas evidente ke nuntempe tiuj aspektoj de solidareco, esprimitaj en la vortaro, estas iome kadukaj. Tamen mi jam scias, ke nia solidareco lingva kiam ĝi estas petata al ni neniam mankas nia helpo. Eble ni devas esti iomete pli postulemaj. Eble ni devas valorigi multe pli niajn agadon kaj respondecon. Mi jam scias, ke la afero estas grava kaj mal-facila, sed ni devas eliri de ĉi tiu cirklo en kiu ni enfermiĝis.

Ni lasu flanken la rilatojn de la solidareco en la Esperanta movado kaj ni iru al la mondo, al tiu vasta mondo en kiu ekzistas tiom da konfliktoj pro diversaj kialoj. Mondo, kiu en sia aktuala koncepto kaj propra disvolviĝo bezonas multan helpon, se ni ne deziras, ke duono el la homaro pereu meze de tiu alia mondo, en kiu oftas la diboĉado de la necesaj aĵoj kiuj estas tute bezonataj por vivi, por iri antaŭen. Ni ne bezonas longe pensi por scii, kion ni devas fari, kien kaj al kiuj ni devas apliki la nomatan solidarecon. Nia kara mondo estas plena da mizero, mizero, kiu por iuj signifas ne kontentige manĝi kaj por aliaj signi-fas povran kaj mizeran menson kiu ne volas aŭ ne povas kunlabori por estigi mondon pli perfektan, pli justan. Jes, karaj gesamideanoj, por mi la teniĝo de multaj personoj estas abomeninda, kiam ili vidas ke apud sia hejmo estas aliaj homaj estaĵoj kiuj suferas pro maljusteco kaj ili faras nenion. Ho ve! De tempo al tempo ili faras iujn donacojn, kaj pensas ke ili jam faris sufiĉe por tiuj malfeliĉuloj.

Sed ni venu al konkretaj kazoj. Estas la tempo de la Kristnasko, la epoko de paco kaj feliĉo. Vi jam povas konstati, ke abundas donacoj dum ĉi tiuj tagoj de la jaro. Ĉiu estas preta helpi al tiu malfeliĉa homo, kiu vivas surstrate, ke lia hejmo estas granda kartona skatolo. Kaj nun kun nia fama informa medio, la televido, la homoj, profitas la okazon por, unualoke, reteni sian laborpostenon, due la geartistoj de la televidkanaloj sin prezentas al la publiko, por ke la spektantaro konu la situacion en kiu vivas multaj homoj kaj, samtempe, kiel helpi al tiuj mizeruloj. Post adekvata prezentado komenciĝas la televizia parolisto, instigi la rigardantaron, ĉar ni devas esti solidaraj, kun tiuj malfeliĉuloj, kiuj ne havas hejmon nek nenion por manĝi. Post longa parolado la prezentisto denove prononcas la vorton solidareco. Li reliefigas la valorojn de la membroj apartenantaj al nia komunumo, kiuj tiom helpas la mizerulojn. Kaj, kial ili estas mizeruloj? Neniu respondas. Kaj ne nur oni alvokas al la solidareco, ke eĉ oni mencias la karitaton. Oni mencias la solidarecon, kiel unu el la grandaj valoroj de nia socio en kiuj ni vivas, tiu valoro tute simple estas laŭdi la maljustecon de nia amata sociordo, ĉar implicate oni rekonas, ke estas mizero kaj maljustaĵoj. Estas informaj medioj kiuj faras kolektojn, por esti solidaraj kun tiuj membroj de la socio, kiuj estas en malbonaj kondiĉoj. Kaj la radioaŭskultantoj aŭ la televido-spektatantoj malavare donacas monon por helpi tiujn malfeliĉulojn. Oni ne pensu, ke tiuj donacoj estas senprofitaj, ĉar anonco de entreprenado pro ĝia

helpo estas propagando por si mem, ili evitas pagi por anonci sian entreprenon, en ĉiu tiu mondo en kiu ni vivas nenion oni faras sencele. Ĉio havas sian komercan profiton. Kaj daŭre la vorto solidareco estas prononcata kaj ofte en iuj lokoj, anguloj de la scenejo, tre videbla aperas la vorto solidareco. Unue ili devus klarigi, kio estas solidareco, se ne dirante eternan kanzonon por helpi homojn, kiuj bezonas helpon. Ne, ili devas diri ke solidareco estas la vorto per kiu ni kaŝas niajn fiagojn. Solidareco estas la vorto anoncanta, ke en la socio estas maljustaĵoj, ke la socio en kiu ni vivas ne estas rozkolora. Unu el tiuj solidarecoj, kiu pli turmentas min, estas kiam oni petas solidarecon por solvi tiun aŭ alian malsanon. Tio estas io netolerebla. Havigi armilojn por mortigi aliajn civitanojn, kiuj fakte faris al ni nenian domaĝon ĉiam estas la necesaj rimedoj kaj ne estas bezonata la fama solidareco. Plaĉus al mi aŭdi “estu solidaraj kun ni ĉar ni devas aĉeti armilojn cele mortigi aliajn personojn” kaj tiu ekzemplon oni povas apliki al multaj kazoj de nia vivo. Malfeliĉa vorto –solidareco– kiu kaŝas tiom de fiagoj de la homo.

Kiam iu persono solidare helpas alian, li sentas sin kontenta kaj li pravus. Ankaŭ mi estas kontenta kiam de tempo al tempo estas solidara. Kaj mi estas kontenta kiam mi donas iujn monerojn al almuzulo. Solidareco kaj almuzado estas la samo aŭ almenaŭ ili estas vortoj kun tre proksima parenteco. Mi ne scias, ĉu iam ne estos bezonata la solidareco. Se la mondo ne avancis en tiu direkto la mondo estos plena de almuzuloj aŭ se vi preferas, de homoj, kiuj petas solidarecon, Kaj, karaj gesamideanoj, rimedoj ekzistas, oni devas ĉesigi la propran egoismon. Malfacila afero, mi jam scias, ĉar nia socio, manke de aliaj valoroj, funkcias tiamaniere. La egoismo, la avareco kaj la deziro regi aliajn personojn donas fikuraĝon krei la socion en kiu ni vivas. Jes, estas multaj kuncivitanoj, kiuj ne vidas tion, ne komprenas ke alia socio eblas. La solidareco koncernas al ĉiuj facetoj de nia vivo. Sed tamen estas momentoj de nia vivo en kiu la solidareco estas bezonata. En nia lando ekzistas multaj NROj (**N**e **R**egistaraj **O**rganizaĵoj), kiuj laboras por helpi homojn, en diversaj partoj de la mondo sed precipe en Afriko. Laŭdinda laboro estas tiu, kiun faras tiuj kuraĝaj personoj. Danke al ili multaj personoj en la plej granda mizero povas ion manĝi. Sed ni analizu la temon je vidpunkto laŭ diras la homaj rajtoj. En tiu dokumento, dokumento, kiu ege malofte estas aplikata, oni legas, ke ĉiu homo rajtas al deca vivo, al la laboro kaj ceteraj postuloj por ke la vivo de ĉiu homo estu komforta kaj precipe for de tiu mizero, kiu ekzistas hodiaŭ. Sed la plenumo de tiuj rajtoj fakte ne ekzistas, ne estas observataj. Tiele, ke estas regionoj en iuj landoj, kie danke al helpo, al la solidareco de la mondo, t.n. riĉa, povas homoj vivi. La televido tre ofte montras al ni bildojn de kompatindaj personoj en la plej granda mizero. Tio, se ni vivus en socio justa, ne devus ekzisti. Tiuj bildoj montras la fiagadon de la t.n. riĉaj landoj. Ofte longaj vicoj da personoj atendas pacience por ricevi supteleron. Sed, mi volas demandi, ĉu dum la tuta vivo tiuj popoloj, tiuj gentoj devos vivi tiamaniere? Ĉu ĉiam ili devos restadi en tiu mizera stato? Tia solidareco devas ne ekzisti. Tiu solidareco estas la honto de la homoj, kiuj regas nian socion. Infanoj, maljunuloj, virinoj kaj fortaj viroj troviĝas en tiu vicoj de la mizero. Ilia vivo-daŭro ne estas longa. En ĉi tiu kazo la solidareco estas, kiu donas esperojn al tiuj malfeliĉuloj. Sed restu klare, ke tiu solidareco ne devus ekzisti. Se ni vivas en komunumeco laŭ oni diras oni devas trovi rimedojn kaj formojn por eviti tiujn situaciojn. Sed, ni konstante parolas pri la solidareco de la riĉaj landoj al tiuj malriĉaj. La avareco de nia socio ne havas limojn, ĉar tre ofte okazas, ke kompanse al la helpo, al la solidareco, niaj riĉaj landoj ne hezitas eltiri de tiuj landoj la naturajn rimedojn tie ekzistantajn. Altranguoloj entuziasme kreas fondusojn por helpi tiujn landojn plenaj de malsatantoj. Poste, kiel jam dirite supre tiuj sinjoroj aperas, kiel la grandaj protektantoj. En multaj aliaj okazoj oni postulas, ke tiuj landoj aĉetu armilojn. Aparte de tio, ne ĉiam la famaj NROj kondukas honeste, miloj da rimedoj restas survoje en la manoj de la prizorgantoj, de la respondeculoj de tiaj bonfaraj organizaĵoj kaj iam aperas multaj skandaloj. Do, en ĉi tiuj situacioj, kia estas la rolo de la homo? La rolo de homoj, kiuj subtenas tiujn organizaĵojn aŭ iumaniere helpas tiujn malfeliĉulojn, estas meti ĉiujn rimedojn por ke tiuj gentoj ne devu almozi. Se vi rigardas la mapon, vi povas konstati, ke tiuj landoj iam estis kolonioj de la nomataj okcidentaj landoj. Oni devas urĝe pretigi la necesajn rimedojn, ĉu agraran disvolviĝon, hospitalojn, centrojn por eduki la homojn al produktiva laboro. Tio, ja, estus solidareco, ĉar la nuna solidareco estas nur ia formo pro kaŝi la realon de la situacio. Forigu ĉi tiujn kazojn de solidareco, kaj venu la justeco. Kaj minimume kion oni devus fari, en multaj okazoj estas lasi trankvilaj la homojn ke dum miloj da jaroj vivis siamaniere, respekti la rajton, kiun ili havas al la tero, kie ili naskiĝis. Se tio ne okazas, iom post iom oni senarbigas la teron kaj precipe la lokojn, kie loĝas tiuj personoj. Neniam antaŭe, dum ili vivis laŭ siaj kutimoj, ili bezonis helpon aŭ solidarecon, estas ĝuste kiam alvenas la homoj, kiuj reprezentas la progreson, kiam tiuj feliĉaj homoj fariĝas viktimoj de la avareco de iuj personoj, kies celo estas sia propra potenco kaj egoismo.

Estis tambure anoncanta siatempe la dediĉon de la sep-milona helpo de ĉiuj registaroj kaj aliaj instancoj por tiuj homoj kies situacio estas ege malbona. Neniu lando plenumis tiun projekton, malgraŭ la firma

promeso tion fari. Dume, ni vidas la fikondiĉojn en kiuj vivas la mizeruloj. Mi ne volas insisti ĉi tie pri tiuj bildoj, kiujn vi povas vidi ĉiutage per televido. En la mondo estas nutraĵoj por ĉiuj, mankas la volo ilin distribui. Iam mi aŭdis al sinjorino diri, “devas esti almozuloj, ĉar tiamaniere mi povas doni al ili almozon kaj mi gajnos la ĉielon”. Se ni ankoraŭ troviĝas en tiu epoko aŭ situacio, mi jam kompatas la malriĉulojn, ĉefe tiujn, kiuj loĝas en tiuj landoj, kie ili dependas de la volo de aliaj personoj. La solidareco simple estas kaŝi la fiagojn de personoj kaj registaroj. Nur kiam la homo havas siadisponon ĉion necesan por vivi ni suriros la vojon de paco kaj kunvivado. Intertempe ni estu solidaraj, kun la espero, ke ni ne falu en tiu situacio. Ĉar ankaŭ en tiuj ĉi riĉaj landoj la mizero frapas multajn pordojn kaj eniras hejmen kaj restadas. La solidareco estas alvoko por plej bona distribuado de la riĉeco, sed ĉi tio estas grava kialo en nia socio, kie unika celo estas akapari kiel eble plej multe, senkonsidere al la situacio en kiu troviĝas aliaj civitanoj. La solidareco, oni devas diri tion tre laŭte kaj klare, estas fiasko de la socio. Ĉiu ajn socio, kiu alvokas al solidareco estas fiaskinta en tiu tereno. Ni ne povas atenti pri la alvoko nuntempe. Oni petas solidarecon por rekonstrui, tion, kion barbara milito detruis en iuj landoj. Tio ne povas esti nomata solidareco, sed simple daŭrigo de milito fare de fremdaj potencoj. Oni devas kompreni, kio estas solidareco, ĉar en multaj kazoj oni uzas tiun vorton por konfuzi aŭ trompi la civitanojn. Ĉu vi povas imagi socion, en kiu ne troviĝus almozantoj, en kiu la riĉeco, kiun produktas la laboro estus ĝuste distribuata? Kaj leciono pri solidareco estas tio kio okazas nuntempe en nia lando. Peti solidarecon por homo, kiu perdis sian hejmon ĉar ne povis pagi sian hipotecon pro sia senlaboreco. Mi ne scias, kion vi pensas, karaj gekolegoj, sed por mi estas serioza fiasko de tiuj, kiuj okupiĝas pri la regado de la lando, kaj ne gravas, kia lando ĝi estos, nek en kia reĝimo ĝi ekzistas.

Mi ne scias, kio okazis en pasintaj tempoj kaj mi aludas al la viktimoj de genero, kiuj konstante okazas en nia lando, kie laŭdire ekzistas la nomata libero, ĉar se ni volas analizi justecon, certe devus ekzisti aliaj leĝoj. Oni petas solidarecon, kun la parencoj de la viktimoj, sed unue oni devas studi, analizi, kial okazis tiaj abomenaĵoj? Se la civitanoj havus, sufiĉan edukon, se la civitanoj estus devigataj sekvi regulojn por paca kunvivado, fakte tiuj perfortoj ne okazus. Sed ofte nome de unu libereco malbone prezentita kaj malbone obeata, ni alvenas al tiuj situacioj. Kiam la fiago estas farita, oni alvokas al solidareco kun la familianoj kaj estas vero, ke en tiu socio en kiu ni vivas la solidareco estas unu el la rimedoj, kiuj povas trankviligi la familianojn de la viktimo. Sed vi bone komprenas, ke la solidareco estas rimedo por kaŝi la malbonan edukadon kaj kunvivadon de socio malbone organizita. Mi estas solidara en tiuj okazoj, sed mi scias distingi la kaŭzojn kaj kialojn.

Kiam la solidareco ne estos bezonata, fakte ni alvenis al kunvivado ĝusta kaj justa, Eble al iuj el vi tio ŝajnus io stranga, io pri kio vi neniam pensis. Ni predikas konstante la virtojn de nia socio sed malofte vi demandas vin, kiaj estas la malvirtoj. La pasiveco “aktiva” estas unu el la kulpantoj de la solidareca ekzistado. Ankaŭ ĉiu persono povas eduki sin mem; por esti honesta kaj por ke homo sentu la veran fratecon ne estas necese iri al la lernejo. Eble la solidareco devos esti aplikata, kiam iu parenco forlasas nin por ĉiam, tiam oni devas ni troviĝi apud, la suferanta familio. Estas devigo de ĉiu homo, kiu si sentas solidara troviĝi flanken de la familio, ĉar en tiu tereno, la normoj de kunvivado establitaj de kiu ajn reganto aŭ regantoj havas neniam influon, nek kulpas. Preskaŭ ĉiuj moralaj problemoj la solidareco estas tute necesa. Sed apliki la solidarecon pro misfaroj de la socio estas alia afero.

Mi povus meti multajn aliajn ekzemplojn por subteni mian kriterion, ke la solidareco, en la plej multaj okazoj, estas nur fiasko de la socio en kiu ni vivas nuntempe. Do, al ni restas nur starigi socion en kiu ne estos necesaj tiuj homaj bonfaroj. La akcepto de tia socio nun aperas nerealegebla, sed ni devas labori tiucele. La homaro tre evoluis rilate al la tekniko kaj la scienco, sed rilate al la homa kunvivado ni progresis ege malmulte. Pratempe la rilatoj inter la malmultaj loĝantoj ne estis bonaj, hodiaŭ malgraŭ ke la tekniko kaj la scienco metas niadisponon multajn ilojn, kiuj povus agrabligi la vivon, ni troviĝas en similaj rilatoj. Daŭre la homo utiligas la homon siaprofite, kreante tiujn diferencojn, kiuj postulas la t.n. solidarecon. Mi esperas, ke estonte la homaro kapablos krei socion justan por ĉiuj kun egalaj rajtoj kaj devigoj. La tasko, ja, ne estas facila, sed ni ĉiam devas pensi al plibonigo. Vero estas ankaŭ, ke io ni progresis, sed ĉio funkcias tiom rapide, ke mi ne scias, kiom da tempo estos necesa por atingi stadion, en kiu ĉiu homo povos diri: mi estas feliĉa. Kaj en ĉi tiu planedo ni havas ĉion por ke la homaro vivu en konkordo, frateco kaj plena libero, sed por tio estas necese grandan ŝanĝon. La progreso, tiu progreso teknika kaj scienca, havas nian valoron, se la civitanoj ĉiam kverelos por posedo de povo kaj riĉeco. Ĉiuj homaj estaĵoj estas similaj, pli belaj aŭ plimalbelaj, kun tiuj aŭ aliaj kapabloj, kiuj povas distingi unu de la alia, sed kiel membro de la homa raso, ne povas esti distingoj. Neniu persono estas pli supera ol la alia. Neniu homo povas regi la vivon de alia. Ni devas vivi en ne deviga solidareco, sed en plena apliko de homaj rajtoj, por ĉiuj egale.



Universala Kongreso en Bjalistoko

La Universala Kongreso de Esperanto de ĉi tiu jaro 2009 okazis en Bjalistoko, la naskiĝurbo de Ludoviko Zamenhof. La estraro de UEA en sia kunsido la 9an de aŭgusto, ke la 94a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Bjalistoko, por omaĝi la 150an datrevenon de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof en lia naskiĝurbo mem. Ludoviko Zamenhof naskiĝis la 15an de decembro 1859 en Bjalistoko, ĉe la strato Zielona, kiu nun estas nomata strato Zamenhofa. Apud la loko kie iam staris la naskiĝdomo de Zamenhof pendas nun marmora tabulo.

Prepate al la Universala Kongreso en Bjalistoko, en lokaj busoj aperis reklamŝildoj kun esperantaj vortoj. La ŝildoj, pagitaj de la urba registaro, instruis al la urbanoj kelkajn bazajn frazojn. En dudek aŭtobusoj de 17 linioj en Bjalistoko la veturantoj povis lerni diversajn vortojn kaj frazojn en Esperanto. Aldone al reklamŝildoj super la fenestroj, esperantaj frazoj aperis ankaŭ sur televida ekrano plej antaŭe en la buso.

La 21an de julio, la urbestro de Bjalistoko, Tadeusz Truskolaski, solene inaŭguris Esperanto-Centron Ludwik Zamenhof, troviĝantan ĉe la strato Warszawska, n-ro 19 en Bjalistoko. Samtempe kun la malfermo de la Centro oni inaŭguris la konstantan ekspozicion: "Bjalistoko de juna Zamenhof". La Centro troviĝas ĉe la strato Warszawska, n-ro 19. La Centro Zamenhof - kiu estas filio de Bjalistoka Kulturcentro - gvidos la agadon, prezentanta la multkulturan karakteron de la urbo kaj la popularigadon de L. Zamenhof. Oni antaŭvidas, ke la Centro prezentados la konstantan ekspozicion, organizos la portempajn ekspoziciojn, gvidos la edukadon, okazigos seminariojn, prezentaĵojn kaj ekzercadojn.

La Universalaj Kongresoj de Esperanto ofte altiras la atenton de la amaskomunikiloj en la urboj, ĉi foje en Bjalistoko, en kiuj ili okazas. La loka gazetaro, radio kaj televido raportis pri la UK ĝenerale, kaj tiuj raportoj ofte vekas iom da intereso en la loka loĝantaro.

La Solena Inaŭguro de la Kongreso okazis dimanĉe, la 26a de julio, sed la antaŭan tagon jam estis okazintaj ne malpli ol 14 kunsidoj, iuj el ili samtempaj, de diversaj fakoj, komitatoj, organizaĵoj... Laŭlonge de la dimanĉo estis multenombraj aktoj: religiaj servoj, spektakloj, kunvenoj, prelegoj, komuna fotado... Simila intensa programo estis dum la ceteraj kongrestagoj. Ne eblas priskribi ĉiujn aktojn samkiel ne eblis al la kongresanoj

ĉeesti ĉiujn ĉar samtempe okazis kelkaj el ili. Ni priraportos nur iujn el ili.

Ĵaŭde vespere granda grupo de kongresanoj estis invitita al oficiala akcepto en la impona palaco Branicki. Tie dum la kongreso estis montrata vasta ekspozicio pri la familio Zamenhof. La akcepton faris urbestro Tadeusz Truskolaski kun parolado en Esperanto. Sekve parolis Louis Christoph Zaleski-Zamenhof, la nepo de la iniciatinto de Esperanto. Li dankis pri la granda helpo kiun la urbestro donis al la aranĝado de la kongreso. Li aparte menciis la ĵus malfermitan centron Zamenhof kie troviĝas moderna ekspozicio pri la urbo Bjalistoko en la epoko de L. L. Zamenhof. La prezidanto de UEA en sia parolado rakontis pri sia junaĝa konatiĝo kun la verkoj de polaj eminentuloj, kaj aparte menciis la verkon Sinjoro Tadeo de Adam Mickiewicz, kun kiu li povis konatiĝi pere de la klasika esperantlingva traduko de Antoni Grabowski. Laŭ lia analizo, Sinjoro Tadeo temas ne nur pri la konkretaj historiaj okazaĵoj en Pollando lige kun la Napoleonaj militoj, sed ankaŭ pri tio, ke "el gravaj malvenkoj ni lernas, kion ni devas poste fari por ne malvenki denove". Tiun instruon li trovis aparte aktuala lige kun la nuna ekonomika krizo en la mondo. Post la solenaj paroladoj kaj transdono de donacoj la urbo Bjalistoko regalis la ĉeestantajn kongresanojn per luksaj festmanĝaĵoj.

Inter la fakaj kunsidoj de la kongreso, estis tiu de TEJA (Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio). La plej debatiga temo de tiu ĵurnalista kunsido dum la Bjalistoka Universala Kongreso estis rezolucio pri nova litova leĝo, kiu povas severe limigi la liberecon de la amaskomunikiloj. Post ŝtorma diskuto, la ĉeestantoj post voĉdono donis sian aprobon al la rezolucio proponita de vicprezidanto Kalle Kniivilä. Unuanime oni aprobis proponon, ke la estraro de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio turnu sin al la gvidantaro de pola radio kaj esprimu sian zorgon pro la ĵusa malpligo de la esperantlingvaj elsendoj.

En la ĉi-jaraj Belartaj Konkursoj de UEA, Nicola Ruggiero gajnis la unuan premion en la kategorio "poezio". Lena Karpunina ricevis unuan premion por sia esejo kun la titolo "Ni ne entombigu niajn literaturajn trezorojn". En la kategorio "prozo" unua premio ne estis aljuĝita, kvankam la kategorion partoprenis 24 verkoj de 15 aŭtoroj.

En sia ferma parolado, fine de la Kongreso, Probal Dasgupta parolis pri "la enuantoj" kaj "la super-

demokratoj", kiuj tuj post la kongresa fervoro komencas kritike recenzi la ĵusan aranĝon kaj ĉiujn kongresojn, deklarante sin enuantaj aŭ pridubante la elekton de kongreslandoj. "Sendepende de la pravoj kaj malpravoj en tiu prisekvinda debato, mi volus sugesti, ke la postkongresa juĝemo parte respegulas nian embarasiĝon pri nia dumkongresa emociemo", li diris. Sian propran paroladon li finis emocie, per la vortoj de Grabowski: "Agordu la brustojn, ho nia fratar', por nova, pli vigla jam kanto!". Jen lia interveno:

Karaj kongresanoj, Ni kune spertis emocian semajnon en la lulejo de la praesperantisto. Nun ni venas al la fino de nia pilgrimo – de pilgrimo, dum kiu la nepoj nin benis, ĉar ni pacience eltenis dum pli ol jarcento. Vojaĝinte al la individua pasinteco de unu homo, ni konkrete alfrontas la gigantajn aktualajn taskojn de la homaro – en hodiaŭo, kies intensaj interretaj konfliktoj donas specifan urĝecon al la tagordoj de la esperantistoj kaj de la homaranoj. En ĉi tiu momento, kiam ni transiras de nia pilgrimo al energia reengaĝiĝo kun ĉies aktualo, ni evidente devas unue tutkore danki ĉiujn, kiuj ebligis tiel plengaman ĉielarkan sperton dum ĉi tiu pilgrima semajno. Al la LKK, al la Centra Oficejo, urba administrejo bjalistoka, al la eminentaj gastoj, al la postkulisaj ebligantoj - al tre longa listo da kreditoroj ni sentas ŝuldon, dankemon, aplaŭdemon, gratulemon, kaj ni ja plene donu nin al tiuj sentoj, kresĉendaj en festofina jubilo.

Tiu intenseco en la esperantistaj sentoj, kiuj pintas en la klimaksa semajno de la komunuma jaro, stimulas ian reagon en nia cerbo. La poeto Mauro Nervi prave skribis: "Kie mi kaŝas miajn songojn? / En la cerbo, en la cerbo." Ni volas esti raciaj, strategie saĝaj, senstultaj, senmitaj agantoj por pragmatike defendebla celaro, kaj nin akute embarasas la emocioj de la idealismo. Eble parte pro tio, ni ofte, tuj post la kongresa fervoro, komencas recenzi la ĵusan kongreson, ĉiujn kongresojn, tra revizora prismo. En tiu humoro ni deklaras nin enuantaj, aŭ ni pridubas la elekton de kongreslandoj. **Kaj** la enuantoj **kaj** la superdemokratoj negativadas pri niaj kongresoj, kaj en la fervoro de tiu severemo komplete ignoradas tiujn, kiuj argumentas, ke ne estas serioze defendeblaj la juĝkriterioj malantaŭ tiuj ĉiujraj verdiktoj. Sendepende de la pravoj kaj malpravoj en tiu prisekvinda debato, mi volus sugesti, ke la postkongresa juĝemo parte respegulas nian embarasiĝon pri nia dumkongresa emociemo. Sed la pli vasta zamenhofa familio de ni ĉiuj, kiuj en 1888, en la Dua Libro, ricevis de la iniciatinto la rajton kaj la respondecon kolektive plukrei la lingvon (laŭ vojo hodiaŭ

rekonebla kiel vikipedia labormetodo), ne povas stiri nian komunuman ĉaron sen la emocioj de idealismo. La ideo, ke UK estus simple varo, kies vendiĝon oni plej taŭge analizus per merkataj metodoj, aŭ similaj ideoj en sociologia aŭ alia pure objektivisma vesto, laŭ mi maltrafas iujn kernajn faktojn pri nia situacio, kvankam kompreneble UEA volonte malfermas sin al ĉiuspecaj studemuloj kaj kritikemuloj, kaj ĉion farados por kiel eble plej kuraĝigi kaj antaŭenigi la objektivigon kaj profesiiĝon. (Mi havas la permeson de Dennis Keefe kaj Zbigniew Galor publike skeptiki pri iliaj manieroj skeptiki.) Eble ni nin komprenos pli bone, se ni ekvidos, ke nia idealismo estas hodiaŭ en tiu sama pozicio, en kiu estis la demokratiemo en la antikva socio en Grekujo. La antikvaj grekoj – nomu ilin helenoj, se vi emas – kovis la demokration en la sino de tia sama hierarkio de mastroj kaj sklavo, kian ĉiuj tiutempaj socioj rigardis kiel normalan. Tamen, kontraŭ ĉia verŝajno, el la greka socio kreskis tia demokratio, kian oni poste trafis aliredakti en universalan formon. El la etoso de Romio, kies publiko pretis brutale aplaŭdi leonojn nevegetarismajn, venis la kristanismo. Malgraŭ la neniel admirebla reĝimo de la rusaj caroj, la mondo estas danko al la rusimperia humo pro Zamenhof, pro Tolstoj, kaj finfine pro tiu alilanda disĉiplo de Tolstoj, kies bildo ornamas la monbiletojn de Barato – Mahatma Gandhi. Simple dirite: kvankam la mallumo ĉirkaŭas nin, tamen ne estas racie perdi la fidon. Ni laboru kaj esperu. Por ke ni povu racie fidi al la hodiaŭaj energioj, ni malpli bezonas la nostalgio pri la pasinteco, kaj pli bezonas aktualan reinterpreton de nia zamenhofa heredaĵo. Mi mem – eble ĉar mi foje persone portis saluton de la nepo de Zamenhof al nepo de Gandhi – rigardas Zamenhof kiel similan al Mahatma Gandhi, do kiel avangardan pioniron de sisteme malmilita aliro al la strebado kontraŭ la malegaleco, la ŝovinismo, la ekspluatado, la subpremado. Post la malrapida, plurstupa efektiviĝo de la programo de la Ligo de Nacioj por la malkoloniigo de ĉiuj klasike koloniigitaj landoj kaj post la serioza memstariĝo de la orienteŭropaj landoj ekde 1989, la ĉefaj traktendaj konfliktoj ne plu temas pri absurda mondmapo kun maljustaj imperilimoj aŭ ŝtatlimoj. Hodiaŭ en ĉiuj socioj ni spertas konfliktojn inter elito kaj popolo, inter viroj kaj virinoj, inter altaj kaj malaltaj popoltavoloj, inter haŭtoj purpuraj kaj bluaj kaj oranĝaj, inter delongaj loĝantoj kaj lastatempaj enmigrintoj, do ĝenerale inter pli kaj malpli potencaj homgrupoj. Diference de la klasikaj problemoj, tiujn ĉi problemojn neniu proponas solvi per redeseĝno de la mapaj landlimoj. Ni ne povas el ĉiu lando elhaki, ekzemple, viran respubli-

kon kaj virinan respublikon per secesio de la virinaro. La demando estas, kiamaniere homoj kunekzistu kaj malgraŭ ĉio alparolu la maljustulojn, kun kiuj ili estas en stato de senelira konflikto. Gandhi instruis, ke la metodoj uzendaj en nia epoko devas baziĝi sur la neperforta rezistado al la malbono. De Zamenhof ni lernis, ke temas pri komunika problemo, kies solvo estas parte lingva. Ambaŭ majstroj emfazis, ke oni devas lanĉi novan tipon de konversacio kun sia malamiko, kaj ke la procezo restos dolora kaj iom ĥaosa, ĉar la homa eksplodemo kaj eksplodigemo ne malaperos per ia tuj magia, sed ke oni tamen trovos, ke per la serioza aŭskultado oni transformas sin, kaj per tio la dialogadon, kaj per tio iom post iom la aliulon, kvankam dum multaj jaroj la pliboniĝantaj ekspluatantoj tamen dolorige plu suferigados siajn viktimojn pro enostiĝinta kutimo tion fari. Mi tial volas proponi al vi, ke surbaze de tiu zamenhofa-gandhia programo la esperantista konversaciado regu unu strion de nia pensado pri la asocia laborplano, pri kiu la debatoj nun ekas. Mi poste pli detale ellaboros tiun mian ideon de "teranismo", el kiu mi ĵus koncizege skizis por vi unu pensfadon: temas pri versio de la homaranismo kun media suplemento. En 2010 UEA devos formuli kaj adopti novan strategian laborplanon por la jardeko 2011-2020. Mi ĵus kuncerbumis kun vi pri kelkaj elementoj de tio, kion povas kontribui al ĝi la jubilea pilgrima etoso de la bjalistoka kongreso. Mi denove dankas, en la nomo de ĉiuj pilgrimantoj, al tiuj, kiuj nin gvidis tra kaj gastigis dum ĉi tiu unika sperto. Tre koran dankon – el niaj koroj, kiuj lernis nove kori en tiu ĉi urbo, kie oni trafis disŝuti la kongresan magion tra la kvartaloj, tra la aero, tra la arboj. En la fino, kun Grabowski, ni diru unuj al la aliaj: Agordu la brustojn!

REZOLUCIO DE LA KONGRESO

La 94a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Bjalistoko de 25a de julio ĝis 1a de aŭgusto 2009, kun partopreno de preskaŭ 2000 homoj el 63 landoj en la jaro de la 150a datreveno de la naskiĝo de la kreinto de Esperanto, Lazar Ludwik Zamenhof, kaj samtempe en la Internacia Jaro de Akordiĝo proklamita de Unuiĝintaj Nacioj, **diskutinte** la kongresan temon "Krei pacan ponton inter la popoloj: Zamenhof hodiaŭ", kaj studinte kun aparta atento la vivon kaj verkojn de Zamenhof, **notinte** la fakton, ke la urbo kaj regiono de Bjalistoko pli kaj pli rekonas la escepte gravan rolon, kiun Zamenhof ludis kaj daŭre ludas kiel monde rekonata figuro en la morala evoluo de la homaro, **konsciante**, ke tiu rekono konkretiĝis interalie en la malfermo de Centro Zamenhof fare de

la urbaj aŭtoritatoj de Bjalistoko, kaj en propono, ke la Bjalistoka Universitato ricevu la nomon Zamenhof; **memorigante**, ke okaze de la 100a datreveno de la naskiĝo de Lazar Ludwik Zamenhof Unesko rekonis lin kiel unu el la grandaj personecoj de la mondo, kaj ke tra la jaroj venis multaj similaj rekonaj pri la meritoj de Zamenhof kiel granda monda pensulo, **kaj gratulante** Unuiĝintajn Naciojn pro ĝiaj iniciatoj rilate al la ideo de akordiĝo, tiel esenca en mondo kiun dividas malakordoj pro antaŭjuĝoj kaj manko de toleremo, **konstatas**, ke

1. Per la internacia lingvo Esperanto, Zamenhof kreis unike efikan ilon de internacia komunikado sur neŭtrala bazo, sen favori unu popolon super alia, kaj sen favori unu etnan lingvon super alia, kaj ke tra pli ol 120 jaroj da uzado Esperanto pruvis sian taŭgecon kiel internacia lingvo plene adaptebla kaj adaptita al ĉiuj komunikaj bezonoj.
2. Tamen, Zamenhof samtempe komprenis, ke lingvo estas kolektiva posedaĵo, kaj konfidis la evoluon de sia lingvo al ties komunumo de uzantoj, tiel ke Esperanto kaj ĝia kulturo fariĝis esence kreaĵo kolektiva, kiu evoluis en spirito de lingva demokrateco.
3. Tion farante, Zamenhof ankaŭ rekonis, ke utiligo de neŭtrala lingvo en la internaciaj rilatoj helpus konservi lokajn kaj regionajn lingvojn kaj kulturojn kaj la identecon de ties komunumoj.
4. Zamenhof ankaŭ signife kontribuis, per siaj verkoj kaj agoj, al klopodoj forigi la malamikecon inter la anoj de la diversaj religioj, al forigo de rasaj antaŭjuĝoj, kaj al rifuzo de milito kiel akceptebla maniero solvi disputojn – valoroj same gravaj en la nuna epoko kiel en la epoko de Zamenhof.
5. Sekve, Zamenhof plene meritas pli da atento ne nur kiel kreinto de lingvo sed kiel persono, kiu strebis al aŭtenta frateco inter la homoj surbaze de plena kaj reciproka kompreniĝo.
6. Tia frateco povas veni nur kiam la homoj interkompreniĝas en recipoka respekto – procedo, en kiu Esperanto povas ludi kaj jam ludas unikan rolon.
7. Interkompreniĝo estas esenca paŝo al tiu profunda kaj daŭra akordiĝo, kiu estas la celata idealo de la Internacia Jaro de Akordiĝo.
8. Akordiĝo eblas nur en situacio, en kiu lingvaj diferencoj ne formas baron al egaleca dialogo.
9. En tiu senco Esperanto estas unike taŭga kiel bazo por daŭra akordiĝo, kaj Universala Esperanto-Asocio, per sia atento ankaŭ al moralaj valoroj kaj al respekto de homaj rajtoj, povas signife roli en plenumo de la celoj de la Internacia Jaro de Akordiĝo.

Ni ridu iomete

Kara edzino, neniel mi supozis ke la ekonomia krizo tiel mal-favore efikus kontraŭ ni. Ni devos fari ŝparaĵojn.



Mi pensas ke se vi lernus kuir-arton, ni povus maldungi la kuiristinon kaj ŝpari ŝian salajron.



Bona ideo! Kaj se, krome, vi lernus fik-arton, ni povus maldungi ankaŭ la ĉef-serviston, la ŝoforon kaj la ĝardeniston.



Kelnero! Alportu al mi krado-rositan pladon da marestaĵoj, pladon da hispana ŝinko kaj kolbasoj, botelon da bona vino, kaj kiel deserton, glaciaĵon el ĉokolado.



Jes, sinjoro. Mi tion alportos al vi, kaj... kion al via edzino?



Al mia edzino vi povas sendi telefakson rakontante al ŝi kiel lukse kaj feliĉe mi travivas ĉi tagojn...



Instruistino, mi vin amas. Mi arde deziregas vin...



Jaĉjol! Al mi ne plaĉas infanoj.



Nu, tiukaze ni klopodos ke vi ne gravediĝu.



Diru al mi, avo, ĉu vi estis en la Arkeo de Noa?



Ne, kara nepineto, mi ne estis tie.



Ĉu vere? Kial, do, vi ne dronis?

